

VERKALO EL LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCIOJ
SAN MARINO

Věra Barandovská-Frank

Enkonduka lernolibro de

INTERLINGVISTIKO

Edtura Universitata de Sibiu
1986

ISBN 973-95604-6-8

© PDoc. Dr. habil. Věra Barandovská-Frank

Unua eldono, presita en 1995 ĉe Editura Universităţii, Sibiu-Hermannstadt (RO)

ANTAŬPAROLO

Tiu ĉi libro ne celas esti elĉerpiga monografio pri interlingvistiko, sed la enkonduka lernolibro por ĉiuj, kiuj volas pri interlingvistiko aŭ koncize informiĝi, aŭ poste pli profunde studi ĝin. Ne plu ekzistas duboj, ke ĝi estas scienco kaj kiel tia ĝi havas rajton esti studata. Pri la kompleta enhavo de studfako interlingvistiko tamen ne ankoraŭ regas unueco. Laŭ lokaj kondiĉoj kaj bezonoj, laŭ specialiĝoj de instruistoj ktp ĝi ricevas individuajn karakterizilojn jen en Torino, jen en Budapeŝto, jen en Berlino kaj alie. Ĉar temas pri interdisciplina scienco, ĝi ja povas esti utila eĉ por studentoj de pedagogio, psikologio, informadiko, sociologio, klerigteknologio kaj aliaj fakoj.

Tiu ĉi lernolibro originale estis dediĉita al studentoj de interlingvistiko en Sibiu-Hermannstadt, sed espereble ĝi estos utila ankaŭ aliloke, ne nur por studentoj kun lingvistikaj antaŭscioj. Ĉiukaze, kiel kompilintino mi estos aparte dankema al ĉiuj, kiuj pretas prijuĝi, prikritiki, pruvi kaj kompletigi ĝian enhavon, precipe per tute konkretaj fakaj kontribuajoj, kiuj ankoraŭ mankas ĉefe en la parto 1.2. Bona lernolibro ja apenaŭ povas esti verko de unu aŭtoro, necesas multflanka kaj faka kolektivo, aparte en la scienco, por kiuj tiatipaj lernolibroj ankoraŭ ne ekzistas. Tial mi lanĉas ĉi verketon esperante, ke en kunlaboro de ĝiaj uzontoj eblus kompletigi bonkvalitan kaj utilan veran lernolibron.

PDoc.Dr. Věra Barandovská-Frank

Kleinenberger Weg 16

D – 33100 Paderborn

ENHAŬTABELO

1. LOKO DE INTERLINGVISTIKO EN LA SCIENCJOJ	4
1.1 LINGVISTIKO	4
1.1.1 <i>Difino kaj enhavo</i>	4
1.1.2 <i>Lingvo</i>	5
1.1.3 <i>Historio de lingvistiko</i>	5
1.2 INTERLINGVISTIKO	7
1.2.1 <i>Difinoj kaj objekto</i>	7
1.2.2 <i>Lokigo en la sciencoj</i>	11
1.2.3 <i>Interlingvistiko kaj kulturo</i>	12
1.2.4 <i>Interlingvistiko kaj semiotiko</i>	13
1.2.5 <i>Interlingvistiko kaj psikologio</i>	14
1.2.6 <i>Interlingvistiko kaj lingvopolitiko</i>	15
1.2.7 <i>Interlingvistiko kaj kibernetiko</i>	17
1.2.8 <i>Interlingvistiko kaj pedagogio</i>	18
1.2.9 <i>Interlingvistiko kaj sociologio</i>	19
1.3 DEMANDARO.....	20
2. LA INTERNACIA LINGVOSITUACIO.....	20
2.1 ETNOLINGVOJ.....	20
2.2 LINGVONORMIGO EN ETNOLINGVOJ.....	23
2.3 LINGVOJ ADAPTITAJ POR INTERNACIAJ KONTAKTOJ	25
2.4 NATURAJ INTERLINGVOJ	27
2.4.1 <i>Antikvaj lingvoj</i>	27
2.4.2 <i>Piĝinoj kaj kreoloj</i>	36
2.5 EŬROPA MULTLINGVECO.....	39
2.6 DEMANDARO.....	43
3. KLASIFIKADO KAJ KONSTRUKTERIOJ DE PLANLINGVOJ	43
3.1 KLASIFIKADO	43
3.1.1 <i>Tradicicia klasifikado laŭ Moch – Couturat – Leau</i>	43
3.1.2 <i>Klasifikado laŭ S. N. Kuznecov</i>	44
3.1.3 <i>Klasifikado laŭ D. Blanke</i>	45
3.1.4 <i>Klasifikado laŭ esprimformo</i>	45
3.1.5 <i>Klasifikado laŭ A. Bausani</i>	46
3.1.6 <i>Klasifikado laŭ la esprimeblo de projektoj (laŭ A. Münnich)</i>	47
3.1.7 <i>Klasifikado laŭ la detalgrado de prilaboro (laŭ D. Blanke)</i>	47
3.1.8 <i>Klasifikado laŭ grado de artefariteco (laŭ E. Svadost)</i>	47
3.1.9 <i>Klasifikado laŭ tipo de morfosintakso (laŭ T. Carlevaro)</i>	47
3.1.10 <i>Opozicia klasifikado (laŭ V. P. Grigorijev)</i>	48
3.2 KONSTRUKTERIOJ	48
3.3 DEMANDARO.....	53
4. ETAPOJ DE LA EVOLUO DE INTERLINGVISTIKO; HISTORIO DE PLANLINGVOJ.....	53
4.1 UNUAJ NESISTEMIGITAJ PROJEKTOJ.....	53
4.2 HUMANISMO KAJ FILOZOFIAJ LINGVOJ	54
4.3 DE HUMANISMO ĜIS VOLAPŬK	56
4.4 LA PLANLINGVISTIKA PERIODO — DE VOLAPŬK ĜIS ESTANTECO.....	58
4.5 NUNTEMPA STATO DE INTERLINGVISTIKO	66
4.6 DEMANDARO.....	70
5. DETALA PREZENTO DE LA PLEJ SUKCESINTAJ PLANLINGVOJ.....	71
5.1 VOLAPŬK (JOHANN MARTIN SCHLEYER, 1879)	71
5.2 INTERNACIA LINGVO DE DOKTORO ESPERANTO (LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF, 1887).....	74
5.3 IDO (LOUIS COUTURAT – LOUIS BEAUFONT, 1907).....	78
5.4 LATINO SINE FLEXIONE (GIUSEPPE PEANO, 1903)	80
5.5 OCCIDENTAL (EDGAR DE WAHL, 1922).....	83
5.6 NOVIAL (OTTO JESPERSEN, 1928)	86
5.7 INTERLINGUA (ALEXANDER GODE, 1952).....	89

5.8	DEMANDARO.....	93
6.	PRAKTIKA UZO DE PLANLINGVOJ SUR LA EKZEMPLO DE ESPERANTO	93
6.1	PERKOMPUTILA TRADUKADO	94
6.2	PAROLSINTEZO	96
6.3	LINGVOORIENTIGA INSTRUADO.....	97
6.4	DEMANDARO.....	102

1. LOKO DE INTERLINGVISTIKO EN LA SCIENCOJ

1.1 Lingvistiko

1.1.1 Difino kaj enhavo

Lingvistiko estas teoria humanscienco, esploranta ekziston, historion kaj funkciadon de homaj lingvoj. Oni priatentu du elementojn de ĉi (plej ofta) difino: temas pri scienco teoria — la lingvosciencisto do ne devas praktike regi plurajn lingvojn, due temas pri homaj lingvoj, ene de pura lingvistiko oni do ne interesiĝas pri maŝinaj kodoj, nomataj ankaŭ lingvoj. *Ĝenerala* lingvistiko okupiĝas kiel lingvoteorio pri la esenco de la lingvo kaj ĝiaj kondiĉoj, pri la parolprocezo kaj ĝiaj formoj. *Kompara* lingvistiko esploras komunaĵojn kaj diferencojn en la lingvokonstruo, kutime ene de parenca lingvogrupa. *Historia* lingvistiko esploras devenon kaj evoluon de la lingvo. Oni povas esplori aŭ la nunan lingvostaton kaj lingvoformojn, tion faras *sinkrona* lingvistiko, aŭ staton de la lingvo en diversaj etapoj de ĝia evoluo, tion faras *diakrona* lingvistiko. Strukturon de lingvoj en certa evolustadio kun helpo de sinkrona metodo priskribas *priskriba* lingvistiko, dum la *normiga* lingvistiko estas preskriba, ĝi do ne nur konstatas, sed preskribas, direktigas la lingvouzon.

Lingvistikaj disciplinoj prilaboras unuopajn aspektojn de la lingvo. *Fonetiko* studas sonojn de la lingvo laŭ ilia materia vidpunkto, do akustikajn kaj artikulaciajn ecojn kaj ŝanĝojn de vokaloj, konsonantoj, akcentoj, intonacioj kaj similaj elementoj. *Fonologio* studas la samajn elementojn laŭ la vidpunkto de ilia funkcio, do signifon de fonemoj kaj iliajn diferencojn enkadre de la lingva sonsistemo. *Morfologio* studas morfemojn, do lingvoelementojn, kiuj havas propran signifon (vortradikoj, finaĵoj, afiksoj, partikloj), silaban konsiston de vortoj kaj ilian apartenecon al gramatikaj kategorioj (kazo, genro, numero, tempo ktp.). *Sintakso* okupiĝas pri kunmetado de vortoj en frazojn, pri rilatoj inter frazelementoj kaj enfraza vortordo. *Leksikologio* kompetentas pri vortprovizo — laŭ morfologia, sintaktika kaj semantika vidpunkto ĝi esploras unuopajn vortspecojn (t. e. substantivoj, adjektivoj, verboj, prepozicioj ktp.), iliajn formon kaj signifon. Al ĝi apartenas leksikografio kiel disciplino specialiganta pri konstruado de vortaroj. Ankaŭ semantiko apartenas al leksikologio, studante signifon de la vortoj, diversajn signifoŝanĝojn kaj similajn fenomenojn, kiel metaforojn, metonimiojn, sinonimojn, homonimojn, antonimojn k.a. Pri propraj nomoj (personaj, lokaj) specialigatas onomastiko. *Stilistiko* okupiĝas pri elekto de lingvaj rimedoj por kunmeti tekstojn parolajn aŭ skribajn laŭ konkretaj bezonoj kaj kriterioj (skribaĵo aŭ parolaĵo familia, oficiala, scienca ktp.).

Diversaj kromdisciplinoj helpas al la laboro de *aplikata* lingvistiko: individuajn kondiĉojn de la parolo (paroli kaj kompreni) esploras lingvopsikologio kaj lingvofiziologio kun helpo de akustiko kaj anatomio. Pri diversaj parolperturboj interesiĝas psikiatrio, lingvopatologio kaj neŭrologio. La teknikan flankon de interhoma komunikado esploras komunikadscienco, aldoniĝas informaciteorio kaj lingvokibernetiko kaj rilate al maŝina prilaborado de la lingvo ankaŭ matematika lingvistiko, statistiko, komputistiko. Se temas pri lingvo kiel pensinstrumento, helpas filozofio kaj logiko, se pri koda ĥaraktero de la lingvo, taŭgas semiotiko. Pri efikoj kaj rilatoj inter lingvo kaj lingvokomunumo okupiĝas lingvosociologio, kies najbaraj disciplinoj estas etnolingvistiko kaj lingvogeografio. Al diversforma lingvouzo aldoniĝas lingvoinstruado, lingvopolitiko, lingvoestetiko ktp. Lingvon de artaj kreaĵoj priesploras literaturscienco, poetiko, artscienco. Tekstojn esploras filologio, ofte kunlabore kun historio kaj arĥeologio. Lingvistiko do tuŝas ĉiujn humansciencojn kaj parte eĉ natursciencojn, ĉar lingvaj esprimado kaj komunikado havas ege gravan rolon en la homa vivo entute. Al tiatipaj aplikadkampoj apartenas ankaŭ interlingvistiko.

1.1.2 Lingvo

La nocio "lingvo" havas eĉ centojn da diversaj difinoj. La ĉefajn trajtojn de la lingvo enhavas difino de Ferdinand de Saussure: "lingvo estas sistemo da signoj esprimantaj pensojn", kaj tiu de Adolf Erhart : "lingvo estas natura kodo, servanta por komunikado de certa homa komunumo". Gravaj ecoj de la lingvo estas ĝia sistemeco, ĝia koda-signa ĥaraktero, ĝia komunikada funkcio en homa socio kaj la fakto, ke ĝi estas instrumento kaj esprimilo de pensoj. Oni kutime uzas terminon "lingvo" por la enhavo kaj terminon "parolo" por la realigo de la lingvaĵo. La lingvo estas abstrakta sistemo, kiun oni realigas kaj konkretigas helpe de parolo. Tio rilatas al du flankoj de la lingvosigno (laŭ Saussure): ĝia enhavo estas "esprimata" ("signifié") per "esprimanta" kodo ("signifiant"). La rilato inter ambaŭ flankoj estas pure arbitra kaj realiĝanta pro interkonsento ene de certa lingvokomunumo. Estas do hazardo, ke en diversaj lingvoj nomiĝas "domo" "Haus" aŭ "maison" aŭ "casa"; grave estas, ke la koncerna vorto estas uzata por esprimi la ideon "domo" ene de la lingvokomunumo germana, franca aŭ itala. Tiu ĉi fakto estas grava dum la lingvokonstruado kaj lingvoplanado.

Laŭ morfologia vidpunkto ekzistas kvin bazaj tipoj da lingvoj. Preskaŭ neniu lingvo, nek planlingvo, estas tipologie pura, ĝi havas nur la plejmulton da elementoj de certa tipo. Dum sia evoluo povas lingvoj eĉ tiom ŝanĝiĝi sekve de diversaj influoj, ke ili transiras al alia morfologia tipo. *Izoliva* (aŭ: analiza) tipo karakteriziĝas per neŝanĝiĝantaj, prefere unusilabaj vortoj. Gramatikaj kategorioj aŭ ne ekzistas, aŭ esprimiĝas helpe de apartaj vortetoj (prepozicioj, artikoloj, pronomoj, helpverboj ktp.). La vortordo en la frazo estas fiksa. Vortoj povas transiri de unu vortspeco al la alia, novaj vortoj ekestas per kunmetado. Al izolivaj lingvoj apartenas ekz. la ĉina, la Vietnama, polineziaj lingvoj, sed tre izolivaj estas ankaŭ la Angla kaj la Franca. *Aglutina* tipo uzas diversajn afiksojn, kiuj aldoniĝas tiel, ke la limo inter vortradiko kaj afikso restas rimarkebla. Ĉiu gramatika kategorio kaj ĉiu gramatika formo havas propran afikson, tial ne ekzistas helpverboj. Laŭ la fonema aspekto de vortradiko ekzistas t.n. vokala harmonio en afiksoj. Ne ekzistas genro, substantivoj kaj adjektivoj ne kongruas gramatike. Lingvoj de aglutina tipo estas ekz. la Turka, la Tataro, la Hungara, la Armena, la Persa, la Keĉua, mongolaj lingvoj. *Fleksia* tipo ankaŭ uzas afiksojn, sed tiuj estas firme algluitaj al la vortradiko, oni do ne ĉiam rekonas la limon. Unu afikso povas servi al pluraj gramatikaj kategorioj kaj por la sama gramatika signifo povas male ekzisti pluraj afiksoj. La vortradiko povas fonetike ŝanĝiĝi. Ekzistas helpverboj, kazo kaj nombro, kongruo de substantivoj kaj adjektivoj, kongruo de subjekto kaj predikato, la vortordo ne estas fiksa. Originale apartenis al tiu ĉi tipo ĉiuj hindeŭropaj lingvoj, sed multaj perdis fleksion. Plej konataj fleksiaj lingvoj estas la slavaj, la baltaj, la Latina, la Greka. *Introfleksiaj* lingvoj enhavas fonetikajn ŝanĝojn ene de la vortoj por esprimi gramatikajn kategoriojn kaj por derivi novajn vortojn. Apartenas tien ekz. la ŝemidaj lingvoj. *Sinteza* tipo esprimas gramatikajn kategoriojn per kunigo de du plensignifaj vortoj en unu tuton. Ĝi estas ofta ĉe afrikaj kaj aziaj lingvoj, sed ankaŭ ekz. la Germana uzas sintezan principon dum vortkreado.

1.1.3 Historio de lingvistiko

Unua faka priskribo de la lingvo okazis en Hindio en la 5-a jc. a. K. Konatas precipe la gramatiko de Pāṇini. En antikva Grekio lingvistike komentis Aristarkhos en la 2-a jc. a. K. homerajn eposojn. Pri lingvofilozofio jam antaŭ li interesiĝis Plato kaj Aristoteles. Sub greka influo oni gramatikumis en antikva Romo — la gramatiko de Varro estas el la 1-a jc. a. K. La mezepoko interesiĝis precipe pri lingvofilozofio, ekzistis skolo de realistoj, reprezentita de Duns Scotus, kaj de nominalistoj ĉirkaŭ Guillaume d'Ockam. Realistoj asertis, ke nocioj reale ekzistas, nominalistoj opiniis, ke ekzistas nur aĵoj, dum nocioj estas homaj kreaĵoj. Preskaŭ ĉiuj mezepokaj prilingvaj verkoj temis pri la Latina, nur en la 14-a jc. skribis Dante pri la Itala, menciante ankaŭ aliajn latinidojn. Dum renesanco oni pristudis krom la Latina kaj la Greka ankaŭ la Hebrean, la Armenan kaj aliajn

lingvojn, precipe pro historiaj kaj etimologiaj kialoj. Krome ekestis normigaj gramatiko de etnolingvoj, kiuj iĝis simboloj de novaj nacioj. La preskriba gramatiko havis praktikan valoron ankaŭ por libropresistoj, kiuj bezonis unuecigitan lingvonormon. En la 17-a jc. aperis pluaj gramatiko kaj ĉefe vortaroj de etnolingvoj. Menciindas la franca gramatiko de Port Royal el la jaro 1660. En la 18-a jc. regis en la lingvoesplorado filozofia racionalismo kaj enciklopediismo, oni teoriomis pri la natura origino de la lingvo. Ĝenerale kristaliĝis ĝis la dua duono de la 18-a jc., do en t.n. antaŭscienca epoko, tri lingvistikaj direktoj: (1) la retoriko-gramatika, uzata por la bezonoj de literatura lingvo, el kiu oni derivis normativan gramatikon, celante raciigi ĝin en logikan kaj kodigitan sistemon, (2) la filozofia, studanta rilatojn inter lingvo, pensado kaj objektiva realaĵo, (3) la historia, interesiĝanta pri deveno de la lingvoj kaj iliaj genetikaj rilatoj.

Ekde la dua duono de la 18-a jc. oni povas paroli pri scienca lingvistiko, kiam eŭropanoj, ĉefe Friedrich Schlegel, Franz Bopp kaj Rasmus Rask ekinteresiĝis pri sanskrito kaj pri komparo de hindeŭropaj lingvoj. La kompara metodo, laboranta ne kun izolitaj vortoj, sed kun tutaj lingvostrukturoj kaj sistemoj, estas ankaŭ bazo de historia gramatiko, kies fondinto estis Jacob Grimm. Li formulis la unuajn fonetikajn leĝojn por la germana lingvo. Komence de la 19-a jc. estis fama lingvotioriisto Wilhelm von Humboldt kiel kreanto de kompleta lingvoteorio. Ĝiaj precipaj tezoj estis jenaj: (1) la lingvo estas reflektado de homa animo samkiel ekz. arto, ĝi estas esprimo de maniero vidi la mondon, (2) la lingvo estas esprimo kaj karakterizilo de la nacio, (3) ekzistas interna lingvoformo, t. e. imago de koncerna lingvokomunumo, kaj ekstera lingvoformo, t. e. fonetika, morfologia ktp. flanko de la lingvo.

En la duono de la 19-a jc. eniris humansciencojn pozitivismaj teorioj de Auguste Comte kaj evoluteorioj de Charles Darwin. Pozitivisman lingvistikon fondis August Schleicher, komprenante lingvojn kiel vivantajn organismojn. Sekvoj de tia lingvokompreno estis (1) transpreno de natursciencaj metodoj kaj terminologio, (2) detala analizo de lingvofenomenoj, precipe de fonetikaj ŝanĝoj, (3) serĉado de naturaj leĝoj, kiuj determinas lingvoevoluo, kaj de la pralingvoj. Al kontraŭuloj de Schleicher apartenis ekz. Hugo Schuchardt, kiu havis propran teorion pri lingvaj ŝanĝoj, nome ke ili disvastiĝas kvazaŭ akvaj ondoj (ondoteorio). Fine de la 19-a jc. ekestis en Germanio jungramatika skolo, fondita de Hermann Osthoff kaj Karl Brugmann. Laŭ ilia teorio (1) la lingvo estas memstara fenomeno ekzistanta nur kune kun la homa subjekto, (2) la lingvo havas flankon kaj psikan, kaj fizikan, (3) pli grave ol rekonstrui pralingvon estas studi etnolingvojn kaj iliajn dialektojn, (4) fonetikaj ŝanĝoj estas mekanikaj, influataj de analogio, sendependaj de homa individuo. La tezon de mekanikaj fonetikaj ŝanĝoj kritikis ekz. Hermann Paul, kiu substrekadis la psikoanalizon de lingvaj fenomenoj. La psikan kaj individuan faktoron de la lingvo pristudas precipe dialektologio, reprezentita fine de la 19-a jc. per Graziadio Isaia Ascoli, Gaston Paris kaj Pierre Rousselot. En la 19-a jc. la lingvistiko konstituiĝis kiel memstara, grandparte historia disciplino, prefere studanta eksteran lingvoflankon kaj neglektante la homan faktoron.

La 20-a jarcento alportas ĉiam pluajn lingvistikajn teoriojn kaj terminologiojn. *Psikolingvistiko* estis reprezentata de Wilhelm Wundt kaj Henri Delacroix, kiuj esploris la rilatojn inter lingvo kaj pensado, do transiron de ideoj en lingvan esprimon. Psikolingvistoj, ekz. Albert Sècheyne, multe studis sintakson kaj semantikon. *Idealisma* skolo estis orientita sociologieme kaj estetikeme, substrekante rilaton inter lingvoevoluo kaj kulturo. Pri parenceco de lingvo kaj arto skribis Benedetto Croce. Pri stilistiko okupiĝis Karl Vossler, vidante lingvon kiel procezon de kreado kaj evoluo. *Novlingvisma* skolo, fondita de Mateo Bartoli, sintezis klasikan komparan lingvistikon kaj kunlaborigis lingvistikon kun aliaj humansciencoj, ekz. kun literaturscienco, historio, arĥeologio kaj estetiko. *Sociologia* franca skolo estis reprezentata de Antoine Meillet kaj Joseph Vendryès, vidante en la lingvo precipe socian fenomenon dependan de la homaraj sociaj kondiĉoj, malpli de la homa individuo, kiu ja adaptas sian lingvaĵon al la bezonoj de la lingvosistemo. Proksiman, marksisme orientitan direkton reprezentis Marcel Cohen. Nova metodo de la studado de vivantaj etnolingvoj estas esploro de dialektoj laŭ antaŭpreparitaj demandiloj kaj ilia topografia bildigo en lingvoatlasoj

— *lingvogeografio*, fondita de Jules Gilliéron. *Strukturalisman* sinkronan lingvistikon fondis Ferdinand de Saussure, aŭtoro de kompleta lingvoteorio, kiun transprenis la hodiaŭa lingvistiko. Krom la supre menciita teorio pri arbitreco de signo, diferenco inter lingvo kaj parolo, pri diakrona kaj sinkrona lingvostudado ktp. li aljuĝis studadon de lingvaj signoj al semiologio. Li krome diferencigis eksteran lingvistikon (por studi rilatojn inter lingvo kaj socio) disde interna lingvistiko, studanta la lingvosistemon mem. Liaj teorioj inspiris Pragan Lingvistikan Skolon, al kiu apartenis Jean Baudoin de Courtenay, N. S. Trubeckoj, Vilém Mathesius k.a. Tiu ĉi skolo fondis fonologion kiel novan disciplinon, precipe sinkronan. Parenčan, t.n. glosematikan skolon reprezentis Luis Hjelmslev, kiu kritikis troigon de fiziologiaj, psikologiaj kaj aliaj metodoj ene de lingvistiko. Laŭ li havas ĉiuj lingvoj komunan strukturon, kies objektiva priskribo estas la ĉefa tasko de lingvistiko. Strukturalismon en Usono flegis Edward Sapir, uzante terminon "patterns" (modeloj) por priskribi internajn lingvoelementojn el psikologia vidpunkto. Tiun ĉi procedon, "mentalisman", kritikis Leonard Bloomfield, kiu kontraŭstarigis sian "mekanismon" por priskribi lingvon surbaze de difineblaj faktoj. Laŭ li kaj lia skolo konsistas parolo el stimuloj kaj reagoj, ekzistantaj ene de homa socio. Oni analizas la parolon helpe de substituo de unuopaj elementoj pere de samkvalitaj elementoj. *Generan* lingvistikon lanĉis Noam Chomsky. Laŭ lia teorio etas parolo ekstera strukturo, per kies transformo oni venas al interna strukturo. Eblas ellabori sistemon de precizaj reguloj, laŭ kiuj oni generas gramatike ĝustajn parolojn. Tion povas fari eĉ maŝino, ricevinte oportunajn regulojn. Tiaj matematikaj kaj aliaj natursciencaj metodoj estas ĉiam pli ofte uzataj ankaŭ en nuntempa lingvistiko.

Pliprofundiga literaturo

Ekzistas riĉa literaturo en diversaj naciaj lingvoj. En la Germana, ekzemple, aperis en la serio "dtv Taschenbücher" konciza monografio: *Arnold, H. L.: Grundzüge der literatur- und Sprachwissenschaft, Band 2 (Sprachwissenschaft), DTV, München 1984, 572-paĝa*, kiu pritraktas bazajn terminojn de lingvistiko, rilatojn de diversaj lingvistikaj disciplinoj, historion de lingvistiko inkluzive diversaj specialiĝintaj skoloj, kaj fine disciplinojn de aplikata lingvistiko. Sekvas detala listo de pli speciala literaturo kaj registro de lingvistikaj terminoj. En la rusa lingvo kaj en germana traduko ekzistas detala trivoluma verko de B. A. Serebrennikov "Ĝenerala lingvistiko", vaste uzata, kies unua volumo pritraktas ekzistoformojn, funkcion kaj historion de la lingvo, la dua volumo lingvostrukturon kaj la tria metodojn de lingvistika esploro. Germanlingva eldono: *Serebrennikov, B. A.: Allgemeine Sprachwissenschaft, Akademie-Verlag, Berlin 1976, 1344-paĝa*. En la angla lingvo estas originale skribita verko: *Bodmer, F.: The loom of language, G. Allen-Unwin, London 1980*, ankaŭ tradukita en la Germanan (*Bodmer, F.: Die Sprachen der Welt, Kiepenhauer & Witsch, Köln-Berlin, jaro ne indikita, 678-paĝa*). Temas pri detala verko kun ampleksa enkonduka ĉapitro. La unua parto pritraktas lingvoevoluan, do evoluon kaj stacion de la alfabetoj, morfologio kaj sintakso de diversaj lingvoj, morfologiajn kaj geografiajn trajtojn de lingvoklasifikado kaj skribmanierojn. La dua parto sufiĉe detale pritraktas ĝermanajn kaj romanajn lingvojn, la tria parto nomiĝas "lingvomuzeo" kaj enhavas laŭtemajn listojn de vortoj en pluraj eŭropaj lingvoj, sekvas listo de grekaj kaj latinaj vortoj, kiuj estas internacie uzataj. Ne mankas literaturlisto kaj registro.

1.2 Interlingvistiko

1.2.1 Difinoj kaj objekto

La termino "interlingvistiko" videble devenas de la indiko "interlingua", do "internacia lingvo", kiun uzis Giuseppe Peano en la jaro 1903. La reprezentanto de naturalisma lingvistika skolo Jules

Meysmans publikigis en 1911 artikolon "Une science nouvelle" en la revuo "Lingua internationale", kaj proponis nomi "interlingvistiko" sciencon, kiu esploras naturajn leĝojn de formado de ĝeneralaj helplingvoj. Li starigas demandon, ĉu ankaŭ artefaritaj lingvoj povas iĝi objekto de scienca esploro. Ĉar plejmulto da tiaj lingvoj apenaŭ trapasis la stadion de projekto, ili ja ne povas esti esplorataj kiel funkciantaj etnolingvoj. Meysmans rekomendas okupiĝi pri artefaritaj lingvoj nur en la kunteksto kun internaciaj etnolingvoj kaj transpreni ties esplormetodojn. Interlingvistiko en la kompreno de Meysmans do pritraktas ĉiujn internaciajn lingvojn, precipe naturajn kaj aldone artefaritajn. Klopodoj konstrui artefaritan lingvon (sub diversaj nomoj, ekz. "universala", "tutmonda", "helpa", "internacia" ktp.), do lingvokonstruado kaj lingvoplanado ekzistis jam ekde antikva epoko, sed ne ligite ekskluzive kun lingvistiko aŭ eĉ kun aparta scienco, interlingvistiko. Ĝi ekzistis kvazaŭ subkonscie kiel parto de diversaj filozofiaj, politikaj, lingvistikaj kaj aliaj esplorkampoj.

Pri interlingvistiko kiel memstara disciplino de lingvoscienco okupiĝis en la tridekaj jaroj Otto Jespersen. Li difinis ĝin kiel lingvistikan branĉon, kiu esploras strukturon kaj bazan koncepton de ĉiuj lingvoj, celante starigi normojn por interlingvoj, t. e. artefaritaj helplingvoj por skriba kaj parola komunikado inter homoj, kiuj ne povas interkompreniĝi per propraj gepatraj lingvoj. Laŭ tiu ĉi koncepto interlingvistiko interesiĝas pri esploroj de la problemoj de konstruo, historio kaj funkcio de planlingvoj, kiujn ĝi vidas kiel lingvojn internaciajn kaj artefaritajn.

Pri artefariteco en la lingvoj oni trovas menciojn jam ĉe pli fruaj lingvistoj, sed la koncepto de artefariteco estas diversa — oni komprenas per ĝi jen lingvonormigon, jen konstruadon de planlingvoj. Germanisto kaj jungramatikisto Hermann Paul mencias en sia laboraĵo "Principoj de historio de la lingvo" en 1880 "artefaritajn lingvojn". Diferencon inter naturaj kaj artefaritaj lingvoj li komparas kun dialekto kaj normlingvo — la unuan oni regas ekde infanaĝo, la duan oni devas lerni. Pri artefariteco parolas en 1889 Jean Baudoin de Courtenay ligite al Volapük, la unua funkcianta planlingvo. Fakte jam en 1887 starigis Amerika Filozofia Societo komisionon por esplori la sciencan valoron de Volapük kaj dum la esploro eniris diskuton kun la Londona Filozofia Societo pri lingva kaj socia flankoj de internacia komunikado. Pri internaciaj lingvoj skribis Hugo Schuchardt, opiniante, ke al starigo de monda lingvo kondukas praktikaj bezonoj de la homaro. Kompara historia lingvistiko, kiu klopodas rekonstrui pralingvon, povas, laŭ Schuchardt, uzi siajn metodojn por konstrui bezonatan internacian lingvon.

En la dudeka jarcento interlingvistiko alproksimiĝis ankaŭ al lingvotipologio kaj lingvokomparado, tial la laboroj de E. Sapir, M. Swadesh kaj W. Collinson, gvidataj de IALA (International Auxiliary Language Association) en tridekaj jaroj okupiĝis pri fundamentoj de eŭropaj lingvoj, konstruante sur la esplorita bazo novan helplingvon. Internacianismoj, do komunaj elementoj en etnolingvoj, iĝis grava esplorobjekto kiel estonta bazo por planlingvo.

Ekde la dudekaj jaroj ekzistis en la soveta lingvoscienco esploro de problemaro ligita al diversaj lingvoj en interetna komunikado kiel principa enhavo de interlingvistiko (sen nomi ĝin tiel). Soveta sciencisto E. F. Spiridoviĉ en la tridekaj jaroj konstatas, ke en lingvistiko hejmiĝas ideoj pri krea procedo en la lingvo, pri ĝiaj konsciaj ŝanĝoj, do lingvoesplorado-analizo estas anstataŭigata per lingvokreado-sintezo. Ekestas lingvoteknologio, celanta (1) krei internacian helplingvon kaj (2) raciigi kaj perfektigi naciajn literaturajn lingvojn.

Simile al la koncepto de Jespersen, Dénes Szilágyi difinas en 1931 interlingvistikon kiel sistemon de teorioj kaj teknikoj, servantaj al produktado de interlingvoj. Li distingas interlingvistikon ĝeneralan por historia kaj kompara studoj de interlingvoj, kaj interlingvistikon normativan. Samjare formulis sian difinon C. W. von Sydow dum la dua internacia kongreso de lingvistoj, dirante, ke la kreo de internacia lingvo bezonas specialan lingvistikan disciplinon. W. J. Manders en 1950 vidas en interlingvistiko tiun branĉon de la lingvoscienco, kiu celas trovi la plej kontentigan solvon de la

planlingva problemo. H. Ölberg (1954) diras, ke interlingvistiko okupiĝas pri internaciaj, t. e. artefarite konstruitaj lingvoj. Laŭ Eugen Wüster (1955) interlingvistiko, kiun li komence nomas "sinteza lingvistiko", ne nur konstatas, sed konscie influas la evoluon de la lingvo. (Li proponas terminon "planlingvo" anstataŭ "artefarita" aŭ "artefarite konstruita" lingvo.) V. Tauli (1968) emfazas la apartenon de interlingvistiko al aplikata lingvistiko — ĝi sisteme studu la celojn, principojn, metodojn kaj taktikojn de lingvoplanado. La lingvoplanado mem okupiĝu pri (1) reguligo kaj evoluigo de ekzistantaj lingvoj, (2) pri la kreado de novaj lingvoj regionaj, naciaj kaj internaciaj. En 1971 A. D. Ŝvejcer difinas lingvoplanadon kiel konscian influon sur la lingvajn ŝanĝiĝojn, alproksimigante ĝin al lingvopolitiko kaj lingvokonstruado. La lingvomodeligan aspekton emfazas P. N. Denisov, konsiderante la interlingvistikon kiel antaŭkibernetikan lingvomodeligon. Laŭ la "Meyers Neues Lexicon" (1973) temas pri lingvistika disciplino kreita komence de ĉi jarcento, studanta strukturojn de grandaj mondaj lingvoj kun celo krei bazon por konstruo de internacia lingvo.

Pli vaste vidas la enhavon de interlingvistiko O. S. Aĥmanova (1966): ĝi estas branĉo de lingvoscienco, kiu studas diversajn problemojn ligitajn kun la kreado kaj funkciado de diversaj helplingvoj inkluzive de aŭtomataj inter-lingvoj. Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto el la jaro 1970 diras, ke interlingvistiko estas scienco, esploranta la kondiĉojn sociologiajn, kulturajn kaj lingvistikajn de komuna norma lingvo, uzota en la internaciaj rilatoj. Alian enhavon donas al interlingvistiko Mario Wandruszka en 1971, komprenante sub tiu nomo esplorojn de etnolingvaj kontaktoj ĝenerale, do kontrastivan aŭ komparan lingvistikon. Laŭ la granda soveta enciklopedio el la jaro 1979, interlingvistiko estas lingvistika branĉo, kiu studas problemojn lige al kreado kaj funkcio de diversaj rimedoj de internacia komunikado, ekz. problemojn de sociolingvistiko, bilingvismo, multlingveco, programlingvoj, kreado de kodoj kaj skribsistemoj, komunikadon de homo kun maŝino.

István Szerdahelyi skribas en sia "Enkonduko en la interlingvistikon" en 1979: "La aplikita lingvistiko devis rimarki, ke la nuna interlingva problemo estas novtipa demando, kreita de la moderna socio, de la evoluado de la tekniko, kiun ne plu eblas solvi per klasik-tradiciaj rimedoj. Oni devas apartigi novan disciplinon, kies tasko estu ĝuste la solvado de la interlingva problemo. Tiu nova branĉo de la aplikita lingvistiko nomiĝas interlingvistiko. La interlingvistiko devas trovi la respondon al la demando: kiu lingvo solvu la problemon: ĉu nacia aŭ internacia; ĉu estinta, estanta aŭ estonta; ĉu etna aŭ artefarita?" Li inkluzivas en interlingvistikon lingvopolitikon kaj lingvoplanadon, starigante ilin proksime al sociolingvistiko, psikolingvistiko kaj lingvomodeligo.

Detlev Blanke en 1985 difinas interlingvistikon kiel interdisciplinan lingvosciencan branĉon, esplorantan internacian lingvan komunikadon kun ĉiuj politikaj, ekonomiaj, lingvistikaj, informaciteoriaj kaj aliaj aspektoj. Laŭ Blanke tamen estas la ĉefa laborkampo de interlingvistiko problemaro de planlingvoj, nome pro jenaj kialoj: (1) La ekesto de interlingvistiko kiel scienca disciplino estas intime konektita kun la evoluo kaj historio de planlingvoj. Multaj interlingvistikaj problemoj, kiuj ne estas rekte ligitaj kun planlingvoj, estis malkovritaj kaj difinitaj ĝuste dank' al planlingvoj. (2) La planlingvoj estas antaŭ ĉio produkto de interlingvistikaj klopodoj, nome rimedo por plifaciligi la internacian komunikadon. (3) Ke la planlingvoj kontentige funkcias kiel ilo de internacia komunikado, estas pruvebla teorie kaj praktike. Ili formas tiel alternativon al aliaj modeloj de raciigo de la internacia komunikado (ekz. enkonduko de unu, du aŭ pluraj etnolingvoj kiel devigaj internaciaj lingvoj, perkomputila tradukado ktp.) aŭ estas kombineblaj kun ili. (4) La plejmulto de interlingvistika literaturo — 60% — estas publikigita en planlingvoj. Elĉerpigaj interlingvistikaj esploroj ne eblas sen prikonsideri planlingvan literaturon. (5) Preskaŭ ĉiuj interlingvistoj, aktivaj en la difinita kampo, scipovas planlingvojn. Blanke ankaŭ difinas esperantologion kiel memstaran parton de interlingvistiko.

S. N. Kuznecov (1987) opinias, ke interlingvistiko pritraktu interlingvajn kontaktojn kaj internacian

lingvon kiel ilon de tiuj ĉi kontaktoj. Al la esplorkampo de interlingvistiko do apartenu problemoj de multlingveco, planiteco de naciaj lingvoj, uzado de interesaj lingvoj kaj planlingvoj. Ne apartenu tien programlingvoj por komputiloj, etnolingvoj kiel identigiloj de sociaj grupoj ktp. Komprenante interlingvistikon kiel lingvistikan branĉon, li subdividas ĝin analogie al lingvistiko en interlingvistikon ĝeneralan kaj specialan. *Ĝenerala* interlingvistiko interesiĝu pri monda lingvo-situacio, pri multlingveco kaj ĝia evoluo, pri tipoj kaj niveloj de internacia komunikado, pri reciprokaj lingvaj influoj kaj ekesto de internacianismoj, pri klopodoj solvi la internacian komunikadproblemon helpe de kaj naturaj lingvoj, kaj planlingvoj. Laŭ Kuznecov apartenas al ĝenerala lingvistiko ankaŭ teorioj de internaciaj naturaj kaj artefaritaj lingvoj, kaj al la lasta teorioj de lingvoprojektado kaj de lingvofunkciado. Al *speciala* interlingvistiko apartenas teorioj de unuopaj planlingvoj, do ankaŭ esperantologio. Krome estas interlingvistiko ligita al multaj aliaj sciencoj laŭ specialiĝo en unuopaj esplorkampoj, kiel lingvopolitiko, lingvopedagogio, sociologio, lingvofilozofio, dokumentadscienco, semiotiko — speciale terminologio, scienca komunikado, informadiko, logiko, kibernetiko, problemoj de artefarita inteligenteco kaj multaj aliaj.

Nove (1992) rimarkigas Werner Bormann, ke planlingvistiko estas tro malvasta interesokampo de interlingvistiko, eĉ kun aldono de novaj esplorceloj kiel uzo de interlingvo kiel referenc- kaj pontolingvo, en lingvoorientiga instruado kaj simile. Al sciencaj laboroj super la lingvo adiciigis temaro literatursciencan, lingvosociologia, lingvopolitika kaj aliaj. Sub la interlingvistikan temaron do laŭ la nuntempa kompreno apartenu ankaŭ problemoj filologiaj. Ekzistas proponoj de Helmar Frank, Yashovardhan kaj Vera Barandovská (1991) apartigi la literatursciencajn kaj planlingvomovadajn problemojn tiel, ke ili apud interlingvistiko formu parton de interfilologio.

La plej disvastigita kompreno de la enhavo de interlingvistiko restas tamen ligita al la internacia lingvo kaj al aro da problemoj, kiuj apartenas al ties uzado en plej diversaj sciencaj kaj praktikaj kampoj. Tia difino malfermas vastajn eblojn por nelingvistikaj sciencoj enplektiĝi kaj kontribui al interlingvistikaj esploroj.



Pliprofundiga literaturo

Antaŭ ĉio menciindas *Szerdahelyi, I.: Enkonduko en la interlingvistikon*, en *Carlevaro/Lobin (eld.): Einführung in die Interlinguistik, Leuchtturm, Alsbach 1979, 263-paĝa*. Temas pri ĉ. kvardekpaĝa teksto, pritraktanta envicigon de interlingvistiko en la lingvosciencan, elirante de kontaktologio-lingvomodeligo, tuŝante la aliron de lingvistoj al la nova fenomeno, poste pritraktiĝas lingvopolitiko, internacilingva movado, lingvomodeligo, tipologio de planlingvoj, interlingvistiko kiel scienco kaj la modern-lingvistikaj esploroj. Tiu ĉi teksto rekomendindas, enhavante la esencajn informojn pri interlingvistiko, detalan literaturliston kaj vastan germanlingvan resumon. Same la aliaj artikoloj de la menciita libro koncernas interlingvistikon, nome prezentadon de planlingvoj kaj iliajn pedagogiajn, sciencajn kaj lingvopolitikajn aspektojn. Bone uzeblan koncizan enkondukon en interlingvistikon enhavas 50-paĝa germanlingva pritrakto: *Mayer, H.: Etablierung der Interlinguistik als Wissenschaft, E-Muzeo, Wien, 1988*, resumanta la plej gravajn indikojn pri interlingvistiko. Diversajn eseojn pri interlingvistika kaj planlingva problemaro inkluzive la fama "Interlingvistiko — nova scienco" de Otto Jespersen kolektas verko *Hauptenthal, R. (Hrsg.): Plansprachen, Wissenschaftliche Buchgesellschaft, Darmstadt 1976, 365-paĝa*. Ĉiuj kontribuaj (krom unu en Latino sine flexione) estas tradukitaj germanlingven, enestas elektita bibliografio de aliaj verkoj pri interlingvistiko. Klasikas *Manders, W.: Interlingvistiko kaj esperantologio, Purmerend 1950*. Pri ĝeneralaj interlingvistikaĵoj parolas ankaŭ du unuaj ĉapitroj de la plej ampleksa germanlingva monografio *Blanke, D.: Internationale Plansprachen, Akademie-Verlag, Berlin 1985, 408-paĝa*. Tiu ĉi monografio estas nepre konsultinda precipe por elĉerpiga, por la pli detala studado de interlingvistiko nemalhavebla bibliografio de multlingva literaturo koncernanta interlingvistikon, lingvoplanadon kaj detalojn pri unuopaj

planlingvoj. Ruslingva monografio *Kuznecov, S.: Teoretiĉeskie osnovy interlingvistiki, Izdatelstvo universiteta družby narodov, Moskva 1987, 207-paĝa*, ankaŭ taŭgas kiel enkonduka lernolibro. La unua ĉapitro pritraktas ĝeneralajn interlingvistikajn problemojn, la dua nomiĝas "lingvoj en monda lingvosituacio", pritraktante la multlingvecon en historio kaj perspektivo kaj rilatojn inter lingvo, sociologio kaj kulturo. En la bibliografio troviĝas precizaj indikoj pri la konsultinda literaturo, plejgrandparte ruslingva, inkluzive de pli fruaj verkoj de la aŭtoro. Parte tuŝas interlingvistikan temaron revuo "Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft" (grkg), el ĝi estas menciitaj artikoloj: *Frank, H., V. Barandovská, Yashovardhan: Kiel utile difini la nocion "interlingvistiko", grkg 4/91, p. 182-190* kaj *Bormann, W.: Evoluiĝinta kompreno de interlingvistiko, grkg 1/92, p. 3-6* La materialo por ĉapitro "Lokigo de interlingvistiko en la sciencoj" estas ĉerpita el *Frank, H.: Noto pri proponita sciencoklasigo por strukturigi sciencan akademion, grkg 4/83, p. 164* kaj *Frank, H.: Zur kybernetischen Rechtfertigung einer axiomatischen Interlinguistik, grkg 2/85, p. 71-82*. La menciitaj artikoloj, samkiel aliaj artikoloj tuŝantaj diversajn aspektojn de interlingvistiko, precipe rilate al pedagogio kaj kibernetiko, estas represitaj en kolekto *Barandovská, V. (Hrsg.): Kybernetische Pädagogik / Klerigkibernetiko, Band 6, Esprima, Bratislava 1993, 1123-paĝa*. Novaj esperantlingvaj verkoj pri interlingvistika temaro kaj pri lingvoproblemoj riceveblas en Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, en kies ĉiujare eldonata katalogo troviĝas speciala tiutema parto.

1.2.2 Lokigo en la sciencoj

Interlingvistiko povas deklari sin scienco nur, se ĝiaj problemoj estas solveblaj enkadre de la sistemo de la sciencoj. Almenaŭ parto de la sciencaro baziĝas sur aksiomoj. Tia scienco posedas malmulton da firmaj eldiroj, el kiuj oni povas derivi ĉiujn aliajn validajn eldirojn de la koncerna disciplino. Formale transformiĝas aksiomoj laŭ certaj reguloj, validaj kaj en la scienco mem, kaj en la helpsciencoj. La aksiomoj enhavas kategoriojn, karakterizajn por la koncerna scienco, kaj aliajn nociojn, kiuj apartenas ankaŭ al la helpsciencoj (ĝuste tial ili estas helpaj sciencoj). Kiel elira scienco, mem ne havanta iun ajn helpsciencojn, estas pritraktata la logiko — ĝi do estas helpscienco de ĉiuj sciencoj — almenaŭ de tiuj, kiuj estas logike starigeblaj sur propraj aksiomoj. Unu el eblaj envicigoj de interlingvistiko en tian sciencsistemon estas ene de la lingvistika kadro, influata per logiko, matematiko kaj psikologio, sen prikonsideri ĝian sociologian fonon. Tiun vidpunkton montras la grafikaĵo de Helmar Frank el la jaro 1985, kiam li enŝovis la interlingvistikon en sian sistemon de aksiomhavaj sciencoj jam publikigita en 1966. Sed jam tiam li reliefigis, ke ne ĉiuj sciencoj strebas aŭ povas strebi al starigo sur aksiomojn, sed nur la struktursciencoj (formala logiko kaj matematiko), la novepokaj natursciencoj kaj la kibernetiko, do tiuj sciencoj, kiuj kulminas en kalkuloj kun la celo, antaŭkalkuli estontecon aŭ efikon de teknika konstruaĵo (t. e. la sciencoj nomitaj "nomotetaj" de la filozofo Windelband). Tion ne celas la humanistikaj sciencoj (la "idiografaj" en la terminologio de Windelband), kies celo estas i.a. ekkompreni la ĝisnunan evoluon. Se ekzemple la lingvistiko esploras la evoluon de la hindeŭropa lingvaro kaj se la interlingvistiko strebas kompreni la ekeston de planlingvoj, ili apartenas al la humanistikaj sciencoj kaj tie ne povas preteratenti sociologiajn ekkonojn. Interlingvistiko do trovas du lokojn en la sistemo de la sciencoj. Parte ĝi sendube daŭre apartenos al la humanistika lingvistiko. Sed ĝi ankaŭ povas preteratenti historian evoluon kaj ties sociologiajn kaŭzojn kaj strebi al aksioma bazo de lingva komunikado kaj de planlingvokonstruado; per tiu (ĝis nun malpli evoluiginta) parto ĝi apartenas al la sistemo de la nomotetaj sciencoj — speciale al la humankibernetiko. Tion respektas la sciencoklasigo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, laŭ kiu ĉi tiu strukturiga dekomence (1983) per la po tri nomotetaj kaj idiografaj sekcioj de la dua grafikaĵo kaj flegas interlingvistikon (same kiel psikologion, klerigsciencon kaj lingvistikon) kaj per sia humanistika, kaj per sia kibernetika sekcio.



1.2.3 Interlingvistiko kaj kulturo

En la monografio pri kulturo kaj internacia lingvo de William Auld troviĝas multaj pensigaj ideoj. La plej grava el ili estas, ke ĉiu lingvo posedas kulturon, aliel ĝi ne estus lingvo. La lingvo ne povas esti memstara natura fenomeno, ĉar ĝi ligiĝas al homo kaj al la kulturo de la homo. Nura lingvo sen kultura fono praktike neekzistas, same kiel ne ekzistas homo staranta ekster sia kulturo. La vorto kulturo implicas la tutan gamon de la homaj aktivecoj, kiel historion, geografion, religion, teknikon, arton, civilizon kaj antaŭ ĉio la lingvon, per kiu la kulturo esprimiĝas. Depende de la lingvo do la kulturo kreis la homon. Oni substrekas, ke la kulturon ne eblas disigi disde ĝia ĉirkaŭaĵo; de la loko, kie oni parolas la lingvon kaj de la koncerna nacia identeco. La nacilingva "tono" estas karakteriza kaj ne ĉiam rekonebla de eksterlandanoj. Sed eblas paroli ankaŭ pri supernaciaj lingvo kaj kulturo, ekzemple se al la ĝenerale parolata angla lingvo aldoniĝas naciaj akcentoj de Usono, Britio, Aŭstralio kaj simile. La internacian planlingvon, kiun oni parolas en ĉiuj mondpartoj, akompanas internacia kulturo, al kiu kontribuadas la unuopaj parolantoj. La originala literaturo kaj parolantaro de la internacia lingvo donas al ĝi spiritan identecon, kiu povas esti nek nacia, nek loka — evidente la loko de la internacia lingvo estas la tuta terglobo. Ĝi tamen dependas de la socia medio. Por la plejmulto da homoj, kiuj parolas internacian lingvon, ĝi estas la dua lingvo, sekve ekestas kultura dulingveco kaj alproprigo de la dua kulturo. Tiu ĉi internacia kulturo estas bazita ne nacie, sed tutmonde, ne geografie, sed spirite, eĉ ideologie.

Ĉiu aparta kulturo estas afero de edukado. La limojn de tiu edukado difinas unuavice la kapablo de la individuo kaj duavice lia deziro edukiĝi. Oni povas pli aŭ malpli konscie aliĝi al tia aŭ alia kulturo. Pro tio, ke la kulturo estas kreita kaj disvastigita per edukado kaj konscia kaj nekonscia, ĝi estas artefarita. Ŝangante la premisojn de iu socio, oni povas ŝanĝi ankaŭ la kulturecon. Same kiel nuntempe universaliĝas la civilizo pere de internaciaj kontaktoj, universaliĝas ankaŭ la kulturo. Al la internacia lingvo oni tamen ofte rifuzas kulturecon, ĉar por la artefaritaj kulturaj lingvogrupoj oni starigas grupojn politikajn. La lingvoj iĝas simboloj de politika unueco de nacioj kaj ŝtatoj, kaj samtempe ilies politika batalilo, ĉar la akcepto de ies lingvo implicas akcepton de ties kultura tradicio. Al la planlingvoj evidente mankas riĉa nacikultura tradicio. Multaj opinias ilin nuran solvon de praktika komunikadproblemo. Praktikaj homoj, cetere, en konkretaj situacioj ne interesiĝas pri la kultura valoro de iu ajn lingvo inkluzive la propra etnolingvo. La afero gravas en specife kulturaj medioj. La kulturo de la internacia lingvo estas inkluziva anstataŭ ekskluziva, ne celante esprimi apartaĵojn de certaj grupoj, sed ĉion, kio estas komuna al ĉiuj homoj en ĉiuj mondpartoj. La uzantoj de la internacia lingvo estas homoj kulturaj, posedante apud sia nacia kulturo ankaŭ kulturon tuthomaran, kies esprimo la lingvo estas, ili do bazigas sian kulturecon sur la inkluzivaj faktoroj.

La internacia kulturo povas esti samriĉa kiel kulturoj naciaj, ĉar ĝi dependas de la homoj, kiuj ĝin posedas. Same kiel oni kutimas laŭdi anglan lingvon, ke ĝi kapablis engluti multajn fremdlingvajjn, precipe koloniajn esprimojn, oni povas aprezi la lingvon internacian, kiu estas la sintezo de la kulturoj de siaj parolantoj. Ĝi estas precize tiel kultura, kiel la homoj ĝin uzas. Kvankam la internacia lingvo ne posedas politikan forton, ĝi posedas politikan signifon, kontaktiĝante homojn el diversaj mondpartoj. Rilatoj inter interlingvistiko kaj kulturo do estas esplorindaj koncerne de diferencoj inter kulturoj naciaj-ekskluzivaj, kaj la kulturo internacia-inkluziva, ambaŭ perataj pere de siaj lingvaj rimedoj. Esplorindas, kiel al la internacia kulturo, staranta en la fono de internacia(j) lingvo(j), kontribuas ĉiuj ĝiaj uzantoj.

Pliprofundiga literaturo

Bv. legi *Auld, W.: Kulturo kaj internacia lingvo, Fonto, Chapecó 1986*, 120-paĝan kolekton de eseoj, kiuj konkrete rilatas Esperanton, enhavante multajn ĝeneralajn ideojn. La dua duono de la broŝuro estas dediĉita al pritrakto de beletraĵaj kaj poeziaj tradukoj kaj al koncernaj pripensoj de sperta internacilingva verkisto. Apartan ĉapitron pri planlingvoj kaj kulturo (naciaj kulturoj, "subkulturo", interkulturo, komparo de kulturaj rilatoj de planlingvo kaj etnolingvo ktp.) enhavas la ruslingva broŝuro de *Kuznecov, S.: Napravlenija sovremennoj interlingvistiki, Izdatelstvo universiteta družby narodov, Moskva 1984, 98-paĝa*.

1.2.4 Interlingvistiko kaj semiotiko

Ĉiu lingvo povas esti konsiderata kiel sistemo de signoj. Ĝi enhavas esprimebenon kaj enhancebon, reprezentantan aron da esprimeblaj nocioj. Ambaŭ ebnoj rezultas el organizita sistemo de materio kaj konsistas el substanco kaj formo. Esprimformo konsistas el fonologia sistemo, vortprovizo kaj sintaksaj reguloj. Helpe de esprimformo eblas generi diversajn esprimsubstancojn, do vortojn kaj tekstojn. Por ke tiuj ĉi estu kompreneblaj, necesas ilia ligo al enhavo, kies materio estas la fizika kaj mensa tutaĵo, organizita en lingvan formon. Diversaj ebloj organizi la enhavon varias de lingvo al lingvo, ofte ankaŭ laŭ tio, ĉu oni uzas lingvaĵon ĉiutagan, sciencan, artan ktp. Ĉiu lingvouzo do reprezentas certan mondpercepton, laŭ kiu la lingvo strukturiĝas. Esprimenhavo poste reprezentas la sencon de unuopaj esprimoj, kiujn oni komunikas pere de esprimsubstanco.

Se oni volas konstrui lingvon, necesas respekti tiujn ĉi mekanismojn kaj precipe la duoblan

lingvoniveladon: surbaze de leksemoj korespondas enhavo al formo (ekz. la leksemo "dom" enhavas signifon de konstruaĵo, konkretaĵo, objekto ktp., la morfemo "oj" indikas substantivon kaj pluralon), sed la unuopaj fonemoj estas arbitraj, do "d", "o" kaj "m" ne estas elementoj de senco "konstruaĵo", "objekto" ktp. Tiu ĉi duobla lingvostrukturigo ne estis ĉiam respektata, precipe ne ĉe aprioraj lingvoj. Aŭtoroj de diversaj universalaj filozofiaj lingvoj, ĉefe en la 17-a jarcento, ofte kredis je eblo esprimi nociojn rekte per fonemoj aŭ grafemoj. Multaj aliaj sistemoj strebis pri ekvilibro inter signo, realeco kaj nocio. Naturaj lingvoj funkcias surbaze de reguloj, kiuj adaptiĝas al diversaj parolsituacioj kaj kunteksto, kio siavice ebligas variigi la signifon de vortoj kaj parolturnoj. Kelkaj projektoj de universalaj lingvoj, pretendante esti perfektaj, forigis tiun ĉi pragmatikan aspekton de la lingvo, dum aliaj klopodis konservi ĝin. Kvankam la parolata lingvo ne estas la plej perfekta esprimo de ĉiuj realaj psikologiaj nuancoj (oni ne povas ekz. precize pervorte priskribi diversajn odorojn aŭ sentojn), ĝi estas la plej grava el semiotikaj sistemoj. Tiam preskaŭ ĉiu konstruanto de planlingvo prenas la naturan lingvon kiel modelon por sia projekto, elirante el ĝia semiotika valoro.

Oni povas konsideri apriorajn lingvojn ankaŭ komputilajn sistemojn, "lingvojn" kiel Basic aŭ Pascal. Ili havas simplan, rigidan sintakson, kaj surbaze de signifoj, aljuĝitaj al iliaj malplenaj simboloj, dependas kvazaŭ parazite de aliaj lingvoj, konsistante el logikaj implikacioj (rilatoj "setiam"). Ili estas universalaj sistemoj kompreneblaj por parolantoj de diversaj etnolingvoj, do siaspece internaciaj lingvoj, estante ankaŭ perfektaj en tiu senco, ke ili ne enhavas plursignifojn. Aprioraj ili estas tiomgrade, ke ili baziĝas sur reguloj, kiuj supozeble esprimas profundajn strukturojn komunajn al ĉiuj lingvoj. Tamen iliaj radikoj estas en logiko, kiu ĉerpas el la civilizo de hindeŭropaj lingvoj. Multaj interlingvistoj rifuzas envicigi ĝuste tiajn komputilajn sistemojn inter "interlingvojn", ĉar ili ne servas al komunikado direkte inter homoj, sed inter homo kaj maŝino. Temas do pri problemo de artefarita inteligenteco. Observante ĝin pli atenteme, oni tamen devas konstati, ke la projektoj de artefarita inteligenteco pli malpli revivigas la problemaron, sur kiu baziĝas aprioraj filozofiaj interlingvoj.

En la intereskampon de interlingvistiko, precipe en ĝian historion, apartenas streboj krei perfektan kaj logikan lingvon, en kiu plene koincidus sistemo de objektoj, nocioj kaj nomoj. Same oni strebas krei universalan gramatikon, ian sistemon de ĝenerale validaj gramatikaj reguloj. Oni demandas, ĉu el semiotika vidpunkto eblas trovi aŭ konstrui universalajn validajn por ĉiuj lingvoj. Interlingvistiko havas tiamaniere sian parton de aplikadkampo ankaŭ en artefarita inteligenteco kaj semiotiko.

Pliprofundiga literaturo

Estis uzita libro de *Eco, U.: La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea, Laterza, Roma-Bari 1993, 388-paĝa, itallingva*. Ĝi alportas detalan historion de la streboj pri universala lingvo, ne el pure lingvistika, sed el semiotika kaj filozofie logika vidpunkto. Oni povas informiĝi pri kabalistiko, pri etimologiaj esploroj de hindeŭropaj lingvoj kaj pri diversaj skribmanieroj, pri teorio de Lull, Bacon, Comenius, Mersenne, Dalgarno, Wilkins, Lodwick, Leibniz kaj aliaj filozofoj. Pli koncize estas priskribita evoluo de filozofiaj lingvoj ekde humanismo ĝis hodiaŭ, unu ĉapitro estas dediĉita al planlingvoj, ekz. Volapük kaj Esperanto. En la bibliografia parto troviĝas pluaj indikoj de similtema literaturo. La libro ekzistas i.a. en germana traduko.

1.2.5 Interlingvistiko kaj psikologio

La kunlaboro de interlingvistiko kun psikologio antaŭvidas pritakson de internaciaj lingvoj el psikologia vidpunkto. Psikologoj ekzemple evidentigis la fakton, ke la uzo de planlingvo

reprezentas sublimigon de la plezuro manipuli. Jam en la jaro 1925 interesiĝis pri la afero J. C. Flügel kaj post li D. Szilágyi, kiuj pritraktis la rolon de planlingvo en rilato kun t.n. Edipa situacio. Inter 1950-1965 interesiĝis pri planlingvoj psikiatro J. Stučlík, kiu esploris precipe lingvofaradon de skizofrenuloj kaj parafreniuloj. Por li, la serioza planlingvisto devas suferi aŭ pro infaneca ludemo aŭ paranoia grandiozeco. Nuntempe T. Carlevaro kaj C. Piron analizas la fenomenon de lingva planado el psikodinamika vidpunkto, enkadrigante ĝin tamen en pli ampleksan sociologian problemaron. T. Carlevaro studas ĉefe sociopsikologion de planlingvo kaj la rilatojn inter psikologia genetiko kaj planlingvo, C. Piron interesiĝas pri la rezistoj kontraŭ la ideo de planlingvo (stereotipoj, antaŭjuĝoj), kiujn li analizas kvazaŭ temus pri egodefendomekanismoj, el la vidpunkto de la defendo kontraŭ praangoroj de la individuo.

La individuo formiĝas per integriĝo de tri sferoj: la kognitiva, la afektiva kaj la moviĝa. El ilia integriĝo rezultiĝas ankaŭ la konscia volo. Al la kognitiva sfero apartenas ĉefe la inteligento, inter kies faktoroj estas i.a. la lingvoregado. Grave estas analizi la rilatojn inter la lingvo de la nekonscio, "eso" kaj la lingvo de la konscio, "egoo". Esaj pulsioj estas pli primitivaj, dum la egoo ebligas komunikadon helpe de simboloj. Inter la esa prasimbola lingvo kaj egoa komunika kompetenteco ekzistas interna spaco, enhavanta fantasmojn. La lingvo estas esence konsciiga komunikilo, grava por la individuigo, permesante analizon de si mem. Ĝi havas gravan rolon ankaŭ ĉe la ludo, ebligante esprimon de fantasmoj. Ĉiuj infanoj iam ludas per la lingvo, do mem kreas "planlingvon". Planlingvo estas bone manipulebla, ĉar ĝiaj lingvaj normoj estas malpli striktaj ol tiuj de naciaj lingvoj kaj la plananto mem povas starigi proprajn normojn. Ekzistas opinioj, ke la planlingvo, do ekzemple Esperanto, estas envicigebla en tian lingvan ludismon kaj ke ĝi kontentigas la psikan sinmontran deziron de la aŭtoro.

Sed krome estas rimarkeblaj ankaŭ aliaj psikologiaj analizoj por pristudi la kialojn de antaŭjuĝoj kontraŭ planlingvoj kaj por starigi dinamikan tipologion de planlingvanoj kaj planlingvistoj. La historio kaj disvastiĝo de la planlingvoj, kaj ankaŭ ties malapero, do ne dependas esence de nur lingvaj faktoroj, sed de faktoroj psikologiaj, perataj tra sociologiaj mekanismoj. Gravas la apogo de interlingvistiko sur psikologiaj faktoj, kiuj povas ekspliki kaj prognozi la uzadon de planlingvoj.

Pliprofundiga literaturo

Vidu Carlevaro, T.: *Psikologio kaj planlingvo*, en: *Carlevaro/Lobin (eld.)*, 1979, p. 177-197 (vidu ĉe 1.2), en Esperanto, kun literaturlisto kaj germanlingva resumo. Krome Piron, 1994, p. 131-163 (vidu ĉe 2.5), franclingve, kie oni trovas aliajn interesajn observadojn de lingvaj mekanismoj, ne strikte rilate al internaciaj lingvoj.

1.2.6 Interlingvistiko kaj lingvopolitiko

fakte devas intime kunlabori, ĉar la enkonduko de internacia lingvo en la socion estas afero ne lingvistika, sed politika. Ekzistas multaj politikaj solvoj de problemhaviga multlingveco. La skemon de eblaj solvoj de lingvoprobelloj oni povas fari ekz. jene:

Solvo de lingvoproblemoj:

I. Per unueciga lingvo anstataŭonta ĝisnunajn multajn etnolingvojn. Tiu ĉi lingvo estu

1. Lingvo de reganta popolo (ekz. en Roma imperio) → *lingva imperiismo*
2. Anstataŭa lingvo → *lingva neŭtralismo*
 - ekstera etnolingvo (ekz. la Angla en Hindio)
 - morta lingvo (ekz. novenkonduko de la Hebrea en Israelo)
 - planlingvo

II. Konservante la etnolingvojn,

1. Per tradukado
 - Aŭtomata → *lingva kibernetismo*
 - Homa
2. Per instruado de pluraj fremdlingvoj
 - Kelkaj elektitaj
 - Ĉiuj enlandaj (ekz. Svislando) → *lingva helvetismo*
3. Per instruado de ununura fremdlingvo
 - De privilegiita etno (ekz. laŭjure en Hindio) → *lingva feŭdismo*
 - Komuna dua lingvo (eksterna; "morta"; planlingvo) → *lingva neŭtralismo*

Videblas, ke la problemoj de multlingveco estas solveblaj per neŭtrala lingvo kaj en tiu rolo taŭgas precipe planlingvo, ne havanta etnon, kiun ĝi avantaĝigus. Por enkonduko de la planlingvo en la socion ankaŭ necesas ne lingvistikaj, sed precipe politikaj strategioj. Temas pri ne nur enkonduko de la internacia lingvo en la ŝtatajn lernejojn, sed ĉefe pri ĝia oficialigo en oficialaj ŝtataj tekstoj kaj kiel sciendaĵo de ŝtataj ekzamenoj. Por akcepti la neŭtralan internacian lingvon devas la koncernaj politikaj lokoj havi taŭgan motivon kaj klare vidi avantaĝojn de tia lingvo. Ĝuste tie estas la kunlaboro kun interlingvistiko necesa. Montriĝas ekzemple, ke taŭga planlingvo povas utili por plua lernado de fremdlingvoj kaj ke ĝia lernfacileco pli taŭgigas ĝin por privata, ĉefe sciencista komunikado.

La planlingvo estas akceptebla el la politikaj starpunktoj kaj liberala, kaj egalecema, kaj konservativa, ĉar ĉiu laŭvice povas trovi en ĝi avantaĝojn. Por la liberaluloj, la internacia lingvo sekurigas la ĝeneralan lingvolimtranspaŝan interkompreniĝon, post kiam la lernantoj libere povas elekti pluajn etnolingvojn. En ĉiu okazo, kiam ne eblas allasi ĉiujn deziratajn lingvojn, la libereco de la opiniesprimo estas pli granda, se la subprivilegiitoj, al kiuj oni malpermesas esprimiĝi senpere en ilia gepatra lingvo, almenaŭ rajtas uzi facilan neŭtralan lingvon anstataŭ fremda nacilingvo. Laŭ egalecema vidpunkto neŭtrala lingvopolitiko (anstataŭ lingvo-diskriminacio pro lingvohegemonio) gravas precipe por realigi samrajtecon kaj ŝancegalecon sendepende de la gepatraj lingvo kaj socia tavolo. Por realigi samrajtecon estas ĉiuj etnolingvoj same traktendaj, oni do devas aŭ allasi ilin ĉiujn, aŭ elekti nur neŭtralan internacian lingvon. La konservativisto povas vidi kiel plej gravan avantaĝon de la enkonduko de iu neŭtrala lingvo la nur tiel eblan defendon de ĉiu historie evoluinta nacilingvo, kiu estas laŭ lia vidpunkto konservenda.

La fakto, ke neniu planlingvo ankoraŭ oficialiĝis, estas same lingvopolitike klarigebla, nome pro respondec-cirkuligo de politikaj aŭtoritatoj, klerigsistemoj kaj fakscienculoj, kiuj ĉiuj malkonsentas precipe pro nesufiĉa informiteco. Rolo de interlingvistiko do estas ankaŭ taŭge informi la decidpovajn lokojn kaj instigi ilin por agi. Necesas reliefigi, ke ekestas nova lingvosituacio: (1) politika, ĉar kunlabore unuiĝas diverslingvaj demokratiaj nacioj, ekestas novaj fakkunlaboraj, vojaĝaj kaj turismaj ebloj, (2) faka, ĉar disvolviĝas komunikado inter homoj kaj maŝinoj, kie gravas lingvo taŭga por perkomputila prilaborado, (3) pedagogia, se la internacia lingvo taŭgas por plifaciligi kaj motiviĝi lernadon de fremdlingvoj. Laŭ politika vidpunkto ne estus riske allasi internacian lingvon kiel kroman ĉie, kie pro praktikaj kialoj eblas allasi nur kelkajn el la lingvoj de la landoj partoprenantaj projektojn, konferencojn ktp. Dependas do nur de ĝusta informiteco kaj kunlaboro kun interlingvistoj.

Pliprofundiga literaturo

Legu Frank, H.: Strategioj por enkonduki la internacian lingvon en la socion, en *Carlevaro/Lobin (eld.)*, 1979, p. 227-247 (vidu ĉe 1.2), kun germanlingva resumo. Krome estas pluraj

tiutemaj artikoloj de la sama aŭtoro represitaj en *Barandovská (eld.)*, 1993 (vidu ĉe 1.2). Pri lingvopolitiko kaj lingvosituacio en diversaj internaciaj organizaĵoj parolas *Lapenna, I.: The language problem in international relations, Centre for Research and Documentation on the Language Problem, London-Rotterdam 1972*, 12-paĝa dokumento anglalingva. Same konsultindas pluraj aliaj anglalingvaj dokumentoj eldonitaj per la sama instanco, ekz. *Edwards, J. – Tonkin, H. (eld.): Language Behavior in International Organizations, Center for Research and Documentation..., New York 1984*, 150-paĝa kolekto de referaĵoj de precipe usonaj sciencistoj el la internacia konferenco el la jaro 1983 kaj *Tonkin, H. – Johnson-Weiner K. (eld.): Overcoming Language Barriers: the Human / Machine Relationship, Center for Research..., New York 1986*, 110-paĝa kolekto de referaĵoj de la internacia konferenco el la jaro 1985, pri problemoj de bilingvismo, plurlingvismo, tradukado, terminologio ktp. ĉe UN, ĉe grandaj transnaciaj firmaoj, dum militaj operacioj kaj simile.

1.2.7 Interlingvistiko kaj kibernetiko

Kibernetiko estas subdividebla laŭ ontologia aŭ laŭ komplekseca klasigo de la objekto. Ontologie oni subdividas ĝin en la formalan, ĝeneralan kibernetikon, la biokibernetikon, la inĝenierkibernetikon kaj la antropokibernetikon. La komuneco estas, ke ĉie interestas informo, nek materio, nek energio, kaj ĉie oni celas mezuradon kaj kalkuladon por prognozi. Laŭ la komplekseco oni povas pritrakti ĉi tiun problemaron laŭ kvar ŝtupoj: (1) nuran informon, ties strukturon, amplekson kaj kodeblon, (2) la algoritmojn de la informprilaborado kaj la strukturon de la informprilaborantaj sistemoj, (3) la retrokoplado de la elmetoj de tia sistemo al la enmeto tra neinformeca aŭ almenaŭ pasiva ĉirkaŭaĵo, (4) la retrokoplado inter almenaŭ du informecaj sistemoj, kiuj normale strebas al malsamaj celoj, uzante ofte tiucelajn strategiojn.

Sur ĉiuj kvar ŝtupoj povas kibernetiko trovi komunajn interespunktojn kun interlingvistiko, esplorante la uzon de internacia lingvo.

Al (1): Sur la informa ŝtupo, la internacia lingvo kiel neŭtrala esence ne ludas la biologian aŭ kulturhistorian rolon de identigilo de la etno, sed servas kiel kodo al la lingvolim-transpaŝa komunikado de semantika informo. Oni povas kibernetike analizi la kvalitojn de ĉi tiu kodo, konstatante ekz., ke la internacia lingvo kodigas la semantikan informacion pli dense ol etnolingvoj kaj estas malpli ambigua ol ili.

Al (2): Sur la algoritma ŝtupo estas notinda, ke pro la precizeco de planlingvo tiu ĉi bone taŭgas por perkomputila, algoritma pritraktado. La algoritman pritrakteblon de Esperanto uzis René de Saussure por la skizo de ĝia vort-teorio. Gramatikon por perkomputila vortfarado en Esperanto kiel fundamento de komputila lingvistiko inciatas sur la bazo de tiu teorio H. Frank kaj M. Lánský.

Al (3): La retrokoplada ŝtupo: pro ĝia neŭtraleco kaj planiteco facilas uzi planlingvon kiel referenclingvon por terminologia laboro en rapide evoluantaj fakoj. La neŭtraleco defendas ĝin kontraŭ tro fortaj influoj de maltaŭgaj parolkutimoj. Retrokoplade sentiĝas la bezono en naciaj lingvoj atingi similan precizecon. Ekzemplo estas la Esperanto-neologismo "informacio", enkondukita en la kibernetikan faklingvon de R. Hilgers kaj Yashovardhan por diferencigi inter informo kaj ties laŭkvanta aspekto. La Angla, la Franca kaj la Germana nur konas la esprimon "information", havanta ambaŭ sencojn.

Al (4): La strategia ŝtupo apartenas al teorio de la strategiaj ludoj. Temas pri ĝi ĉie, kie oni celas disvastigi la internacian lingvon kontraŭ la rezisto de tiuj, kiuj volas konservi aŭ enkonduki alian lingvon. Diskutoj pri tiucelaj taŭgaj strategioj oftas en interlingvistikaj

rondoj.

Pliprofundiga literaturo

vidu Frank, H.: *Kibernetiko kaj la internacia lingvo*, en: Maxwell, D. – Preotu, M. – Puiu Tacu, A. (eld.): *Lingvo kaj kibernetiko*, Akademia Libroservo, Praha 1994, 143-paĝa, sur la paĝoj 113-117, kun anglalingva resumo. La kolekto enhavas materialojn el la konferenco de TAKIS "Interkibernetik 93", okazinta 1993 en Iasi (Rumanio), en Esperanto, la Angla, la Franca kaj la Rumana. Utilas la enkonduka informo pri evoluo kaj celoj de TAKIS (Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko), kaj la artikoloj pri lingvoteorio, aŭtomatigo de lingvoscienco, kunigo kaj mezurado de lingvoscio, psikokibernetiko k.s.

1.2.8 Interlingvistiko kaj pedagogio

Interlingvistiko kaj pedagogio kontaktiĝas, se temas pri instruado de la internacia lingvo. Ĝiaj instrumentoj ne devas diferenciĝi de tiuj de naciaj lingvoj. Ekzistas la metodo klasika, literaturbazita, gramatik-traduka, praktikata ankoraŭ hodiaŭ precipe en la instruado de la fleksiaj lingvoj. Almenaŭ en Eŭropo tio estas heredaĵo el la ĝenerala instruado de la latina lingvo en la mezlernejoj. Ĝi havas siajn avantaĝojn. Bonaj lernantoj tiel akiras novan valoran ŝlosilon, kiu ebligas al ili legi la koncernan literaturon en la originalo. La gramatika metodo, sur kompara bazo kun gepatra lingvo, krome helpas en la studado de la propra lingvo. La tradicia metodo tamen ne taŭgas por tiuj lernantoj, kiuj malfacile lernas gramatikon. Nove oni do postulas, ke aŭskulto kaj parolo estu instruataj antaŭ lego kaj skribo, ke la lernantoj enmemorigu bazajn konversaciajn frazojn kaj enradikigu frazajn modelojn per ripeta praktikado. Dum la pasintaj ses jardekoj aperis diversaj teorioj en la kampo de lingvoinstruado kaj ĉiam novaj instrumentoj, ekz. la aŭdovida, konversacia, struktur-ripetiga, rekta metodo ktp. En la instruado de Esperanto estas i.a. uzata la rekta metodo laŭ Andreo Cseh, taŭga por lernantoj kun malsamaj gepatraj lingvoj. Uzado de taŭga instrumentado dependas ankaŭ de la lernantoj mem (ilia aĝo, antaŭscioj, gepatra lingvo), de la instrucelo (instrui por pasivaj aŭ aktivaj scioj) kaj de la instruado.

Ke la instruado de la planlingvo estas pli facila kaj pli efika ol tiu de etnolingvoj, estis jam sufiĉe pruvita. Se oni bezonas nur pasivajn konojn de fremdlingvo por atingi fakan kompetentecon en alia fako (ekz. ekonomio, informadiko ktp.), ne necesas instrui aktivan uzadon de la lingvo, konversacion, ripetadon kaj simile, sed koncentriĝi al klarigo de senŝanĝaj reguloj de la planlingvo kaj al instruado de koncerna terminologio. Eksperimente pruviĝis, ke proksimume dudeko da lingvopreparaj studhoroj sufiĉas al eŭropa universitata studento por pasive kompreni fremdlingvan (konkrete esperantlingvan) prelegon en lia fako. Tia uzo de planlingvo do estas pli tempoŝpariga ol lernado de fremda etnolingvo kaj longa preparado en la lingvaj kursoj por povi studi eksterlande aŭ entute kompreni la fremdlingvan prelegon. Aliro al la fremdlingva faka literaturo estas helpe de pedagogie taŭga instruado de planlingvo eĉ pli facila.

Krome ekzistas riĉe dokumentitaj eksperimentoj montrantaj propedeŭtikan valoron de planlingvo konstruita surbaze de eŭropaj lingvoj. La pedagogia valoro de lingvoorientiga instruado estas unu de la plej gravaj argumentoj, uzataj en interlingvistiko kaj en lingvopolitiko por prui la taŭgecon de la planlingvo (vidu la parton 6.3).

Pliprofundiga literaturo

Ekzistas metodologia lernolibro de Barcsay, Z. (eld.): *Metodiko en la praktiko*, Esperanto-Centro, Paderborn 1982, 122-paĝa, kun ĝenerale pedagogia enkonduko de B. Ragnarsson kaj

kun precizaj metodikaj ekzemploj de lingvoinstruado fare de spertaj instruistoj, membroj de ILEI. Pri interlingvistiko kaj glotodidaktiko, pri interlingva interfero en la fremdlingva instruado kaj psikolingvistikaj aspektoj de planlingva instruado, pri metodologiaj tendencoj, psikologiaj procedoj kaj similaj specialaĵoj de instruado de planlingvo legu *Szanser, I.: Glotodidaktikaj kaj specifaj aspektoj de Esperanto-instruado, KCE, La Chaux-de-Fonds 1988, 78-paĝan pedagogian kurslibron. Pri lernejoj eksperimentoj kun propedeŭtika instruado de planlingvo skribas Sonnabend, H.: Esperanto: lerneja eksperimento, raporto, analizo, konkludo, Edistudio, Pisa 1979, 157-paĝa, kun konkretaj ekzemploj, kalkuloj kaj grafikaĵoj pruvantaj lingvan transferon kaj propedeŭtikan valoron de la internacia lingvo. Plue Frank, H. – Barandovská, V.: Lernplifaciligilo pro antaŭmetitaj lingvokursoj, IPR 4/91, p. 11-15, represita en Barandovská (eld.), 1993 (vidu ĉe 1.2), paĝoj 621-625 klarigas kaj raportas pri efiko de enkondukaj planlingvaj kursoj por la posta faka instruado.*

1.2.9 Interlingvistiko kaj sociologio

La socia ĥaraktero de ĉiu lingvo estas ĝia daŭra eco, ĉar ĝi estas uzata kaj modifata de certa komunumo, kolektivo, grupo, ĉu senkonscie, ĉu konscie. Konscie formata lingvo pli bone adaptiĝas al ekzistaj bezonoj. Lingvaj komunumoj transiras evoluon integriĝan aŭ diferenciĝan. Tiuj du tipoj ŝanĝiĝis dum la evoluo de la socio, ekde primitiva komunuma socio kun diferenciga lingvotendenco trans sklava socio kun lingvointegriĝaj signoj ĝis la tempo de feŭdismo lingve dispecigita. Grandaj sociaj kuniĝoj dum kapitalisma epoko denove integriĝas la lingvojn, kiuj servas sur pli grandaj teritorioj. Sociologiaj faktoroj kondiĉas ankaŭ uzadon de komunaj lingvoj inter diversaj popoloj kaj nacioj, ĉu ene de unu ŝtato, ĉu inter kunlaborantaj memstaraj ŝtatoj. Sociologia flanko de interlingvistiko estis profunde studata ekzemple en iama Sovetunio (A. A. Reformatskij, V. G. Kostamarov), ĉar la Rusa iĝis interlingvo por multaj etnoj kun tre malsamaj gepatraj lingvoj. Oni studis sociologian funkcion de lingvoj interetnaj, internaciaj, interŝtataj ktp. La funkciado de planlingvo en la funkcio de lingvo internacia certe alportas aron da sociologia studmaterialo.

La dua intereskampoj de sociologio estas pristudo de diversaj planlingvaj movadoj kaj esploro, en kiuj sociaj tavoloj ili evoluas. La universala lingvo estis ekzemple ero de la teorioj de utopia socialismo, klopodanta krei idealan homan socion sen materiaj diferencoj, kie oni kunvivus en harmonio kaj paco. Eblas observi tiun ideon jam ĉe la renesancaj utopiistoj (More, Campanella), en la postaj du jarcentoj (Fourrier, Weitling), ĉe etburĝaj socialistoj kaj eĉ ĉe Marx kaj Proudhon. Interese estas observi la socian bazon de konkretaj planlingvoj, ekzemple Interlingua konatas kiel interlingvo de intelektularo, en Ido-movado ekzistas laborista branĉo. Same ĉe Esperanto estas klare distingeblaj celoj de la Universala Esperanto-Asocio kaj de Senacieca Asocio Tutmonda, kiu inklinas al laborista movado, laŭ la ideo de P. Lanti, ke la internacia laboristaro povas unuiĝi surbaze de komuna lingvo.

Simila problemaro, multe pli vasta ol menciite, orientigas multajn interlingvistojn sociologie. Kiel ekzemplo servu E. K. Drezen, kiu en sia historio de internaciaj lingvoj speciale observas uzadon de Esperanto kaj Ido inter laboristaro, el la nunaj interlingvistoj prilaboras tiun ĉi problemaron Arpád Rátkai, Sergej Kuznecov kaj Detlev Blanke.

Pliprofundiga literaturo

Legu artikolon de Rátkai, A.: *Fruaj socialismaj konceptoj pri la lingva futuro de la homaro*, en: *Szerdahelyi, I. (eld.): Miscellanea intelinguistica, Tankönyvkiadó, Budapest 1980, 513-paĝa*, sur la paĝoj 107-121. En la sama kolekto troviĝas kelkaj similtaj tekstoj, ekzemple pri sistemo de la transnacia lingvouzo de la sama aŭtoro, pri bazaj ecoj de la lingvopolitiko de J. Pool, pri etnaj problemoj kaj interlingvistiko de J. Jermár, pri socia bazo kaj komunika

efikeco de interlingvoj de H. Trautmüller kaj pluaj aliaj tekstoj pri interlingvistiko kaj esperantologio. Temas pri antologio enhavanta precipe prelegkolektojn el la internacia interlingvistika konferenco en budapeŝta universitato. La plejmulto da prelegoj estas en Esperanto, kelkaj en la Itala, Angla, Franca kaj Hungara. Pri socialismaj-komunismaj ideoj en internacia lingvouzo (interesa el historia vidpunkto) skribas ekz. *Isajev, M. I.: Problema iskusstvennogo jazyka meĵdunarodnogo obŝĉenija*, en: *Problemy interlingvistiki, Nauka, Moskva 1976, 157-paĝa*, sur la paĝoj 26-34. La broŝuro estas ruslingva. Sociologiaj pripensoj troviĝas ankaŭ en la ruslingvaj verkoj de S. Kuznecov, ekz. en *Kuznecov, 1984* (vidu ĉe 1.2.3) kaj *Kuznecov, 1987* (vidu ĉe 1.2.1).

1.3 Demandaro

4. Pri kio okupiĝas lingvistiko ĝenerala, historia, kompara?
5. Nomu almenaŭ 3 lingvistikajn disciplinojn.
6. Kiuj nacioj faris unuajn lingvopriskribojn?
7. Nomu almenaŭ 3 lingvistojn el la 18-a kaj 19-a jarcento.
8. Nomu almenaŭ 3 lingvistikajn skolojn el la 20-a jarcento.
9. Nomu almenaŭ 3 lingvistojn, kiuj difinis interlingvistikon.
10. Kio estas esenco de difinoj de Wandruszka, Szerdahelyi kaj Blanke?
11. Nomu almenaŭ 3 parencajn disciplinojn de interlingvistiko.
12. Kio estas esenco de lingvaj imperiismo kaj neŭtralismo?

2. LA INTERNACIA LINGVOSITUACIO

2.1 Etnolingvoj

La lingvo estas socia fenomeno, kunligita kun grupo da uzantoj, etno. Etnoj formiĝas en historia procezo dum teritoria disvastiĝo de homaro kaj sekva lingva diferenciĝo. Sociaj kontaktoj de diversaj etnoj kondukas male al lingva integriĝo, dum kiu etnolingvoj influas sin reciproke. Politika integriĝo alportas ekeston de nacio, formata de unu aŭ pluraj etnoj, kaj formadon de nacia lingvo. La termino "nacia lingvo" estas kaŭzita ĉefe politike, dum lingvistiko ofte uzas terminon "dialekto" ne nur pri diversaj lokaj realiĝoj de la sama lingvo (do ekzemple germana dialekto bavara, saksa, ŝvaba ktp.), sed ankaŭ pri memstaraj lingvoj naciaj, do "ĝermanaj dialektoj" estas ekz. la germana, la nederlanda ktp. La plej tipa ekzemplo estas la luksemburga lingvo, kiu laŭ ŝtata statuto estas nacia lingvo, sed el lingvistika vidpunkto ĝi estas germana dialekto.

Etnolingvojn oni kutime klasifikas genetike, do lingvoj ekestintaj dum diferenciĝo de la komuna pralingvo formas unu grupon. Baza unuo estas lingvofamilio, disiĝanta en branĉojn. Plej bone konata kaj esplorita estas la familio hindeŭropa, al kiu apartenas lingvoj hindaj, iranaj, balkanaj, italikaj, romanaj, keltaj, ĝermanaj, baltaj, slavaj, la greka, la armena kaj kelkaj izolitaj lingvoj. En Eŭropo kaj okcidenta Azio estas ankoraŭ lingvofamilioj: la kaŭkaza, la dravida, la urala, la altaja kaj la semido-hamida. Kiel apartajn grupojn oni indikas la korean kaj la japanan. Grandaj lingvofamilioj de orienta Azio estas krome: la ĉina, la taja, la tibetobarma, la aŭstrazia, la aŭstronezia. La lingvoj de Aŭstralio formas ĉ. 25 lingvofamiliojn, la plej granda estas la pamanjunga. En Afriko ekzistas ekz. jenaj lingvofamilioj: la sudana, la senegala, la volta, la bantua, la sahara. En Ameriko estas multaj familioj de eskimaj kaj indianaj lingvoj, ne ĉiuj bone esploritaj. Sed la importitaj eŭropaj koloniaj lingvoj ludas gravan rolon ankaŭ en Aŭstralio, Ameriko kaj parte en Afriko.

Kiom da lingvoj ekzistas? Tiu ĉi demando ne estas precize respondebla. Diversaj enciklopediaj kaj lingvistikaj verkoj mencias jen 4000-5000 lingvojn, jen 5000-8000 lingvojn, sed la ekzakta nombro ne estas trovebla, jam pro simpla kazo, ke estas ofte malfacile starigi limon inter lingvo kaj dialekto.

Ĉar la lingvo estas elemento vivanta, ĝi kaj ekestas kaj mortas, kio ja konstante okazas en la mondo. Oni scias, ke ekzemple amerikaj indianoj havas pli ol milon da lingvoj, ankaŭ da afrikaj lingvoj estas proksimume milo, la sola insulo Novgvineo havas ĉ. 700 lingvojn, Hindio pli ol 150, Ĉinio kelkdekon ktp. Oni scias, ke la Biblio estis tradukita en ĉ. 1800 lingvojn.

Kaj oni scias proksimumajn nombrojn de parolantoj de la plej grandaj lingvoj. Po pli ol 500 milionoj da parolantoj (ne nur denaskaj) havas kvar lingvoj: la Ĉina, la Hinda, la Hispana kaj la Angla. Po pli ol 100 milionoj da parolantoj havas naŭ lingvoj: la Araba, la Rusa, la Franca, la Portugala, la Vietnamana, la Japana, la Bengala, la Germana, la Suahila. Po pli ol 50 milionoj da parolantoj havas 18 pluaj lingvoj, po pli ol 5 milionoj da parolantoj ĉ. 3000 lingvoj, kaj ĉirkaŭ po miliono da parolantoj ĉ. 2500 lingvoj. Laŭ statistikoj el la jaro 1991 estas la plej grandaj (laŭ nombro de denaskaj parolantoj) jenaj 11 lingvoj: la Ĉina (882 milionoj da parolantoj), la Angla (445), la Hinda (363), la Hispana (351), la Rusa (292), la Araba (201), la Bengala (186), la Portugala (175), la Indonezia (144), la Japana (125), la Germana (120). Estas apenaŭ imagebla trovi iun komunan interkomprenigilon por tiom da diverslingvanoj. Sep el la menciitaj plej grandaj lingvoj estas hindeŭropaj, ili do havas komunan originon kaj similan strukturon, sed dum sia historia evoluo ili tiom diferenciĝis, ke ili (krom la paro hispana kaj portugala) estas reciproke nekompreneblaj kaj eĉ uzas diversajn skribsitemojn. Krome, ĝuste la plej parolata lingvo, la Ĉina, ne apartenas al tiu ĉi grupo, havante tute diversan strukturon. La 11 plej grandaj lingvoj estas parolataj de proksimume du miliardoj da homoj, kaj tio reprezentas eĉ ne unu duonon de la homaro. Nuntempe pli kaj pli da malgrandaj etnoj postulas oficialigon de siaj lingvoj, oni do devus respekti ankaŭ ilin. Se temas pri Eŭropo, neniu el ĝiaj lingvoj estas parolata de pli ol 15% de la tuta loĝantaro.

Interese estas kompari laŭ la posta tabelo la nombron de parolantoj kun la ekonomia potenco de la landoj uzantaj koncernan lingvon (indikoj el la monda ekonomia jarlibro 1992). Oni tuj konstatas, ke la Ĉina estas plej parolata lingvo, sed ne ekster Ĉinio, kiu okupas kun sia ekonomia produktiveco nur la okan lokon en la mondo. La Angla okupas pozicion numero du laŭ la nombro de parolantoj, sed la ekonomia potenco de angle parolantaj landoj senkonkurence superas ĉiujn aliajn. Laŭ similaj komparoj videblas, ke ekzemple la Hinda estas pli parolata ol la Japana, sed 363 milionoj da hindparolantoj produktas nur 340 \$ pokape, dum nuraj 125 milionoj da Japanoj 23 800 \$ pokape. Estas facile konkludi, ke la lingva superregado havas ne lingvistikajn, sed precipe ekonomiajn kaj sekve politikajn kialojn. Tial oni en Ĉinio kaj en Japanio diligente lernas la Anglan, sed en Eŭropo oni ne lernas la Ĉinan aŭ la Japanan. Se oni legas en eŭropaj ĵurnaloj anoncojn pri novaj laborlokoj, ili preskaŭ ĉiam postulas konojn de fremdlingvoj. Laŭstatistike (1992) estas procentaĵo de postulataj lingvokonoj en Eŭropo jena: la Angla 55%, la Germana 20%, la Franca 9%, la Hispana 3%, la Itala 2%, la Rusa 1%, la restantaj anoncoj postulas ĝenerale "fremdlingvaj konojn".

La internacia lingvo numero unu, la Angla, disvastiĝis kun koloniigo en ĉiujn kontinentojn kaj regas nuntempe ĉie kiel lingvaĵo de komputado, astronautiko kaj moderna tekniko. Lingvistike ĝi konsistas el kelkaj komponentoj, el kiuj la plej gravaj estas la anglosaksa kaj la franca. La historia ortografio estas konservata, dum la prononco ne korespondas al ĝi, estante komplika kaj malfacila. Por lernado estas ankaŭ malfacilaj la anglaj idiomaro kaj sintakso, same kiel ne klare rekoneblaj vortspecoj.

La plej multajn denaskajn parolantojn en Eŭropo havas la Germana, nacia kaj ŝtata lingvo de tri ŝtatoj kaj parolata de multaj minoritatoj ankaŭ en orienta Eŭropo. Ĝi havas grandegan diatopion (diferenciĝon de dialektoj), tiel ke ekz. la suddevena kaj la norddevena germanoj ne komprenas reciproke siajn dialektojn, nur la komunan literaturan lingvon. Kiel kulturlingvo de luterana eklezio ĝi iĝis unueciga en Germanio kaj ĝi servis kiel vehikla lingvo por kontaktoj en meza Eŭropo, ĉar la plejmulto da kleraj urbanoj en Pollando, Moravio, Hungario kaj en baltaj landoj estis germana. Gravan komunikan rolon ĝi havis ankaŭ en la habsburga monarĥio kaj kiel komerca kaj intelektula

lingvo ĝi estis vaste uzata en tuta Eŭropo ĝis la dua mondmilito. Ekzistas riĉa scienca germana literaturo, ĉefe pri teologio, filozofio, natursciencoj kaj lingvistiko. Morfologie ĝi estas analiza lingvo, sed kompare kun ekz. la Angla ĝi havas komplikajn fleksian sistemon. La ortografio estas nekomplika kaj superrigardebla, substantivoj estas markitaj ne nur per gramatika artikolo, sed eĉ per komenca majusklo.

Lando / lingvo	Parolantoj (milionoj)	Brutta socia produkto (USD)	Produktiveco (miliardoj da USD)	Loko laŭ parolantaro	Loko laŭ ekonomia potenco
Ĉinio / Ĉina	882	350	308	1-a	8-a
Usono, Britio, Aŭstralio / Angla	445	16000	7080	2-a	1-a
Hindio / Hinda	363	340	123	3-a	9-a
Hispanio, Sudameriko / Hispana	351	2000	600	4-a	4-a
Rusio / Rusa	292	2000	580	5-a	5-a
Sauda Arabio / Araba	201	2000	400	6-a	7-a
Hindio / Bengala	186	340	61	7-a	11-a
Portugalo, Brazilo / Portugala	175	2500	425	8-a	6-a
Indonezio / Indonezia	144	500	70	9-a	10-a
Japanio / Japana	125	23800	2980	10-a	2-a
Germanio, Aŭstrio, Svisio / Germana	120	20500	2460	11-a	3-a

Ĝis la pasinta jarcento havis gravan internacian rolon ankaŭ la Franca, kiel lingvo diplomacia kaj kiel prestiĝlingvo de nobelaro, precipe en Rusio. Ĝi regis en afrikaj kolonioj, kie ĝi parte ankoraŭ konserviĝis, ankaŭ en Kanado. Ĝia lingvouzo en Eŭropo estas homogena en Francio, Belgio kaj Svislando. Lingvistike ĝi konsistas el du historiaj dialektoj, norda kaj suda (la okcitana), el kiuj la norda iĝis politike pli grava pro centriga rolo de Parizo kiel ĉefurbo kaj sidejo de la Franca Akademio. La ortografio de la Franca estas relative komplika (supersignoj), same la fonologio (nazaloj), sed regula. Idiomaro estas riĉa.

La Hispana estas (krom Hispanio) nacia lingvo en la tuta Sudameriko krom Brazilo, estante parte uzata ankaŭ en Usono. Nun oni postulas ĝiajn konojn en Eŭropo pro komercaj celoj. Onidire ĝi

estas la plej facile lernebla eŭropa lingvo, kun nekomplika gramatiko, fonetike kaj ortografie klara.

La Itala restis lingvistike la plej proksima al la iam internacia Latina, konservinte la ortografion kaj ne tro ŝanĝinte la prononcon; la gramatiko, precipe la substantiva kaj adjektiva fleksioj faciliĝis. Ĝi estas lingvo konsiderinde regula, kun klaraj silaba kaj vorta strukturo. Kvankam Italio konsistis ĝis la pasinta jarcento el multaj malgrandaj ŝtatoj, la kulturhistorie kondiĉita literatura lingvo estis unueciga elemento. La Itala regas internacie en muzika nomenklaturon.

La Rusa estis grava interetna komprenigilo en iama Sovetunio kaj principe en tuta orienta Eŭropo, sed tiun prestiĝon ĝi estas perdanta. Kiel nacia lingvo ĝi tamen kovras relative grandan teritorion. Kiel slava lingvo ĝi multe diferenciĝas de okcidenteŭropaj lingvoj, havante ne nur komplikan gramatikon, sed ankaŭ nekutiman skribsistemon.

La ĵus menciitaj etnolingvoj estas konsiderataj kiel "gravaj" aŭ "grandaj" kaj tial estis ofte uzataj kiel kontrollingvoj por konstruo de internaciaj planlingvoj. Krom la Rusa ili apartenas al t.n. Standard Average European Group, havante multajn komunajn trajtojn: analizan esprimsistemon, prepozician fleksion, gramatikan artikolon, verboformojn laŭ vulgarlatina modelo (helpverbojn esti kaj havi), firman vortordon, vortkreadon kun afiksoj, similan idiomaron kaj latindevenan parton de vortprovizo. Ili estas daŭre respektataj en internacia komunikado.

Pliprofundiga literaturo

Rekomendatas konsulti ajnan etnolingvan lernolibron, en la Germana ekz. *Meier, G.&B. : Handbuch der Linguistik u. Kommunikationswissenschaft, Band I, Akademie-Verlag, Berlin 1979, 552-paĝa*. Ĝi enhavas detalan geografian klasifikadon de etnolingvoj kun priskriboj de ilia historio kaj aktualaj informoj. Aldoniĝas riĉaj maparo kaj registro. Tre praktika ekzemplaro de tekstoj en diversaj lingvoj de la mondo, inkluzive kelkaj piĝinoj kaj Esperanto, kun anglalingvaj komentarioj kaj registro, estas broŝuro *Katzner, K.: The Languages of the World, Routledge, London & N. Y. 1992, 376-paĝa*. Tie troviĝas ankaŭ kelkaj informoj rilate la sekvan ĉapitron.

2.2 Lingvonormigo en etnolingvoj

Oni apenaŭ konscias, ke en ĉiuj etnolingvoj, kiuj havas propran literaturon, gramatikon kaj vortaron, okazis jen pli, jen malpli strikta konscia lingvonormigo. Kialoj de lingvonormigo estas praktikaj, nome uniugo kaj kodigo de prononco, gramatiko kaj ortografio de la lingvo. Sekve ekestas gramatikaj libroj kaj vortaroj, kiuj resumas la staton de la lingvo en certa tempopunkto, sed samtempe ili iĝas preskribaj por la futura lingvouzo. Ili do iĝas devigaj kaj normigaj, tamen en la momento de la apero jam eksmodaj, ĉar la lingvo plu spontanee evoluas. Tempo ekde la apero de popola lingva artkreado kaj literaturo ĝis la apero de gramatiko estas konsiderinde granda — la lingvo jam devas esti sufiĉe disvastigita, evoluigita kaj konscie uzata. Ekzemple la franclingva literaturo ekestis en la naŭa jarcento (la unua teksto datiĝas el la jaro 842), la franca gramatiko nur en la jaro 1660. Ĝi havis tiomgrade normigan influon al la lingvo, ke ĝi estas senprobleme komprenebla eĉ hodiaŭ. (Sed ekzemple la ĉeĥaj tekstoj el la sama epoko hodiaŭ ne plu estas kompreneblaj, ĉar la ĉeĥa gramatiko ekestis nur en la 19-a jarcento.). La lingvonormigo en naciaj lingvoj do estas tute natura fenomeno, kiu okazas, kiam la lingvo jam estas funkcia. Male, ĉe planlingvoj ekestas unue normo, t. e. gramatiko kaj vortaro, kvazaŭ skeleto, sur kiu poste konstruiĝas kaj plu evoluas la lingvo.

La literatura lingvo poste apogas sin je la ekzistantaj gramatiko kaj vortaro, uzante "standartan", norman formon, kiu diferenciĝas de dialektoj. En ili ĝenerale ne aperas literaturo, sed ili pravas

naturan evoluon de la lingvo. Dialekto povas naski lingvon nacian, ekzemple la nacia slovaka lingvo estis normigita eĉ dufoje, unue surbaze de la mezslovaka dialekto, la duan fojon sukcese surbaze de la okcidentslovaka dialekto. Nacia lingvo povas esti eĉ sintezo de dialektoj — la Germana normiĝis surbaze de la saksa oficeja lingvaĵo kaj de la okcidenta dialekto. Por normigo de la literaturlingvo (kaj de la nacia lingvo) estas gravaj bazaj, t.n. ŝlosilaj tekstoj, kiuj estas vaste konataj, precipe se temas pri tekstoj religiaj kiel Vedioj, Korano. En Eŭropo ludis tiun ĉi rolon la Biblio kaj ĝiaj tradukoj — ekzemple la Slovakoj uzis antaŭ sia lingvonormigo kiel oficialan lingvon la Ĉeĥan, ĉar la ĉeĥa traduko de Biblio estis tie vaste konata. La nacia germana lingvo stabiliĝis pro la biblia traduko de Luther. Por la nacia lingvo itala ludis tian rolon la amase legata verko de Dante Alighieri "La divina commedia", skribita en toskana dialekto.

La transformo de etnolingvo/dialekto en lingvon nacian ĉiam alportas konscian normigon, ĉu en ortografio kaj prononco, ĉu en vortaro, gramatiko kaj stilistiko. Estas enkondukataj novaj skribmanieroj (ekzemple la Vietnama kaj la Turka akceptis latinan alfabeton), la vortaro estas kompletigata per nove bezonataj vortoj (ekz. vortojn kiel robot aŭ sputnik transprenis multegaj lingvoj el la slavaj) ktp. La nacia lingvo servas en ĉiuj kampoj de nacia vivo, la nacioj do devas lerni la normlingvon, eĉ se ili hejme parolas dialekton. La normigo plifaciligas komunikadon en granda teritorio, alivorte, la nacia lingvonormigo garantias senprobleman komunikadon ene de unu nacio. Nuntempa ekzemplo estas la romanĉa lingvo, parolata en Svislando. Ĝi havas plurajn dialektojn. Sub la gvido de profesoro Schmitt estis enkondukita "oficiala" romanĉa lingvo, kiu estas uzata en oficejoj kaj en amaskomunikiloj, dum la dialektoj estas daŭre uzataj hejme.

En Norvegio malaperis la historia lingvo dum la kelkcentjara (1380-1814) dana okupacio, estante anstataŭigita per la dan-norvega literatura lingvo, riksmål. Post la ekesto de nacia memstareco iĝis aktuala la problemo de norvega nacia lingvo. Fine de la 19-a jarcento ellaboris ĝin la dialektologo Ivar Aasen surbaze de malnovnorvegaj dialektoj. Tiu ĉi nova literaturlingvo, landsmål (aŭ nynorsk) estas egalvalora al riksmål kiel oficiala lingvo. Nuntempe ekzistas eĉ reformprojektoj plunormigi ambaŭ lingvojn tiel, ke ekestu unueca nacia lingvo, samnorsk.

Pri la akcepto de oficiala lingvo ĝenerale ne decidis lingvistikaj, sed historiaj kaj politikaj kaŭzoj, kion pruvas ekzempla kazo de la oficiala lingvo de Israelo. La sendependa ŝtato enkondukis post la jaro 1945 la "mortan" malnovhebrean lingvon, kiu servis kiel bazo por unueca ŝtata normlingvo, ivrito. Oni parolas pri la revivigo de la Hebrea, tamen pluevoluigita kaj reformita en vortaro kaj ortografio.

Tie, kie pluvivas pluraj nacioj kun diversaj etnolingvoj, ekestas lingvonormigo internacinivela. Tion oni povas diri pri la oficiala lingvo de Indonezio, Bahasa Indonesia. La lokaj lingvoj parolataj en multnombraj indoneziaj insuloj estas reciproke nekompreneblaj. Male al ceteraj koloniistoj, la Nederlandanoj ne devigis la koloniigitojn uzi la Nederlandan, ili tamen havis intereson pri enkonduko de unueca oficiala lingvo, kio ja estis grava kaj por klerigo kaj por kristanigo. La plej konata lingvo, uzata en lokaj komercaj kontaktoj, estas la Malaja. Komence de nia jarcento oni konstruis surbaze de la konataj vortradikoj gramatikon kaj vortaron de la Indonezia, kiu praktike estas identa kun la Malaja, sed la ortografio estas nederlandeca, dum tiu de la Malaja estas angleca. La normigita Indonezia komence estis uzata en lernejoj kiel instrulingvo. Post la sendependiĝo de Indonezio iĝis la normlingvo grava politika ligilo. Nuntempe oni uzas dum la unuaj du lernojaroj ankoraŭ lokajn lingvojn, sed poste ĉiuj lernas en Bahasa Indonesia. Sekve estas la plejparto de la loĝantaro dulingva. Proksimume 12 milionoj de la 165 miliona loĝantaro de Indonezio jam parolas la normlingvon kiel gepatran. Ekzistas eĉ oficiala centro (siaspeca lingva akademio) por pluevoluigo de la unueca Indonezia.

En multaj afrikaj ŝtatoj, kiuj estis formitaj kiel kolonioj ofte sen respekti etnajn kaj lingvajn cirkonstancojn, estis enkondukitaj post ekskoloniigo afrikaj lingvoj. Tiel per registara dekreto iĝis

la Svahila oficiala lingvo de Tanzanio en la jaro 1967 kaj ekde 1970 ĝi estas enkondukata kiel oficiceja kaj nacia lingvo en Kenio.

Konklude, sociaj kaj politikaj kaŭzoj, laŭ kiuj ekestas nacioj kaj ŝtatoj, havas ankaŭ lingvajn konsekvencojn en lingvonormigo, eĉ lingvoplanado, nome kaj enkadre de unu nacio aŭ ŝtato (kiu povas esti plurnacia), kaj por la bezonoj de eksteraj kontaktoj internaciaj kaj interŝtataj.

2.3 Lingvoj adaptitaj por internaciaj kontaktoj

praktike jam apartenas en la kategorion de planlingvoj, adaptante etnolingvojn celkonscie por internacia lingvouzo. Oni konas en tiu ĉi grupo ekzemple lingvojn de Basic-tipo, reformlingvojn, zonajn lingvojn, kompromis-lingvojn. *Basic*-lingvoj estas modifitaj etnolingvoj, kiuj uzas reduktitan vortaron de la koncerna etnolingvo kaj per parafrizado kaj kombinado de ties elementoj trovas proprajn esprimrimedojn. La ortografio, morfologio kaj sintakso de la etnolingvo restas konservitaj. La plej konata reprezentanto de tiu ĉi grupo estas *Basic English* ("Basic" estas samtempe mallongigo por **British American Scientific International Commercial**). Ĝi estas la Angla lingvistike modifita de Charles K. Ogden. Li publikigis en 1925 kun Ivor A. Richards verkon pri semantikaj problemoj "The Meaning of Meaning", kiu okupiĝis pri elementoj kaj strukturo de vortsignifoj kun la celo trovi vortaran minimumon por difino de plej bezonataj nocioj. La aŭtoroj trovis ĉ. 800 anglajn vortojn. Plu baziĝante sur ili, konstruis Ogden en 1930 *Basic English*. Oni asertis, ke ne temas pri nova lingvo, sed pri metodo plifaciligi la lernadon de la Angla — por tiu, kiu ellernis *Basic English*, sufiĉas nur iom plulerni por regi la Anglan. Sed samtempe ĝi estas propagandilo por uzado de la Angla en internaciaj kontaktoj.

La vortaro de *Basic English* konsistas el 850 anglaj vortoj en originala ortografia formo. Ili dividiĝas en tri grupojn:

- a) substantivoj (things), el kiuj 400 ĝeneralaj (general), ekz. agreement, attraction, space, stone, kaj 200 pentreblaj (pictured), ekz. apple, bird, potato.
- b) adjektivoj (qualities), 100 ĝeneralaj, kiel able, angry, broken, kaj 50 kontraŭaj (opposites), ekz. bad, bitter, dear.
- c) operaciiloj (operators), 100 vortoj, el kiuj 18 verboj: come, get, give, go, keep, let, make, put, seem, take, be, do, have, say, see, send, may, will, plue prepozicioj, konjunkcioj, artikolo, adverboj kaj pronomoj.

Al la baza vorprovizo alkalkuliĝas internaciaj vortoj kiel automobile, passport, police, hotel, plue ciferoj, nomoj de tagoj, monatoj ktp. kaj propraj nomoj. En la listo ne troviĝas kunmetitaj vortoj, krome oni devas aldoni fakterminojn, se oni volas skribi sciencajn tekstojn.

Ekzemplo de parafradoj: to descend = to come down/to go down, to participate = to take part, to think = to have opinion/to have idea/to have thoughts in one's mind, to wander = go from place to place without aim, bush = small tree, tyranny = cruel government. Per tiaj parafradoj transformiĝas la anglalingva frazo ekz. jene:

"The looking-glass on the way to the motion picture house had a fall after getting off the ship and is badly broken." La angla originalo sonas: "The mirror dispatched to the cinema sustained serious damage through falling after disembarkation."

Dum malmultaj jaroj aperis konsiderinde granda kvanto da tekstoj en *Basic English*, kaj beletraj, kaj sciencaj, kaj didaktikaj tekstoj por instruado. En multaj landoj estis kursoj. Winston Churchill

rekomendis en 1943 al la Brita Kabineto subteni Basic por helpi disvastigon de la Angla. La kritikistoj rimarkigas, ke Basic estas nur unu ŝtupo por atingi la normalan lingvouzon.

En multaj etnolingvoj oni poste ellaboris minimuman vortaron, necesan por lerni la fundamentojn de la lingvo. Tiaj sistemoj, kiel Francais Fundamental, Grunddeutsch, Basic Slovak kaj similaj, ne estas sur la sama lingvoplanada nivelo kiel Basic English, ĉar ili nur reduktas vortaron al baza minimumo, ne celante esti memstara lingvo.

Krome ekzistas multaj provoj reformi gramatikon kaj ortografion de etnolingvoj, ekzemple pli ol cent *reformprojektoj* de la Angla. Kelkaj tiuj provoj estis prezentitaj ankaŭ en interlingvistika literaturo, kiel Simingsound (E. B. Johnston, 1960), Sistemizd English (Fiomedoro 1969), Soundwriting (Bivins, 1960) k.a.

Al *zonaj* lingvoj apartenas projektoj ellaboritaj por certaj lingvogrupoj aŭ lingvoregionoj. La plej konataj estas tutgermanaj kaj tutslavaj projektoj, ekestintaj plej multe en la epoko de "nacia revivigo" fine de la 19-a jarcento, sed eĉ nuntempe: "Tutonish", tutgermana projekto de Elias Molee (1902), "Universalspråket" por skandinaviaj landoj de K.G.F.Keyser (1918), "Euronord" por norda Eŭropo de A. J. Pilgrim (1965), "Mezduslavjanski jezik" por Slavoj de Ladislav Podmele (1958).

Kiel *kompromis-lingvoj* estas indikataj sistemoj, kiuj kombinas unu aŭ plurajn etnolingvojn. Iliaj aŭtoroj ne strebas pri la plej ebla internacieco, sed respektas lingvomaterialon, kiu laŭ ilia vidpunkto estas grava. Dum la zonaj lingvoj kolektas materialon el unu lingvogrupo, la kompromis-projektoj kombinas materialon el diversaj grupoj. Tipa ekzemplo estas "Anglo-Franca" de Georg Henderson (1889), kiu uzas artikolon, pronomojn, adverbojn, prepoziciojn kaj konjunkciojn de la Angla kaj la reston de vortprovizo de la Franca. El la Angla kaj Hispana ĉerpas du projektoj: "Anglo-Lat" de Robert Monteiro (1967) kaj "Frendo" de Alonso Churruca (1966).

Iom apartan kazon en planlingvistiko reprezentas Loglan (Logical language). Ĝi estas verko de James Cooke Brown, ellaborita surbaze de formala logiko por bezonoj de lingvistikaj teorioj de Edward Sapir kaj Benjamin Lee Whorf pri interrilatoj de lingvo, kulturo kaj mensaj procezoj, nome ke la pensado estas determinata per la koncerna lingvo. Tial, opinias Brown, povas la logika lingvo influi la pensadon, plifaciligante ĝin. La logika lingvo do superus la etnolingvojn en la apercepteblaj lingvoprocedoj. La unua propono de internacia logika lingvo aperis en la jaro 1960 en la revuo "Scientific American" kaj oni vaste diskutis la problemon en "The international Language Review". La plua versio de la projekto estis publikigita en la jaro 1975 kaj ĝi estas ankoraŭ plibonigata. Loglan havas kvin vokalojn kaj 16 konsonantojn, tri vortspecojn (t. e. propraj nomoj, 120 unusilabaj partikloj kaj 834 predikativoj) kaj 257 gramatikajn regulojn, ebligantajn formi gramatike korektajn frazojn. La predikativoj havas firman fonologian strukturon, reprezentantan certan agon en ĉiuj eblaj evoluperiodoj, ekz. DA = la unua evoluperiodo = subjekto, DE = la dua evoluperiodo = objekto, varieblaj estas pluaj periodoj DI, DO, DU. Ekzemple: Gluva = esti ganto, da gluva = estas ganto; gorma = esti pli varma, da gorma de = X estas pli varma ol Y; kampe = aĉeti, da kampe de di do = X aĉetas Y por X en H. La partikloj organiziĝas en logikaj kategorioj laŭfunkcie, ekzemple lokaj VI, VA, VU, abstraktaj PO, PU, ZO... La vortprovizo enhavas ĉ. 4200 vortojn (funkciaj elementoj, primitivaj vortoj, predikativoj, internaciaj vortoj, sciencaj terminoj k.a.) Strukturo de la unuopaj vortoj estas konstruita tiel, ke ili enhavu certan procentaĵon de fonemoj el ĉiuj grandaj lingvoj: 28% de la Angla, 25% de la Ĉina, 11% de la Hinda, 10% de la Rusa, 9% de la Hispana, po 6% de la Franca kaj de la Japana kaj 5% de la Germana. Do ekzemple la vorto por semajno estas "likta", ĉerpinte 2/3 de siaj fonemoj el la angla "week", 3/5 el la ĉina "li bai", 3/7 el la japana "ishukan", 2/5 el la hinda "saptah" kaj 3/9 el la rusa "nedelja". La frazo "La Mark Twain bie le grada ge merka srite na le neveri nemni" (Mark Twain estas unu de la plej grandaj usonaj verkistoj de la 19-a jarcento) do estas internaciega, kunmetita el elementoj de la plej grandaj lingvoj, sed ne komprenebla de unuopaj lingvoparolantoj. Loglan estas en sciencaj rondoj ofte

menciata kaj diskutata projekto, tamen destinita pli por scienca esploro ol por praktika lingvouzo. Diskutata estas ankaŭ propono de itala kibernetikisto Silvio Ceccato konstrui internacian helplingvon per kibernetikaj metodoj.

Pliprofundiga literaturo

Troviĝas bazaj informoj en *Blanke, 1985* (vidu ĉe 1.2), en la tria ĉapitro. Por Basic English bv. konsulti *Ogden, C. K.: Basic English, London 1931* kaj aliajn tiutemajn verkojn de la sama aŭtoro, bibliografiitaj ankaŭ ĉe *Blanke, 1985, paĝo 327*, por *Loglan Brown, J. C.: Loglan, Gainesville 1966*.

2.4 Naturaj interlingvoj

Pro diversaj sociaj, kulturaj kaj ekonomiaj kialoj estis kaj estas etnolingvoj uzataj ankaŭ en la funkcio de interlingvo. Parte konscie, parte tute spontanee ili estis adaptitaj por la bezonoj de komunikado inter uzantoj kun malsamaj gepatraj lingvoj, estante aŭ modifataj kaj ŝanĝataj tiucele, aŭ simpligataj tiel, ke praktike ekestis nova natura interlingvo. La komencojn de tia procezo oni povas observi jam en la antikvaj tempoj.

2.4.1 Antikvaj lingvoj

Iom nescienca ŝajnas esti biblia legendo pri la babela turo kaj lingvokonfuzo, kiu tamen estis konsiderata serioza ankoraŭ de humanismaj filozofoj. Kia estas vera historia kerno de la legendo? Komence de la 19-a jc. a. K. ekloĝis la babilonan teritorion unu el amureaj etnoj kaj nomis sian loĝlokon Bab-ili, "dia pordo". Tiu nomo estis adoptita por la tuta regiono, elpuŝante la antaŭan nomon "Ŝumer kaj Akkad". La babilona dinastio famiĝis pro la sesa regnanto Ĥammurapi en la 18-a jc. a. K., kiu unuigis la landon kun tre malsamtipa kaj malsamlingva loĝantaro. Ĝia ega parto estis idoj de Ŝumeroj. Interlingvistikaj fontoj (ekz. Kuznecov, Duliĉenko) nomas ĝuste la Ŝumeran la unua internacia lingvo en homara historio, substrekante la fakton, ke la Ŝumeroj inventis kejluskribon, transprenatan eĉ por la kodigo de aliaj lingvoj, ekz. la Elama, la Ĥetita kaj la Akkada. En la imperio de Ĥammurapi la Ŝumera estis liturgia lingvo, uzata ankaŭ en oficialaj dokumentoj. Kroma grava lingvo estis la Akkada. Krom la semitaj Akkadanoj loĝis en Babilonio multaj amureaj etnoj, Kassitoj kaj Ĥetitioj. Laŭ iuj lingvotestoj ekestis la biblia legendo pro lingva etimologio: signifoj de la hebrea vorto "balal" estas "miksi, grumbli, malklare paroli", kio ja fonetike similis al "Babel" kaj kune kun la fakto, ke la babilona imperio estis multnacia, kreiĝis nocio "babel" kiel sinonimo de lingva ĥaoso kaj multlingveco. En la biblia legendo tamen kaŝiĝas du sobraj faktoj: informo pri la multlingva ĥaraktero de la antikva imperio kaj konsciiĝo pri tio, ke tia stato estas maloportuna kaj ke la komuna lingvo estus pli natura kaj avantaĝa.

La Aramea

En la babilonan regionon transloĝiĝis ankaŭ arameaj etnoj. Ekde la 11-a jc. a. K. fondiĝis multaj malgrandaj ŝtatoj. Asiriaj atakoj ekde la 9-a jc. ofte celis la arameajn ŝtatojn kaj kaŭzis la deportadon de loĝantaro en malproksimajn teritoriojn, inter la homojn de alia lingvo. La unuopaj etnoj komprenis sin reciproke pro la strukturo de semitaj lingvoj, kies vortsignifo troviĝas en la konsonantoj, en la skribo do ne estas apartaj signoj por la modifantaj vokaloj. La Aramea, kvankam disdialektiĝinta, formis lingvon komunan al ĉiuj etnoj. En la 7-a jc. a. K. ĝi iĝis oficiala lingvo de la Persa Imperio. El ĝenerala lingvo ĝi supreniris al la nivelo de komprenigilo de internaciaj politikaj kaj kulturaj rilatoj en vastaj regionoj de Hindio ĝis Egiptio. La Aramea travivis la detruon de Persa imperio fare de Aleksandro la Granda en 333 a. K. kaj iĝis fundamenta materialo por skriblingvoj

de arameigaj nacioj. Pro sia superrigardebla gramatiko kaj unueca skribmaniero ĝi estis prototipo de pazigrafio — la skriba formo estis uzata eĉ per nearameanoj. Tamen, la pli gravan rolon, kiel ĉiam en la historio de internaciaj lingvoj, ludis la politikaj kaj ekonomiaj faktoroj, pro kiuj la Aramea estis en la internacia forumo elpuŝita per la Greka..

La Sanskrita

En la 2-a jc. a. K. okupis Hindion Arioj kaj subigis al si la lokajn Dravidojn eĉ lingve. La plej malnova lingvostato ne estas skribe dokumentita, sed dedukteblas el du pli postaj literaturaj lingvoj, la Veda en Hindio kaj la Avesta en Irano. En la plej malnova aria lingvo, la Veda, estas skribita religia poezio. Oni opiniis, ke la deklamado de religiaj himnoj havas magian povon nur tiam, se ĝi estas lingve korekta, tial konserviĝis la arkaika lingvoformo, poezieca kaj ne uzata en normala komunikado. La parolata lingvo certe estis pli simpla ol tiu arkaika formo. El la Veda evoluis la parola Sanskrita, en kiu ankaŭ ekzistas tekstoj. La klasika formo el la 5-a jc. a. K. nur malmulte ŝanĝiĝis kaj plenumis la funkcion de literatura lingvo dum 2000 jaroj. Inter la Veda kaj la Sanskrita ne estas tro grandaj diferencoj en fonetiko kaj gramatiko, sed en la vortprovizo de la Sanskrita aperas novaj vortoj, parte transprenitaj el aliaj lingvoj, precipe la dravidaj, kaj el dialektoj, kiuj abundis en Hindio. Kulmina fazo de la Sanskrita estis en la 4-a jc. a. K., kiam la lingvo estis gramatike normigita kaj ekde tiam konatas la termino "saṃskṛta", regula, kontraŭ la ĝistiamaj "prākṛta", simpla, ĉiutaga. Gramatikisto Pāṇini verkis la klarigon de la gramatika sistemo, sistemigante la ĝistiamajn konojn kaj klasifikante la konsonantojn kaj vokalojn laŭ la artikulacia loko. Lian gramatikon formas ĉ. 4000 mallongaj frazoj, priskribantaj la lingvostrukturon preskaŭ matematikece. La deklinacio havas tri genojn, tri numerojn (inkluzive dualon) kaj ok kazojn. Numeraloj kaj pronomoj havas apartan deklinacion. Malgraŭ ilia komplikeco estas ĉiuj lingvaj fenomenoj superrigardigitaj. La plejparto de tekstoj devenas el la tempo post tiu ĉi lingvonormigo. La gramatiko de Pāṇini koncernis la skriban formon, sed de li priskribita akcento, longiĝo de vokaloj en alparolo ktp. transiris en la vivantan lingvon.

La sanskrita estis en siaj komencoj vivanta lingvo, ekzistanta en dialektaj variaĵoj, kion asertas ĝiaj gramatikistoj. Kiu parolis tiun ĉi lingvon? Brahmanoj, nomataj en gramatikistaj mencioj "ŝiŝta", saĝuloj, la reĝo kaj oficistoj, kaj superaj tavoloj de la loĝantaro. La popolo parolis per prakrtoj, sed devis kompreni ankaŭ la Sanskritan, kiun uzis iliaj oficistoj. La Sanskrita estas ankaŭ lingvo de teatraĵoj kaj eposoj. La budhistoj komence evitis la Sanskritan, uzante popolajn lingvojn, poste ili tamen akceptadis sciencajn terminojn el la sanskrita kaj adaptis la popolan lingvon. En la enskriboj konserviĝis prakrtoj ĝis la 1-a jc., sekvis miksoformo influita de la Sanskrita, sekvata de la pura Sanskrita, dominantaj ekde la 6-a jc., kvankam la prakrtoj plu ekzistis. (Du originalaj ĉefaj dialektoj de prakrtoj, okcidenta kaj orienta, disbranĉiĝis komence de nia jarcento kaj naskis nuntempajn hindeŭropajn lingvojn de Hindio.) La Sanskrita tamen konserviĝis en la literaturo de Hindio, la vivantaj lingvoj do estis akompanataj de klasika lingvo, kies kono ne malaperadis. Unuopajn sanskritajn esprimojn transprenis eĉ la koloniala Angla. Sanskritaj enskriboj troviĝas ankaŭ ekster Hindio.

Kiel pritaksi la Sanskritan el interlingvistika vidpunkto? La plejmulto de teoriistoj (Renou, Mac Donell) konsentas, ke la Sanskrita estis normala parolata lingvo, normigita por la bezonoj de literaturaj religiaj tekstoj. Gramatikistoj ne forgesas mencii Pāṇini kiel unuan fonetikiston. La ekziston de la literatura lingvo paralele kun parolataj dialektoj oni povus kompari al funkcio de la Latina dum mezepoko, kiam krom la "literatura", sed parole kaj skribe aktiva Latina de kleruloj ekestis naturaj latinidoj. Konscia influo de la lingvo, fiksigo de gramatikaj normoj, helpis krei unuecan lingvoformon kun "transnacia" funkcio kiel komuna komprenigilo por parolantoj de diversaj dialektoj. Drezen mencias la Sanskritan kiel ekzemplon de lingvoplanado. Eksterlingvaj kulturaj faktoroj ankaŭ estis gravaj: Brahmanoj kiel flegantoj de kulturo sentis bezonon de unuigita lingvo por interpreti malnovajn religiajn tekstojn, kies prononco ekdiferenciĝis dum la evoluo ĉe

diversaj etnoj. En la reguligitan lingvon tradukiĝis ĉio literature kaj historie grava. Ekzisto de la Sanskrita do helpis konservi kulturajn valorojn en Hindio.

La Greka

La Greka estas menciata kiel tipa kultura lingvo kiu, disvastigante sciencon kaj kulturon postlastis spurojn en ĉiuj eŭropaj lingvoj. Oni povas sekvi ĝian evoluon dum trimil jaroj. Neniu alia lingvo havis pere de literaturo kaj vortmaterialo tioman influon al pli postaj hindeŭropaj lingvoj en Eŭropo mem. Kiomgrade estis la Malnovgreka ankaŭ unuiganta faktoro? Oni estas informitaj pri greklingva loĝantaro jam en la 2-a jarmilo a. K. sur balkana duoninsulo, sur insulo Kreta kaj sur proksima azia marbordo. La nacio plue formiĝis per kunkresko de diversaj hindeŭropaj etnoj, kiuj penetris al balkana duoninsulo dum la 2-a jarmilo a. K. el siaj nordaj sidejoj kaj kunfandiĝis kun pli malnova loĝantaro. Unuopaj gentoj ekloĝadis ankaŭ sur egejaj insuloj kaj okcidentazia bordo, poste ili kolonizis Sicilion, sudan Italion, kaj fine marbordon de Mediteraneo kaj Nigra Maro. Oni komence renkontas la Grekan kiel grandan spektron de la plej diversaj dialektoj. Preskaŭ ĉiu urboŝtato (polis) havis sian propran varianton enkadre de certa lingvogrupo, precipe se ekzistis genetika parenceco, ekz. en la rilato de kolonio al la patrina urbo. Ne temis tiam pri la rilato konata el la nunaj vivantaj lingvoj, nome ke la dialektoj ekzistas paralele kun la unuiganta skriba lingvo, kiu ĉirkaŭigas ilin. Grekaj dialektoj estis multe pli memstaraj kaj la plej gravaj el ili havis sian propran literaturan verkadon. La fonetikaj kaj gramatikaj diferencoj respeguliĝis ankaŭ en la skribmaniero, kio videblas sur enskriboj jam en la 6-a jc. a. K. Reciproka kompreniĝo inter la unuopaj etnoj ja eblis, sed la preciza klasifiko de la dialektoj ŝajnas esti problemhava. Kiel ĉefaj grupoj estas menciataj la Iona, la Attika, la Aiola, la Boiota, la Thessala, la Dora kaj la Arkadokipra¹. Kiomgrade eblas rekonstrui historian evoluon de la tri plej gravaj etnoj (Aioloj, Ionoj, Doroj), tio ankoraŭ ne estas senproblema demando. Dialektaj diferencoj estas klarigataj ne nur genetike, do laŭ la historio de koloniigo, sed ankaŭ loke, per reciproka influo de najbaraj regionoj ktp. La bunteco de politika spektro de la antikva Grekio klare speguliĝis en la unuopaj dialektoj, kiuj tamen estis reciproke kompreneblaj.

Baza arkaika greka literaturo estas la Homeraj eposoj, skribitaj en la Iona kun multaj Aiolaj elementoj. Unu el la teorioj de ilia genezo (kantataj historioj, versoj akompanataj per ludinstrumento) klarigas, ke per la mekanika ripetado de tutaj frazeroj konserviĝis multaj arkaikaj esprimoj kaj parolturnoj, kiuj en la tempo de skriba esprimigo ne plu estis uzataj. Same eniris la finpretan tekston partoj transprenitaj el pli malnovaj skribaĵoj. Ilias kaj Odyssea estis ofta legaĵo, oni do devis kompreni ilin. La Iona poste stabiliĝis kiel lingvo de epiko kaj elegio, kaj tiucele uzis ĝin eĉ la verkistoj origine aliaj ol Ionaj (Hesiodos el Boiotio, Tyrtaios el Sparta). Se iu literatura ĝenro estis perfektigita en iu dialekto, sekve la dialekto iĝis deviga kaj karakteriza por la ĝenro. Tiel oni klarigas la uzon de la Aiola en la Mela liriko dank' al Alkaios kaj Sapfo. La ĥorliriko estis tradicie kreata en la Dora, do eĉ la aŭtoroj de attikaj tragedioj uzadis ĝin. En la kampo de naturaj sciencoj kaj historio brilis Ionaj aŭtoroj el Mileta regiono (ekz. Thales, Anaksimandros), sekve sciencajn publikaĵojn skribis ione ankaŭ Herodotos el la Dora Halikarnassos kaj Hippokrates el Dora insulo Kou. Sammaniere venkis la Attika kiel lingvo de dramo, retoriko kaj filozofio. Retoriko kaj filozofio estas kompreneble tre gravaj en la politiko, kaj kune kun la influo de Ateno, grava centro ekonomia, politika kaj kultura, la konoj de la Attika iĝis bezonataj ĉe ĉiuj grekaj etnoj. Surbaze de la Attika do, pro la niveligaj tendencoj, ekestis la komuna greka "koine". Estas certe malfacile prijuĝi, kiomgrade estis stiligitaj la unuopaj literaturaj dialektoj ĝuste por la uzo en sia literatura ĝenro. Verŝajne ili diferenciĝis de la ĉiutaga parollingvo. Laŭ tiu ĉi vidpunkto do "koine" ne iĝis unueciga lingvo ĝenerala kaj parola, sed literatura, skriba.

¹ La nomoj uzataj ĉi tie estas rektaj transskriboj de la grekaj originaloj. Ekzistas pli esperantigitaj radikoj kaj laŭ la instruo de Nova Plena Ilustrita Vortaro la koncernaj dialektoj povas esti nomataj: ionia, atika, tesalia, eolia, beotia, doria.

Grava fakto por pritaksado de interlingvistika funkcio de la malnova Greka estas, ke la Grekoj ne estis unueca nacio. La nomon "Graeci", kiun oni transprenis el la Latina, apartenis al la etno de Graikoj, loĝanta en nordorienta Grekio. Kiel unuaj ili kontaktiĝis kun la Romanoj, kiuj poste ĝeneraligante nomis tiel la tutan loĝantaron. Ĉe Homero portas liaj samlandanoj tri nomojn: "Danaoj" "Arĝeoj" kaj "Aĥajoj". Ĉ. 700 a. K. oni la unuan fojon renkontas la nomon "Helenoj", kiu el la indiknomo de unu el malgrandaj Thesalaj etnoj iĝis alnomigo por ĉiuj Grekoj. Nek ilian lingvon nomis la Grekoj unuece — ili parolis do attike, ione, dore ktp., sed por esprimi la kontraston inter lingvo kaj popolo Greka kaj negreka oni komencis uzi la parolturnon "paroli helene" kontraste al la lingvoj "barbaraj", do nekompreneblaj. La grekaj etnoj neniam eniris politikan situacion, en kiu ili estus devigataj formi komunan ŝtaton, kiel ekz. Mezopotamio. Nur la persa danĝero parte unuigis ilin kaj kreis kondiĉojn por la ekesto de unueca stato. Meritojn havis ĉefe la "barbaraj" Makedonanoj. Persoj klopodis venki la eŭropajn Grekojn en la 5-a jc., sed tiuj ne nur haltis ilian atakon, sed preparis kontraŭatakon. Filipo la Makedona do unuigis grekajn etnojn, atingante ilian konsenton por siaj militaj planoj — tiujn realigis lia filo Aleksandro la Makedona.

Lia ega imperio, sur kies teritorio nun kuŝas pli ol dudek memstaraj ŝtatoj, pro sia malkompakteco ne konserviĝis kiel tuto, sed la kultura kaj lingva konsekvencoj de tia unuigo estis grandaj. Aleksandro la Makedona kunprenis al siaj ekspedicioj geografojn, historiistojn kaj filozofojn, fondante en Afriko kaj Asio novajn grekajn urbojn. La norma greka "koine" disvastiĝis kiel funkcia rimedo de internaciaj rilatoj tra la tuta teritorio, en la orienta parto ĝi estis uzata paralele kun la Aramea kaj post la morto de Aleksandro (323 a. K.) ĝi helpis fondi helenisman kulturon. Unu el la gravaj centroj de helenismo estis Aleksandrio Egipta, kie estis skribita en 271 a. K. la grava traduko de la hebrea Biblio, nomata Septuaginta. En "koine" estas formulita ankaŭ la dua parto de biblio, Nova Testamento. La Greka do post la Aramea kaj la Hebrea spontanee reprezentas kulturajn tradiciojn kaj la novan religion, kristanisman. Kulture fekunda tempo de sinkretisma helenismo formale finiĝas per invado de Romanoj al Egiptio 30 a. K., sed la Greka travivis eĉ en la Romana epoko — ĉiuj klera Romano lernis la Grekan kaj konis grekan literaturon. Romantiko — klasicisma movado de atticismo en la epoko de Aŭgusto helpis la naturan konservigon kaj evoluon de la literatura "koine". En la Bizanca Imperio ĝi plu vivis kiel literatura kaj ofica lingvo, unuflanke kil esprimo de la delikata kulturo, aliflanke kiel riĉa diplomata lingvo, uzata de bizanca kortego por internaciaj kontaktoj. Oni multe flegis la antikvan Grekan en la 11-a ĝis la 15-a jc. dum le regno de dinastioj Komnena kaj Paleologa, kaj ĉ. 1100 ĝi atingis en prononcmankaj kaj gramatika formo la staton, kiu nur neglektinde sanĝiĝis ĝis nuna tempo. En eŭropajn lingvojn tiam enfiltriĝis precipe esprimoj el la religia terminologio, ekz. la vorto por "eklezio, preĝejo", kiu en multaj lingvoj similas la originalan "kyriakos oikos" (cirkev, Kirche, church, cerkov). Tiu ĉi flora etapo de la meza Greka finiĝas per fama venko de Konstantinopolo 1453.

La lastan renesancon ĝuis la lingvo dum novepoko, post fondiĝo de la Novgreka Reĝlando. En 1832 estis oficialigita "katharevusa", t.n. pura lingvo, flegata kiel tiu de intelektularo, oficoj, ŝtataj instancoj, sciencaj informoj kaj oficialaj sciigoj, en kiu estas hodiaŭ skribataj ekz. mezlernejaj lernolibroj. Tiu ĉi fiksigo reprezentas multflankan kompromison — la deklinacio, kun escepto de preskaŭ jam formortinta dativo, konservas kompletan kvanton de originalaj formoj, sed la nombro de verbaj formoj estas limigita kompare al la antikva Greka kaj la sintakso estas plisimpligita. La parolata lingvo, hodiaŭ nomata "dhimotiki", popola lingvo, malproksimiĝadis de la antikva dum la evoluo kaj pliriĉiĝadis per elementoj el aliaj lingvoj. Ambaŭ formoj spertas longan reciprokan influon, plifortigatan per amaskomunikiloj.

Ĉio ĉi plialtigas la valoron de la Greka en la rolo de internacia lingvo. Nuntempaj interlingvistoj parolas pri ĝi kun respekto kaj klasifikadas ĝin kiel tipe konscie prilaborita lingvo, kiu konscie diferenciĝis de la popola parolformo kaj konservis certan estetikan kaj literaturan nivelon. Ĝi ofte estas nomata, apud la Latina, lingvo morta. La interlingvistikan valoron de la antikva Greka oni vidu en ĝia kvazaŭ propedeŭtika valoro por ekesto de aliaj lingvoj. Praktika ekzemplo estas la

Latina, kiu transprenadis aron da grekaj esprimoj kune kun la greka kulturo. La nuntempa viva Latina plejparte savas sin ĝuste dank' al grecismoj, kiam ĝi dum la kreado de neologismoj ne trovas taŭgajn vortojn el la antikva latina vortprovizo. Ankaŭ dum konstruado de internacilingvaj projektoj troveblas la Greka pli ofte ol ekz. la Sanskrita. Monoglosse, Pantos dimou glossa, Cosmoglossa, Panglossie, Polyglotte improvise, Apolema kaj aro da aliaj registritaj projektoj alproprigas al si la Grekan kiel elirmaterialon por kreado de internacia lingvo. Aliaj projektoj kombinas la Grekan kun la Latina (nove Auxilia, Linguadel). Tipa ekzemplo estas "Interglossa" de L. Hogben el 1943, nuntempe freŝe prilaborita kiel "Glosa", kuniganta vortmaterialon de la Greka kaj la Latina.

La greka vortmaterialo eniris en multajn eŭropajn lingvojn ankaŭ dank' al la scienca terminologio. Respekto por la greka filozofio estas ĉiam konsiderinda. Dum ekz. la Sanskrita tute malaperis el la lingva konscio de la nuntempa Eŭropo, la Greka aktive kontribuas al ĝi.

La Latina

La Latina estas la plej longe kaj la plej vaste uzata natura interlingvo de Eŭropo. En unuopaj etapo de sia ekzisto ĝi havis diversajn specialajn trajtojn kondiĉitajn politike, ekonomie, kulture kaj religie.

La antikva Latina estas dokumentata proksimume ekde la 3-a jc. a. K. Komence de la historia epoko ĝi estis nur unu el la dialektoj el la ĉirkaŭaĵo de Romo kaj ne havis iun ajn privilegiitan lokon inter aliaj italikaj lingvoj. La urbo Romo mem dankas por sia ekesto (575 a. K., laŭ latina legendo 753) kaj ekfloro al la popolo de Etruskoj, kies lingvo ne apartenas al la hindeŭropa grupo, disvastiĝinta tiam ankaŭ en Italio. La Etruskoj estis multe pli civilizitaj ol la Latinoj, havante propran religion, arĥitekturon, medicinon, kulturon kaj skribon, transprenitan el la fenica tra la greka. La Latinoj transprenis multon de la etruska civilizo, ilia lingvo tamen enhavis nur kelkajn etruskajn nociojn rilatantajn ŝtatan organizon, kulturon kaj komercon. Estas neklare, kial la lingvo de pli civilizita popolo ne venkis la Latinan — probable ĝuste pro sia nehindeŭropa ĥaraktero, kiu tro diferencigis ĝin de la aliaj etnolingvoj en Italio.

La Latinoj estis potencavida popolo — ili superis unue la Etruskojn, poste najbarajn etnojn kaj iompostioe la tutan duoninsulon. Enkondukado de la politika kaj la lingva unuiĝoj sur la itala teritorio komencis per kreo de religia kaj politika centro Romo, sekve ĝia lingvo elpuŝis aliajn lingvojn kaj dialektojn, kiuj parte konserviĝis en enskriboj, ne penetrante en oficialan kaj literaturan uzon. Post la t.n. itala milito 89-82 a. K. komencis Sulla konscian politikon de subpremado de nelatinaj popoloj. Post lia epoko malperis la nelatinaj enskriboj, kio pravas, ke la Latina hejmiĝis en Italio kaj iĝis vera interlingvo. Tamen ĝi absorbis kelkajn elementojn de la superigitaj lingvoj en fonetiko kaj vortprovizo. La plej grandan influon al la Latina havis la Greka, en morfologio, sintakso kaj leksiko. La unuaj grecismoj aperis en la Latina jam en la 8-a jc. a. K. en komerca kaj marista terminologio, poste en kultura sfero kaj aparte en religio, precipe la kristana. En la latina literaturo klare montriĝas transprenado de grekaj literaturaj formoj, eĉ la tuta historio de latina literaturo komencas per tradukoj el la Greka, sed male al la Greka formiĝis en la Latina unueca literaturlingvo.

Ekde la 2-a jc. a. K. gvidis Romo sian ekspansion ekster la itala teritorio, kio gvidis ankaŭ al la subpremado de lokaj lingvoj kaj senproblema disvastigo de la Latina kiel lingvo oficiala, sed ankaŭ ĉiutaga en la kontakto de romaj legianoj kaj komercistoj kun la loka loĝantaro. Tio poste ebligis naskiĝon de Romanaj lingvoj, kies etimologio do estas tre superrigardeble dokumentata.

En **Gaŭlio** loĝis Keltoj, Gaŭloj, Belgoj, Akvitanoj kaj aliaj malpli grandaj etnoj, lingve malsamaj. Dum la 1-a jc. a. K. penetris tien Romanoj, kies politiko celkonscie influadis precipe lokan nobelaron, honorigante ĝin per roma civitaneco, enkondukante latinajn lernejojn kaj fondante

komercajn centrojn. Ekz. Massalia iĝis konata pro sia filozofia lernejo, Lugdunum pro komerco, konataj estis gaŭlaj oratoroj kaj poste kristanaj verkistoj. Pro la stabiligado de latinaj kulturaj centroj en Gaŭlio do la Latina iĝis ĝia interreta komunikilo.

Nek **Hispanio** estis lingve unueca; la nordaj kaj okcidentaj lingvoj estis hindeŭropaj, sed pri origino de la lingvo de sude loĝantaj Iberoj oni ne povas diri ion certan. La invado de Kartaganoj 236 a. K. kaŭzis militon kun Romo kaj kreon de roma provinco Hispanio. Fondiĝis novaj urboj kiel Italica, Valentia, Hispalis, Caesaraugusta — naturaj centroj de romanigo, ĉar tie loĝantaj romaj veteranoj edzinigadis al si lokajn inojn. Kunmiksiĝo de roma kaj lokaj popoloj okazadis ankaŭ en lernejoj. La tombejaj enskriboj kun latinecaj nomoj pruvas, ke la hispana loĝantaro rapide latiniĝis — la Latina regis en justico, senatdecidoj, dekretoj, preskriboj, oficialaj dokumentoj kaj kalendaro. Dum ekz. en Grekio troviĝas enskriboj kaj tekstoj dulingvaj, en Hispanio ili estas nur latinaj. La imperiestro Claudius eĉ malpermesis agnoski roman civitanecon al homoj nescipovantaj latine. La hispana Latina onidire havis karakteristikajn "provinciajn" trajtojn, aŭdeblajn ekz. ĉe la hispandevena imperiestro Hadrianus. Grava hispana klerigcentro estis Corduba, devenurbo de verkistoj Seneca, Lucanus, Quintilianus kaj Martialis.

Britio konservis dank' al sia insulareco la etnajn apartaĵojn kaj lingvan memstarecon de keltaj lingvoj. Ili estis nur malmulte influitaj de la Latina, kvankam la Romanoj estis tie ekde la 1-a jc. a. K. ĝis la komenco de la 5-a jc., klopodante enkonduki instruadon de la Latina kaj edukadon de nobelidoj laŭ roma maniero. Maloftas tie ankaŭ latinaj enskriboj. La Latinan tamen komencis uzi kristanaj aŭtoroj, ekz. Pelagius, Patricius kaj Beda Venerabilis. Post la foriro de Romanoj envadis grandan parton de la brita teritorio la anglosaksa elemento.

Loĝantaro de **Helvetio** estis parenca al gaŭlaj Keltoj. La lando iĝis parto de Roma Imperio en la jaro 15. El la konserviĝintaj enskriboj klaras, ke nordhelvetiaj Alemanoj konservis siajn keltajn nomojn kaj verŝajne eĉ la lingvon, dum la sudaj Burgundoj romaniĝis. Multaj latinaj enskriboj troviĝas en Romanaj urboj kiel Genava, Aventicum, Lousonna, Salodurum k.a.

Kiel limon de **Germanio** starigis Cezaro 58 a. K. la Rejnon. Pluaj romaj klopodoj de penetri malantaŭ ĝin malsukcesis. La enskriboj atestas ĉeeston de romaj legioj, sed la videbla romanigo de la Germanoj ne okazis. Nur el historiaj mencioj, ekz. ĉe Tacitus, oni scias, ke kleraj Germanoj, celantaj superan pozicion en la imperio, lernis la Latinan. Parolis ĝin eĉ la fama militgvidanto Hermann. Sur la maldekstra bordo de Rejno travivis izolitaj romaj lingvoinsuletoj onidire ĝis la 10-a jc.

Loĝantaro de provincoj **Vindelicia, Raetia kaj Noricum**, t. e. de Alpoj kaj la supra Danubolando, estis kelta, asimilinta la originajn Ilirojn. Romanoj invadis 15. a. K. Dum la regno de Tiberius ekloĝis tie veteranoj, kiel klaras el enskriboj. Raetoj kaj Norikoj havis ankaŭ gravajn militajn kaj oficajn funkciojn, ĉar en la enskriboj troviĝas malmultaj Romanaj nomoj. Pro malstabileco de la limo revenis la provincoj en Italion post 488, sed la agrikulturaj setlejoj de restintaj Romanoj estas menciataj ĝis la 6-a jc.

Panonio sur la Danubo ankaŭ havis iliran loĝantaron, iĝinte roma provinco en la jaro 8. Dum la roma regno ĝi estis unu el la plej evoluintaj regionoj en kulturo, arĥitekturo kaj edukiĝo, kies tradicio travivis ĝis la bizanca epoko. La Latina enradikiĝis eĉ kiel popola lingvo, precipe en la suda parto, en la nordo ĝi estis lingvo de kleruloj kaj monakoj. Panonian originon havis eĉ imperiestroj Aurelianus, Probus, Valentinianus kaj Gratianus. En la 5-a jc. estis la floranta latina kulturo detruita de Hunoj.

En **Makedonio** kaj **Trakio** renkontiĝis influoj latinaj kaj grekaj, Romanoj eĉ studis en tiamaj grekaj lernejoj, ekz. en Apollonia. La transiro al latina kulturo signifis imitadon de la vivo de romaj legioj

inkluzive religiaj kutimoj, kiel pravas latinaj nomoj de Trakaj festoj. Romanigon helpis ankaŭ translokigo de la ĉefurbo en Bizancon 330 — la Latina estis lingvo de la registaro kaj leĝoj. Nur en la 7-a jc. ĝi cedis al la Greka.

Balkan-danubaj landoj **Moesio** kaj **Dakio** estis ankaŭ loĝataj de trakaj etnoj. Moesion fondis Aŭgusto jam 29 a. K., Dakio iĝis kolonio nur en la jaro 107. La koloniigo rapide influis lokan kulturon, enkondukiĝis roma kulto kaj sacerdotaro, samkiel metiistaj kolegioj laŭ roma ekzemplo. En aĉetkontraktoj, testamentoj, verdiktoj kaj similaj dokumentoj troviĝas nomoj de Dakoj en romigita formo, aŭ en la sama familio miksiĝas nomoj dakaj kaj latinaj. La roma superregno en Dakio daŭris nur 170 jarojn, sed ĝi konsiderinde influis la lingvon. En Moezio estis malpli forta influo de la Latina, kiu estis uzata precipe en eklezio. Pro invadoj de Gotoj, Bulgaroj kaj Slavoĵ estis la romanigita loĝantaro elpuŝita suden de Danubo, konservante la latinidan Rumanan.

Grekion kaj **Okcidentazion** invadis la Romanoj jam en la 2-a jc. a. K. kaj enkondukis la Latinan kiel lingvon oficialan, la popolo tamen konservadis la Grekan eĉ en kontakto kun oficejoj, tial imperiestraj ediktoj kaj aliaj dokumentoj estis dulingvaj. La Latina portempe iĝis moda lingvo de intelektularo, sed la vera latinigo ne okazis.

La disvastigo de la Latina en konkeritaj teritorioj ne devas aŭtomate signifi la elpuŝadon de lokaj lingvoj — ĝi dum certa tempo verŝajne funkciis paralele kun ili. Tamen ĝia uzo kiel lingvo oficiala kaj poste liturgia reprezentas jam certan premon al la lingva ĉirkaŭaĵo. Ankaŭ interkompreniĝo kun romaj legianoj, komercistoj kaj oficistoj povis efektiviĝi nur en ilia lingvo, kiun oni do devis lerni. La romanigo havis en diversaj partoj de la imperio malsaman intensecon, pri kiu kundecidatis la ekzisto de latinaj lernejoj, kunlaboro de loka nobelaro, nombro de romaj koloniistoj, longeco de koloniigo ktp. La lingvo tamen estis sufiĉe unueca, servante en sia interlingva funkcio ekster la itala teritorio kiel interkomprenigilo al parolantoj de diversaj originaj lingvoj. Administrado, kulturo kaj literaturo ankaŭ postulis unuecan normlingvon. Tiu ĉi unueco iompostiome malaperadis post la disfalo de la imperio kaj proksimume inter la oka kaj deka jarcentoj ekestis sur iama roma teritorio Romanaj lingvoj, influitaj ĉiu de sia loka substrato. Sed la Latina tamen ne malaperis kaj transiris en novan fazon de sia evoluo, iĝante internacia lingvo de intelektularo kaj de roma eklezio.

La literatura Latina estis normiga kaj memstara fenomeno, kiu diferenciĝis de tiu ĉiutage parolata. Ĝi evoluis ekde la "arĥaika" periodo en la 3-a jc. a. K. tra la "klasika" kaj "arĝenta" tempoj de la bonstila literatura kreado ĝis la 2-a jc. al la malfrue imperiestra periodo, konata kaj pro arĥaismoj kaj pro vulgarismoj en la lingvo. Krom la literaturaj kaj poeziaj esprimoj kreiĝis ankaŭ sciencaj kaj teknikaj terminoj, terminologio muzika, agrikultura, filozofia kaj precipe jura. La ekzisto de la skriba lingvo unuflanke montras la evoluintecon de la lingvo, aliflanke ĝi ebligas la kreon de normiga gramatiko, grava por la lingvolernado kaj plua lingva disvolviĝo. Speciala kazo estas *la kristana Latina*, kiu ne nur enhavas specialan fakterminologion, devenantan plejparte el la Greka, sed ĝi ankaŭ funkcias dum preskaŭ du jarcentoj kiel oficiala interkomprenigilo de romaj kristanoj, kiel lingvo de ekleziaj aktoj kaj leĝoj. Krome ĝi servas kiel internacia referenclingvo en eklezia juro kaj liturgio.

La vulgara Latina, parolata praktike ĝis la mezepoko, estis natura interlingvo de malpli kleraj, per la literaturo neinfluitaj popolaj tavoloj sur la imperia teritorio ankaŭ post ĝia disfalo. Dokumentoj pri tio, ke ĝi ekzistis paralele kun la normlingvo, ni havas jam en la 2-a jc. a. K. el la komedioj de Plautus, kiu uzis la vulgaran formon celkonscie pro karakterizi siajn dramajn personojn. La saman ideon havis Petronius en la 1-a jc., montrante la parolmanieron de ekssklavoj. Al la popola lingvouzo klopodis adaptiĝi ankaŭ kristanaj verkistoj por alparoli simplajn kristanojn. Plua fonto de ekkonoj pri la vulgara Latina estas enskriboj, precipe tombejoj, de privatuloj. La plej taŭga fonto estas tekstoj, en kiuj aperas vulgarismoj senkonscie, pro nesufiĉa kleriĝo de la aŭtoroj: ĉe fakaj manlibroj skribitaj de metiistoj, ekz. pri hejma brutaro, pri hejma kuracado, pri kuirado k.a., plue en

vojaĝpriskriboj, vivpriskriboj de sanktuloj kaj kronikoj. Novepoka fonto de konoj pri la vulgara Latina estas la Romanaj lingvoj.

La mezepoka Latina estas plua grava formo die tiu ĉi lingvo. Ĝi ampleksas proksimume la tempospacon inter la jaroj 500-1500 kaj kunigas ĉiujn tri antaŭajn lingvoformojn, nome la Latinan klasikan, vulgaran kaj kristanan. Precipe legendoj, vojaĝpriskriboj kaj kronikoj de eŭropaj etnoj estis skribitaj latine. Sed, la influoj de alilingvaj substratoj gvidis al malunuecigo de la lingva esprimaspekto, kiu iĝis en la sepa jarcento tiom konfuza, ke necesis du refomoj-renesancoj por reveni al la normiga formo. La unua renesanco okazis en la oka kaj naŭa jarcentoj sub regno de *Karolo la Granda*. Li venigis al sia palatinejo en Aachen elstarajn kristanajn klerulojn kun bona scipovo de la Latina, ekz. Alcuin el Britio, Paulus Diaconus el Lombardio, Theodulf el Hispanio, fondante ĉe monaĥejoj bibliotekojn kaj lernejojn, kiuj iĝis gravaj centroj de klerigo. La dua renesanco de antikva kulturo okazis dum la regno de Otto I. ĉ. 960. Koscia reveno al la klasika formo samtempe kaŭzis la malaperadon de la vulgara Latina, kiu intertempe tro diferenciĝis de ĝi. Dum la renesancoj do transformiĝis la Latina en tipe vehiklan lingvon, kiu estis nenies gepatra, sed servis grandskale kiel interkomprenigilo de ĉiuj, kiuj lernis ĝin — do plene en la intencoj de hodiaŭa kompreno de interlingvo. La mezepoka Latina iĝis memstara fenomeno, tamen diferenca de la klasika formo, ĉar ĝi spontanee pliriĉiĝis je tiam bezonataj esprimoj kaj malkomplikiĝis en la stilo. En la mezepoka literaturo svarmas aro da ĝenroj. Krom altvaloraj kristanaj poemoj, legendoj, himnoj, sekvencoj kaj tropoj temas pri nereligiaj rakontoj, enigmoj, moraligaj poemoj, pri tn. "speguloj", "kvereloj", teatraĵoj, studentaj poeziaĵoj, amkantoktp, kiuj ĉiuj pruvas, ke la Latina estis spontanea esprimilo.

La humanisma Latina en la 14/15-a ĝis la 17-a jc. reprezentis koscian revenon al la cicerona lingvokoncepto kaj fortan intereson pri klasikaj kulturo kaj klerigo. En lernejoj estis legataj antikvaj aŭtoroj, ĉefe Cicero, Caesar, Sallustius, Vergilius, Ovidius, Horatius. Precipe jezuitoj zorgis pri la aktiva uzo de la Latina, kiu estis instrulingvo en lernejoj kaj universitatoj. Unuflanke oni klopodis pri lingva perfekteco, sed aliflanke oni akceptis neologismojn por krei novan literaturon. Klasicismoj plej bone konserviĝis en scienca terminologio kaj fakaj filozofiaj, pedagogiaj kaj teologiaj verkoj — latine skribis ekz. Patrizzi, Campanella, Grotius, Kopernik, Kepler, Galilei, Descartes, Leibniz kaj la scienca tradicio daŭris ĝis novepoko. La aktiva uzado de la lingvo tamen iompostiome malaperis.

Akoraŭ en la duono de pasinta jarcento oni prelegis en kelkaj eŭropaj universitatoj latine. Dum solenaĵoj kaj defendoj de sciencaj laboraĵoj daŭris tiu ĉi kutimo ankoraŭ komence de nia jarcento ekz. en Cambridge, Oxford, Budapest, Amsterdam, Dorpat kaj alie. Kvankam la scienca literaturo ekde humanisma epoko ekzistis ankaŭ en naciaj lingvoj, kelkaj sciencistoj daŭre skribis latine por esti internacie komprenataj, ekz. Linné, Saccardo, Schulze, Wirchow, Van der Hoeven, Gauß. Pri la konservigo de la Latina kiel interlingvo oni grave diskutis, ekz. la bibliografio de Stojan el la jaro 1929 nomas 87 verkojn pri tiu ĉi temo kaj ok tiam ekzistantajn latinajn revuojn. Ekzemple George J. Henderson, redaktoro de la latina revuo "Phoenix", organizis eĉ movadon por la aktiva instruado de la Latina en mezlernejoj, samkiel "Verein der Berliner Hochschullehrer", organizanta popolajn kursojn de la Latina por granda publiko komence de nia jarcento.

Historion de la *novepoka Latina* oni povas sekvi ekde la dudekaj jaroj: 1923 estis fondita "Société des études latines" en Parizo, poste "Istituto di studi Romani" en Romo kaj 1932 "Societas Latina" en Munkeno. Internacian uzadon de la Latina favoris ankaŭ "Société internationale de philologie". La movado por revivigo de la Latina kristaliĝis en la kvardekaj jaroj kaj gvidis en 1956 al la unua kongreso pri la viva Latina en Avignon, sekvata de multaj aliaj ĝis nun. En la sesdekaj jaroj ekestinta "Academia Latinitati Fovendae" organizas regule sciencajn kongresojn pri la viva Latina (lastfoje 1993 en Antwerpen kaj Leuwen). La novepoka lingvo enhavas kompreneble multajn neologismojn, bezonataj por la modernaj vivo kaj scienco, ĝia prononco estis internacie "restarigita"

surbaze de la antikva kaj ĝia stilo permesas uzi ekzemplojn ekde antikveco ĝis humanismo. Ekzistas deko da revuoj, inter kiuj "Latinitas" (Vatikano), "Vita Latina" (Avignon), "Vox Latina" (Saarbrücken), "Helmantica" (Salamanca) estas la plej konataj, ekzistas eĉ novlatinaj aŭtoroj de belestro kaj poezio. La Latina do pruvas sian kapablon servi kiel internacia lingvo de sciencoj ĝis nun. Iom problemhava estas tamen ĝia ĝenerala uzado. Ĉiun fremdan lingvon oni ja devas lerni kaj ĉar la Latina ne estas la plej facile lernebla, oni malvolonte akceptas ĝin malgraŭ tuta populariga movado, organizanta popolajn kursojn, latinajn feriojn kaj somerajn lernejojn. Kvankam oni respektas la grandan kontribuon de la Latina al eŭropa kaj kolonialeŭropa civilizoj, oni serĉas facile lerneblan lingvon por internaciaj kontaktoj. Tial ankaŭ la Latina estis multfoje reformata, ŝanĝata kaj faciligata — nome, ekestis aro da latindevenaj kaj latinidaj planlingvoj, kiuj reprezentas grandan parton (ĉ. 200) el la ĉ. 900 registritaj planlingvaj proponoj.

Rekonstruo de la hindeŭropa pralingvo

La Sanskrita, la Greka kaj la Latina aperas en manlibroj de interlingvistiko kiel "veraj" aŭ "naturaj" interlingvoj. Konatas tamen la fakto, ke apud la "artefarita" konstruado de komunikadprojektoj de estonteco surbaze de lingvoj jam konataj ekzistas la tendenco mala, orientita en estintecan, nome la rekonstruo de origina elirformo de tiuj hindeŭropaj lingvoj. (Pri projektoj konstruitaj surbaze de nehindeŭropaj lingvoj oni havas nur malmultajn sciigojn — se temas pri lingvokarakteristiko, oni povas evicigi tien lingvoprojektojn surbaze de la hungara. Kelkaj, ekz. Unilingua de Noubar Agopoff el la sesdekaj jaroj de nia jarcento, respektas la gramatikan strukturon de orientaj lingvoj, ĉefe de la Ĉina. La plej granda parto de internacikomprenigaj projektoj orientiĝas al Eŭropo kaj hindeŭropaj lingvoj.) Historie orientitaj interlingvistoj, ekz. Ignatius Danka, do venis kun la ideo uzi por konstruo de internacia lingvo ĝuste la formon eliran, la plej originalan kaj la plej internacian, kaj eluzi tiel la lingvistikan heredaĵon por "revivigo" de origina stato, komuna al ĉiuj homoj.

Jam la saĝaj viroj en antikva Grekio kaj Romo opiniis surbaze de similaj esprimoj iliajn lingvoj parencaj, sed ili ne ankoraŭ venis al la imago de iu komuna pralingvo. Platono en ofte citata dialogo Kratylos (410 a) pripensas la formon de grekaj kaj frigaj vortoj, eksplikante tion ne per parenceco, sed per elpruntaĵoj, kiuj penetris en la grekan el la barbaraj lingvoj. Kleraj Romanoj, kiuj lernis la Grekan kaj renkontis vortojn identajn en ambaŭ lingvoj (ego, ago, fero, duos, tres) poste opiniis, ke la Latina ekestis surbaze de la Greka. Josephus Justus Scaliger en sia verko "Pri kaŭzoj de la Latina" el 1540 komparas latinajn kaj grekajn esprimojn, el kiuj li tradicikonforme eliris, sed atentigas jam pri regulaj ŝanĝoj de konsonantoj kaj vokaloj, ekestintaj dum ilia evoluo. La materialo uzita al tia komparado jam povus servi kiel elirpunkto de la Latina kaj de la Greka al ilia komuna antaŭulo. Aŭstra misiisto Paulinus a Sancto Bartholomaeo, kiu loĝis en Hindio en la jaroj 1774-1790, konatiĝis tie kun la Sanskrita kaj skribis eseojn "Pri antikveco kaj proksimeco de lingvoj Avesta, Sanskrita kaj Germana" kaj "Pri originoj de la Latina kaj ĝia konekto kun orientaj lingvoj". Laŭ komunaj trajtoj de la Greka, la Germana, la Latina kaj la Sanskrita li juĝas, ke ili devenas de ununura lingva familio.

En 1808 publikigis germana lingvisto Friedrich Schlegel verkon "Pri la lingvo kaj saĝo de Hindoj", en kiu li atentigas al parenceco de la Sanskrita kaj hindeŭropaj lingvoj. Komence de la 19-a jc. ekestis la kompara lingvistiko, la frato de Schlegel, August Wilhelm, inventis la lingvotipologion, opiniante la fleksian tipon (al kiu apartenas la Sanskrita, la Greka kaj la Latina) la plej perfekta. Sisteme komencis uzi lian metodon Rasmus Rask. En lia verko oni trovas grupojn de konformaj esprimoj el diversaj hindeŭropaj lingvoj. La kompara gramatiko de Franz Bopp estis eldonita en 1833-1852 kaj alportis la superrigardon de fleksio en fonetike parencaj lingvoj. Ankaŭ li opinias la Sanskritan plej proksima al la perfekta pralingvo. La plej fama persono en kompara lingvistiko estis August Schleicher. Lia "Kompendio de kompara gramatiko de indogermanaj lingvoj" (1861-1862) iĝis konata kaj la rekonstruitan fabelon en la hindeŭropa pralingvo "Owis ek'woi kwe" (Ŝafo kaj ĉevalo) oni trovas en multaj lernolibroj, kvankam rekonstruon de kompleta teksto la lingvisto ne

opinias tro serioza. Gravas tamen, ke lia teksto baziĝas sur fakte konstatitaj fonetikaj rilatoj, li do estas ĝenerale proksima al ĉiuj hindeŭropaj lingvoj.

La lingvorekonstruan metodon de Schleicher oni povas konsideri lingvoplanado en moderna vortsenco, do kreado de memstara lingvo. Oni povas relative bone prijuĝi, ĝis kioma grado estis lia teksto "artefarita", se eblas komparo de tiu ĉi rekonstruo kun la lingvoj, kies skribaĵoj konserviĝis. Laŭ similaj principoj estis konstruitaj ankaŭ projektoj surbaze de komunaj radikoj en eŭropaj lingvoj (t.n. Standard Average European Group).

La lingvorekonstua metodo motras vojon al eblaj metodoj de lingvoplanado. La rekonstruo estas komparebla kun la normala gramatika kodigo — la gramatiko neniam montras la plej aktualan ligvostaton. La rekonstruo de la originala elirformo en pli larĝa senco estas analoga al serĉado de elirpunkto por konstruo de interlingvo kaj ĝia vortfarado.

Pliprofundiga literaturo

Por ĉi tiu parto adaptiĝis dulingva (ILO-ĉeĥa) disertaĵo *Barandovská, V.: La Latina kiel interlingvo kaj planlingvistika fonto* ĉe AIS 1994, kie estas kelkpaĝa koncerna bibliografio en pluraj lingvoj. La laboraĵo eldoniĝos kun germanlingvaj resumoj ĉe Akademia Libroservo de AIS en 1995.

2.4.2 Piĝinoj kaj kreoloj

Piĝinoj kaj kreoloj estas tipaj ekzemploj de naturaj interlingvoj, kiuj nuntempe funkcias precipe en Mezameriko kaj Pacifiko. Ili ekestis el praktikaj interkomprenigaj bezonoj, do spontanee kaj neplanite. En la menciitajn teritoriojn venadis de diversaj regionoj de la mondo koloniistoj, komercistoj, rifuĝintoj, migrantaj laboristoj, estis tien deportataj sklavoj, tiuj ĉiuj ofte de multaj landoj kun diversaj gepatraj lingvoj. Precipe la sklavoj, kvankam de afrika origino, devenis de diversaj triboj kun tre malsamaj lingvoj, ili do ne komprenis sin reciproke, nek komprenis la lingvon de la koloniistoj. La ununura eblo de interkompreniĝo por ĉiuj estis lerni la lingvon de la koloniaj sinjoroj, do ĉefe la Anglan, alie la Francan, la Hispanan, la Portugalan k.a. Tio estis malfacila ne nur pro tio, ke ekzemple la gepatraj lingvoj de la afrikanoj havas alian strukturon ol tiuj de la eŭropaj koloniistoj, sed precipe pro la neeblo viziti lernejon kaj pro ofta analfabetismo; oni do lernis laboreje kaj surstrate. Tial la esprimmaniero estis tre primitiva, servanta al nepraj bezonoj, do ekzemple anstataŭ "I have been ill" oni diris "yesterday me ill", uzante minimumon de gramatiko kaj forte reduktitan vortaron (esprimojn bezonatajn dum la ĉiutaga vivo, dum laboro en haveno, en minejo aŭ sur la kampoj), ofte kun miksaĵo de indiĝenaj vortoj. Tia "foreigners' talk" estas transira stadio, je kies fino stabiliĝas nova lingvo kun propra, kvankam primitiva gramatiko kaj vortprovizo, *piĝino*. Piĝino do estas memstara, surbaze de la kolonia lingvo ekestinta interlingvo, uzata kiel natura interkomunikilo inter homoj de origine malsamaj gepatraj lingvoj sur konsiderinde vasta teritorio (ekz. Novgvineo, Kamerunio). Ĝi estas gramatike simpligita kaj vortare reduktita (je kelkcent ĝis kelkmil vortoj), servante nur por interkompreniĝo en bezonataj situacioj, do ne kiel lingvo ekzemple poezia aŭ scienca.

Piĝinoj povas funkcii en sia primitiva stato dum longa tempo, sed plej ofte okazas ilia "pluevoluo", kiun oni nomas *kreoligo*: la uzantoj, ĉefe la socie malalta tavolo de sklavoj, rifuĝintoj, simplaj laboristoj ktp. ekuzas la koncernan piĝinon ankaŭ dum sia ĉiutaga vivo (precipe se ili denove estas etnolingve malsamaj). Iliaj infanoj lernas tiun ĉi lingvon en la familio praktike kiel sian gepatran. Sekve la lingvo pliriĉiĝas je novaj bezonataj esprimoj laŭ la antaŭa maniero, ĝia vortaro kreskas kaj la gramatiko stabiliĝas, okazas do natura pluevoluo ĝis la ekesto de "kompleta" lingvo, *kreolo*. Kreolo ne plu estas limigita komprenigilo inter parolantoj de malsamaj etnolingvoj, sed plene

aŭtonoma, memstara lingvo, kiu evoluis el piĝino kaj estas uzata kiel gepatra lingvo.

La vorton *piĝin* oni klarigas diverse, aŭ kiel ĉinece deformitan vorton *business*, laŭ alia teorio ĝi devenas de la indiana tribo nomata de la angloj *Pidians*, laŭ la tria teorio temas pri misformigo de la hispana vorto *pequeno*. *Kreoloj* estis nomataj en eŭropaj kolonioj naskiĝintaj gefiloj de eŭropanoj, ekde la 17-a jc. oni nomas tiel ankaŭ la en kolonioj ekestintajn kaj parolatajn lingvojn. Unuopuloj, ĉefe misiistoj, interesiĝis pri la lingvistika esploro de tiuj ĉi lingvoj jam en la 17-a kaj 18-a jarcentoj. Kiel antaŭulon de kreolistiko oni agnoskas la germanan lingviston Hugo Schuchardt (1842-1927), aŭtoron de "Kreolische Studien" pri mediteraneaj kreoloj. Ekde la kvindekaj jaroj de nia jarcento estas kreolistiko flegata universitatnivele. En 1959 organiziĝis la unua internacia kreolistika simpozio.

La plejmulto de piĝinoj kaj sekve kreoloj ekestis surbaze de iu eŭropa lingvo (depende de la deveno de la koloniistoj precipe la Angla, la Franca, la Hispana, la Portugala, la Nederlanda) kiel miksaĵo kun lingvoj neeŭropaj. En Afriko, ĉefe en la zono de bantuaj lingvoj, ekestis tamen naturaj interlingvoj de la kreola tipo, kiuj ne havas iun ajn eŭropecan kontribuadon. Nombro de piĝinoj kaj kreoloj oni taksas ĉ. 200, la plej konataj el ili havas eĉ kelkajn milionojn da parolantoj.

Anglecaj:

Havajo. La indiĝenoj de la havaja insulo parolis polinezian lingvon, kiu estis pli kaj pli superata de la Angla, definitive kun sukera monopolo de Usono en 1876 kaj anekso de la insulo en 1898. Por la laboro en sukerplantejoj venadis laboristoj el Ĉinio, Filipinoj, Japanio, Koreio, Portoriko kaj de alie — tiuj ĉi gastlaboristoj formis jam en la 17-a jarcento la plejmulton de la loĝantaro. Ili apenaŭ estis en kontakto kun la Angloj, formantaj superan socian klason. Tial ilia komuna piĝino havis multajn variantojn laŭ la gepatraj lingvoj de parolantoj, ekz. japanecan, filipinecan ktp. La sekva generacio akceptis kaj evoluigis tiun ĉi lingvon en *Hawaiian Creole*. (Ekzemplo: John-them stay cockroach the kaukau = John and his friends are stealing the food.)

Florida. La loka angleca kreolo nomiĝas *Gullah*, parolata ankaŭ en marbordo de Georgio, Suda Karolino kaj en najbaraj insuloj. Ĝi ekestis el la piĝino uzata en la 17-a jarcento inter britaj koloniistoj kaj iliaj okcidentafrikaj sklavoj. Ties gepatraj lingvoj estis Ewe, Haussa, Yoruba, Ibo, Kikongo kaj aliaj. El *Gullah* eniris en lokan usonan Anglan kelkaj lokaj esprimoj. Ekzistas eĉ en Suda Karolino farita traduko de la Biblio en *Gullah*.

Jamaika: Jamaika aŭ Jagwa kreolo estas parolata aŭ komprenata sur la tuta insulo kaj eĉ science esplorata, en la loka universitato organiziĝas kreolistaj kongresoj. En la jaro 1901 eldoniĝis en Londono la pritrakto "Jamaican Talk", sekvis "Jamaican Creole Syntax" kaj "Dictionary of Jamaican English" eldonitaj en Cambridge. (Ekzemplo: Muma no waan yu fi sel i = Mummy not want you for sale it.)

Sierra Leone. En Freetown kaj ĝia ĉirkaŭaĵo ekestinta kreolo, nomata *Krio* praktike servas kiel vehikla lingvo en la tuta lando. Ĝia antaŭulo estis piĝino kreita por la interkompreniĝo kun la eŭropanoj, nomata *Talkee-Talkee*.

Melanesio. La lingvo importita de ĉina marbordo kaj surloke adaptita nomiĝas *Beach-la-mar* aŭ *Melanesian Pidgin English*. Ekzistas ĝiaj gramatiko kaj vortaro, en la vortprovizo troviĝas eĉ kelkaj germandevenaj vortoj, ekz. "beten" kaj "langsam". (Ekzemplo: Ol man i lukim, ol sampela i lap na narapela gen i belhat. = Some of those who saw this laughed and others got very angry.)

Papua-Novgvineo. La loka kreolo *New Guinea Talk* = *Niugini-tok* estas tute oficiala, ekzemple aperas en ĝi ĵurnaloj. Ĝi estas la plej konata ekzemplo de "Pidgin English" kun proksimume

duonmiliono da parolantoj, kies nombro kreskas. En Papua estas krome vaste uzata piĝino *Police Motu*, simpligita formo de la loka komerca lingvo uzata inter Motuanoj kaj iliaj klientoj surborde de la papua golfo. La nomo rememorigas la fakton, ke la lingvo estis uzata ankaŭ de la indiĝena papua polico, kies membroj venadis de ĉiuj partoj de la teritorio.

Francecaj:

Louisiana. En partoj de Louisiana kaj Texas estas parolata kreolo *Créole louisianois*, nomata ankaŭ *Français nègre*, kio indikas, ke ĝi ekestis ĉe nigraj sklavoj (kaj krome ĉe indianoj). Krom tio en kelkaj partoj de Louisiana parolas la iom arĥaiĝintan Francan la blankuloj devenantaj de iamaj francaj superaj sociaj tavoloj. Tiu ĉi aparta formo de la Franca ne estu intermiksita kun la kreolo.

Haiti. La kreolo, simila al tiu de Louisiana, disvastiĝis kvazaŭ popola ĉiutaga lingvo, parolas ĝin ĉ. kvin milionoj da homoj. Oficiala lingvo estas la Franca, kiun ĉiutage uzas nur malgranda supera socia tavolo en interna kontakto. Ekde la kvindekaj jaroj oni agnoskas al la kreolo statuton de vera lingvo kaj ĝi iĝas grava instrumento de la landa alfabetiga programo.

Seychelles. *Créole seychellois* evoluis surbaze de praktike pure franca vortaro, kun forte simpligita gramatiko. Aperas en ĝi ĵurnalo "Seychelles nation". (Ekzemplo: Sa zur la pli ti tombe = Ce jour la pluie est tombée.)

Mauritius. La insulo estis en la 18-a jarcento franca kolonio, en la jaroj 1814-1968 angla kolonio. La Franca konserviĝis pli bone, precipe kiel lingvo de lernejo kaj eklezio. La plej granda parto de loĝantaro estas posteuloj de nigraj sklavoj kaj de hindaj enmigrintoj, krome estis tie ĉinaj kaj arabaj enmigrintoj. La plej forta grupo, la hinda, havis kiel gepatrajn lingvojn Hindi, Urdu, Tamil, Telugu kaj aliajn. En tiu situacio evoluis maŭretana kreolo, uzata de la tuta loĝantaro — por kelkaj ĝi estas la ununura komprenigilo. Multaj loĝantoj estas bilingvaj eĉ trilingvaj: ili parolas hejme iun hindan lingvon, la kreolon en eksterfamilia medio kaj en la oficialaj kontaktoj, en lernejo ktp. la Francan. La kreolo tamen ne estas instrulingvo, por kleriĝi oni do devas lerni la Francan aŭ la Anglan.

Hispanecaj kaj portugalecaj:

Antiloj. Sur la insuloj Curacao, Aruba kaj Bonaire estas parolata *Papiamentu*, riĉe dokumentita kaj servanta kiel lingvo de amaskomunikiloj-televido, radio, ĵurnaloj. Ĝi stabiliĝis surbaze de hispana piĝino, tamen kun influoj de la portugala kaj eĉ de la nederlanda, kies kontribuaĵo formas hodiaŭ preskaŭ kvaronon de la vortaro. Gramatiko sekvas hispanan modelon. Papiamentu havas ĉ. kvaronmilionon da parolantoj. (Ekzemplo: La máma ta' a mand e jú báí bende piská = La mama mandaba al hijo que vaya a vender pescado.)

Kapverdaj insuloj. La kreolo *dialecto crioulo de Cabo Verde* baziĝas sur la portugala lingvo. Parte ĝin uzas ankaŭ enmigrintoj, kiuj en la 19-a jarcento foriris al la usona ŝtato Massachusetts.

Indianaj:

Chinook ekestis kiel natura interlingvo antaŭ la apero de blankaj koloniistoj en indianaj teritorioj de Nordameriko. La lokaj indianaj tribaj lingvoj estis tro multaj kaj diversaj, tial por celoj de komerco ekestis indiandevena piĝino. Poste, uzata ankaŭ de blankaj vakeroj kaj marĉandistoj, ĝi pliriĉiĝis je anglodevenaj kaj francdevenaj esprimoj. Kun la progresanta koloniigo Chinook ekmalaperis, hodiaŭ ĝi ne plu ekzistas.

Afrikaj:

Pidgin Hausa estas miksa afrika lingvo kun eŭropecaj influoj, parolata en la nordo de Nigero. Ĝi formiĝis en eŭropaj soldataj tendaroj. En Afrikaj minejoj estas ankaŭ ofta "faka" piĝino por interkompreniĝo de diversdevenaj ministoj, ekz. *Fanakalo* aŭ *Basic Bantu*. Ĝi estas uzata de ĉ. miliono da homoj. Minejaj estraroj eĉ organizas kursojn de tiu ĉi lingvo por novaj laboristoj — por certi, ke ĉiuj ordonoj kaj precipe alarmvokoj estos komprenataj. Baza lingva fono de tiu ĉi nuntempe kreoliĝanta piĝino estas angla, afrikansa, *Zulu* kaj *Xhosa*. Ankaŭ surbaze de *Suahili* ekestis piĝinoj, ekz. *Ki-setla* en Kenio. La Araba influis sudanan piĝinon *Juba Arabic*.

Piĝinoj kaj kreoloj havis komence trajtojn de lingva malsupereco kaj subniveleco. Tiu ĉi elemento pli kaj pli malaperas, la kreoloj estas rigardataj serioze, uzataj en ĉiutaga vivo, en amaskomunikiloj, en lernejoj, ofte ili devenas ilo de alfabetigo kaj eĉ simbolo de nacia identeco. Ili estas science esplorataj kaj priskribataj, ekhavante gramatikon, vortaron kaj propran literaturon. Oni eĉ esploras surbaze de tiuj ĉi lingvoj, ĉu ekzistaj iliaj komunaj trajtoj, priskribeblaj kiel lingvaj universalajoj validaj ĝenerale por ĉiuj lingvoj.

Pliprofundiga literaturo

Pri piĝinoj kaj kreoloj konsultendas *Störig, H. J. : Abenteuer Sprache, Humboldt, München 1992, 380-paĝa*, la 13-a ĉapitro. La germanlingva libro estas rekomendinda por havi superrigardon pri geneologio kaj historio de mondaj lingvoj, eĉ kun informoj pri planlingvoj. Priskribiĝas en ĝi indoĝermanaj lingvoj, la valoro de la Greka kaj de la Latina, sekvas ĉapitro pri latinidaj etnolingvoj, pri ĝermanaj lingvoj, informoj pri jida, cigana kaj aliaj diasporaj lingvoj, pri la internacia signifo de la Angla, en du pluaj ĉapitroj pritraktiĝas lingvoj de unuopaj kontinentoj. Unu ĉapitro estas dediĉita al morfologia lingvoklasifikado kaj rimarkoj pri aliaj lingvoklasifikadoj, la lasta ĉapitro mencias planlingvojn. Enestas i.a. mapetoj kaj registro. Pro sia popularscienca stilo ĝi estas tre agrable legebla libro. Pri piĝinoj kaj kreoloj krome konsultu *Holm, J. A.: Pidgins & Creols, Cambridge 1991*, anglalingvan verkon kun specimenoj kaj mapetoj, kaj *Philippe, B.: Kreolsprache und Plansprache, Internacia E-muzeo, Wien 1991, 24-paĝa* germanlingva tezo komparanta francecajn kreolojn kun Esperanto, iliajn fonetikon, morfologion, sintakson, vortkreadon, vortprovizon, vidante ne nur lingvistikajn, sed ankaŭ sociologiajn paralelojn de ambaŭ sistemoj.

2.5 Eŭropa multlingveco

Post la politikaj ŝanĝoj en orienta Eŭropo oni konstante parolas pri eŭropa integriĝo. La organizo de la nova, unueca Eŭropo devas respekti la bezonojn de ĉiuj eŭropanoj. Instituciaj demandoj kiel demokrata reprezentiĝo kaj lingvouzo, ekonomiaj liberecoj kaj kondiĉoj de stabileco rekte tuŝas ĉiujn unuopajn landojn. Ne plu ekzistas baroj por libera vojaĝado de la civitanoj ene de Eŭropo, ĉiuj kontaktoj estas pli facilaj. Amasa fenomeno iĝis la laborado en eksterlando, unuflanke de simplaj laboristoj, kiuj ne bezonas bonajn lingvokononjn, aliflanke de memstaraj profesiuloj kaj de reprezentantoj de internaciaj entreprenoj, kiuj male bezonas bonajn lingvokononjn. La entreprena vivo en la Eŭropa Unio multe internaciigis, kun problemoj ligitaj al tio: la edukado de la infanoj, la laborloko por la geedza partnero, la adaptiĝo ĝenerale, inkluzive la lingva. Alia kampo de rapide kreskanta internacieco estas la sciencoj. La universitatoj fariĝis multnaciaj. La profesoroj venas el diversaj landoj kaj instruas jen tie, jen tie. La bibliotekoj pleniĝas per libroj en fremdaj lingvoj. Studentoj pasigas siajn studajrojn ankaŭ en eksterlando. Esplorinstitutoj interligiĝas trans limojn kaj interŝangas siajn fakulojn. Unuecaj kondiĉoj estas bezonataj kaj senĝena lingva interkompreniĝo estas urĝa neceso.

Grava estas la lingva situacio de Eŭropa Komunumo. Ĉiuj naŭ lingvoj de la partoprenantaj ŝtatoj estas egalrajtaj, estante oficialaj lingvoj kaj laborlingvoj de la organoj de la Komunumo. Ĉiu

membraĝo de nova ŝtato kaŭzas novan dekretan kompletigantan la lingvaron. La lingvaj preskriboj en la organoj de la Komunumo apartenas al la laborkampo de la ministroj pri eksterlandaj aferoj, kiuj tamen povas agi nur post registara decido en la unuopaj membroŝtatoj. Tial eĉ ĉiu prilingva decido apartenas al la tagordo de konferenco de la eŭropaj ŝtatestroj. La decidoj en la Eŭropa Konsilio estas unuanimaj, do la kontraŭstaro de eĉ ununura ŝtato povas bloki la tutan sistemon. Ankaŭ la ŝanĝo de lingvareguloj do devas esti akceptita de koncernaj registaraj organoj de unuopaj ŝtatoj.

Por praktiki la naŭlingvecon necesas multaj teknikaj rimedoj. Ĉiuj kunvensalonoj de la EK devas havi koncernan interpretadan instalaĵon, ĉiuj dokumentoj kaj protokoloj devas esti tradukitaj. Ĉiu dokumento estas jure valida en ĉiu ajn unuopa lingvo. En kazo de duboj pri la celita senco de frazo en unu lingvo ne eblas esplori en paralela teksto en unu el la aliaj lingvoj, ĉar ilia enhavo devas esti identa. Por forigi malglatajn tradukojn oni havas naŭlingvajn difinvortarojn en unuopaj branĉoj. En la jaro 1993 havis EK 24 718 oficistojn, el ili 3 151 tradukistojn kaj interpretistojn, t. e. ĉ. 13%. La traduk- kaj interpretkostoj reprezentas unu trionon de la tuta bilanco. Por 9 lingvoj estas bezonataj 79 tradukkombinaĵoj (por 12 lingvoj estus bezonataj 132 kombinaĵoj), la tradukistoj/interpretistoj specialigas ĝenerale nur pri unudirekta traduko. La perkomputila traduksistemo SYSTRAN funkcias por 16 lingvokombinaĵoj. Ekde sia enkonduko en la jaro 1975 ĝis 1993 ĝi kostis 37 milionojn da ekuoj. La traduko de unu paĝo kosta ĉ. 2 ekuojn, dum unu monato estas bezonataj 10 000-12 000 tradukitaj paĝoj. EK tamen pretas pagi 1,5 miliardojn da ekuoj jare por konservi la lingvan neŭtralecon.

En la Kortumo de EK estas la lingvouzo leĝe limigita je la Franca kiel interna lingvo, do por internaj traktadoj, leĝolibroj kaj dokumentoj. Oni aprezas tiun ĉi unulingvecon kiel avantaĝon por terminologio en komplikaj aferoj. Ĉar EK rajtas limigi la lingvonombrojn por sia interna lingvouzo, ĝia Komisiono fiksas kiel internajn laborlingvojn la Anglan, la Francan kaj la Germanan. Aliaj institucioj kun propra jura personeco ankaŭ limigas sian lingvouzon, ekzemple la Eŭropa Oficejo pri Varmarkoj en Madrido uzas kvin lingvojn.

La ĉiutaga realo tamen ne estas fidela al la preskriboj, ĉar ofte mankas traduk- aŭ interpretfortoj por malgrandaj lingvoj, sekve okazas duobla tradukado trans la Angla, kaŭzante neprecizecon, aŭ la parolantoj de malgrandaj lingvoj akceptas trakti en negepatra lingvo. Eĉ la dokumentoj ekzistas kutime nur en la Angla, la Franca kaj la Germana, la tradukoj en ceterajn lingvojn aŭ ne estas petataj, aŭ okazadas kun malfruiĝo. La traktantoj tamen ne sentas iun lingvoproblemon, ĉar por enposteniĝo en EK estas postulataj konoj de fremdlingvoj. Ankaŭ por la traktadoj oni prefere elektas homojn ne laŭ ilia maksimuma fakkapablo, sed laŭ ilia kapablo fremdlingva. Krome, pro la koncentriĝo de organoj de la Eŭropa Unio en plej grandparte franca lingvoregiono estas normala ĉiutagaĵo la Franca. La naŭlingveco mankas ankaŭ en la rilatoj kun eksterkomunumaj instancoj, kie oni kutime uzas nur grandajn lingvojn, precipe la Anglan kaj la Francan, do oficialajn diplomaciajn lingvojn. Konforme al tiu ĉi realo estas en Eŭropo lerneje instruata antaŭ ĉio la Angla, malpli la Franca kaj la Germana. La pozicio de la Angla pligraviĝis post la falo de socialismo en orienta Eŭropo. Tie oni avida eklernas la Anglan kaj volonte akceptas superregadon de usona kulturo, kiu jam normalas en la okcidenta Eŭropo — por hodiaŭaj eŭropaj infanoj ja estas ĉiutagaĵo rigardi usonajn filmojn, aŭskulti anglalingvajn kantojn, porti vestaĵojn kun anglaj enskriboj, uzi komputilajn ludojn kun angla teksto ktp. Aliaj fremdaj lingvoj, precipe la lingvoj de najbaroj, havas pozicion preskaŭ sensignifan. En la scienca vivo kaj en direktorado de grandaj eŭropaj entreprenoj regas la Angla, eĉ en entreprenoj, kiuj ne havas kontaktojn kun angle parolantaj landoj. Solvo de la eŭropa multlingveco per la Angla ŝajnas esti la plej natura fenomeno, kvankam ĝi nedemokracie preferigas anglalingvanojn.

EK, klopodante tamen konservi la naŭlingvan demokration, serĉas aliajn solvojn: jen la plibonigon kaj plirapidigon de tradukado helpe de komputiloj, jen la plibonigon de lingvoinstruado. Ĝenerale

estas akceptata la postulo, ke ĉiu eŭropano scipovu apud sia gepatra du ĝis tri eŭropajn lingvojn. EK kontribuas per helpprogramoj, por ke plej eble multaj eŭropanoj scipovu plej eble multajn eŭropajn lingvojn. Ekzemple la projekto LINGUA kostis en la jaro 1993 41 milionojn da ekuoj. Por okcidentanoj ekzistas programo ERASMUS, por orientanoj TEMPUS kaj pluraj aliaj. Tiuj aranĝoj finance helpas tie, kie la alpaŝo al fremdlingvoj jam okazis, do en kleraj sociaj tavoloj, sed ne plene solvas la kompleksan situacion. La necesa lingva minimumo ekzistas por la Angla (threshold level) kaj por la Franca (niveau seuil), la instruado de aliaj lingvoj kaj la preparo de lingvoinstruistoj ankoraŭ ne iras glate. Ellerni unu fremdan lingvon ĝis la nivelo komparebla kun la gepatra estas esceptkazo kaj ĉe la dua aŭ tria fremdlingvo estas la bona scipovo eĉ malpli probabla. Cetere, nek la nivelo de konoj de la Angla estas kontentiga. Oni devas dediĉi al ĝia lernado grandan kvanton da tempo, kiun oni aliel povus uzi por profundigi siajn fakajn konojn. Krom reale ekzistantaj komunikaj malfacilaĵoj dum internaciaj aranĝoj oni ne malatentu psikan barieron: bonkvalita fakulo, hontanta paroli angle en ĉeesto de "native speakers" ŝajnas esti primitivulo. Preskaŭ sesdek procentoj de nobelpremiitoj ekde komenco de nia jarcento devenas de angle parolantaj landoj. La angle parolantaj sciencistoj ne bezonas perdi tempon por lingvolernado — laŭ statistikoj nur 5% de britaj sciencistoj scipovas la Germanan.

La klopodo konservi demokratan plurlingvecon en EK estas iom malfacile praktikata eblo. Alia propono estas havi laborlingvojn. Iuj proponas la Anglan kiel unusolan, aliaj pledas por la Angla kaj la Franca, tria grupo krompostulas la Germanan kaj kvare ekzistas postuloj pri iu neŭtrala unulingva solvo. Tia solvo nek avantaĝigus anglalingvanojn, kiuj nun ne bezonas lerni fremdlingvojn, nek influus naciajn kulturojn. Por la EK kaj eŭropaj oficejoj ĝi estus eĉ finance avantaĝa. Teorie ĉiu eŭropano konservus sian lingvon por internaj kontaktoj kaj plulernus unu kroman lingvon por kontaktoj oficialaj kaj eksterlandaj. Lernado de aliaj fremdlingvoj iĝus ne necesa, sed libervola kromaĵo. Antaŭvideble temas pri pura teorio, sed ĝi havas seriozajn apogantojn.

La postulo de tia kroma "supernacia" lingvo venas ankaŭ de la etnaj minoritatoj, postulantaj siajn lingvaj rajtojn, sed dezirantaj interkompreniĝi kun ekstera mondo, kiel montras ekzemple parto de la Deklaracio de Torino 1991, ellaborita en la kolokvo, kiun organizis la torina universitato:

1. Eŭropo de la patrujoj, nun unuiĝanta, konsistas el mozaiko da etnoj, ĉiu el kiuj posedas propran neforigeblan historian, kulturalan, socian kaj lingvan identecon.
2. Pro sinsekvo de historiaj procezoj, pluraj etnoj troviĝas interne de naciaj ŝtatoj, kie ili vivas en minoritata kondiĉo, kiu limigas aŭ endanĝerigas la pretervivon de ilia identeco.
3. Pro la rekonsciiĝo de la unuopaj etnaj minoritatoj, firmiĝas en tuta Eŭropo fortaj movadoj postulantaj civitanajn rajtojn kaj etno-regionajn aŭtonomiojn; inter la postuloj elstaras tiu pri la protekto de la specifeco de etnaj minoritatoj.
4. El ĉiuj konsist-elementoj de etna identeco, la lingvo estas la ĉefa. Kiam la lingva identeco de etna grupo ne koincidas kun tiu de la plimulto de la civitanoj de la sama ŝtato, la konflikto estas preskaŭ ĉiam solvita per la trudo de la majoritata lingvo super la minoritataj lingvoj, nome per hegemonio de unu reganta lingvo super ĉiuj aliaj regataj lingvoj.
5. La supre menciita superrego ofendas la dignon de la minoritataj etnaj lingvoj kaj lezas la universale agnoskatan principon de egaleco inter ĉiuj lingvoj. tiu principo estas implicite aŭ eksplacite sankciata en la ĉefaj dokumentoj de la internacia komunumo, kiel la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de 1948 (art. 2), la Fina Akto de la Konferenco de Helsinki kaj aparte, la Internacia Traktato pri la Rajtoj civitanaj kaj Politikaj, aprobita de la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj en 1966 (art. 27).

6. Dum la minoritataj etnaj lingvoj estas tiel minacataj en sia pretervivo fare de la naciaj lingvoj, ĉi lastaj estas siavice minacataj fare de la superrego de la Angla en la funkcio de eŭropa aŭ monda komunika lingvo.

7. La gardado de la riĉeco kaj la plureco de la eŭropaj etnaj kulturoj, minoritataj kaj majoritataj, tial alprenas la aspekton de duobla defendo: a) rilate la minoritataj lingvoj en la nacia teritorio kaj b) de la naciaj lingvoj en la eŭropa kaj la monda perspektivo.

a) La konservo de la identeco de la etnaj minoritatoj devas realiĝi per la respekto de la uzado de la koncernaj lingvoj kaj per akcelado de ĉiuj instrumentoj edukaj, komunikaj kaj kulturesprimaj, taŭgaj por garantii ties liberan evoluon;

b) La naciaj lingvoj — evitante subpremi unu la alian — devas konfidi sian integrecon al la uzado, je internacia nivelo, de supernacia neŭtrala lingvo.

8. Nur tiel establiĝas justa lingva ordo, kiu jene respektas la dignon kaj suverenecon de ĉiuj kulturoj en ilia propra sfero: je loka nivelo regu la lokaj lingvoj, je nacia nivelo regu la naciaj lingvoj, je internacia nivelo oni uzu internacian supernacian lingvon.

Kiel neŭtrala supernacia lingvo proponas sin en Eŭropo du raciaj ebloj: lingvo "morta" aŭ lingvo "artefarita", ĉar neniu el ili avantaĝigas sian nacion nek endanĝerigas ies kulturon. La neŭtrala internacia lingvo en Eŭropo ja iam ekzistis, ĝi estis la hodiaŭ "morta" latina lingvo. Estas iom erare nomi ĝin "morta", ĉar ĝi havas parolantojn eĉ hodiaŭ, kaj la modernaj latinistoj diligente kompletigas la vortaron tiel, ke ĉiuj modernaj kreaĵoj kaj inventaĵoj trovas koncernan novlatinan esprimon. Krome ĝi estas ligita al eŭropaj civilizo kaj kulturo, estante ilia peranto. La instruado de la Latina ne estus problemo, ĉar ĝi ja jam estas flegata en lernejoj kaj ekzistas bonkvalitaj instruistoj, kvankam plejmulte kun nur pasivaj konoj. Ĝi estas lingvo klara kaj preciza, uzata kiel referenclingvo en juro kaj eklezio, garantianta senprobleman fidelan tradukadon al kaj el etnolingvoj. La nura argumento kontraŭ la Latina estas, ke ĝia instruado estas estas nek pli facila, nek pli rapida ol ĉe aliaj eŭropaj lingvoj, ĉar en la historie evoluinta lingvo estas fiksitaj ĉiuj komplikaĵoj kaj malregulaĵoj de vortaro kaj gramatiko. Ĝia kontribuo al eŭropaj lingvoj tamen estas nediskutebla: ekzistas aro da latindevenaj vortoj, uzataj tuteŭrope: universitato, hotelo, konferenco, informo, restaŭracio... Ankaŭ gramatikaj strukturoj kaj vortspecoj estas similaj en ĉiuj eŭropaj lingvoj. La sumo de tiaj komunaj elementoj estas ĝuste taŭga bazo por la komuna eŭropa planlingvo. La avantaĝo de tiu lingvo estas, krom la postulata politika neŭtraleco, ĝiaj reguleco, precizeco kaj koncizeco, faciligantaj ĝian lernadon kaj samtempe gravaj por la uzo en teknikaj rimedoj, perkomputila tradukado ktp. Sed, praktike, tiaj argumentoj ne sufiĉas por akcepti planlingvon kiel solvon de eŭropa komunikadproblemo, se la lingvon ne akceptas koncernaj politikaj organizoj kaj aliaj oficialaj lokoj. En la realo neniu ŝtato pledas por la lingvo, kiu ne estas ĝia propra, kaj malantaŭ kiu ne staras ekonomia kaj politika forto. Kvankam eĉ la Eŭropa Komunumo ekinteresiĝis pri planlingva solvo kaj aprezis ĝian taŭgecon, neniu konkreta aranĝo estis akceptita. La oficiala akcepto de planlingvo en la rolo de internacia komunikilo do estas solvo racia, sed apenaŭ realisma en proksima estonteco.

Pliprofundiga literaturo

Estis uzita dulingva (ILO-germana) broŝuro *Bormann, W., H. Frank: Por plurlingveco de Eŭropo / Für Europas Mehrsprachigkeit, Akademia Libroservo / IfK, Paderborn 1994, 167-paĝa*. Tre rekomendinda estas pliprofundiga franclingva verko *Piron, C.: Le défi des langues, L'Harmattan, Paris 1994, 335-paĝa*, en viva, legebla stilo, enhavanta aron da dokumentitaj informoj pri la lingvosituacio en eŭropaj kaj mondaj internaciaj organizoj.

2.6 Demandaro

13. Nomu la 4 plej parolatajn etnolingvojn.
14. Nomu almenaŭ 3 ekzemplojn de normigitaj etnolingvoj.
15. Nomu almenaŭ 3 lingvojn adaptitajn por internacilingvaj kontaktoj.
16. Nomu almenaŭ 3 antikvajn internacie uzatajn lingvojn.
17. Kia estas diferenco inter vulgara kaj humanisma latina lingvo?
18. Kia estas diferenco inter piĝinoj kaj kreoloj? El kiuj lingvoj ili devenas?

3. KLASIFIKADO KAJ KONSTUKRITERIOJ DE PLANLINGVOJ

3.1 Klasifikado

Ekzistas multaj kriterioj kaj manieroj, laŭ kiuj eblas klasifikadi planlingvojn, ekzemple:

- laŭ lingvostrukturaj ecoj (deveno de vortprovizo, rilato al etnolingvoj, lingvotipologio)
- laŭ detaleco de prilaboro kaj evoluigo de projektoj
- laŭ praktika realiĝo
- laŭ respektado de lingvistikaj reguloj...

3.1.1 Tradicia klasifikado laŭ Moch – Couturat – Leau

Klasifikado la plej disvastiĝinta en la literaturo estas tiu laŭ rilato al etnolingvoj: ĉu la vortprovizo de planlingvo estis transprenita, modifita, ŝanĝita, aŭ ĉu ĝi ekestis sendepende de etnolingvoj. Tiam klasifikadon alportis Gaston Moch en la jaro 1897 kaj uzis Louis Couturat kaj Léopold Leau en sia historia verko pri universalaj lingvoj en 1903. Ili diferencigas sistemojn apriorajn, aposteriorajn kaj miksitajn. La *aprioraj* estas sendependaj de etnolingva materialo, plejmulte temas pri filozofiaj sistemoj (laŭ filozofia klasifikado de nocioj kaj simile) aŭ aliaj inventitaj principoj. La *aposterioraj* projektoj imitas etnolingvajn modelojn, transprenante sian vortprovizon el etnolingvoj kaj modifante ĝin diversgrade. La *miksitaj* sistemoj kombinas ambaŭ koncernajn principojn, ĝenerale ili havas aposterioran vortprovizon kaj logikan, aprioran gramatikon.

En tiu ĉi klasifikado oni atenteme prikonsideras la devenon kaj strukturon de vortprovizo, malpli la gramatikon kaj apenaŭ la semantikon. Foje estas malfacile decidi pri apriora aŭ aposteriora. La kriterioj de IALA (International Auxiliary Language Association) el la jaro 1937 diferencigas ekstreman kaj modifitan apriorismon kaj aprosteriorismon. La ekstreme aprioraj sistemoj formas vortojn kaj gramatikaĵojn tute libere kaj hazarde. La modifita apriorismo respektas etnolingvajn formojn. La ekstreme aposterioraj projektoj transprenas etnolingvan vortaron sen aŭ kun nur malmultaj ŝanĝoj. La modifita aposteriorismo adaptas la transprenitan etnolingvan materialon laŭ diversaj kondiĉoj — tio koncernas la plejmulton de aprioraj sistemoj. Tiu ĉi klasifikado estas la plej uzata, ĝi tamen donas nur malprecizan orientiĝon, ĉar eĉ tute aprioraj projektoj havas iujn aposteriorajn elementojn, ekzemple dividon de vortspecoj aŭ bazajn gramatikajn rilatojn. Tial dividas Monnerot-Dumaine en sia eseo el la jaro 1960 la projektojn laŭ deveno de iliaj vortradikoj, laŭ derivadprincipo kaj ekzisto de vortspecoj:

- 1) Lingvoj kun artefaritaj radikoj — artefarita kaj skemisma derivado, vortspecoj havas karakteristikajn trajtojn (subdivido je lingvoj filozofiaj kaj nefilozofiaj).
- 2) Lingvoj kun duonartefaritaj radikoj, artefarita kaj skemisma derivado, karakterizitaj vortspecoj (ekz. Spelin, Blaue Sprache, Pario, Speedwords).

3) Lingvoj kun deformitaj radikoj de naturaj lingvoj, artefarita kaj skemisma derivado, ĝenerale ekzistas karakterizo de vortartoj (ekz. Volapük, Dil, Dilpok, Parla).

4) Lingvoj kun nedeformitaj radikoj de naturaj lingvoj:

a) Duonnatura kaj skemisma derivado: la radikoj konsistas el neŝanĝeblaj morfemoj (monomorfismo), la vortfamilioj estas kreataj regule kaj skemisme, la vortspecoj havas karakterizilojn (Esperanto kaj esperantidoj, Universalglot, Neolatine, Novilatin, Kosmo).

b) La vortoj devenas de Romanaj lingvoj, la derivado kaj vortfamilioj estas neregulaj, abundas alomorfoj (dimorfismo), la vortspecoj ne havas karakteristikajn trajtojn (naturalismaj projektoj).

5) Sistemoj hibridaj kaj neklasifikeblaj.

Plua klasifidado de aposterioraj projektoj estas ilia divido en projektojn *skemismajn* kaj *naturalismajn*. La skemismaj projektoj (ankaŭ nomataj aŭtonomaj) prilaboras etnolingvan materialon laŭ propraj skemoj — ili do aposteriore transprenas etnolingvaĵojn, sed apriorie modifas ilin. La naturalismaj volas maksimume alproksimiĝi al etnolingvoj — ekz. latinidaj naturalismaj sistemoj estas kvazaŭ dialektoj de unu lingvo. Dum tiu ĉi divido oni ĝenerale pritraktas la lingvon nur el strukturaj vidpunktoj de la vortprovizo, neglektante fonologian, morfologian, sintaksan kaj semantikan flankojn.

3.1.2 Klasifikado laŭ S. N. Kuznecov

La klasika klasifikado laŭ Couturat-Leau donas la proksimuman orientiĝon pri la ĥaraktero de planlingvaj projektoj. S. N. Kuznecov rimarkas, ke en la kategorio "miksitaj projektoj" poste troviĝas granda kvanto da ne precize specifitaj sistemoj. Li proponas jenajn karakterizilojn:

1) Kvanto kaj kvalito de fizikaj manifestiĝoj de la koncerna lingvo. La minimuma nombro de manifestiĝoj estas unu (grafika, reprezentata de pazigrafioj, universalaj skribsistemoj). Du manifestiĝojn havas aposterioraj projektoj (grafikan kaj fonetikan). Kelkaj projektoj havas pli ol du manifestiĝojn, ekzemple kodigon per ciferoj, stenografiaj signoj ktp.

2) Rilato de morfemoj kaj vortstrukturo. Vortoj povas esti kunmetitaj (normale de du aŭ pluraj radikoj), derivitaj (radiko plus afiksoj), uzantaj gramatikajn rimedojn (plej ofte radiko plus finaĵoj), la lingvo povas uzi nur unu aŭ plurajn tiajn procedojn.

3) Karakteristikaj apartaĵoj de morfemoj. Ĉe aprioraj sistemoj temas pri motivitaj kaj nemotivitaj morfemoj, ĉe aposterioraj ili povas esti leksike homogenaj (devenantaj de unueca etnolingva fonto) aŭ leksike heterogenaj (el diversaj lingvoj). En tiu ĉi grupo dividiĝas la aposterioraj lingvoj laŭ

a) maniero de kompletigo de sia vortprovizo

b) ĥaraktero de ŝanĝoj de etnolingva vortmaterialo (grafikaj, fonologiaj, morfologiaj).

Kuznecov do tiel pli detale gradigas la klasifikadon ekde apriorismo tra skemisma aposteriorismo ĝis naturalisma aposteriorismo. Lia klasifikado ne interesiĝas pri perfekteco de prilaborado de koncernaj projektoj nek pri praktika uzeblo.

3.1.3 Klasifikado laŭ D. Blanke

Detlev Blanke klasifikas planlingvojn el pure sociologia vidpunkto. En sia disertaĵo pri planlingvoj el la jaro 1985 li dividas projektojn laŭ ilia praktika realiĝo en tri grupojn: planlingvaj projektoj, semiplanlingvoj kaj planlingvoj.

Da *planlingvaj projektoj* ekzistas ĉ. 900. Ili diferenciĝas laŭ grado de sia praktika realiĝo. La plej granda parto de ili restis "surpapere", do en stadio de nura projekto, apenaŭ uzita almenaŭ de la aŭtoro mem. Ĝis nun aperas novaj projektoj (laŭ Blanke 1-3 jare), tiu ĉi grupo do konstante kreskas. Malmultaj de ili estis pli konataj (krom lernolibroj aperis revuo, ekzistis organizo ktp.), kiel Idiom Neutral, Novial, Ro, Neo, havante portempan sukceson.

Semiplanlingvoj havas certan rolon en la internacia komunikado, precipe eŭropa. La praktika uzo de tiuj sistemoj kondukas al ekesto de memstara signifonivelo en la lingvo. Aperas revuoj, libroj kaj vortaroj, la vortprovizo kreskas, ekzistas certa lingvokomunumo. Ne plu temas pri projektoj, sed ankoraŭ ne plene pri lingvoj. Principe povas kreski ankaŭ tiu grupo, se la funkciantaj semiplanlingvoj trovas pli grandan disvastiĝon. Volapük, Basic English kaj Latino sine flexione praktike ne plu ekzistas, Occidental, Ido kaj Interlingua havas konsiderindan, tamen ne kreskantan parolantaron.

La kategorion de *planlingvo* eniris laŭ tiu ĉi klasifikado nur unu reprezentanto, nome la Internacia Lingvo de D-ro Esperanto. Ĝi atingis plenan funkciadon kompareblan kun tiu de etnolingvoj kaj dank' al la kreskanta lingvokomunumo montras sian taŭgecon kiel internacia komunikilo.

La praktikan realigon de planlingva projekto mezuras Blanke laŭ 18-ŝtupa skalo:

- 1) publikigo de sistemo (multaj projektoj),
- 2) la aŭtoro eldonas revueton en sia lingvo (ekz. Ro, Medial)
- 3) relative forta propagado, ekzisto de adeptoj, internacia korespondado
- 4) certaj organizaj formoj de propadago, malgrandaj organizoj (ekz. Idiom Neutral, Novial)
- 5) iom da beletro, tradukoj, originala literaturo
- 6) pluraj revuoj en la planlingvo
- 7) parta uzado por fakaj celoj, scienco, tekniko (Latino sine flexione, Basic English)
- 8) instruado, neŝtataj kursoj
- 9) ioma paroluzo, internaciaj aranĝoj (Volapük, Occidental, Interlingua)
- 10) pli forta praktika uzado, fakaj revuoj kaj organizoj
- 11) pli evoluigitaj naciaj kaj internaciaj organizoj
- 12) abunda beletro, tradukoj, originalaj verkoj
- 13) relative disvastigita instruado, ankaŭ en ŝtataj lernejoj
- 14) grandaj internaciaj eventoj, mondaj kongresoj
- 15) radioelsendado
- 16) socia kaj politika diferencigo de parolantoj
- 17) propra junulara movado
- 18) parta uzado en familio, bilingvismo de infanoj

3.1.4 Klasifikado laŭ esprimformo

La planlingvoj dividiĝas laŭ tio, ĉu ili havas formon nur skriban (*pazigrafioj*) aŭ/kaj parolan (*pazilalioj*). Al pazilalioj do apartenas ĉiuj elparoleblaj planlingvoj. Pazigrafioj, uzante nur simbolojn, ne dependas de iu lingvo, ĉar oni povas legi ilin en ajna lingvo. En pli larĝa senco apartenas tien ekzemple trafiksignoj, arabaj ciferoj, ĥemiaj formuloj ktp. En la 18-a kaj la 19-a jarcentoj ekestis la plejmultaj pazigrafiaj projektoj de planlingvoj, la novaj estas ĉiam kreataj, ekz.

Videlingo surbaze de Esperanto en 1992. Eblas ilia plua disdivido: gestolingvoj, piktografioj kaj ideografioj, sekretaj skribsistemoj, universalaj alfabetoj, stenografioj, signalsistemoj kaj aliaj kodoj.

Estas konataj ekz. *gestolingvoj* de indianaj triboj. Gestosistemoj de surdmutuloj estis jam adaptitaj internacive. En bibliografioj oni trovas kelkajn dekojn da verkoj pri internaciaj gestolingvoj. *Piktografioj kaj ideografioj* havas sian originon en pratempaj pentraĵoj kaj komencoj de skribsistemoj (ekz. la egiptaj hieroglifoj). Piktogramoj estas bildetoj de konkretaj objektoj, ideogramoj estas pli abstraktaj kaj bildigas ankaŭ certajn nociojn. Pluraj pazigrafioj ĉerpas el ili. *Kriptografioj (steganografioj)* estis konataj jam en mezepoko kiel sekretaj skribsistemoj de certaj komunumoj, organizoj ktp. Multaj ekestis en la 16-a jarcento, kelkaj en kombinaĵo kun elparolebla sistemo. Estas registrita ĉ. sepdeko da pazigrafioj por tiuj celoj. *Universalaj alfabetoj* kaj transkripciaj sistemoj devis plifaciligi la komunikadon, ili estis ellaboritaj por diversaj lingvogrupoj, registrita estas ĉ. ducento da ili. Da "rapidskribaj" *stenografioj* oni ankaŭ konas sepdekon en diversa grado de prilaboro. Al pazigrafioj oni povas alvicigi ankaŭ *telegrafajn kodojn, dekuman klasifikadon, luman kaj flagan signalsistemon, Morse-alfabeton* ktp.

Same kiel ĉe planlingvaj projektoj ĝenerale oni povas dividi pazigrafiojn laŭ maniero de ilia ekesto aŭ laŭ deveno de materialo, kiun ili uzas. Ekzistas do *aprioraj* pazigrafioj, konstruantaj siajn signojn laŭ divido de homaj scioj en certajn klasojn kaj subklasojn, kiuj ricevas respektivajn simbolojn. Tiaj sistemoj estas finpretaj, oni do apenaŭ povas aldoni novajn nociojn sen ŝanĝoj en la tuta sistemo. La koncernaj klasoj povas ricevi vokalan, konsonantan kaj silaban valoron, tiam ili estas prononceblaj kaj iĝas aprioraj pazilalioj. Plejmulto da ili ekestis kiel "filozofiaj" planlingvoj en la 17-a kaj 18-a jarcentoj.

Kiel ekzemplojn de aprioraj pazigrafioj oni menciuj "Graphische Sprache" de Carl Haag el la jaro 1930. Li karakterizas sian provon kiel "apartiĝon de pensado desde lingvo pere de nokia skribo". La bazaj elementoj de ties nokia konstrusistemo estas klasoj fizikaj, psikaj, historiaj ktp. Por bazaj nocioj li uzas grafikaĵojn, ekzemple kvadrateto signifas aĵon, trianguleto konduton, cirkleto personon, kruceto bonon, horizontala streketo malbonon. "Translingua Script" de E. Funke (1956) estas cifera pazigrafio: la vortprovizo dividiĝas en 35 grupojn, la unuopaj nocioj estas signitaj per ciferoj kaj iliaj kombinaĵoj, ekzemple 9 = korpo, 9.1 = homa korpo, 9.2 = ostoj, 9.6 = korpaj funkcioj. Interesan grupon de aprioraj pazigrafioj formas tiuj, kiujn oni volas uzi por interkompreniĝo kun eksterteranoj, ekzemple L. Hogben (aŭtoro de projekto Interglossa) kredas, ke eksterteranoj konas numerojn. Matematikisto Hans Freudenthal publikigis en 1960 projekton "Lincos" (Lingua cosmica), por ebligi kosman interkompreniĝon helpe de radiosignaloj.

Aposterioraj (aŭ "empiriaj") pazigrafioj baziĝas sur nocioj esprimataj per vortoj kaj vortgrupoj, ĉerpante do el lingva materialo. Ili abundas en la 19-a kaj la 20-a jarcentoj. Unu el la plej bonaj kaj detalaj oni opinias "Safo" de André Eckardt (1947), inspiritan per ĉina skribo. Ĝi havas 180 bazajn signojn por la plej gravaj nocioj de ĉiutaga vivo. La nociaro estas kunmetita respektante la strukturon de eŭropaj lingvoj, i.a. gramatikajn kategoriojn. Tial al bazaj signoj aldoniĝas kromsignoj (ekz. al granda streko kromstreketo) por indiki pluralon, kazon, preteriton, imperativon ktp. Ekzistas ankaŭ miksaj formoj de aprioraj kaj aposterioraj pazigrafioj.

3.1.5 Klasifikado laŭ A. Bausani

1. Lingvoj sanktumaj:

- a) sanktuma kvazaŭlingvo (glosolalio, magiaj formuloj)
- b) artefarita sanktuma lingvo (Balaibalan)

2. Lingvoj laikaj:

- a) pure luda artefarita laika lingvo (ekz. inventita de infanoj aŭ paranojuloj)
- b) artefaritaj lingvoj por praktika komunikado

3.1.6 Klasifikado laŭ la esprimeblo de projektoj (laŭ A. Münnich)

1. *Piĝin-projektoj*: la aŭtoro strebas pri lernfacileco kaj enmetis elementojn ekzistantajn en etnolingvoj (Wedde, Basic English)
2. *Naturalismaj projektoj*: la projekto celas egaligi sian esprimeblon al tiu de etnolingvoj kaj plej eble simili al ili (Occidental, Interlingua)
3. *Raciismaj projektoj*: la projekto atingi pli grandan esprimeblon ol etnolingvoj mem, ĝi enhavas elementojn, kiujn la etnolingvoj ne havas (Solresol, Volapük, Esperanto)
4. *Projektoj miksitaj* (el la antaŭaj tri grupoj).

3.1.7 Klasifikado laŭ la detalgrado de prilaboro (laŭ D. Blanke)

1. *Detale prilaboritaj projektoj*: ili havas precizan gramatikon kaj ampleksan vortaron, (la detaligo tamen ne estas signo de kvalito), ekz. aprioraj projektoj de Wilkins, aposterioraj Interlingua, Neo.
2. *Bone prilaboritaj skizoj* kun baza vortprovizo, superrigardebla gramatiko kaj specimenoj de teksto, do la plejmulto de realiĝintaj sistemoj kiel Volapük, Ido, Interglossa, Esperanto...
3. *Skizitaj projektoj*, ofertantaj nur supraĵan bildon pri la lingvo, ekz. Glosa
4. *Informoj pri projektoj*, mallongaj skizoj en revuoj ktp.
5. *Fragmentaj informoj*, prikonsideroj ktp.

3.1.8 Klasifikado laŭ grado de artefariteco (laŭ E. Svadost)

Principe ĉiuj lingvoj estas artefaritaj, ili nur diferenciĝas en grado de artefariteco:

1. *Lingvoj, kiuj ne havas skribsistemon*: parolkomunuma lingvaĵo de antaŭskribaj naciaj lingvoj, historiaj lingvoj kaj dialektoj antaŭ la normigo
2. *Normigitaj lingvoj*: la naciaj, literaturaj lingvoj
3. *Projektoj de internaciaj lingvoj ne ankoraŭ uzataj (nur eksperimente)*: lingvoj konstruitaj surbaze de lingvaj spertoj de la homaro, el la materialo de historiaj lingvoj (aposterioraj lingvoj)
4. *Projektoj konstruitaj sen konsidero de lingvaj spertoj de la homaro*, surbaze de filozofia ideoklasifiko kaj litera simbolaro (aprioraj lingvoj)
5. *Sistemoj, kiuj ne povas eĉ eksperimente funkcii kiel parolaj*: maŝin-interlingvoj, kibernetikaj, matematikaj kodoj, ĝenerale ĉiuj kodoj.

3.1.9 Klasifikado laŭ tipo de morfosintakso (laŭ T. Carlevaro)

1. *Lingvoj vere izolivaj* (ekz. Latino sine flexione, Interglossa, Loglan)
2. *Lingvoj fleksiaj reguligitaj* (ekz. Occidental, Novial)
3. *Lingvoj fleksiaj nereguligitaj* (ekz. Neolatino, Interlingua)
4. *Lingvoj aglutinaj multe sintezaj* (ekz. Volapük)

5. *Lingvoj aglutinaj modere sintezaj* (ekz. Ido)

6. *Lingvoj izolivaj-sintezaj* (ekz. Langue internationale néo-latine, Esperanto).

3.1.10 Opozicia klasifikado (laŭ V. P. Grigorijev)

resumas multajn vidpunktojn de klasifikado:

- 1) lingvo (projekto): natura / artefarita
- 2) apriora / aposteriora
- 3) ĝenerala / regiona (kontinenta)
- 4) plenfunkcianta / parte funkcianta
- 5) autonoma / naturalisma
- 6) homogena / heterogena

3.2 Konstrukriterioj

Postuloj pri ecoj de la internacia lingvo estas tre diversaj, kondiĉitaj de la konstruceloj. Ekzemple la universalaj lingvoj de la antaŭhumanisma epoko estis ofte kreitaj kiel kriptolingvoj, ilia ĉefa eco do ne estis simpleco aŭ simileco al iuj etnolingvoj, eĉ male. Filozofiaj lingvoj de la humanisma epoko devis esti "spiegulo de aĝoj", estante kunigitaj kun la klasigo de nocioj. Por tiuj celoj oni kompreneble bezonis lingvon pure logikan kaj aprioran, logikeco kaj maksimume ebla kompleteco do estis iliaj ĉefaj postulataj trajtoj. Multaj aŭtoroj propagandis lingvan universalismon — la internacia lingvo devis esti la ununura komprenigilo aŭ de la tuta homaro aŭ de certa lingva komunumo (projektoj tutslavaj, tutgermanaj ktp.), iliaj projektoj do serĉis la maksimumon de komunaj elementoj. Lingvoj naturalismaj postulas plej eblan alproksimiĝon al etnolingvoj, sekve ili ne celas esti regulaj kaj senesceptaj. Internacian lingvon oni devas lerni, do al lingvistikaj, filozofiaj kaj sociaj kriterioj aldoniĝas la pedagogiaj. La multflanka bezono de internacia lingvo aldonigis kriteriojn lingvopolitikajn, estetikajn, teknikajn, komputilajn, amaskomunikilajn ktp., ktp.

La ĝenerale akceptataj lingvistikaj kriterioj por konstruo de planlingvo aspektas pli malpli tiel, kiel ilin priskribas Tazio Carlevaro en sia verko pri lingvokonstruado el la jaro 1993:

Grafemoj

La unuopaj grafemoj devas aparteni al la latina alfabeto, sen literoj, kiuj ne apartenas al alfabeto uzata komune en eŭropaj lingvoj; krome estas kutimo ne proponi literojn kun apartaj grafikaj supersignoj.

Fonemoj

Fonemaro devas esti organizita en sistemon, devas esti relative simpla kaj al la fonema strukturo devas korespondi grafika strukturo. Temas pri tiel nomata fonologia skribmaniero, aŭ la postulo, ke al unu fonemo korespondu unu grafemo kaj male. Tiun ĉi kriterion tamen kontraŭas kelkaj scienculoj, kiuj opinias, ke la grafika aspekto de lingvo estu tiom grava, ke ili postulas absolutan apartenecon al la modela lingvo aŭ lingvoj, eĉ se tiuj posedas tre historian, ne fonetikan ortografion.

Monemoj

Monemoj devas esti laŭeble monomorfaj, derivataj, se temas pri ilia formo, de ekzistanta lingvo. Ĉiu morfemo devas havi determinitan semantikan valoron, do tial havi sian laŭeble unuecan pozicion en la semantika reto. Ĝenerale estas la etimologia korekteco tiomgrade respektata, ke ne pereas la krea povo de la sistemo mem, do la povo krei novajn motivitajn vortojn neekzistantajn en

la lingvoj, de kiuj devenas la monemoj. Ekzistas escepto, nome lingvoj "naturalismaj" (kutime bazitaj sur rigora alproksimiĝo al novlatinaj modeloj), en kiuj eblas krei novajn vortojn kondiĉe ke ili korespondas al tiuj, kiuj ekzistas en la lingvoj, al kiuj ili alproksimiĝas aŭ kiujn ili prenas kiel modelon.

Morfologio kaj sintakso

Oni ĝenerale postulas, ke la morfologio estu aglutina, do posedu unumorfajn monemojn, kiuj aldoniĝas unu post la alia, restante senŝanĝaj. Tiuj "aldonaĵoj" devas esti faritaj analogie (do esti priskribeblaj per reguloj) kaj ne permesi ambiguecon. Ĝenerala postulo estas, ke la lingvo estu nek ekstreme sinteza, nek ekstreme analiza. Tio ne validas por lingvaĵoj kiel Interlingua, por kiu valoras aparteneco al novlatinaj modellingoj. Ĝia gramatiko do estas aglutina, se tia estas morfologio de novlatinaj lingvoj, kaj sinteza-fleksia en aliaj kazoj.

Semantiko

Oni postulas, ke la semantika strukturo de la lingvo evitu ambiguecon, restante samtempe ekonomie akceptebla. En la planlingvoj troviĝas nur rare kazoj de polisemio (kiel en la franca "louer" = "pruntepreni" kaj "pruntedoni"), kazoj de homonimio (kiel en la franca "pomme" = "pomo" kaj "terpomo") kaj kazoj de homofonio (kiel en la franca "vert" = "verda", "ver" = "vermo", "vers" = poezia verso, "vers" = al, "verre" = vitro, glaso, ĉiuj prononcataj /ver/).

Kio koncernas sintakson, oni postulas, ke la planlingvo ne havu idiomaĵojn kaj ke ne enestu redundaj aŭ ambiguaj morfosintaksaj funkcioj. Do, ke ekz. al du morfosintaksaj formoj ne korespondu la sama funkcio, kaj ke al unu formo ne korespondu du diversaj funkcioj. Tamen iu certa elasteco de esprimado estas necesa.

Kvalitkriterioj de planlingvo tamen ne konsideras nur internajn lingvostrukturojn, sed inkluzivas ankaŭ politikajn konsekvencojn, vidpunktojn komunikadsciencajn, lernrilatajn kaj aliajn. Kriterioj de Daniela Wegge, starigitaj en 1985 dum la kolokvo pri lingvopolitika kaj lingvokibernetika flankoj de interlingvistiko jenas:

1. Politika kaj kultura neŭtraleco

La lingvostrukturo ofte determinas la lingvon, kies parolantaro pleje estos privilegiita dum la lernado de ĉi lingvo kiel la dua — ĉu pro la elpreniteco de la vortprovizo el certa vivanta lingvo, ĉu pro la simileco de la gramatiko kun tiu de vivanta lingvo. Se planlingvo aparte similegas vivantan lingvon, la disvastigo de la planlingvo povas konduki al politika, ekonomia aŭ kultura plipotenciĝo de unu ŝtato kompare kun la aliaj. Eblaj konsekvencoj estus la subpremo kaj ekstermo de malnovaj kulturvaloraĵoj. La pludaŭro de tradiciaj lingvoj ne estu endanĝerigita pro la enkonduko de nova interkomprenigilo.

2. Politika realigeblo

Gravas ankaŭ la financa kaj tempa kostoj de la enkonduko de lingvo kiel dua lingvo. Ju pli altas la kostoj por la evoluigo de studlibroj kaj literaturo en ĉi lingvo (ekz. ĉar ĝi tiurilate ankoraŭ malriĉas), des pli la disvastigo de la lingvo iĝas elspeziga. Same validas: ju pli altas la kostoj por instrui instruistojn de ĉi lingvo aŭ por trovi subtenajn organizojn, des pli malfaciliĝas la politika realigeblo. Dumjaraj spertoj do estas avantaĝaj.

3. Pedagogia taŭgeco

El pedagogia vidpunkto dezirindas, ke la akiro de planlingvo konsiderinde plifaciligu la akiron de kromaj fremdlingvoj.

4. Taŭgeco por aŭtomata traduko

Planlingvo devas, por havi multajn aplikadkampojn, esti enkodigebla. La gramatiko estu permaŝine pritraktebla, t. e. senescepta kaj unusenca. La vortprovizo estu sen homonimoj kaj sinonimoj, por ebligi facilan manipuladon en datenbakoj.

5. Taŭgeco por homa komunikado

La plej grava aplikadkampo estos la interhoma komunikado. Oni formulu laŭeble unusence, sed aliflanke nuance. La esprimovo ne reduktiĝu draste, ĉar oni certe ne pretus esprimi en rigidaj kaj tre limigitaj frazstrukturoj iujn komplikajn faktojn, kiujn oni kutimas senprobleme kaj tamen unusence esprimi en la gepatra lingvo.

6. Taŭgeco por la teknika komunikado

La repertuaro egalas al tiu de normigita skribmaŝinklavaro (por telekso, telegramoj ktp.). Dum telefona komunikado la ricevonto havu la eblon restarigi la mesaĝon eĉ kaze de tre perturbita kanalo. Tio validas ankaŭ por radiosendaĵoj. Teknika komunikado fariĝas problemhava kaze de nesufiĉa lingva redundanco. La vortoj ne estu tro mallongaj, la gramatikaj strukturoj estu klare ekkoneblaj ĉe ne tro malmultaj trajtoj ktp. Precipe ne estu limigo de la planlingvo-uzado al certa fako. Planlingvo devas ankaŭ esti malfemita al novaj vortoj kaj forgespova rilate malnovajn.

7. Efika lerneblo

Planlingvo devus esti laŭeble facile kaj rapide lernebla. Lerncelo estas la kapablo je libera kaj adekvata komunikado en ajna fako. Oni povas diferencigi inter lernŝtupoj: pasiva lingvokompreno (legi, kompreni aŭditaĵon), kaj aktiva lingvokono (skribi, paroli). Post tre malmultaj horoj almenaŭ pasiva lingvokompreno akireblu. Ne estu maleble skribi poezion tradukante el la gepatra lingvo aŭ en ĝin, aŭ mem verkante en la lernita lingvo. Certe dependas de diversaj normjuĝoj, ĉu tio estas nepra lerncelo. La malfacilo lerni lingvon dependas de la skribmaniero, la prononcmansiero, la vortprovizo kaj la gramatiko de la lingvo.

7.1. Skribmaniero

La skribsimboloj estu laŭeble kutimaj kaj ne tro multaj. La ortografio estu fonetika, t. e. ĝi ne enkonduku superfluajn literojn kiel la plilongiga "h" en la Germana.

7.2. Prononcmansiero

Ĝi enhavu laŭeble malmultajn fonemojn, kiuj ne ekzistas en ĉiuj vivantaj lingvoj. La akcentigo de la vortoj estu simpla kaj regula.

7.3. Vortprovizo

La baza vortprovizo devas esti eta. Ne tro ampleksa regularo ebligu konstrui pluajn vortojn, sed samtempe ĉi tiuj neologismoj estu evidentaj. Tiu regularo principe garantiu, ke la koncerna planlingvo havu la potencon esti pliriĉigata.

7.4. Gramatiko

En la moderna lingvistiko estas tre diversaj sistemoj (Chomsky-gramatiko, retogramatiko, transformgramatiko ktp.). Al multaj lingvoj la priskribmodelo kaj la terminologio de la tradiciaj gramatikoj ne estas adekvate aplikeblaj. Tute senutila estas la tradicia gramatiko por la aŭtomata lingvotraduko. Tial estas dubinde, ĉu la postuloj al gramatiko facile lernebla povas esti formulitaj helpe de tiuj tradiciaj fakvortoj: genro, nombro, modo, pronomo, artikolo ktp. Oni tamen laboras surbaze de la tradicia terminologio kaj gramatiko, ĉar fakte la plejmulto de la planlingvopriskriboj aperas en la tradicia terminologio. Sekve tiel ili plej bone kompareblas. Sed ankoraŭ klarigendas, kiomgrade la sekvaj gramatikaj strukturtraĵoj konfomas al la modeloj kontentigantaj la nunan staton de la lingvistiko: *Verbo*: neniu indiko de persono kaj nombro, ĉar pri tio infomas la substantivo. Por ĉiu tempo nur unu finaĵo. Por ĉiu modo nur unu finaĵo. *Substantivoj*: laŭeble malmultaj kazoj. La rilaton inter subjekto kaj objekto aŭ inter la objektoj indiku prepozicioj. La pluraligo estu regula kaj simpla. *Adjektivoj*: neniu diferencigo de la genro; la komparativo kaj la negacio estu farata per kromaj finaĵoj. Agordigo rilate kazon kaj nombron kun la koncerna substantivo. *Artikoloj*: neniu diferencigo de la genro; indiki la sekson de vivaĵo eblas per kromaj vortpartoj aŭ vortoj. Neniu nedifina artikolo. *Numeraloj*: ili baziĝu sur strikte decimala sistemo kiel logika sintezo.

Similaj kriterioj ofte ripetiĝas rilate al diversaj apudlingvistikaj postuloj. En sia referaĵo dum kolokvo pri eŭropa lingvopolitiko surlistigas Helmar Frank en 1979 jenajn kriteriojn:

Kriterioj de taŭgeco por interhoma kompreniĝo

1. La lingvo ebligu laŭeble precizan kaj nuancitan formuligon.
2. La lingvo posedu mezume laŭeble koncizajn esprimojn.
3. La ortografio estu laŭeble simpla; la ĝusta prononco estu facile derivebla el la skriba formo.
4. La lingvo estu artikulebla senprobleme, t. e. enhavu laŭeble malmultajn fonemojn, kiujn regas nur malmultaj eŭropanoj.
5. La sonoj de la lingvo klare diferencigu unu de la alia, tiel ke la kompreno restu ebla ankaŭ dum la ĝenaj sonoj.
6. La kazoj, kiam la samsonaj (ne nepre same skribitaj) vortoj havas principe diversajn signifojn, estu laŭeble malmultaj.
7. La kazoj, kiam pro unu kaj la sama signifo ekzistas pli ol unu vorto, estu laŭeble malmultaj.

Kriterioj de taŭgeco por aŭtomata lingvoprilaborigo

1. Postulata ŝanĝo de skriboformo de la lingvo por la enkomputiligo, telefaksado kaj simile estu laŭeble minimuma.
2. La gramatiko de la lingvo devas ebligi facilan komputilan analizon (sen aldonaj subprogramoj)
3. La provizo de bazaj vortoj kaj afiksoj, en kiujn eblas sisteme dismeti ĉiun esprimon de la lingvo, devas esti laŭeble malgranda.

Kriterio de estetika akceptebla

La lingvo sonu (ankaŭ en kantformo) laŭeble agrable kaj ebligu vortludojn, rimojn, metrikajn skemojn k.a.

Kriterioj de sendanĝero por elprovitaĵoj

1. La lingvo kiel eŭropa lingvo laŭeble minimume endanĝerigu la staton de etnolingvoj.
2. La lingvo estu jam sufiĉe longe elpruvita kaj dum tio konservata kiel interkomprenigilo.
3. La enkonduko de la lingvo kiel eŭropa estu konektita kun laŭeble malmultaj ŝanĝoj de la estanta stato.
4. La lingvo estu kulturhistorie enradikiĝinta en Eŭropo kaj havu ĉi tie sian elirpunkton.

Kriterioj de egaleco de ŝancoj

1. La lingvo estu laŭeble samkvante disvastiĝinta ene de Eŭropa Komunumo.
2. La enkonduko de la lingvo kiel eŭropa lingvo estu samavantaĝa por ĉiuj lingvokomunumoj de Eŭropa Komunumo.
3. La enkonduko de la lingvo kiel eŭropa lingvo ege malgrandigu, event. laŭeble ete grandigu la diferencojn inter diversaj sociaj tavoloj.
4. La nombro de eŭropanoj, por kiuj la lingvo estas la gepatra, estu laŭeble malgranda.

Kriterioj de pedagogia taŭgeco kaj de klerigpraktika realigeblo

1. Post decido pri la lingvo kaj antaŭ ĝia realigo estu ankoraŭ facile fareblaj dezirataj korektoj.
2. La tempo por la ellerno de la lingvo devas esti laŭeble mallonga (ankaŭ por neeŭropanoj).
3. La ellerno de la lingvo devas laŭeble multe faciligi alproprigon de pluaj eŭropaj lingvoj.
4. La havigo de instruistoj kaj instrurimedoj por la koncerna lingvo estu laŭeble senproblema.

Kriterioj de politika realigeblo

1. Nombro de eŭropanoj, kiuj la koncernan lingvon jam komprenas kaj laŭeble ankaŭ aktive regas, estu laŭeble granda.
2. En la realigota lingvo jam ekzistu laŭeble riĉa literaturo.
3. La lingvo estu laŭeble ŝatata en Eŭropo.
4. La lingvo estu ankaŭ laŭeble disvastiĝinta ekster la unuiĝinta Eŭropo.
5. La nombro de internaciaj organizoj, kiuj jam uzas la lingvon, estu laŭeble granda.
6. La agordigo de enkonduko de la lingvo kun la homaj rajtoj estu laŭeble senkonflikta.
7. La danĝero, ke la enkonduko de la lingvo gvidos al subpremo de per ĝi malavantaĝigitaj grupoj, estu laŭeble minimuma.
8. Jam antaŭ la enkonduko de la lingvo kiel eŭropa lingvo kaj sendepende de ia tia decido ĝi estu disvastiĝinda.

La postuloj de diversaj uzantoj estas ofte kontraŭdiraj — iuj postulas, ke la lingvo estu riĉa kaj multfaceta por povi skribi en ĝi beletron kaj poezion, aliaj postulas, ke ĝi estu sen sinonimoj por taŭgi al perkomputila tradukado, iuj postulas ĝian similecon kun eŭropaj lingvoj por kaŭzi pedagogian transferon, aliaj volas, ke ĝi estu pure logika kaj senescepta laŭ matematikaj modeloj, ktp., ktp. Neniu lingvo do povas samtempe plenumi ĉiujn dezirojn de diversaj uzantoj — evidente necesas iu kompromiso.

3.3 Demandaro

19. Kia estas baza klasifikado de planlingvoj rilate al etnolingvoj?
20. Kia estas baza klasifikado de planlingvoj rilate al praktika uzo?
21. Kia estas baza klasifikado de planlingvoj rilate al la formo?
22. Nomu almenaŭ 3 kriteriojn por konstruado de planlingvo.

Pliprofundiga literaturo

Taŭgas legi precipe *Blanke, 1985* (vidu ĉe 1.2.), paĝojn 99-122. Krome itallingvan verkon de *Carlevaro, T.: Per costruire una lingua, Dubois, Bellinzona 1993*, paĝojn 12-18 kaj 25-33. Pri konstrukriterioj *Wegge, D. : Kvalitkriterioj kaj komparadimensioj de planlingvoj, en Wegge, D. (Hrsg.): Interlingvistiko en lingvokibernetika kaj lingvopolitika perspektivo, IfK, Berlin 1985, 65-paĝa*. En la sama dulingva (ILO-germana) kolekto troviĝas pluaj similtemaj artikoloj. Plue *Frank, H.: Die Überwindbarkeit der innereuropäischen Sprachbarrieren...* en *Barandovská (eld.), 1993* (vidu ĉe 1.2), paĝoj 543-561.

4. ETAPOJ DE LA EVOLUO DE INTERLINGVISTIKO; HISTORIO DE PLANLINGVOJ

4.1 Unuaj nesistemigitaj projektoj

Kiom da planlingvoj entute ekzistas? La bibliografioj mencias diversan kvanton, ekz. Stojan (1929) ĉ. 350 projektojn, Drezen (1939, reeldono 1991) 467 projektojn, la plej aktuala bibliografio de Duliĉenko (1990) 912 registritajn projektojn, konstruitajn ĝis la jaro 1973. Deko da novaj aŭ renovigitaj projektoj konatas el la pasintaj dudek jaroj, oni do povas supozi ekziston de preskaŭ mil proponoj de la internacia lingvo (IL), inkluzive pazigrafioj kaj projektoj neregistritaj. Kvankam oni scias, ke la ideo de la komuna interlingvo estas tre malnova, ekzistas nur malmultaj indikoj pri la planlingvoj proponitaj antaŭ la 17-a jarcento. En Eŭropo ĝis tiam plenumis la interlingvan funkcion la Latina.

Tamen ekzistas informoj pri la interlingvistikaj provoj de Lucius Claudius Galenus el la 2-a jarcento. Temis verŝajne pri pazigrafio — oni konkludas tion el la mencio de la Roma historiisto Piso en lia verko "Historiae". Galenus vivis en la jaroj 131-200, studis en Pergamon kaj Alexandria, iĝis persona kuracisto de la imperiestro Marcus Aurelius kaj filozofo, diskutante kun siaj samtempuloj ankaŭ pri lingvoj. Lian projekton inspiris la eldiro de Platono, ke la plej granda donaco por la homaro estus komuna lingvo.

Iom pli da scioj oni havas pri propono de la klera abatino Hildegardis von Bingen (1098-1178), kies profetaĵoj, filozofiaj kaj teologiaj verkoj en la Latina estas bone konataj. Konservigis parto de la manuskripto de ŝia apriora projekto "Lingua ignota per simplicem hominem Hildegardem prolata", el la jaro 1134, enhavanta vortaron de 1011 vortoj kun latina kaj malnovgermana traduko. Oni povas konkludi al la plejparte latindevena vortprovizo kun substantiva finaĵo -z (pariz, mariz, diueliz, aiganz = patro, patrino, diablo, anĝelo). La lingvo probable estis planita kiel kriptolingvo dum la krucmilitoj, do ankoraŭ ne serioza projekto de IL.

Same, do ne kiel konscian lingvoprojekton oni povas prijuĝi "Latino macaronico" de Theofilo Hieronimo Folengo (1491-1544). Duliĉenko (1990) priskribas ĝin kiel eksperimenton pliriĉigi la Latinan per italaj leksikaj elementoj. Temis pri la miksaĵo ofte uzata en la siatempa ŝerca studenta poezio; ekzistas "makarona" latina poezio ĉeĥa, germana ktp., en kiu laŭrime alternas versoj en

ambaŭ lingvoj.

Ĝis la 17-a jarcento estas bibliografie registritaj entute ok projektoj de IL. Certan signifon havas teorio de la hispana filozofo Raymund Lull (1325-1375), priskribita en lia verko "Ars magna", kie li substrekas la ligitecon de lingvo kaj logiko — la lingvo estu "logika maŝino". Lia verko estis reeldonita kaj komentita ankoraŭ en la jaro 1592, mencias ĝin filozofoj kaj aŭtoroj de lingvoprojektoj en la 17-a jarcento, i.a. Jungius, Alsted kaj Komenský.

4.2 Humanismo kaj filozofiaj lingvoj

La humanismo ĝenerale alportis revivigon de intereso pri la antikvaj civilizo, kulturo, filozofio kaj lingvoj, precipe pri la Latina. Oni konsciiĝis pri la grava rolo de la lingvo en klerigo kaj homa progreso, pri lingvo kiel instrumento de pensado kaj esprimformuligo de abstraktaĵoj. Ne temis ĉiam pri iu konkreta lingvo, sed pri ĝia filozofia imago, t. e. esprimo de la nocioj. Tiaj ideoj gvidis al prilaborigo de filozofiaj universalaj lingvoj, oni do povas paroli pri ekesto de interlingvistiko, tamen nur enkadre de la filozofio, ĉar lingvistiko kiel scienco ankoraŭ ne ekzistis. Sed samtempe oni konsciiĝis pri la bezono de internacilingva komunikado kaj teoriumis pri taŭga lingvo por tiu celo.

La Latinan en tiu ĉi funkcio favoris ekz. hispana klerulo Juan Luis Vives (1493-1540). Lia elstara pedagogia verko "De disciplinis libri XX" el la jaro 1531 entenas parton dediĉitan al lingvoinstruado (libro X), dirante: "La lingvo estas trezorejo de kleriĝo kaj instrumento de homa societo, estus do humane havi unu lingvon, kiun komune uzus ĉiuj nacioj... Tia lingvo estu agrabla, sed ankaŭ scienca kaj riĉa. Mi opinias taŭga la Latinan, certe el tiuj, kiujn jam homoj uzas." Krome li mencias propedeŭtikan valoron de la Latina, kies lernado estas ŝlosilo por multaj eŭropaj lingvoj. Kvankam la Latina estas lingvo malfacila, Vives opinias ĝin valora kaj pli facile lernebla helpe de taŭgaj metodoj. (Tiun parton de la verko de Vives detale citas kaj komentas alia humanisto, Jan Amos Komenský, cent jarojn poste, sed la filozofia koncepto de la lingvo gvidis lin al aprioraj kaj aposterioraj proponeroj ne nur pure latinaj.)

Signifoplenan rolon de la lingvo en evoluo de la sciencoj substrekis la filozofo Francis Bacon, kiu strebis pri klasifikado de nocioj kaj klarigo de naturaj fenomenoj sur empiria bazo. Lia koncepto de filozofia gramatiko implicas komparan sciencan studon de diversaj etnolingvoj kaj aplikon de iliaj avantaĝoj en universala lingvo. En sia verko "Novum Organon" el la jaro 1624 Bacon nomas la lingvon "vehiculum scientiae", t. e. "movigilo de la scienco".

Intereson pri lingvaj fenomenoj kaj pri stabiligo de naciaj lingvoj pruvas ankaŭ la tiam fondataj novepokaj sciencaj akademioj. La unua ekestis 1560 en Napoli, la dua 1575 en Madrid, en la unua duono de la 17-a jarcento sekvis du aliaj en Italio (Romo kaj Florenco), en Germanio (Weimar kaj Rostock), la Franca Akademio fondiĝis 1635 kaj la Reĝa Societo en Londono 1660. Precipe la Franca Akademio estas konata pro siaj gramatiko kaj vortaro de la Franca, la angla akademio serioze pritraktis planojn pri universala lingvo kaj pri plibonigo de lerneja sistemo inkluzive lingvoinstruadon. Oni ankaŭ strebis plikontaktigi Eŭropon kun aliaj kontinentoj, pli konataj iĝis orientaj lingvoj, precipe la Araba kaj la Ĉina, kies skribmaniero havas kvazaŭ pazigrafian funkcion. Kvankam la hipotezo pri "paradiza pralingvo" kaj pri la babilona lingvokonfuzo estis tre forta, la sciencistoj pli kaj pli konsciiĝis, ke la lingvoj ekestis per konvencio kaj ke do ne estas kontraŭnature (kaj kontraŭ diaj leĝoj) konstrui novan lingvon. Inter la aŭtoroj de tiatempaj interlingvaj projektoj estis do multaj religiuloj, (ankaŭ pro tio, ke la Eklezio precipe regis en la kampo de klerigo), kiel Mersenne, Le Maire, Dury, Urquhart, Wilkins, Kircher, Komenský k.a.

El la 17-a jarcento konserviĝis trideko da projektoj de internacia lingvo, plejparte pazigrafioj kaj filozofiaj lingvoj. Flanke de la empiria direkto lanĉita de Bacon disvolviĝis ankaŭ logike orientita

lingvokonstrua teorio. La angla episkopo John Wilkins intencis konstrui universalan lingvon jam en la jaro 1611. Tridek jarojn poste li publikigis pazigrafion "Mercury" kaj en la jaron 1668 datiĝas lia esejo pri filozofia lingvo. Li klasigis la nociojn en kvardek plu subdividitajn klasojn. Ĉiu membro de la koncerna klaso aŭ subklaso havis apartan grafemon kaj apartan sonon, ĉiu pli komplikan klaseron signis kombino de grafikaj signoj kaj sonoj. Siatempe oni alte taksis la projekton pro la preciza esprimo de semantikaj nuancoj, ekz. "De" = elemento, "Deb" = unua subklaso de divido de elementoj = fajro, "Deba" = parto de fajro = flamo. La verko de Wilkins estis pritraktita per la Reĝa Societo, kiu kunigis plurajn same eksperimentantajn filozofojn kun intereso pri universala lingvosistemo. Similan sistemon ellaboris ankaŭ George Dalgarno. Pazigrafion kiel bazon por kreado de universala lingvo proponis ankaŭ Johann Joachim Becher, aŭtoro de cifera steganografio el la jaro 1661. La libro havas du partojn, leksikonon (enhavantan esprimojn de nocioj per vortoj) kaj indekson (klarigantan gramatikajn nuancojn kaj fleksion). La bazo estas uzo de dek numeroj; la latina vortaro estas transskribita en 10 283 numeraj formuloj (ekz. bibere = 939, biblia = 940, viper = 9200, vir = 9201), en la dua parto estas 172 numeraj signoj por gramatikaĵoj, do la kazoj en singularo 1 ĝis 6, en pluralo 7 ĝis 12, verbaj tempindikoj 13 ĝis 117 ktp. En sian "lingvon" tradukis Becher eĉ kelkajn librojn.

La saman, do filozofie logikan orientiĝon de lingvokonstruado havis francaj filozofoj, nome la grupeto koncentrita ĉirkaŭ la abato Marin Mersenne, kiu diskutis pri eblo de lingvosistemo senpere speguliganta la esencon de nocioj kaj aĵoj. Pri la projekto de internacia lingvo, bazita sur la logika analizo de nocioj skribis la filozofo René Descartes al Mersenne en la jaro 1629. De tie oni do scias pri liaj filozofiaj lingvopostuloj: (1) ĉiuj ideoj estu analogaj al nocioj de numeroj, (2) oni serĉu simplajn ideojn, kombineblajn en pli komplikaj, (3) tiuj ĉi kombinoj iĝu analogaj al matematikaj operacioj, (4) la procedo de pritaksado estu mekanikigita kiel kalkulo, (5) la difinoj de ideoj estu kunigitaj kun vortoj. Laŭ Descartes kaj analogie laŭ aliaj samtempaj filozofoj eblas krei sisteman klasifikadon de nocioj kaj de ilia adekvata alnomigo. Tiamaniere ekestus la universala lingvo tute logika kaj ĝenerale valida, en kiu eĉ ne eblus erari, ĉar ĝi estus esprimo de "pura filozofio".

"Ars combinatoria" de Leibniz datiĝas en la jaro 1666. Ankaŭ li substrekas, ke la lingvo estu ilo de racio, ke la vortoj ne nur esprimu, sed ankaŭ kundifinu la ideojn kaj ebligu malkovri iliajn rilatojn simile kiel matematikaj formuloj. Laŭ lia "logika algebro" do la komplikaj nocioj estu kombinoj de la simplaj, same kiel numeroj, la kunigo de pensoj aŭ nocioj korespondu al la matematika multobligo, ilia diferenco al matematika divido ktp. Pli ol elĉerpigan filozofian klasifikadon de ĉiuj eblaj nocioj, kies kompleteblon Leibniz iom pridubis, li substrekis eblon starigi perfektan logikan sistemon de signoj. Kiel ekzemplon li priskribis sonkombinaĵojn korespondantajn al numeraj kombinaĵoj: naŭ bazaj numeroj estu esprimitaj per naŭ konsonantoj (b c d f g h l m n) kaj la ciferaĵoj (1, 10, 100, 1000, 10000) per vokaloj a, e, i, o, u, la numeroj do estus logike prononceblaj.

Iom apartan lokon meritas la interlingvistikaj proponoj de Jan Amos Komenský. Li estas konata antaŭ ĉio kiel pedagogo kaj aŭtoro de lingvaj lernolibroj kaj metodikoj, kiel "Orbis pictus" kaj "Methodus linguarum novissima". En sia verko "Via Lucis" el la jaro 1640 li skribas, ke por la disvastigo de la saĝeclumo bezonatas la lingvo ĉie komprenata. Tia estis por tiutempaj kleruloj la Latina, Komenský tamen ne rekomendis ĝin uzi pro jenaj kialoj: (1) internacia lingvo devas koncerni ĉiujn kaj esti komprenata de ĉiuj, dum la Latinan scipovas nur malmultaj, kiuj devis elspezi multan tempon por lerni ĝin, (2) internacia lingvo estu kuracilo kontraŭ konfuzo de nocioj, dum en la Latina, same kiel en naciaj lingvoj, ekzistas multaj sinonimoj, homonimoj, idiomaĵoj ktp., la vortoj do ne konformas al siaj nocioj. Necesas do lingvo malkomplika, klara kaj facile lernebla. La verko krome enhavas proponon fondi internacian sciencan akademion, kiu uzus por internaciaj rilatoj universalan lingvon. Tre originala estas grandskala koncepto de Komenský "plibonigi" la tutan homaron per taŭga eduko kaj klerigo. Tiu ĉi verko, titolita "De rerum humanarum emendatione consultatio catholica" (Ĝenerala konsulto pri la rebonigo de homaj aferoj) ekestis en la jaroj 1644-1666. La plano pri la grandskala homara eduko havas sep partojn, kies

kvina, tute organika parto estas t.n. "Panglottia", do "ĉieslingvo" — tio signifas, ke la lingvo estu parto de homara klerigo, la homo estu bone edukita ne nur morale, fake, arte kaj science, sed ankaŭ lingve. Kiel aspektu tia universala lingvo? Komenský esploras ambaŭ ĉefajn eblojn: aŭ lingvon tute aprioran-logikan, aŭ empirian, bazitan sur la plejparte latinlingva materialo. En Panglottia, sed ankaŭ en aliaj siaj verkoj Komenský pripensas avantaĝojn de multaj lingvoj, ekz. la Hebrea havas mallongajn radikojn, la Germana multajn eblojn de vortkunmetado, la Greka estas belsona ktp., sekve aperas ideo kunigi la avantaĝojn de ĉiuj konataj lingvoj en unu komuna. La ideoj de Komenský estas tre modernaj kaj multaj validas eĉ nun. Fakte, la postulo, ke la homo estu edukita kaj klerigita ne nur en ĉiuj bezonataj scioj kaj fakoj, sed ankaŭ lingve, ĝis nun ne trovis adekvatan realiĝon.

4.3 De humanismo ĝis Volapük

En tiu ĉi epoko, dum la 18-a kaj la 19-a jarcentoj, prepariĝis la transiro de la teoria filozofumado pri la lingvo al praktika konstruo de planlingvoj kaj al ilia vera realiĝo. Multaj laboroj pri la internacia/universala lingvo restis je nivelo de la filozofia, logika-matematika aliro, daŭre do aperadis proponoj pri la filozofiaj sistemoj similaj al tiu de Leibniz, estis elpensita aro da pazigrafioj, krome kuriozaĵoj kiel gestaj sistemoj aŭ muzika interlingvo. Aliflanke, la 18-a jarcento estas epoko de racionalismo, kiu pliprofundigas intereson pri sociaj bezonoj de la homo, reprezentitaj per la granda franca revolucio. Tiaj noblaj ideoj estis ligitaj kun la antaŭe jam aperinta plano de homara unuecigo kaj la tutmonda unulingveco.

Filozofi-sciencaj prikonsideroj pri la universala lingvo okupis kaj unuopajn sciencistojn, kaj kolektivojn. En la teorioj de logika klasifikado kaj nomumado de ideoj kaj kun ĝi kunigita universala lingvo (kiel tiu de Leibniz) kontinuus en la 18-a jarcento ekz. la germana fizikisto kaj filozofo J. H. Lambert, la angla orientalista William Jones, la franca sciencisto Condorcet, la germana fizikisto Kristian Berger, la franca fizikisto Ampère, la franca revoluciisto Delormel, la franca filozofo P. Laromiguière k.a.

Inter la kontraŭuloj de logikistoj oni nomu la francan geometron P. Maupertuis. Li opiniis pure filozofian sistemon de universala lingvo nesukcespova, ĉar ekzemple la filozofiaj perceptoj de Descartes estus jam fremdaj por Newton kaj Locke. Maupertuis tamen skribas, ke regula gramatiko kaj derivado ebligus krei lingvon multe pli facilan, ol estas ĉiuj etnolingvoj. Similmaniere M. Michaelis forte kritikis la penojn filozofie konstrui la lingvomaterialon kaj atingi la plenan sistemon de la ideoj. Pluajn praktikajn pripensojn ĉi-kampe aldonis la franca enciklopedisto Faiguet de Villeneuve kaj la liberalulo D. de Tracy.

Fine de la 17-a kaj en la 18-a jarcento oni amase entuziasmiĝis pri pazigrafioj sub influo de la ĉina skribsistemo, ekzemple la propono de Fréret komence de la 18-a jarcento imitis la Ĉinan mem. Aliaj aŭtoroj certis, ke eblas elpensi eĉ pli perfektan ideografian sistemon por la tuta mondo kaj precipe kunigi ĝin kun la filozofia sistemo de nocioj. Konataj pazigrafiaj projektoj estas ekzemple tiu de Besnier (1674), Solbrig (1726), Kálmár (1772), Hourwitz (1801), Matraya (1831), Grimm (1860) kaj kelkdeko da aliaj. Respektindan lokon en la historio de la pazigrafiaj eksperimentoj havas Joseph de Maimieux, en kies verko cetere aperas la termino "pazigrafio" la unuan fojon. Li fondis en Parizo specialan oficejon, organizantan pazigrafiajn kursojn. Li asertas, ke li ricevis e. sesmilon da leteroj el diversaj landoj, kiuj kuraĝigis la eldonadon de lia "Pasigraphie" (1797). Ĝia bazo estas logika klasifiko laŭ la dekdusigna sistemo, identa kun tiu de Leibniz. Sur granda pazigrafia vortaro "Grand Nomenclateur" kunlaboris eŭropaj sciencistoj de diversaj fakoj. Kvankam ĝi neniam publikiĝis, ĝi vekis ĝeneralan intereson pri la ideo de pazigrafioj kaj de la universala lingvo ĝenerale.

La universala lingvo estis pritraktata ankaŭ en ĝeneralaj sciencaj verkoj kaj vortaroj de la epoko,

ekzemple en "Dictionnaire de grammaire et de littérature" el 1789, en "Acta eruditorum" el 1732, en Encyclopédie du XIX. siècle de Larousse, en verkoj de Voltaire, de G. B. Vico, de lordo Monboddo, de J. Vater, de H. Kant, de A. Comte, ĉe la francaj enciklopediistoj, ekz. d'Alembert, Condillac kaj Changeux. La Rusa Sciencakademio kaj precipe la imperiestrino Katerina la Dua interesiĝis pri lingvoesploroj (ŝi korespondadis kun Voltaire). Intereson montris ankaŭ la Kopenhaga Sciencakademio, kiu en 1811 proponis premion pri sukcesa pazigrafio. En la verkoj de la utopiistoj preskaŭ ĉiam aperas la vizio de universala lingvo en la ideala socio (ĉe T. More, D. Vairrasse d'Allais, Ch. Fourier, E. Cabet, P. Mantegazza, H. Wells k.a.). En la 19-a jarcento okupiĝis pri universala lingvo ĉiam pli vastaj sociaj tavoloj. Kiel atestilo de kreskanta atento al la ideo de universala lingvo menciindas la Internacia Lingvista Societo, fondita en 1856 en Parizo. Ĝi elektis komitaton de 23 personoj kaj komisiis ĝin prilabori la projekton de apriora universala lingvo — jen la unua provo serĉi kolektivon solvon de tia tasko. La postuloj, kiujn la komitato starigis, estis: la lingvo devas esti klara, simpla facila, racia, logika, filozofia, eŭfonia, elasta, kapabla de plua evoluo. Sub tiuj ĉi kondiĉoj oni rifuzis akcepton de etnolingvoj kaj post esoroj de projektoj de Dalgarno, Wilkins, Faiguet de Villeneuve, Maimieux, Hourwitz, Vidal kaj similaj oni malakceptis ankaŭ tiujn. Poste oni pritraktis projektojn de siaj propraj membroj, favorante la proponon de Sotos Ochando. La sistemo de Sotos Ochando el la jaro 1845 reprezentas pluan paŝon en la praktika transformiĝo de filozofiaj kaj pazigrafiaj sistemoj. Li ellaboris lernolibrojn en la hispana kaj en la franca, publikigis pri ĝi artikolojn kaj zorgis pri ioma disvastiĝo.

Krome menciindas la franca historiisto Ch. de Brosses, kiu, skribinte profundan verkon pri la lingva mekanismo, rekomendas ne elpensadi artefaritan lingvon kaj speciale la lingvon ciferan, sed serĉi bazon de universala lingvo en naturaj lingvoj mem. Tiuj ideoj, tro kuraĝaj por sia tempo, montris la vojon al la plua etapo de interlingvistiko.

Apartan lokon en la epokaj proponoj havas tiu de Jean Sudre el la jaro 1817. Kiel konstrumaterialon li elektis sep bazajn muziknotojn, kies nomoj havas signifon de vortsilaboj. La lingvoprojekto nomata Solresol havas apriorice konstruitajn vortojn konsistantajn el kombino de unu ĝis kvin silaboj/notoj. La kombino el 1-2 notoj formas partikulojn kaj pronomojn (si = jes, do = ne, re = kaj, mi = aŭ...), la plej uzataj vortoj konsistas el tri notoj (doredo = tempo, doresol = monato, dorela = jaro...). Simile kiel en filozofiaj sistemoj, la vortoj dividiĝas je klasoj, ekz. la klaso "do" rilatas materialaĵojn kaj moralaĵojn, "re" familion kaj mastrumadon, "mi" homan agadon ktp. Kontraŭo esprimiĝas per renversita ordo de silaboj (misol = bono, solmi = malbono...), votspecoj estas formataj per akcento. Solresol eblas skribi, paroli, ludi per muzikilo, kanti, skribi per notoj. La kunlaboranto de Sudre, Vincent Gajevski, ellaboris por la lingvo manmovan sistemon por sudmutuloj. Sudre mem dum kvindekda jaroj vojaĝadis tra Francio kaj Britio, propagante sian sistemon kaj vekante atentemon de gravaj sciencistoj kaj organizaĵoj. Solresol estis apriorice konstruita, do malpli facila ol etnolingvoj, sed pli evoluinta ol pazigrafioj kaj filozofiaj sistemoj, havante eĉ paroleblon. Ĝi estis interesa kuriozaĵo survoje al pli praktike realigeblaj lingvoprojektoj.

La universale parolata latina lingvo jam cedadis sian lokon al eŭropaj naciaj lingvoj, kiuj, estinte vortare kaj gramatike kodigitaj, scipovis produkti propran literaturon eĉ sciencan kaj strebi pri internaciaj kontaktoj (precipe la Franca). Aperis tamen ideo, ke la latina bazo estus utila por la universala lingvo. Ĝi ne plu servis, kiel ĉe Komenský, kiel hazarda materialo por klarigi aposterioran metodon de lingvoplanado, sed kiel lingvistika elirfonto. (La vera florado de latindevenaj projektoj komencas tamen nur fine de la 19-a jarcento.) En la jaro 1732 eldoniĝis en Germanio la projekto, kies "fundamento estas deprenita de la latina lingvo, sed ĉio estas tiel ordigita, ke, foriginte ĉiujn malfacilaĵojn, oni respektas konstantan analogion sen iu ajn escepto", kiel asertas la aŭtoro. Li nomas sin "Carpophophilus" kaj sian proponon "konsilo pri universala skribmaniero" (scripturae oecumenicae consilium), montrante la konon de tiutempe florientaj pazigrafioj. Tamen temas ne pri nura pazigrafio, sed pri kompleta lingvo, ne tute aposteriore latinida, ĉar ekzemple la deklinacio okazas helpe de prepozicioj ha, he, ho, pluralo de substantivo

finiĝas per -im — do en la gramatiko observeblas certagrada aprioreco. Konatas eĉ specimeno de teksto. Temas pri la unua intenca pruvo faciligi la latinan lingvon por la internacia komunikado (pri la antaŭaj projektoj de Hildegardis von Bingen kaj de T. H. Folengo oni havas nesufiĉe da materialo por deklari, ke temis pri konscia latineco). Malpli detalaj estis projektoj de novlatinaj interlingvoj "Langue universelle" el 1837 kaj 1838 (Dénis), "Langue simplifiée" el 1856 (Parrat), proponoj de F. A. Gerber (el 1831, greko-latina), de Rössler el 1862, de Le Hir el 1867 k.a.

Samtempe kun la plisimpligo de la Latina aperis proponoj konstrui internacian lingvon surbaze de etnolingvoj. Konsiderinde forta estis la ondo slava, precipe la ideoj krei tutslavan lingvon. En la jaro 1666 kroata pastro Juraj Krizaniĉ kunmetis gramatikon de interslava literatura lingvo, detale ellaboritan sistemon surbaze de la Rusa kaj Serbokroata nomatan "Ruski jezik". "Opshti slovenski jezik" de S. Stratimiroviĉ el la jaro 1796 ankaŭ havas la Rusan kiel bazon, dum "Wspolny jezyk slowianski" de S. B. Linde en 1807 elektas kiel fonton la Polan. Blaz Kumerdey ellaboris projekton de gramatiko por komunslava lingvo surbaze de la Slovena en la jaro 1793, G. Sapel projekton de interslava skriba lingvo en 1790, aliaj aŭtoroj de la interslavaj proponoj estas slovako Ján Herkel, jugoslavo Matija Majar, Petar Tomiĉ, M. Ban, R. Razlag, K. Raiĉ, O. Caf k.a. Surbaze de la franca lingvo kun simpligita senescepta gramatiko kaj ortografio estis konstruita la projekto de J. Schipfer el la jaro 1839. Simpligitaj projektoj de la angla lingvo estis ellaboritaj laŭ kelkaj indikoj en 1711 ("projekto de korekto, perfektigo kaj ĝustigo de la angla lingvo" de D-ro Swift) kaj en 1787 (analogia projekto de Lawth) kaj en 1847 "World English" de James Bredshaw. En la jaro 1853 aperis en Berlino anonima projekto simpliganta la germanan lingvon por la rolo de lingvo universala "Weltdeutsch". Temis pri regulio de la ortografio, forigo de majuskloj ĉe substantivoj kaj simpligo de la gramatiko. Simila projekto de D-ro Lichtenstein aperis samjare. Ekzistis eĉ proponoj elekti kiel elirmaterialon por la internacia lingvo la Hungaran ("Világnyelv" de J. Bolyai en 1832).

En tiu ĉi situacio, do kun intereso de unuopuloj kaj kolektivoj pri internacia lingvo kaj dum kreskanta prestiĝo de lingvoj naciaj maturiĝis la kondiĉoj, en kiuj la vasta publiko pretus akcepti kaj uzi taŭgan planlingvon. La unua praktika pruvo de tio estis disvastiĝo de Volapük je la fino de la 19-a jarcento.

4.4 La planlingvistika periodo — de Volapük ĝis estanteco

En la novepoka lingvosituacio komencis nova periodo en 1879 kun la praktika uzo de Volapük. Ĝi estis la unua planlingvo, kiu havis konsiderinde grandan kvanton da uzantoj, ekestis do nova tipo de lingvokomunumo, uzanta krom siaj etnolingvoj ankaŭ konscie konstruitan planlingvon. Tiel eniras en la historion de lingvistiko nova fenomeno, nome normale funkcia racia lingvo, kiu estas nenies etnolingvo. Sociologie interesa estas, ke tia lingvo ne estas ligita al nacio kaj ŝtato.

La aŭtoro de Volapük estis katolika prelato Johann Martin Schleyer. Kvankam poligloto, li ne estis lingvisto, nek profunde interesiĝis pri planlingvistiko. La lingvo mem tamen reprezentis certan progreson kompare kun la ĝistiamaj projektoj. Ĝi estis lingvo de sinteza tipo, do kun logika, regula gramatiko kaj kun vortaro baziĝanta sur eŭropaj etnolingvoj, precipe ĝermanaj. Sed la aŭtoro ŝanĝis ilian fonetikan aspekton laŭ certaj reguloj: la radikoj devis esti laŭeble unusilabaj, ne enhavi "r", kombinaĵojn de pluraj konsonantoj ktp. La tradicio de logika lingvoprojektado, datiĝanta jam de la 17-a jarcento, respeguliĝas ankaŭ en la riĉeco de teorie eblaj lingvoformoj kaj derivaĵoj de la vortbazoj en Volapük (ĉ. 500 000). Tian en praktika uzo ne ofte bezonatan econ oni tradicie aprezadis, imagante ĉiam ian idealan lingvon, pli perfektan ol la etnolingvoj. La lingvo trovis plejmulton da uzantoj en germane parolantaj landoj kaj oni parte parolis germane eĉ dum la volapükistaj kongresoj. Tio tamen ne malaltigas sukceson de Volapük. Tiun ĉi kaŭzis antaŭ ĉio la organizita movado, nur parte la racieco de la lingvo mem. Ĝi certe estis iom pli facila por la Germanoj ol por aliaj etnoj, sed la vortprovizo estis eĉ por ili ne facile lernebla pro multaj fonetikaj ŝanĝoj. Menciinda estas la disvastigo de Volapük en Francio, kie ja ekzistis kaj interlingvistika

(filozofilingvistika) tradicio, kaj prestiĝo de la Franca, uzata eĉ en internaciaj kontaktoj. En Parizo aktivis August Kerckhoffs, kiu per bone skribitaj lernolibro kaj vortaro de Volapük multe kontribuis al ĝia disvastigo. Sed li mem multe pli substrekadis la praktikan valoron de la internacia lingvo (laŭeble uzebla por komercaj celoj) ol abstraktan riĉecon de lingvoformoj. Li klopodis, ke la lingvo estu pli simpla kaj natura, t. e. pli simila al eŭropaj etnolingvoj kaj tiusence li faris kelkajn lingvoŝanĝojn (ekzemple enkondukis analizan fleksion kaj firman vortordon). Tio kaŭzis konflikton kun la aŭtoro, opinianta la lingvon sia propraĵo kaj rezervante nur al si mem ĝian ŝanĝeblon. Ankaŭ la movadon li emis organizi laŭ la modelo de eklezia hierarkio. La volapükista komunumo disiĝis je du kontraŭaj fluoj: tiu de reformema Akademio, prezidata de Kerckhoffs, kaj tiu de la fidelaj Schleyer-istoj. Kvankam en la florperiodo laŭ iuj indikoj lernis Volapük 200 000 homoj en ĉ. 40 landoj de la tuta mondo, en la jaro de la morto de Schleyer, 1912, la movado jam estis disfalta. (Malgrandan signifon havis provo revivigi ĝin en la 30-aj jaroj.)

Kiel substrekas Kuznecov, la interlingvistika valoro de Volapük konsistas en la fakto, ke ĝi estis konstruita kiel logika lingvo, sed dum la praktika uzado reformita sur empiria bazo — jen la unua kazo de la nova, ĝis nun valida direkto. Tiel Volapük malfermis novan etapon de lingvoplanado — la realiĝinta planlingvo iĝis egalvalora al etnolingvoj kaj rajtas esti esplorata kiel tia. Konsekvence ekestas interlingvistiko kiel scienco esploranta ankaŭ realajn lingvojn, ne nur abstraktajn lingvoteoriojn, ĝi povas esti ne nur preskriba, sed ankaŭ priskriba lingvoscienco.

La Akademio de Volapük (Kadem Bevünetik Volapüka) fondiĝis dum la dua volapükista kongreso en 1887 "por direktado de la aferoj, rilatantaj la lingvokonstruon". Prezidata de August Kerckhoffs ĝis 1891, ĝi strebis pri lingvoreformoj. Nova direktoro de la Akademio, peterburga inĝeniero Waldemar Rosenberger, proponis plenan revizion de Volapük kaj prilaboron de nova lingvo. Li dissendis al akademianoj cirkulerojn kun proponoj de regula sistemo de aposteriora lingvo "Idiom Neutral". Kiel bazo estis metita la principo kontraŭa al la tuta strukturo de Volapük. La gramatiko subordiĝis al la vortaro, konstruita surbaze de eble plej internacia formo de lingvaj elementoj. Estis forigita la principo de unusilabeco de la radikoj, ili povis komenciĝi kaj finiĝi per iu ajn litero. Sekve la vortaro de Volapük estis anstataŭigita per la nova, apoganta sin multe je la latina lingvo. Principe konservitaj restis nur la reguloj de senescepteco, fonetika ortografio, neŝangeblo de vortradikoj kaj gramatikaj elementoj, vortderivado per afiksoj. La "polurigado" de la lingvo estis gvidata ankaŭ kun la nova direktoro A. Holmes (1898), aperis novaj proponoj, kiel "Lingua European" de Bonto van Bijlevelt, "Idiom Neutral reformed" de J. B. Pinth, "Idiom Neutral modifiket" de J. Meysmans, eĉ "Proyekt de Idiom Neutral reformed", de Rosenberger mem. Proponite de akademianoj, la proponoj restadis ĉiam en la stadio de (de la Akademio kontrolata) projekto, mankis al ili libera praktika evoluo. La pli malfruaj projektoj klare tendencis al novlatinismo. Tio respeguliĝis en la akcepto de latinido "Latino sine flexione", kiam la gvidadon de la Akademio transprenis en 1909 Giuseppe Peano.

La tendencoj de la volapükista akademio do, lingvistike rigardate, procedis de apriorismo al aposteriorismo, de aŭtonomismo al naturalismo. La postvolapükaj projektoj diferenciĝas fakte nur en la ŝtupo de aposteriorismo. Do, male al la lingvoj aŭtonomaj, kiuj ja havas aposterioran bazon, sed uzas ĝin laŭ propraj reguloj, naturalismaj sistemoj strebas la plej eble grandan similecon al etnolingvoj, enhavante kaj aposteriorajn morfemojn, kaj regulojn de ilia kombinado. Tre interesan lokon havas ĝuste Idiom Neutral, kies morfemoj estis pure aposterioraj, sed la reguloj de ilia funkciado aŭtonomaj. Oni reliefigas ĝuste la lokon de Idiom Neutral en la evoluo de lingvoplanado: Volapük estis sistemo finfarita, kiun oni devis akcepti kiel tuton, iuj postaj ŝanĝoj ne estis antaŭviditaj, ĝi estis konstruita surbaze de teorio kaj intuicio de la aŭtoro. Rosenberger nomis sian metodon "lingvoteknicismo" — unue estis serĉataj principoj de lingvofunkciado kaj poste estis kvazaŭ industrie konstruita lingvo. Tio iĝis ekzemplo de aplikata lingvoscienco, okupiĝanta pri konstruado de planlingvoj. Similaj streboj, komencintaj jam en la periodo de Descartes, plenumis Idiom Neutral en la periodo de socia funkciado de planlingvoj. Fakte, multaj sistemoj, sekvantaj

Idiom Neutral, pretendis esti science konstruitaj laŭ difinita teorio.

Sed preskaŭ samtempe kun Volapük (1889) aperis la ĝis nun plej sukcesa aŭtonomisma planlingvo "La Internacia Lingvo de D-ro Esperanto", al kies konstruo dediĉis Ludoviko Lazaro Zamenhof ĉ. dek jarojn. Ĝi ne estis "science konstruita", sed multe dependis de la intuicio de sia aŭtoro. Same kiel Volapük, Esperanto konsiderinde rapide disvastiĝis. Gravis tezoj, publikigitaj en ĝia unua lernolibro: Por ke la lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia. La internacia lingvo, same kiel iu ajn nacia lingvo, estu propraĵo publika, ne posedaĵo de la aŭtoro. Komencaj ideoj pri monda kaj lingva harmonio kaj unuiĝo mankis nek al la frua esperantista movado, al kiu cetere transiris parto de volapükistoj. Kontraŭe al Volapük, la vortprovizo de Esperanto, ĉerpanta el eŭropaj, ĉefe Romanaj lingvoj, nur malofte ŝanĝis la fonetikan aspekton de la vortradikoj. La racia kombineblo de radikoj kaj signifoplenaj afiksoj igis la lingvon simila al la aglutina tipo. Lernado ne postulas tiom grandan memorigon kiom ĉe Volapük. Krome, la lingvo memstare plu evoluas. Zamenhof mem komence opiniis ebla, ke ia "lingva akademio" decidu pri la lingvouzo, dum jardekoj tamen montriĝis, ke la interna lingvoevoluo okazas spontanee samkiel ĉe lingvoj etnaj. Tial oni nomas Esperanton lingvo aŭtonoma, t. e. uzanta aposterioran materialon, sed evoluiganta ĝin laŭ propraj leĝoj. Kaj Volapük, kaj Esperanto estis multfoje reformitaj. El preskaŭ dudeko da Esperanto-reformprojektoj praktike sukcesis nur Ido.

Dum la internacia ekspozicio en Parizo 1900 okazis kelkaj konferencoj pri internacia kompreniĝo. Iliaj delegitoj poste la 17-an de januaro 1901 fondis societon "Délégation pour l'adoption d'une langue universelle" (Delegacio por akcepto de universala lingvo), kiu propagis ideon de la internacia lingvo, prikonsiderante ĉiujn konatajn projektojn. En 1907 ĝi kunigis 310 diversajn organizojn kaj al ĝiaj principoj aliĝis 1250 sciencistoj, en la komitato estis 12 sciencistoj el diversaj landoj, sub gvido de profesoroj W. Ostwald, Baudoin de Courtenay kaj O. Jespersen.

Celo de la organizo estis elekti taŭgan helplingvon por internacia komunikado, kiu devis plenumi tri ĉefajn kondiĉojn: (1) servi al normalaj kontaktoj sociaj kaj merkataj, sed ankaŭ al la scienco, (2) esti alirebla al homoj malpli kleraj, kaj precipe al eŭropanoj, (3), esti neŭtrala, do ne etnolingvo. Tre grava ago de la Delegacio estis eldono de la ĝis nun valida publikaĵo "Histoire de la langue universelle" 1903 kaj de ĝia aldono "Les nouvelles langues internationales" 1907. Léopold Leau kaj Louis Couturat (sekretarioj de la delegacia komitato) analizis en tiu ĉi libro ĉiujn tiam alireblajn projektojn de la internacia lingvo. Informoj pri multaj el ili konserviĝis nur dank' al tiu pionira laboro (la lasta reeldono okazis 1979, eldonejo Iltis Hildesheim). Dum multaj pritraktadoj pri la akceptebla de iu el la ekzistantaj projektoj de internacia lingvo ŝajnis esti la plej akcepteblaj jenaj projektoj: Apoléma (Raoul de la Grasserie), sur la greka bazo, taŭga por teknika terminologio, The Master Language (Houghton), kun pure latina vortaro kaj angla gramatiko, Universal (Molenaar), latinida projekto kun ne tro ampleksa derivado, Idiom Neutral (Rosenberger), Idiom Neutral Reformed, poste Novilatin (Beerman), bazita sur la klasika Latina, alia novolatina Novilatin (Blondel), kaj finfine Esperanto, per kies defendo komisiis Zamenhof membron de la Delegacio L. Beaufront. La komitato findecidis akcepti Esperanton en reformita formo, kies proponon prezentis anonimulo sub la nomo Ido. Raporto de la delegacia komisiono el oktobro 1909 formuligis la aferon jene: "La komitato decidis, ke neniu el la lingvoj, proponitaj por esploro, povas esti akceptita "en bloc" kaj sen ŝanĝoj. Ĝi principe decidis akcepti Esperanton pro ĝia relativa perfekteco kaj pro multaj diversaj ebloj de ĝia uzado, kie ĝi jam pruvis sian taŭgecon, tamen oni faru certajn prilaborojn de ĝi. Tiujn faros la konstanta komisiono en la maniero menciita en konkludoj de la raporto de la delegaciaj sekretarioj kaj laŭ la projekto Ido, en konsento kun la lingvistika komisiono de esperantistoj."

En ĉiuj historiaj studoj pri Esperanto estas pli aŭ malpli objekte priskribata la konflikto, kiu okazis poste: evidentiĝis, ke la aŭtoroj de Ido estas Beaufront kaj Couturat, al kies flanko transiris parto da esperantistoj, kelkaj adeptoj de la projekto "Idiom Neutral" kaj aŭtoro de la projekto

"Langue Bleue" Léon Bollack.

Multaj membroj de la Delegacio tamen ne opiniis la komisionan decidon korekta, kvankam ili ne apartenis al fidelaj esperantistoj. En julio 1910 ili skribe protestis kontraŭ la libervola procedo de la komisiono, kiu en tiom grava afero ne prikonsideris opiniojn de ĉiuj membroj. Pro internaj konfliktoj estis la Delegacio voĉdone malfondita 16-10-1910. Samkiel kvardek jarojn pli malfrue la organizo IALA, kiu malfondiĝis post ekesto de Interlingua, estas la Delegacio nesufiĉe aprezata en la nuntempa interlingvistika literaturo kaj ĝi figuras nur kiel iniciinto de la projekto Ido. Tiu konvinko estas plifortigata per la fakto, ke la eksmembroj de la Delegacio, kiuj preferis Idon, kreis en 1911 "Uniono di l' Amiki di la Lingvo internacia", kies sekretario denove iĝis L. Couturat. Lia "Suite à l'histoire de la Délégation" (Couturat, L., 1911) enhavas multajn ĝenerale validajn ideojn — la planlingvo ne estu ŝtoniĝinta fosilio, sklave respektanta norman gramatikon kaj vortaron, sed ĝi nature evoluu kiel iu ajn viva lingvo, t. e. estu ŝanĝebla, "neniam perfekta, sed ĉiam perfektebla".

Esence la principoj de la strukturo de Ido estas la samaj kiel tiuj de Esperanto. Pli gravajn diferencojn enhavas ne pli ol 15% de la tuta gramatika kaj vortara materialo. Sed nek tiu ĉi naturalismen celanta reformo de Esperanto estis senriproĉa — aperis projektoj serĉantaj kompromison inter ambaŭ sistemoj. Jam en la jaro 1907 aperigis René de Saussure projekton "Antido" (daŭre plibonigaditan), en 1912 "Lingvo Kosmopolita", en 1919 "Esperantida", en 1925 "Nov.Esperanto". Aliaj kompromisaj projektoj estis ekz. "Romanizat" (R. Brandt), "Mez-voio" (Jamin), "Ispirantu" (A. Seidel), "Adjuvilo" (C. Colas) k.a.

Komparante la historion de la unuaj du realiĝintaj planlingvoj, kiuj ambaŭ trairis vicon da reformstreboj, oni konstatas, ke Volapük restis lingvo de unu generacio, ne travivinte sian krizon, dum Esperanto stabiliĝis eĉ dum la dua kaj pluaj generacioj, alproksimiĝante al natura mekanismo de etnolingvoj. La kompromisaj reformprojektoj restis nur en la teoria evoluetapo, tamen ili reprezentas novan interlingvistikan fenomenon. Cetere, la nombro de ĉiuspecaj planlingvaj projektoj konstante kreskis kaj kreskas — laŭ bibliografioj estas konata ĉ. okdeko da ili, kiuj aperis ĝis la jaro 1800. El la 19-a jarcento estas konataj ĉ. ducent kaj el la 20-a jarcento ĉ. kvincent projektoj. Tio klare montras, ke pli kaj pli grandaj internaciaj kontaktoj provokas ĉiam pli novajn eblojn de lingvistikaj solvoj. Tiurilate disvolviĝas kaj evoluas ankaŭ la scienco esploranta tiujn ĉi projektojn, precipe la funkciantajn. Ĝis la apero de Volapük kaj Esperanto estis tiu ĉi disciplino pli teoria kaj preskriba, ekde tiam ĝi, esplorante la praktikan uzon de la lingvo, povis uzi metodojn priskribajn kaj observi la lingvofenomenojn same kiel ĉe etnolingvoj, eĉ malkovradi iliajn internajn funkciajn principojn kaj leĝojn.

La ĉefa reformo de Esperanto, do tiu de Leau, Couturat kaj Beaufront, celis la vortkonstrudadon. Zamenhof volis uzi memstarajn, libervole kombineblajn morfemojn. Tio, laŭ la reformistoj, lezas principojn de analogio — tiujn ili ne volis klarigi, sed reformi. Funkciadon de la lingvo komencis esplori E. Boirac, kiu, kritikante reformojn de Couturat, klarigis, ke ŝajna lezado de analogi-principoj estas kaŭzata de gramatika karakterizo de morfemoj (substantivaj, adjektivaj, verbaj) de Esperanto. Tiun ĉi teorion plievoluigis René de Saussure, kiu malkovris sistemajn rilatojn en la planlingvo surbaze de Esperanto, li do estas nomata fondinto de esperantologio. Liaj principoj similis al tiuj de strukturalisma lingvistiko, reprezentata de lia frato Ferdinand de Saussure, kaj igis lin serĉi pli taŭgan reformon de Esperanto ol faris la idistoj. Li reliefigis principojn de neceso kaj sufiĉo en la funkciado de lingvo — la vorto devas havi ĉiujn elementojn necesajn por ĝia signifo, sed ne pli ol necesas, do ĝuste sufiĉan kvanton da ili. Tiel (en la historio de interlingvistiko la unuan fojon) klare vidiĝas diferenco inter projekto kaj funkcianta planlingvo : ĉe Zamenhof teorie eblas uzi morfemojn en iu ajn gramatika funkcio, sed en la praktike funkcianta lingvo ili estas uzataj laŭ gramatikaj klasoj, kio en la originala projekto ne estis antaŭvidita. Alivorte, la lingvo funkcias laŭ principoj, pri kiuj ne konsciiĝis eĉ la aŭtoro mem. Malkovrado, observado kaj priskribado de

tiaspeca funkciado de planlingvoj estas nova aplikadkampo de interlingvistiko. Alia grava punkto estas, ke la praktike uzata lingvo do devas havi internan logikon. Tiam la lingvistoj (ekz. Otto Jespersen) agnoskis en etnolingvoj, sed dubis pri ĝia ekzisto en planlingvoj. R. de Saussure do montris la analogion inter ambaŭ.

La nomo de iama volapükista akademio ŝanĝiĝis al "Akademio internasional de lingu universal". Kun la celo krei lingvon "cum applicatione de principio de internationalitate maximo ad vocabulario" prilaboris la Akademio komparajn studojn de la Latina, la Franca, la Hispana, la Itala, la Angla, la Germana kaj la Rusa, trovante 4500 radikojn, "que suffice pro konstrure lingua". Publikaĵoj de Peano en lia projekto Latino sine flexione tiam jam estis konataj en sciencaj rondoj. Oni povas imagi, ke el la komenca euforio de volapükistoj restis nur malmulto post la racia ekaktivado de la matematikisto Peano. La Akademio ricevis novan nomon, "Academia pro Interlingua" — do pri la internacia lingvo ĝenerale kaj en ĝia kadro publikiĝis aro da diversaj lingvoprojektoj. La statuto estis ŝanĝita tiel, ke oni donu "ingressu libero ad fautores de omni forma de lingua internationale", konservante la bazajn regulojn: (1) vortaro komuna al la Latina, la Angla, la Germana, la Hispana, la Franca, la Itala, la Portugala kaj la Rusa. (2) minimuma gramatiko (3) latina ortografio (4) fonetiko simila al la klasika Latina. Du gravaj punktoj de la statuto: Akademio progresigu internacian lingvon teorie kaj praktike. Ĉiu rajtas uzi sian preferatan formon de la interlingvo.

Oficiala organo de la Akademio iĝis la revuo "Schola et Vita", kiu publikigis multajn lingvistikajn kaj sociologiajn studojn. Al la membroj kaj kontribuantoj apartenis plejmulte akademianoj, profesoroj-natursciencistoj kaj matematikistoj, malpli multe filologoj kaj aŭtoroj de propraj projektoj. Plue kuracistoj, inĝenieroj, filozofoj. La konsisto facile klarigebla, se ni pripensas, ke la sciencistoj komence de nia jarcento ankoraŭ minimume pasive regis la Latinan kaj la latina terminologio estis uzata en natursciencoj kaj medicino.

Dénes Szilágyi el la budapeŝta universitato, unu el la funkciuloj de la akademio, fondis en 1928 "Officio Interlinguistico", organizon, kiu interesiĝis speciale pri la ĝenerala lingvistiko kaj planlingvistiko, kun la propra terminologia komisiono kaj kun la revuo "Communicationes". En 1931 estis eldonita kiel aldono de la revuo "Schola et Vita", la libro de Szilágyi pri interlingvistiko, kiu estas (post la verkoj de Jespersen "The international Language" el 1928 kaj "New Science — Interlinguistics" el 1930) unu el la pioniraj sciencaj verkoj pri tiu ĉi nova lingvosciencia fako kaj kiu enhavas ankaŭ siaspece unikan terminologian enciklopedieton, kie estas klarigataj diversaj interlingvistikaj doktrinoj, ekz. tiu de Jespersen, Liptay, Michaux, Miller, de Wahl, neolatinismo, anglolatinismo k.a.

Surbaze de la kritiko de Volapük kristaliĝis du ĉefaj tendencoj en lingvoplanado: la aŭtonomisma, reprezentata per la lingvoj kiel Esperanto, kaj la naturalisma, strebanta la plej eblan imiton de etnolingvoj. Ambaŭ principoj (aŭ: skoloj) baziĝas sur internaciismoj, do sur la vortformoj komunaj al eble plej multaj (eŭropaj) lingvoj. Dum la aŭtonomisma skolo transprenas nur la bazajn radikojn kaj kombinas ilin laŭ firmaj reguloj kun konstantaj afiksoj, la naturalismaj sistemoj akceptas fonetikajn ŝanĝojn tiel, kiel ili establiĝis en etnolingvoj, ĉefe surbaze de la latina tradicio. Ekesto de la naturalisma skolo estas ligita kun la nomo de aŭstra lingvisto Julius Lott, komence ankaŭ volapükisto. Li subtenadis ideon, ke la internacia lingvo estu esprimo de (eŭropa) homa civilizo, precipe okcidenta. Li pritaksas amplekson de ebla internacia vortaro je 10 000 radikoj, kiujn oni elektu kaj respektu por konstrui lingvon, oni do uzu materialon jam ekzistantan, ne inventante proprajn principojn. Projekto de Lott "Mundolingue" (1900) estas tipa ekzemplo de naturalisma planlingvo (ekz. personaj pronomoj: mi, tu, elo, ela, noi, voi, elos, elas, posesivoj mei, tei, sei, nostri, vostri..., konjunkcioj ergo, quia, etsi, ut, usque..., tipaj ŝanĝoj de vortradikoj kiel vider — vision, scriber — scriptor, mover — motion). Similajn tendencojn havas en la jaro 1892 aperinta "Langue catholique" de Alberto Liptay kaj poste pli ol cento da projektoj ekestintaj dum la 20-a

jarcento, ekzemple Linuga komun (Kürscher 1900), Linguum islianum (Henderson 1901), Panroman (Molenaar 1903), Romanal (Michaux 1909), Simplo (Ferranti 1911). La plej konataj reprezentantoj de la naturalisma skolo estas Occidental, Novial kaj Interlingua de IALA.

Occidental estas projekto de Edgar de Wahl, kiu interesiĝis unue pri Volapük, poste kunlaboris kun Zamenhof, celante reformi Esperanton, mallonge aliĝis al idistoj kaj konatiĝis kun projekto de Lott. Tiu ĉi kaptis lian intereson kaj li starigis kelkajn principojn de la konstruo de naturalismaj latinidoj: divido de verboj en statikaj kaj dinamikaj — laŭ tiu ĉi aspekto regule formiĝas derivaĵoj je -ence kaj -ion, kaj respektadon de latindevena supina formo por formado de deverbativoj — tiel li klarigis ŝajne neregulajn derivaĵojn en internaciaj vortoj, devenantaj aŭ de supino, aŭ de infinitivo. Sian propran sistemon, Occidental, li publikigis post reformproponoj de pluraj projektoj en la jaro 1922.

Novial (Nov International Auxiliary Language) estis verko de la konata kaj respektata lingvisto Otto Jespersen. Li bone konis kaj Esperanton, kaj Idon, apartenante al iliaj reformistoj. Li enmetis en sian lingvon ĉiujn "plibonigojn", kiujn li ne sukcesis enkonduki en Idon. Por havi la sistemon tre internacia li uzas ekzemple helpvortojn en la angla kaj dana formoj (let, mey, bli). La unuan version de Novial publikigis Jespersen en la jaro 1927, sed poste li estis preta fari en ĝi ŝanĝojn kaj diskuti la plej bonan formon kun aliaj aŭtoroj. Pro lia instigo alinomiĝis la idista revuo "Mondo" 1934 en "Novialiste" kaj publikiĝis en ĝi multe da diskutoj pri tiam ekzistantaj internaciaj lingvoj. Por la historio de interlingvistiko estas grava la junia numero el la jaro 1935, kiu publikigis modelan fakdiskuton inter Jespersen, defendanta Novial, kaj De Wahl, reprezentanta Occidental. La enkonduko estas skribita demokratie paralele en ambaŭ lingvoj, plue parolas ambaŭ aŭtoroj ĉiu en sia lingvo. Jam la fakto, ke ili senprobleme komprenis sin reciproke, pruvas, ke la naturalismaj latinidaj sistemoj estas tre similaj.

Ambaŭ aŭtoroj samopinias, ke kaj Occidental, kaj Novial apartenas al naturalismaj sistemoj, kontrastantaj kun pure aprioraj projektoj. Volapük estis jam bazita sur ekzistantaj lingvoj, sed ĝi ŝanĝis la vortojn nenature. Esperanton vidas ambaŭ aŭtoroj kiel progreson, sed ili riproĉas al ĝi la ĉeeston de elementoj neekzistantaj en realaj lingvoj, ekz. la fiksjajn finaĵojn de vortspecoj. Krome ili kritikis diakritikaĵojn. Plaĉas al ili zamenhofa universala prepozicio **je**, kiun ili ambaŭ transprenis en siajn sistemojn. Plue ili pripensas ĝeneralajn postulojn pri internacia lingvo, kiu estu komprenebla al ĉiuj Eŭropanoj sen granda antaŭpreparo kaj ne "fortimigu uzantojn per nekutimaj formoj", do ĝi havu naturan aspekton.

En fleksio ambaŭ sistemoj havas multajn komunajn elementojn, ekz. uzadon de la helpverbo **ha**. Plue oni diskutas pri tio, ĉu necesas la akuzativo, ekz. ĉe pronomoj. Jespersen proponas uzi la akuzativan finaĵon **-m** nur tie, kie povus ekesti miskompreno, en aliaj kazoj sufiĉas la fiksa vortordo. En plua diskuto temas pri posesivaj pronomoj, negacio (**ne** aŭ **non**, privativa afikso **in-**) kaj pri sintakso.

Estas interese sekvi opiniojn kaj argumentojn de ambaŭ aŭtoroj, kies celo samas. Ili kredas, ke la praktika uzo de ambaŭ sistemoj en internacia komunikado povas iompostiome gvidi al ilia alproksimiĝo kaj modifo tiel, ke eblos la natura sintezo de ambaŭ lingvoj. La fina solvo, kiel ili skribas, devas kuŝi ie en la mezo inter ambaŭ sistemoj, de kiuj la unua preferas regulecon kaj la dua volas lasi al la uzanto pli grandan realigeblon. Oni aldonu, ke kaj Jespersen kaj De Wahl aktivis en internacia lingvistika organizaĵo IALA, kiu celis tiatipan sintezon. Precipe en la fakaj diskutoj devus ja esti la ĉefa punkto de la estonta solvo de internacia lingva komunikado, por kiu la internaciaj lingvoj preparis taŭgan materian bazon.

Limo de la 19-a kaj la 20-a jarcento do alportis aron da projektoj de la naturalisma skolo sur latinida bazo. Pri la problemaro de internaciaj lingvoj ekinteresiĝis pluraj lingvistoj kaj iliaj organizoj. En 1903 publikigis Couturat kaj Leau "Histoire de la langue universelle", analizantan pli ol sesdekon

da projektoj de internaciaj lingvoj. Lingva komisiono de "American Philosophical Society" strarigis postulojn por kreado de internacia lingvo surbaze de "ariaj" lingvoj, kun fonetika ortografio (latina), kun internaciaj vortradikoj, kun facila gramatiko kaj prononco. Gravecon de internacia lingvo agnoskis "International Research Council" kun sidejo en Bruselo kaj "British Association for the Advancement of Science". En tiu situacio ekestis komence de la dudekaj jaroj la internacia interlingvistika organizo "International Auxiliary Language Association" (IALA).

Ideo krei internacian lingvistan organizon, kiu pritraktus ekskluzive nur problemojn de la internacia kompreniĝo, ekestis en la laborgrupo de profesoro Ostwald en la universitato de Leipzig. Granda materia helpo de Usonanino A. Vanderbilt-Morris ebligis vastan profesian sciencesploran laboron, kies koncepto aperis en la programpropono 1924.

IALA unue proponis akcepton aŭ modifon de iu el la ekzistantaj internaciaj lingvoj inkluzive de la Latina, poste konstruon de la nova lingvo sur scienca bazo. Por la akceptota lingvo oni uzas terminon "sintetika". Celoj de la ekestanta interlingvistika movado estas difinitaj jene: "Alproprigo (establishment) de la sintetika lingvo kiel la dua lingvo por la tuta mondo, kiel la komuna rimedo pro interŝanĝo de informoj kaj disvastigo de scioj inter homoj kun diversaj gepatraj lingvoj". La ĉefaj taskoj poste estas:

- Trastudi la demandojn koncernantajn enkondukon de la internacia lingvo
- Igi oficialajn registarajn lokojn agnoski la gravecon de akcepto de la internacia lingvo kaj starigi internacian komisionon por ĝia faka pritakso
- Helpi ĉiujn organizojn, kiuj interesiĝas pri internacia lingvo.

Internaj organoj de IALA, ĉefe ĝiaj lingva komisiono kaj akademio, planis okupiĝi pri lingvistika esploro (lingvaj studoj, eksperimentoj, komparo de sintetikaj lingvoj ktp.) Bazaj kriterioj por elekto de la internacia lingvo estis:

- pli facila lerneblo ol ĉe etnaj lingvoj
- unusignife difinita strukturo kaj taŭga vortaro
- aro da ekzistantaj uzantoj.

La kompara analizo estis farota pere de tradukoj de tekstoj el diversaj fakoj kaj kampoj (tekniko, beletro, poezio, ekonomio kaj organizado k.a.). Surbaze de tiuj tradukoj devis ekesti komparo de alfabetoj, fonetiko, vortspecoj, sintaksto, vortkreado, taŭgeco por reprodukta tekniko ktp.

La periodo 1924-1933 estis destinita al analizo de ekzistantaj internaciaj lingvoj. La ĉefa esplorcentro estis Liverpool, kie agis la esplordirektoro Prof. Collinson, kun li kunlaboris Prof. Jespersen el la kopenhaga universitato kaj Prof. Sapir el la ĉikaga universitato. Ekde 1925 oni eksperimente instruis Esperanton kiel propedeŭtikaĵon por la studado de fremdlingvoj en Usono, ekde 1928 ankaŭ en Eŭropo kunlabore kun Rousseau-instituto en Ĝenevo.

Grava estas la publikiga laboro de IALA, ekz. la studoj de Prof. Sapir pri la funkcio de internaciaj lingvoj, serio "Language Learning" de E. L. Thorndike kaj kontribuoj al revuoj "Romanic Review", "Modern Language Journal", "Current History". Serio "Foundation of Language", en kiun kontribuadis ĉefe profesoroj Collinson, Shenton kaj Swadesh, estas interesa pro sia antropologia koncepto de la lingvo kaj pro analizo de specifaj aspektoj de diversaj lingvoj.

IALA havas meritojn pri pritrakto de interlingvistika problemaro dum diversaj internaciaj kongresoj

kaj simpozioj. Dum la UEA kongreso en Ĝenevo 1925 estis al la komuna diskuto invititaj ankaŭ reprezentantoj de la reforma ondo, precipe de la lingvo Ido, por komune analizi avantaĝojn kaj mankojn de ambaŭ sistemoj. 1930 okazis en Ĝenevo internacia lingvistika konferenco por pritrakti taŭgecon de la plej gravaj ses internaciaj lingvoj, defendataj de iliaj reprezentantoj : Esperanto — Stojan, Ido — Auerbach, Nov Esperanto — Saussure, Occidental — De Wahl, Novial — Jespersen, Latino sine flexione — Peano. Ĉeestis pluraj famaj lingvistoj, ekz. A. Debrunner, O. Funke, E. Hermann, Ch. Bally, S. Karcevskij, A. Sècheyaye. La originala celo de organizantoj estis krei surbaze de prezentitaj kaj analizitaj lingvoj certan kompromison, kio tamen ne okazis — montriĝis neceso de pluaj esploroj.

Reprezentantoj de IALA ĉeestis ankaŭ internacian lingvistikan kongreson en Ĝenevo 1931, por kiu ili havis preparitan detalan analizon de esploritaj internaciaj lingvoj kaj krome komparajn studojn de la Angla, la Germana, la Rusa, la Franca, la Hispana, la Itala kaj la Latina. En tri apartaj partoj estis prilaboritaj nocioj kaj iliaj koncernaj esprimoj, vortfarado, derivado, frazeologio, sintakso, vortprovizo, gramatiko, skemoj de lingvostrukturoj kaj aplikado de la rezultoj al internacia lingvo. Tiuj ĉi studoj estis helpontaj ellabori superrigardon de la strukturaj nocioj komunaj al ĉiuj analizitaj lingvoj. La skemoj estis konstruitaj surbaze de esprimoj, kiuj estas en ĉiuj pritrakitaj lingvoj komunaj por esprimi la necesajn nociojn.

Ilustrantaj specimenoj de tiuj lingvoj poste povus esti teorie reguligitaj laŭ starigitaj skemoj kaj tiel ekestus ilia komuna modelo. Elstaraj lingvistoj estis demanditaj jene: Kia estas via opinio pri akcepto de la artefarita efarita lingvo kiel internacia helplingvo? La plejparto de demanditoj reagis pozitive.

La laboron kontinuigis lingvista kongreso en Romo 1933. Komparesploron subtenis 38 profesoroj el 28 universitatoj en 13 landoj, kiuj subskribis la finan raporton. Aperis nomoj kiel M. Cohen, A. Debrunner, S. Ishikawa, V. Mathesius, M. Migliorini, N. S. Trubeckoj, B. Collinder, V. Pisani, E. Otto k.a.

Dum 1933-1936 klare kristaliĝis la ideo krei tute novan internacian lingvon. La komparaj studoj de ekzistantaj naturalismaj projektoj bedaŭrinde ne alportis la atenditan rezulton. Esplordirektoro iĝis C. E. Stillman. Principa postulo por la nova lingvo estis ĝia normigo laŭ internacieco de vortradikoj enhavataj en Standard Average European. IALA organizis unuopajn konferencojn por solvi tiajn taskojn, sed ĝi ankaŭ skribe diskutigis elstarajn mondajn lingvistojn. La taskoj por la koncerna periodo estis:

- Krei sintezon de la ekzistantaj internaciaj lingvoj
- Igi la mondan publikon konsciiĝi pri bezono de la internacia lingvo
- Kunlaborigi organizojn interesitajn pri la problemoj kaj reprezentantojn de unuopaj sistemoj.

Ĝis 1936 oni publikigis 35 verkojn en serio de komparaj lingvistikaj studoj. Samjare okazis lingvistika konferenco en Bruselo, pritraktanta kriteriojn de la postulata lingvo. Tiuj kriterioj (lingvistikaj, pedagogiaj, sociaj) dividiĝis en 28 punktoj, el kiuj la plej gravaj estis:

- Modifita apriorismo en gramatiko kaj apriorismo en la vortprovizo, kie estu reliefigitaj latinaj radikoj
- Strukture analizaj postuloj (neniu el la esploriaj lingvoj enhavas ekstreman analizecon tipan ekz. por la Ĉina)
- Logiko, reguleco kaj aŭtonomeco de la strukturo (neniu lingvo estas strikte logika kaj regula)
- Belsoneco kaj facila prononco (fonetika prononcmaniero)

- Uzeblo en reprodukta tekniko
- Taŭga alfabeto kaj ortografio
- Elekto de unusignifaj vortradikoj kaj ilia bona kombineblo
- Facila fleksio
- Taŭgeco por tradukoj

En 1938 aktive laboris du lingvoesploristaj grupoj: krom tiu en Liverpool, gvidata de profesoroj Collinson kaj Stillmann ankaŭ la novjorka sub la gvido de Helen S. Eaton kaj Alexander Gode. La ĉefa tasko, krom kontinuado de eksperimenta instruado de Esperanto en usonaj mezlernejoj, estis kreado de vortaro kun baza nombro de 2000 radikoj, maksimume plenumantaj la postulon de internacieco. La vortara laboro poste iĝis la ĉefa laborprogramo de IALA post 1939, kiam ĝia sidejo translokiĝis al Novjorko. En la sama jaro ankoraŭ okazis kvar konferencoj de la IALA-komitato kun reprezentantoj de la universitato en Stanford kaj de la internaciaj lingvoj Esperanto, Ido, Occidental, Latino sine flexione kaj Novial. Samtempe estis prilaboritaj frekvencaj vortaroj de naciaj lingvoj (la Angla, la Franca, la Germana, la Hispana) kaj lingvistikaj studoj pri la plej uzataj afiksoj.

En 1939 estis finitaj pedagogiaj eksperimentoj kaj pritraktitaj iliaj rezultoj. Pruviĝis, ke la studado de Esperanto plifaciligas orientiĝon kaj postan komprenon de la poste intruataj lingvoj franca kaj latina.

Ĝis 1945 estis faritaj la plej esencaj laboroj sur la internacia vortaro. Kiel kontrollingvoj servis la Angla, la Franca, la Itala, la Portugala kaj la Hispana. La elektita vorto devis ekzisti en minimume tri el tiuj kvin lingvoj. Ankaŭ afiksoj estis elektitaj el latinidaj lingvoj kaj normigitaj laŭ ĝeneralaj reguloj. Uzado de la vortaro ebligis eltrovi gramatikajn regulojn, ekz. la pluralan substantivan finaĵon -s, naturan genron, derivadon de adverboj per la sufikso -mente, unuvortecon de verbaj formoj. Tiamaniere ekestis kvar tre similaj variantoj de la internacia lingvo, kies specimenoj estis kune kun la detalaj demandiloj senditaj al trimil lingvistoj en Eŭropo kaj Ameriko. Post la voĉdonado akiris la plejparton da voĉoj du naturalismaj variantoj, surbaze de kiuj la nova direktoro de IALA Alexander Gode ellaboris la finan version, nomatan Interlingua. En la jaro 1951 publikiĝis la gramatiko kaj "Interlingua-English Dictionary", en kies antaŭparolo Gode klarigis la kialojn kaj metodojn de la konstruo de Interlingua surbaze de komunaj elementoj de la okcidenteŭropa civilizo.

Per publikigo de Interlingua finiĝas la laboro de IALA. Ĝi estis malfondita en 1953. Malfavoraj kondiĉoj, kaŭzita per usonaj-eŭropaj rilatoj post la dua mondmilito, malebligis publikigon de la rezultoj de IALA-esploroj. La arĥivo de IALA, kiu konserviĝis nur parte, onidire enhavas unikan kolekton de prototipoj de internaciaj lingvoj, multon da gravaj interlingvistikaj studoj kaj modele prilaboritan dokumentaron. La kompleta materialo certe estus valora helpo por plua disvolviĝo de interlingvistiko. Multaj problemoj de scienca pritrakto de internaciaj lingvoj, kiuj nuntempe estas enhavo de sciencaj konferencoj, estis pritraktataj en IALA jam antaŭ kvindek da jaroj. IALA ĉiukaze montris vojon, kiun devas iri hodiaŭaj lingvistoj, se ili volas serioze kontribui al la solvo de internacikomprenigaj problemoj.

4.5 Nuntempa stato de interlingvistiko

Laŭ la plej aktuala bibliografia verko (Duliĉenko, 1990) ĝis la jaro 1973 ekzistis 912 diversdetale prilaboritaj planlingvaj sistemoj (inkluzive de iliaj variantoj kaj reformoj). Dum la lastaj tridek jaroj estis proponita trideko da aliaj sistemoj (ekzemple Neoĥispano, Uni, Glosa, Vikto, Adli, Uropi, Ya-za Huo, Unitario, Vorlin, Voksigid, Jigwa, Hipersigno), oni do povas supozi, ke milo da proponoj de internacilingvaj sistemoj reale ekzistas.

Se oni pli detale observas la konstruprincipojn de lastatempe aperintaj kaj la plej sukcesintaj planlingvoj, tiam klaras, ke la naturalisma skolo, reprezentata per latinidaj sistemoj, atingis la plej grandan kvanton da reprezentantoj. La plej sukcesaj tiatipaj sistemoj estis (post naturalismen celantaj Ido kaj Novial) Latino sine flexione, Occidental kaj Interlingua de IALA. La laste menciita estas praktike la ununura hodiaŭ funkcia naturalisma sistemo kaj samtempe la plej latinida el la menciitaj. Latinida fundamento estas la plej ŝatata fono eĉ de la plej novaj projektoj. Ekzemple en la jaro 1994 aperis "Lingua Románica" de Eusebes, ĉerpanta ĉefe el la hispana kaj itala lingvoj, kun vasta kaj komplika verbosistemo. La aŭtoro tamen opinias, ke la latina kaj greka vortprovizoj estas idealaj por internacia lingvo. Interese estas, ke similan opinion havas eĉ neeŭropanoj, ekz. la projekto Pacea el la jaro 1983 estas verko de japana eksexperantisto Yosio Obana. Li transprenas latinidan vortprovizon kaj adaptas prononcon kaj gramatikon al la bezonoj de la orientazianoj.

La naturalisma skolo do favoras antikvan vortmaterialon kaj kulturon, kiu respeguliĝas en okcidenteŭropa civilizo. Laŭ opinio de Jespersen, la eŭropa civilizo havas respektindajn tradiciojn kaj la strukturo de okcidenteŭropa lingvo estas plene komprenebla, havante tiel komunikan kaj pedagogian valoron. La planlingvistiko do serĉu latinajn elementojn (vortarajn, fleksiajn ktp.) en okcidentaj lingvoj por trovi taŭgan prototipon, krome ĝi serĉu komunajn elementojn en nuntempa aspekto de eŭropaj lingvoj.

La naturalismaj sistemoj do havas latinan alfabeton, strebante alproksimiĝi al etnolingvoj — jen al la Franca (Idiom Neutral: eksepsion, nasion. Novial: seremonie, sone), jen al la Germana (Universal: seduzer, fazer, vinzer). De Wahl dubas pri eblo de universala fonetiko — la tendencoj estas diversaj: c /k, ts/, g /g, ĵ/, y/i, j/, qu /kv, kw, k/, latindependaj sistemoj kiel Latino sine flexione enhavas *th, ph, ae, oe*. Morfologio estas ĝenerale reduktita, baziĝanta sur racionaligo de latina kaj angla strukturoj, kiujn oni klopodas sintezi. La latina fleksio estas konservita tre malofte (ekz. en *Linguum Islianum*). Konjugacio estas aŭ analiza kun helpverboj (ekz. Occidental *yo fe amar, yo va amar*) aŭ sintetika (ekz. Interlingua *io amava, io amara*), Latino sine flexione eĉ strebas anstataŭigi fleksion per kunteksto. Gramatika genro plejparte uzas finaĵon *-o* por maskulino kaj *-a* por feminino (filio — filia), foje ekzistas neŭtrala genro (lingue, comercie), foje estas genro neglektata (lingua, comercio). Nur malmultaj projektoj (ekz. Neolatio) konservas genron kiel gramatikan kategorion. La artikolo havadas neŝanĝeblan formon (*le, li*), la adjektivo kutime estas sen finaĵo.

"Internaciaj" vortoj formas ŝajne regulajn familiojn. Ekzistas multaj afiksoj kun ne klare difinita senco, aŭ la sama radiko havas diversajn formojn. Oni aŭ akceptas ilin kiel memstarajn (Universal: *infant — infanz, solver — solution*), aŭ klopodas regularigi ilin (Idiom Neutral: *invent-ar, invention, invent-ator*). De Wahl atingis ĉ. 95% regulecon dum sia sintezo de vortoj el internaciaj vortfamilioj, kreante deverbativojn el participo prezenca ĉe t.n. statikaj verboj kaj el radiko/supino ĉe t.n. dinamikaj verboj. Tamen kelkaj aŭtoroj malaprobas lian regulon, transprenante originalajn latinajn formojn, do ekz. en Interlingua aperas radikoj kiel *fac/fact/fic/fect* (*facer, facto, eficiente, efective*). La vortprovizo estas transprenata plej ofte el Romanaj lingvoj, tamen strebante pri internacieco ofte aperas kiel "kontrollingvoj" ankaŭ la ĝermanaj, malofte slavaj lingvoj. Estas mirinde, kiom la naturalismaj sistemoj similas en sia vortaro — André Martinet diras pri ili, ke ili estas dialektoj de la sama lingvo, diferenciĝantaj nur per gramatika saŭco. Ili plejmulte baziĝas sur "Standard Average European" (termino devenanta de Benjamin Lee Whorf por indiki komunan eŭropecan vortprovizon).

Interesan ekzemplon de revivigo de la antikva grekeca tradicio reprezentas la projekto "Glosa". La originala versio (sub la nomo Interglossa) de Lancelot Hogben datiĝas je 1943. Pli ol kvardek jarojn poste reprenis kaj modifis lian projekton Ron Clark kaj Wendy Ashby. La baza vortaro havas mil vortojn origine latinajn kaj grekajn, kiuj estas uzataj en internacia scienca terminologio. La ortografio estas fonetika kaj la gramatiko praktike ne ekzistas — numeroj, tempoj, komparado kaj aliaj gramatikaĵoj estas anstataŭigitaj per neŝanĝeblaj apartaj vortoj, ekzemple pluralo per la vorto

plu, estanteco *pa*, futuro *fu*, daŭro *du*. Kiel asertas la aktualaj adeptoj, Glosa estas ideala por enkomputiligo, uzebla en ĉiuspeca terminologio kaj en stenografio. Krome ĝi instrue atentigas al antikva kulturo kiel bazo de eŭropa civilizo, havante latinecan kaj grekecan version (Latino-Glosa kaj Heleni-Glosa). Glosa, same kiel Interlingua, Latino sine flexione kaj similaj projektoj estas certe facila por ĉiuj, kiuj jam lernis la Latinan, eventuale la Grekan, ĝi do taŭgas por sciencistoj kaj ĝenerale por kleraj homoj. Oni ofte riproĉas al koncernaj aŭtoroj, ke ili apenaŭ pensas pri interkompreniĝo de popolamasoj.

La alia sukcesplena skolo en nuntempa interlingvistiko, aŭtonomisma, estas reprezentata per la Internacia Lingvo de D-ro Esperanto. Ĉar ĝi estas la plej disvastigita planlingvo, estas kun ĝi ligita la plejmulto da interlingvistika fakliteraturo — el la interlingvistika literaturo, skribita en planlingvoj, estas ĉ. 95% en Esperanto. Multaj lingvistoj (ekz. Detlev Blanke) opinias ĝin la ununura funkcia *planlingvo*, konsiderante la aliajn realiĝintajn projektojn *semiplanlingvoj*, sekve interlingvistiko ricevas novan specialan branĉon, esperantologion. Esperantologio profunde studas ne nur la strukturon kaj lingvofunkciadon de Esperanto, sed ankaŭ ĝiajn aplikadkampojn, psikologian kaj socian bazon. Ekzistas krome asertoj, ke historio de ĉiu planlingvo estas praktike reprezentata per historio de ĝia movado, do eĉ Esperanto-movado estas vaste studata kaj esplorata. Esperantologio estas cetere instruata kaj esplorata ĉie, kie oni serioze pritraktas interlingvistikon kiel sciencan disciplinon, ĉu en altlernejoj, ĉu en sciencaj institucioj.

Kiel ekzemplo servu la interlingvistika fako ĉe filologia fakultato en Eötvös Loránd universitato en Budapeŝto. Interlingvistikon enkondukis tien profesoro István Szerdahelyi (1924 -1987) en la jaro 1966. Esperanto iĝis unu el la filologiaj studfakoj kaj multaj studentoj specialiĝis en ĝi, skribis siajn diplomlaborojn kaj partoprenadis en internaciaj sciencaj studentaj seminarioj. La fako organizis interlingvistikan kongreson en la jaro 1978, kie partoprenis fakuloj el Eŭropo, Azio kaj Ameriko. La kongreso havis plurajn laborlingvojn kaj vastan temaron pri multaj aspektoj de plurlingveco, lingvoplanado, historio de planlingvoj ktp. Eldoniĝis ĝia prelegkolekto "Miscellanea interlinguistica". Prof. Szerdahelyi estis konata kiel fakulo pri aplikata lingvistiko kaj publikigis multajn artikolojn pri teoria kaj praktika valoroj de planlingvoj — validas lia aserto, ke la realiĝinta planlingva sistemo reale funkcias kiel iu ajn lingvo. Lia libro "Balbelturo kaj mondlingvo" estis publikigita (nur hungarlingve) en 1978. Post lia morto transprenis la aktivecon Zsuzsa Varga-Haszonits kaj Ilona Koutny. Pli ol cent studentoj finis siajn studojn pri esperantologio, okdeko da ili diplomiĝis, kelkaj eĉ doktoriĝis pri ĝi. Inter la studobjektoj figuras priskriba gramatiko, aplikata lingvistiko, metodiko, interlingvistiko, lingvopedagogio kaj movadhistorio. Krom la kvarjara normala studado ekzistas postdiploma trijara kurso de esperantologio, ekde 1990 ankaŭ triajra internacia interlingvistika kurso en koresponda formo. Enkadre de interlingvistikaj specialiĝoj establiĝis en la menciita fakultata fako komputillingvistiko, precipe parolsintezo, ellaborita por Esperanto kiel sistemo "Esparol".

En la sepdekaj kaj okdekaj jaroj aktivis por interlingvistiko studentoj de la varsovia universitato. La intereso pri Esperanto plilarĝiĝis en agadon ĝenerale interlingvistikan. Internaciaj studentaj seminarioj havis konsiderinde altan nivelon. Ilin partoprenis kun prelegoj kaj diskutoj ne nur studentoj el la tuta Eŭropo, sed ankaŭ invititaj fakuloj el sciencaj institutoj kaj eksterlandaj universitatoj. La ĉeforganizanto Ryszard Rokicki redaktadis bultenon "Informilo por interlingvistoj", kiu alportis raportojn pri interlingvistikaj seminarioj kaj esploroj en la mondo, recenzojn de novaj publikaĵoj, anoncojn pri fakaj okazaĵoj k.a.

En la iama GDR havis interlingvistiko kaj esperantologio specialan apogon de la ŝtata kultura organizo. Speciala fakgrupo ekzistis tie ekde la jaro 1970. Gravaj estis pluraj internaciaj seminarioj (en Bad Saarow, en Ahrenshoop, en Berlino) pri aplikado de planlingvoj en scienco kaj tekniko, kiujn partoprenadis eĉ neesperantistaj sciencistoj. En la jaro 1987 estis interlingvistiko pritraktata dum la monda filologia kongreso en Berlino — la duan fojon en la historio de tiuj ĉi kongresoj post

la aktivado de IALA en Ĝenevo 1931. En 1991 transformiĝis la grupo en "Gesellschaft für Interlinguistik", kiu sub gvido de Detlev Blanke kontinuas la agadon kun celo popularigi interlingvistikajn problemojn kaj konojn, subtenante esploron kaj instruadon en la koncerna kampo. Al ĝiaj intereskampoj apartenas ĝeneralaj problemoj de internacia lingvokomunikado, lingvoplanado, esploro de ekonomiaj, politikaj, historiaj kaj similaj aspektoj de interlingvistiko, samkiel esperantologiaj studoj kaj instruado. Ĝi eldonas bultenon "Interlinguistische Informationen" kun sciigoj pri novaperintaj publikaĵoj kaj fakaj kunvenoj.

En la iama Sovetunio havas interlingvistiko longan tradicion. Post Ernst Drezen, aŭtoro de detala "Historio de la mondlingvo" (la 1-a eldono 1927, la kvara, komentita kaj aktualigita ĉe eldonejo Progreso 1991) havas meritojn E. A. Bokarjov, kiu enkondukis interlingvistikon en Sovetunio jam en la jaro 1956 kaj en 1963 kunfondis specialan komisionon ĉe akademio de sciencoj. La aktivecon transprenis en 1972 M. J. Isajev. Elektro el interesaj prelegoj kaj kontribuoj el sciencaj seminarioj eldoniĝis en 1976 sub titolo "Problemy interlingvistiki". Lastatempe aperis serio da broŝuroj pri diversaj interlingvistikaj temoj. En 1987 skribis S. N. Kuznecov monografion "Teoretiĉeskije osnovy interlingvistiki" (Teoriaj bazoj de interlingvistiko) taŭgan kiel lernolibro. Menciindas laboro de profesoro Alexander Duliĉenko en universitato en Tartu, kie eldoniĝas seria kolekto de sciencaj artikoloj "Interlinguistica Tartuensis". La bibliografio "Mejdunarodnye vspomogatelnye jazyki" (Internaciaj helplingvoj) el la jaro 1990 estis jam plurfoje menciita.

Interlingvistikon ligite kun esperantologio enkondukis kiel studfakon en la jaro 1994 la lingvistika fako de universitato en Torino (Prof. Pennacchietti), krome ekzistas diversaj universitataj kursoj, kie estas interlingvistiko prezentata ligite kun lingvistikaj studoj (universitatoj en Berlin, Frankfurt, Marburg) aŭ kun aliaj sciencoj, kiel sociologio, politiko, kibernetiko, pedagogio, komputilscienco ktp. (universitataj aŭ universistatnivelaĵoj kursoj en Hamburg, Paderborn, Prago, Nitra k.a.). En la studadsesioj de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino havas interlingvistiko firman lokon. En la redakcio de Germain Pirlot aperas ĉiujare listo de universitatnivelaĵoj kursoj, el kiuj plejmulto estas dediĉita al instruado de Esperanto, kelkaj ofertas ankaŭ interlingvistikon. Temas pri ĉ. cent universitatoj en la tuta mondo, ekzemple dudeko da universitatoj en Ĉinio, sep en Japanio, sep en Usono, ses en Hungario, ok en Rumanio ktp. Ankaŭ doktorigaj disertaĵoj pri interlingvistiko estas dokumentataj en speciala bulteno.

Aparte menciindaj estas bibliotekoj kaj dokumentaj centroj pri interlingvistiko. En la kvindekaj jaroj fondiĝis "Centro de esploro kaj dokumentado pri la monda lingvoproblemo" sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi eldonadas multajn dokumentojn kaj studojn pri la monda komunikadproblemo kaj speciale pri Esperanto. La publikaĵlingvoj estas krom Esperanto la Angla kaj la Franca. La centro publikigas ankaŭ anglalingvajn faklibrojn, organizas konferencojn (en Usono i.a. en kunlaboro kun la organizo "Modern Language Association of America"), precipe tiujn pri esperantologio enkadre de universalaj kongresoj de Esperanto. Ĝi ankaŭ estas oficiala eldonisto de la "Informilo por interlingvistoj". Prezidanto estas usona profesoro Humphrey Tonkin. Sub lia redakto aperadas serio da sciencaj studoj "Papers of the Center for Research and Documentation on World Language Problems". En la jaroj 1969-1977 eldonadis la centro plurlingvan sociolingvistik-an-lingvopolitikan revuon "La Monda Lingvo-Problemo". Ĝis 1977 aperis dek ok 64-paĝaj kajeroj. Ekde tiam nomiĝas la revuo "Language Problems and Language Planing". Ĝi specializiĝas je problemoj de lingvoplanado kaj interreta komunikado, kun multaj interlingvistikaj komponentoj. Krom sciencaj artikoloj ĝi publikigas lingvopolitikajn rimarkigojn kaj recenzojn pri novaj libroj kaj similajn novaĵojn. Nuntempe ĝi aperas en Amsterdamo.

CDELI (Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale) ĉe la urba biblioteko en La Chaux-de-Fonds (Svislando) fondiĝis en 1967 kiel sekvo de dokumenta kolekto de fondaĵo Edmond Privat el la jaro 1962, arĥivante kaj dokumentante ĉ. 70 000 diversajn dokumentojn pri ĉiuj planlingvoj inkluzive de manuskriptoj kaj privataj kolektoj, kompletaj serioj de raraj revuoj kaj

cirkuleroj ktp. Unikaĵo estas kompletaj bibliotekoj aĉetitaj aŭ donacitaj, ekz. de André Schild (Interlingua kaj latinidaj projektoj), Alphonse Matejka (Occidental), Hans Jakob (letero de pioniroj de Esperanto, Ido ktp.), Henri Meyer (dokumentoj pri Ido). Je dispono al ĉiu studemulo estas katalogoj (aŭtoraj, faka, laŭtitola), studejo kaj fakaj konsiloj. La administranto, Claude Gacond, kunorganizas fakajn seminariojn kaj gvidas esplorojn, ĉefe kunlabore kun Kultura Centro Esperantista (KCE). KCE ofertas dum la tuta jaro kursojn de Esperanto, kulturajn kaj sportajn programojn, sed ankaŭ sciencajn kunvenojn kaj kolokvojn.

Plua dokumenta centro kolektanta verkojn en kaj pri multaj internaciaj lingvoj estas Internacia Esperanto Muzeo en Vieno (17 000 libroj, 30 000 broŝuroj, 250 periodaĵoj, dokumentoj pri ĉ. 700 planlingvoj). La privatan kolekton fondis en 1927 Hugo Steiner kiel memorigon por internacia kompreniĝo. Ekde 1929 ĝi estas parto de la Aŭstra Nacia Biblioteko. La nuna direktoro Herbert Mayer aparte interesiĝas pri interlingvistiko kaj kompletigado de la dokumentaro. Same kiel CDELI, ankaŭ la biblioteko de la Internacia Esperanto Muzeo kolektas novajn sciencajn laboraĵojn pri interlingvistiko, donas informojn kaj organizas seminariojn pri koncernaj temoj. Avantaĝa estas, ke oni ne nur povas studi surloke, sed pere de eksterlandaj universitataj kaj naciaj bibliotekoj pruntepreni materialojn aŭ ricevi fotokopiojn. La muzeo eldonas revuon "La Dua Jarcento" kaj daŭre kompletigatan planlingvistikan bibliografion.

Pluaj dokumentaj kaj esploraj centroj pri internaciaj lingvoj estas Bibliothèque Montagu Butler de Brita Esperanto-Asocio (30 000 dokumentoj), Biblioteko Hodler de Universala Esperanto-Asocio (3500 libroj en Esperanto, 6200 lernolibroj kaj libroj en aliaj lingvoj, 6000 broŝuroj), Esperanto-Fondaĵo de Publika Biblioteko Kortrijk (2500 libroj, 5000 faskoj da binditaj periodaĵoj), Hungarlanda Esperanto-Biblioteko Szeged (1400 Esperantaj libroj, 2000 arĥivaĵoj).

Resume, interlingvistiko establiĝas kiel scienco. Ĝi povas kaj volas esti utila en la solvado de komunikadproblemoj. Kiel pruvon oni menciis internacian kolokvon, organizitan en novembro 1993 en Eŭropa Parlamento en Bruselo. La temo estis "Komunikada kaj lingva problemoj en Eŭropa Komunumo — kiom povas kontribui planlingvo al ĝia solvo"? Tiu ĉi temo estis pritraktata de reprezentantoj de eŭropaj institucioj (specialistoj pri tradukado, lingvoinstruado ktp.) kaj de interlingvistoj. La interlingvistoj alportis informojn pri lingvoplanado, ĝiaj rezultoj, historio kaj nuntempa stato, pri psikaj barieroj kontraŭ uzo de planlingvoj en la hodiaŭa socio, pri praktika uzo de planlingvoj en ĉiutaga vivo, scienco kaj tekniko. Oni pridiskutis, ĉu la oficiale proklamita celo de landoj de la Eŭropa Komunumo, lerni en lernejo minimume du fremdajn lingvojn, povus esti atingita kun la neŭtrala planlingvo anstataŭ la Angla, kaj ĉu en tia situacio povas konserviĝi rajtoj de ĉiuj etnolingvoj. Iĝis klara, ke planlingvoj reprezentas akcepteblan neŭtralan solvon por kultura kaj politika internacia kunvivado.

4.6 Demandaro

23. Nomu almenaŭ 3 aŭtorojn de lingvoprojektoj antaŭ la 18-a jarcento.
24. Nomu almenaŭ 3 interesitojn pri interlingvistiko en la 18-a kaj 19-a jarcento antaŭ Volapük.
25. Nomu almenaŭ 3 interlingvistikajn organizaĵojn en la 19-a kaj 20-a jarcento.
26. Kio estas IALA, kiam ĝi ekzistis, kiuj estis ĝiaj 4 ĉefaj agadkampoj?

Pliprofundiga literaturo

Donas la plej aktualigitajn informojn *Blanke, 1985* (vidu ĉe 1.2), paĝoj 125-204, kun aparta ĉapitro pri Esperanto sur paĝoj 204-289. Plue *Kuznecov, 1987* (vidu ĉe 1.2), paĝoj 52-192, tre

detale pritraktite el lingvistika vidpunkto. Klasikaj verkoj estas: *Drezen, E.: Historio de la mondolingvo, 1931, kompletigita Esperanto, eldono ĉe Progreso, Moskvo 1991, 453-paĝa.* Detala, pli el historie sociologia kaj politika vidpunkto rigardata kaj komentata verko, bibliografiita en piednotoj, informanta ĉefe pri historio de unuopaj planlingvoj, precipe pri Esperanto. Riĉajn komentojn kaj aldonajn informojn pri la aŭtoro, samkiel kompletigojn, ĥronologian superrigardon de planlingvoj kaj registron aligis la eldonanta S. Kuznecov kun kolektivo. Eseo de *Monnerot-Dumaine, M. : Précis d'interlinguistique générale et speciale, Librairie Maloine, Paris 1960, 200-paĝa,* estas simila verko franclingva kun fotoj kaj lingvospecimenoj, pritraktanta unue gramatikajn ĝeneralaĵojn de internaciaj lingvoj kaj poste unuopajn planlingvojn, envicigite laŭ iom individuaj kriterioj. La plej klasika libro pri internaciaj lingvoj estas *Couturat, L., L. Leau: Histoire de la langue universelle, Hachette, Paris 1903, 576-paĝa,* kun kompletigo *Couturat, L., L. Leau: Les nouvelles langues internationales, Hachette, Paris 1907, 110-paĝa.* Temas pri tre detala kaj riĉe (kvankam subjektive) france komentita kolekto de centoj da planlingvaj projektoj; kelkaj el ili estas konataj nur dank' al tiu ĉi pionira verko, havanta nepran historian valoron. Krome gravas du verkoj bibliografiaj: *Stojan, P.: Bibliografio de la internacia lingvo, UEA, Ĝenevo 1929, 519-paĝa,* esperantlingva, kaj la plej freŝa *Duliĉenko, A.: Meĵdunarodnyje vspomogatelnyje jazyki, Valgus, Tallin 1990, 445-paĝa,* ruslingva, kun koncizaj komentoj kaj pluaj bibliografiaj indikoj pri unuopaj projektoj ĝis la jaro 1973.

5. DETALA PREZENTO DE LA PLEJ SUKCESINTAJ PLANLINGVOJ

5.1 Volapük (Johann Martin Schleyer, 1879)

Alfabeto: a, ä, b, c/ĝ/, (ch), d, e, f, g, h, i, j/ĵ/, k, l, m, n, o, ö, p, r, s, t, (th), u, ü, v, x, y/j/, z. Fonemoj /x/ = ĉ kaj /th/ = th, troviĝantaj en la unua lernolibro, estis poste forigitaj.

Artikolo: **el**, nur difina, tre malofte uzata.

Substantivoj havas regulan deklinacion, genitivo finiĝas je **-a**, dativo je **-e**, akuzativo je **-i**, plurala finaĵo estas **-s**. : *sing.* dom, doma, dome, domi, *plur.* doms, domas, domes, domis. Femininon oni formas per prefikso **ji-**: blod = frato, jiblod = fratino, gok = koko, jigok = kokino. Eblas ankaŭ prefikso **of-**. Por reliefigi virecon servas prefikso **hi-**: higok = virkoko, hidog = virhundo. Aĵoj estas neutraj : tab = tablo, buk = libro, gad = ĝardeno.

Adjektivoj: finaĵo **-ik**: gud = bono, gudik = bona, glet = grando, gletik = granda, en komparativo **-um**, superlativo **-ün**. Ili staras malantaŭ sia substantivo.

Personaj pronomoj: ob, ol, on (mask.), of (femin.), os (neut.), en pluralo ili havas finaĵon **-s** kiel substantivoj: obs, ols, ons, ofs, oss. Deklinacio kiel ĉe substantivoj.

Posesivaj pronomoj: per adjektiva finaĵo **-ik**: obik, olik, onik, ofik, osik, obsik, olsik, onsik, ofsik, ossik.

Pronomoj: demonstrativaj at, hiat, jiat (por proksimeco), et, hiet, jiet (malproksimaj), *demandaj* kin (ĝenerale), kim (mask.), kif (femin.), kis (neut.), *relativaj* hikel, jikel, kelos, *nedifinaj* ek = neni, nek = nenia, bos = io, nos = nenio, al = ĉio, alik = ĉiu, an = iu, anik = ia. *Refleksivo:* ok.

Numeraloj: bal, tel, kil, fol, lul, mäl, vel, jöl, zül, deg, degbal... 20 teldeg, 30 kildeg, 100 tum, 1000 mil, 1 000 000 balion. Ordaj numeraloj finiĝas je **-id**: balid, telid.... Onoj: **-dil**: duono = teldil bal,

kvinono = luldil bal.... Opaj: **-na**: balna, telna, kilna...

Verboj: estas ĉiuj regulaj, la tempon montras prefiksoj kaj personon personaj pronomoj en sufiksa formo. Infinitiva finaĵo estas **-ön**, imperfekta prefikso **ä-**, perfekta **e-**, pluskvamperfekta **i-**, futura I **o-**, futura II **u-**, pasiva **p-**, imperativa sufikso **-öd**, kondicionala **-öv**, participa aktiva **-öl**, pasiva **pe-...-öl**.

löfön = ami:

prez. : löfob, löfol, löfon, löfof, löfobs, löfols, löfons, löfofs

imperfekto: älöfob, älöfol, älöfon...

perfekto: elöfob, elöfol, elöfon....

pluskvamperfekto: ilöfob, ilöfol, ilöfon...

futuro I: olöfob, olöfol, olöfon...

futuro II: ulöfob, ulöfol, ulöfon...

pasivo prezenta: palöfob, palöfol, palöfon...

pasivo imperfekta: pälöfob, pälöfol, pälöfon...

pasivo perfekta: pelöfob, pelöfol, pelöfon...

pasivo pluskv.: pilöfob, pilöfol, pilöfon...

pasivo futura I : polöfob, polöfol, polöfon...

pasivo futura II : pulöfob, pulöfol, pulöfon...

Adverboj havas finaĵon **-o**: ädelo = hieraŭ, odelo = morgaŭ, gudiko = bone. Kelkaj havas alian finaĵon, ekz. ai = ĉiam, ba = eble, ya = jam, nu = nun.

Prepozicioj: de = de, in, ini = en, fa = per, nen = sen, sus = sub, vü = inter, domü = ĉe...

Konjunkcioj: e = kaj, bi = ĉar, do = kvankam...

Akcento estas regula, sur la lasta silabo, kiu estas longa. Nur partikuloj **li** kaj **la** estas senakcentaj.

Vortprovizo devenas kvardekprocente de la angla, poste el la latina, franca kaj germana. Sed: la radikoj estas prefere unusilabaj kaj por eviti mikson kun plurala finaĵo ili ne finiĝas per **-c**, **-j**, **-s**, **-x**, **-z**, oni evitas ankaŭ **-r-**, kombinaĵojn de pluraj konsonantoj kaj vokaloj ktp. Sekve estas la fonta vorto apenaŭ rekonebla, ekz. bib (biblia) = libro, dol (dolor) = doloro, gul (angulus) = angulo, nim (animal) = animalo, vun (Wunde) = vundo, bel (Berg) = monto, mud (Mund) = buŝo, fat (father) = patro, flen (friend) = amiko, nol (knowledge) = scio, plim (compliment) = komplimento, pük (speak) = lingvo, vol (world) = mondo, yel (year) = jaro, gad (garden) = ĝardeno, cil (child) = infano, бүр (bureau) = buroo, mag (image) = imago, rig (origine) = origino. Egan parton de vortprovizo eblas derivi per afiksoj kaj sufiksoj, la plej uzataj estas ekz. **-il** por diminutivo, **-en** por profesio, **-af** por animalo, **-ge** por ripetado, **-ne** por negacio, **lu-** por malgrandigo, **-än** por lando, **-em** por kolektivo ktp. Ekzemple de la vorto *pük* = parolo oni povas derivi: pükik — lingvistiko, pükatidel — lingvoinstruisto, pükon — paroli, motapük — gepatra lingvo, pükät — diskuto, pükatil — alparolo, telapükat — dialogo, pükav — filologio, püked — frazo, pükedavod — proverbo, pükel — parolanto, mopükel — plurlingva, okopükot — monologo, gepük — respondo, gepükon — respondi, lepük — konfirmo, lupük — babilado, nepük — silento, nepükten — silenti, sepük — prononco, tapük — kontraŭdiro, volapük = monda lingvo — kaj multajn aliajn.

Specimeno de teksto:

(La preĝo "Patro nia"):

O Fat obas, kel binol in süls, paisaludomöz nem ola! Kömomöd monargän ola! Jenomöz vil olik, äs in süls, i su tal! Bodi obsik vädeliki givolös obes adelo! E pardolös obes debis obsik, äs id obs aipardobs debeles obas. E no obis nindukolös in tentadi, ab aidalivolös obis de bad. Jenosöd!

Pritakso kaj informoj:

Volapük trairis kelkajn ŝanĝojn, parte de la aŭtoro mem. La unua reformanto, Kerckhoffs, celis la plej eblan simpligon, la dua reformanto, De Jong, serĉis certan kompromison. Kelkaj ekzemploj: La frua Volapük havis akuzativon post almovigaj prepozicioj, ekz. *in domi* = en domon, *al teati* = al teatro, kiun Kerckhoffs forigis kaj De Jong anstataŭigis per *ini dom*, sed *al dom*. Schleyer deklinaciis la infinitivon, ekz. *gälöd fitöna* = plezuro de fiŝi, la reformistoj preferis *gälöd fitama* = plezuro de fiŝado. La frua Volapük havis apartan vokativon kun "o" (o söl digik! = estimata sinjoro!), poste forigitan. Ĉe Schleyer oni trovas komparativon ne nur de adjektivoj kaj adverboj, sed eĉ de substantivoj, verboj kaj participoj. Malsameco estas ankaŭ en la uzo de personaj pronomoj: "ĝi" havis unue la formon "om", ĉe De Jong "on", "oni" estas "on", ĉe De Jong "oy", aldoniĝas ankaŭ refleksivo "od" = "unu la alian". En verbosistemo ekzistis komence tri imperativaj formoj (optativa, imperativa, jusiva), poste forlasitaj. En la vortprovizo faris ŝanĝojn ambaŭ reformistoj, ĉe numeraloj ekz. 10 = bals kaj 20 = tels estis ŝanĝitaj al "deg" kaj "teldeg", ŝanĝiĝis nomoj de monatoj, ekz. balul, telul kaj kilul en "yanul", "febul" kaj "mäzul", tagoj, ekz. telüdel = lundo, kilüdel = mardo, folüdel = merkredo en "mudel", "tudel", "vedel", plue landnomoj kaj multaj vortkunmetaĵoj. La novaj uzantoj ne plu evitas fonemon /r/ en la vortradikoj, do "glet" = granda iĝas "gret", "dlem" = tremo iĝas "drem" ktp. Malgraŭ la ŝanĝoj oni asertas, ke eĉ post la reformoj la originala Schleyera lingvo estas rekonebla kaj komprenebla.

Volapük estis la unua plene realiĝinta planlingva projekto kun konsiderinda nombro da parolantoj, propraj literaturo kaj internacia movado. Pri la ekesto ekzistas iom diversaj indikoj (ekz. Drezen skribas, ke Schleyer konis 40 lingvojn, Blanke parolas pri ĉ. 80 lingvoj), multaj tamen asertas, ke la aŭtoro, bavaria katolika prelato, ne konis iun ajn antaŭan projekton de internacia lingvo kaj la ideo venis de lia persona ekzalto. Lia unua ideo estis krei universalan alfabeton por la tuta homaro, poste li celis doni al la unuiĝinta mondo universalan lingvon (la devizo de volapükista movado estis "Menade bal püki bal" = al unu homaro unu lingvon). Ĉiukaze devis temi pri lingvo kun gramatiko absolute regula kaj raciigita, do plene apriora.

Post la unuaj notoj, aperigitaj en katolika revuo "Sionsharfe" en 1878, Schleyer publikigis la gramatikon de Volapük en 1879 kaj samjare trovis favorantojn en Germanio kaj Aŭstro-Hungario (ekz. hungaron G. Banfi-Bauer, ankaŭ aŭtoron de planlingva projekto). En 1880 aperis la unua lernolibro, ekde 1881 ekzistis la revuo "Volapükabled", en 1882 fondiĝis volapükistaj societoj en Germanio kaj Svedio, en 1884 kunvenis la unua internacia kongreso (la plej granda parto de paroladoj tamen estis germanlingva), en 1887 fondiĝis akademio "Kadem Bevünetik Volapüka", prezidata de Schleyer mem, sed kun agema direktoro August Kerckhoffs, profesoro de pariza supera lernejo. La kresko de la volapüka movado do estis tre rapida, kvankam la lingvo mem ne estis tro facila kaj precipe en ĝia vortaro ekzistis arbitreco kaj malklaraĵoj. Schleyer mem iĝis absolute aŭtoritativa kreanto kaj evoluiganto de la lingvo (oni parolas eĉ pri "despotismo"), kies plua evoluo do dependis nur de lia persono.

Tio jam en 1888 kaŭzis movadan skismon: ĉe la flanko de Schleyer kaj lia "Klub Bevünetik" restis plejparte katolikoj, adorante sian majstron ("cifal" = moŝta estro, "datuval" = moŝta inventinto), la

movado havis sian himnon, la ideologion de monda unuigo ktp. Kerckhoffs kaj liaj simpatiantoj apogis la ideon, ke la Akademio rajtas fari ŝanĝojn kaj reformojn en la lingvo, kiun oni volis ĉefe plisimpligi. Pro la aŭtoritato de Schleyer la akcepto de lingvoŝanĝoj tamen malsukcesis kaj Kerckhoffs demisiis en 1891. Lia granda merito estas publikigo de interesa "Jarlibro de diplomitaj volapükistoj" (Yelabuk pedipedelas, Paris, Le Soudier 1889), kie troviĝas mirinde detala listo de libroj, artikoloj kaj projektoj tuŝantaj la problemon de internacia lingvo ĝis la jaro 1889, do eĉ du libroj pri Esperanto. Plue enestas la listo de 283 volapükaj societoj, 384 libroj, 25 gazetoj kaj 316 lernolibroj de Volapük en 25 lingvoj. La plej interesa estas tamen la lasta parto kun nomoj kaj loĝlokoj de 1600 diplomitoj de Volapük — oni do povas supozi, ke la vera nombro de Volapük-lernintoj estis multe pli granda. La volapükistoj estis — laŭ la listo — pastroj, kuracistoj, instruistoj, komercistoj kaj inĝenieroj, do la intelektularo, kiu sentis bezonon de internaciaj kontaktoj kaj ĉe kiu oni povas supozi certajn fremdlingvajn konojn. Ĉar iu kritika konscio pri la dezirinda formo de planlingvo ne ekzistis kaj Volapük estis la unua detale prilaborita logika sistemo, oni volonte akceptis ĝin.

Laŭ indiko de Drezen ekzistis eĉ 58 gazetoj en Volapük, sed ili malaperis dum la unuaj dek jaroj de la 20-a jc. Post la morto de Schleyer en 1912 restis kiel lastaj "Nuns blefik se Volapükavol" en Nederlando kaj "Der Weltsprachenfreund" en Germanio. Gvidado de la movado estis testamentita al pastro Sleumer, kies cirkulero "Volapükanes valik" el majo 1913 tamen ne plu sukcesis revivigi la masojn. La du ĉefaj kialoj de tiu ĉi interesperdo estis neeblo de natura disvolviĝo de la lingvo mem (ĝi dependis de la decido de unu persono), kaj sociologia premo konservi la lingvon en la kadro de organizita movado.

La aktivecon poste transprenis unuopuloj, ekzemple la iama sekretario de Schleyer, sviso Jakob Sprenger, kiu inter 1921 kaj 1935 eldonadis gazeton Nüniel;. Sprenger estis oficiale nomata "cifal" de volapükistoj, do laŭleĝa posteulo de Schleyer kaj Sleumer. Li tamen akceptis lingvajn reformojn de alia fidelulo, D-ro Arie De Jong, pro kies aktiveco Volapük renaskiĝis en 1930 en Nederlando. F. J. Krüger kaj P. Uittenbogaard eldonadis tie gazeton "Volapükagased pro nedänapükans", parte en la Nederlanda. La svisa kaj nederlanda centroj eldonadis diversajn broŝuretojn en kaj pri Volapük, sed la renaskiĝo ne daŭris longe. Ĝi formortis fine de la sesdekaj jaroj, postlasante kiel gravan dokumenton informan kaj bibliografian verkon de Johann Schmidt "Jenotem valemapüka Volapük", eldonitan an 1964 en Amsterdam. En 1979 aperis ankoraŭ unu revueto "Vog Volapüka", postrestis tradukoj, originala beletro kaj poezio.

Nuntempe estas konataj nur kelkaj izolitaj volapükistoj. Estas interese, ke per Volapük inspiro estis relative multaj aliaj projektoj, kelkaj eĉ ege similis al ĝi, kiel ekz. "Dil" de Fieweger en 1893 kaj "Dilpok" de abbé Marchand en 1898, sed ankaŭ "Nuvo-Volapük", "Balta", "Spelin", "Veltparl", ekestintaj pli malpli paralele kun Esperanto. Cetere eĉ Zamenhof konis Vopalük-on kaj lingvistoj (ekz. Jespersen) volonte esploras, kiom li inspiro estis per ĝi. Parto de volapükistoj transiris al Esperanto; alia parto, post reformoj de la volapüka akademio, subtenadis diversajn aliajn lingvoprojektojn, kies nombro iĝis komence de nia jarcento pli kaj pli granda.

5.2 Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto (Ludoviko Lazaro Zamenhof, 1887)

Alfabeto: a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

Artikolo: nur la difina **la**, sensanĝa, en poezio apostrofebla je l'.

Substantivoj: finiĝas per **-o**, akuzativo **-n**, pluralo **-j**.

Adektivoj: finiĝas per **-a**, kongruas kun substantivo (akuzativo **-n**, pluralo **-j**), komparativo havas partiklon **pli**, superlativo **plej**.

Personaj pronomoj: mi, vi, li, ŝi, ĝi, ni, vi, ili. Akuzativo **-n** kiel ĉe subst. kaj adj.

Posesivaj pronomoj havas adjektivan finaĵon **-a**.

Nedifina personpronomo oni.

Numeraloj: unu, du, tri, kvar, kvin, ses, sep, ok, naŭ, dek, dek unu, ...dudek, tridek...cent...mil.

Ordaj numeraloj havas adjektivan finaĵon **-a**, obligaj **-obl-**, dividaj **-on-**, araj **-op-**: kvinoblo, kvinono, kvinopo.

Verboj ne ŝanĝiĝas en persono kaj numero, prezenco finiĝas per **-as**, imperfekto per **-is**, futuro per **-os**, kondicionalo **-us**, imperativo (konjunktivo) **-u**, infinitivo **-i**, participo prezenca aktiva **-ant-** pasinta **-int-**, futura **-ont-**, pasiva prezenca **-at-**, pasinta **-it-**, futura **-ot-**. Helpverbo *esti* regulas. Pro la aprioraj finaĵoj havas Esperanto superrigardeblan sistemon de verbaj tempoj.

Adverboj finiĝas per **-e**, komparado samas al adjektivoj.

Prepozicioj kun nominativo.

Korelativoj formas aprioran sistemon (komenca **ki-** signifas demandan pronomon aŭ adverbon, **ti-** demonstrativon, **ĉi-** ĝeneralecon, **nen-** negacion, **i-** nedifinecon. Fina **-u** signas personon, **-o** aĵon, **-a** econ, **-es** posedon, **-e** lokon, **-am** tempon, **-el** manieron, **-al** kialon, **-om** kvanton).

Vortordo estas libervola.

Vortprovizo estas krom neologismoj pliriĉigata per vortkunmetado kun la ĉefa vorto je la fino de kunmetaĵo (ekzemple preseraro estas eraro en la presaĵo, erarpreso malĝusta, erara presado). Krome uzatas multaj afiksoj, kies nombro kreskis dum la evoluo de la lingvo — Zamenhof uzadis nur ses prefiksojn kaj 25 sufiksojn, per kiuj oni povis pligrandigi la vortprovizon helpe de derivado. La plej uzataj afiksoj estas: **mal-** signifas la kontraŭon, **re-** ripetadon, revenon, **-et-** estas malgranda, **-eg-** pligrandigas, **-in-** signifas virinon, **-id-** infanon, **-aĵ-** objekton, **-ebl-** eblon.

Afiksoj estas plensignifaj kaj povas formi la vortbazon.

Specimeno de teksto

La fidelan tradukon el la latina reprezentas ekz. tiu de Aeneis, kiun, konservinte la metrikon, tradukis Henri Valienne. (Por komparo aldoniĝas la latina originalo.)

Arma virumque cano Troiae qui primus ab oris
Italiam fato profugus Laviniaque venit.
Litora multum ille et terris iactatus et alto
Vi superum, saevae memorem Iunonis ob iram,
Multa quoque et bello passus, dum conderet urbem,
Inferretque deos Latio, genus unde latinum
Albanique patres atque altae moenia Romae.

Armojn mi kantas kaj viron, unua al bordoj Trojanaj
kiu alvenis, fatale puŝita, kaj ĝis Lavinujo,
lando itala, longtempe tra tero kaj maro vagadis,
dia de volo, ĉar lin persekutis Junona kolero.
Grandajn batalojn li ankaŭ suferis, dum urbon konstruis
kaj al Latujo alportis diaĵojn, el kiu latina
raso kaj albanaj prapatroj kaj altaj de Romo muregoj

Pritakso kaj informoj

Alfabeto de Esperanto estas fonetika kaj ĝia gramatiko skemisma. Tio estas ja kialo de la facila lerneblo, sed ankaŭ de ĉiuj ĝiaj kritikoj kaj reformoj. Estas mirinde, ke la lingvo travivis en pli mapli originala formo la tridekon da reformprojektoj, kies nombro konstante kreskas (problable la plej nova estas Hipersigno el 1992).

Uzado de diakritaj signoj komplikas la tajpadon. Uzado de ĉ >ch, ŝ >sh, ĥ >hh, ĵ >jh, ĝ >gh kontraŭas la principon "unu sono, unu signo" (oni tamen povas kontraŭdiri, ke c, ĉ kaj ĝ estas kompleksaj fonemoj). Esperanton tamen eblas konverti en ASCII kodo aŭ skribi per speciala komputila programo. La facila kaj fonetika ortografio iom malplibeligas la originalan vortformon: exemplo — ekzemplo, right — rajto, jersey — ĵerzo. La propraj nomoj konservas en Esperanto plejparte la originan formon .

Ekziston de la ununura gramatika artikolo kritikis kaj Slavoj, kiuj entute ne bezonas artikolon, same kiel latinistoj (vidu la cititan tradukon de Aeneis), kaj, aliflanke, la uzantoj de aliaj lingvoj, kiuj volas krom la difina havi ankaŭ la nedifinan artikolon. (La lingvo havas sufiĉe da aliaj esprimebloj de difineco, sed la artikolo travivas konvencie.)

Unusignifaj kaj devigaj finaĵoj de la vortspecoj ebligas facilan orientiĝon en la teksto, sed samtempe ili estas kaŭzo de "malbelsoneco": Mi vidas belajn novajn domojn ktp. Tamen, la t.n. miaŭantaj sonoj troviĝas ankaŭ en la antikva greka, kie neniu opinias ilin malbelsonaj (...ksejn, angelejn Lakedajmoniojn...). La verba sistemo estas tiom kompleksa, ke ne ĉiam eblas trovi precizan ekvivalenton en etnaj lingvoj. Tamen oni spertas, ke preskaŭ neniu parolanto uzas la tutan eblan riĉecon de la lingvo, kio ja validas ankaŭ por la etnolingvoj. La frazon: "Kiam mi estis veninta, mi salutis", tradukus multaj Eŭropanoj en siajn gepatrajn lingvojn "Kiam mi venis, mi salutis", kaj se oni tiamaniere retradukus en Esperanton, la kompreneblo restas. La riĉeco de gramatikaj formoj estas male avantaĝo, kiun oni povas stilistike bone apliki.

Pli gravaj riproĉoj tuŝas la vortkonstruadon. Oni ja povas, unuflanke, labori kun relative malgranda nombro da vortradikoj (dum la ĝenerala konversacio oni apenaŭ bezonas pli ol okcenton da ili), sed logike konstruitaj novaj formoj ofte donas iom nenaturan, artefaritan impreson: la vorto "maljuna" estas arbitre kreita laŭ vorto "juna", "malpeza" laŭ "peza" (la kritikantoj tuj demandas: kial la bazo estu juna kaj ne maljuna, kial malpeza estas derivita de peza kaj ne male?). Estas fakto, ke la lingvo helpas en tiu ĉi flanko al si mem, ĉar spontanee ekestas neologismoj kiel "olda", "leĝera", "lenta", "kurta". Ankaŭ bele trarigardeblajn analizajn formojn kiel "malsanulejo" (kontraŭo + sana + homo + loko, loko por malsanuloj) jam la normala ĉiutaga uzo anstataŭigis per unuvortaj neologismoj kiel "hospitalo", "vagonaro" (vagono + multo, aro da vagonoj) >trajno, eĉ "programaro" = programo + multo kaj "aparataro" = aparato + multo estas anstataŭigataj per anglaj neologismoj "softo" = software kaj "hardo" = hardware, kiuj en si mem tute ne estas logikaj. Germanaj parolantoj entute ne kontraŭas vortojn kiel "senkulpigo" aŭ "skribmaŝino", sed pro lingva ekonomio ekzistas eĉ neologismoj kiel "ekskuzo" kaj "tajpilo".

Al alia ĉapitro apartenas "neoficiale" uzataj sufiksoj kiel -atoro, -ario, -oza, -io, kiuj atestas kaj spontanee evoluon de la vortprovizo kaj senkonscian transprenadon de vulgarlatinaj formoj de vortkonstruado.

Simile kiel en la makarona latino enŝoviĝas en la lingvon nacionalismoj , kiuj ne estas oficiale uzataj, sed ili plivigliĝas amikan babiladon. La esprimo "krokodili" estas ekzemplo de la interna lingvoevoluo. Alia eblo klarigi tiajn slangajn, "kontraŭregulajn" esprimoj estas rigardi ilin kiel parolan dialektan lingvotavolon, same kiel en etnaj lingvoj, kaj kiel spontanee lingvoevoluo sub influo de la etnolingvoj.

La vortprovizo de Esperanto estas plejparte latinida. Tamen la reguleco de afiksoj igis la aŭtoron

kelkfoje modifi la radikojn, do la sufikso **-et-** signifas "malgranda", tial "planeto" estas "malgranda plano" kaj la vorton "planeta" oni ŝanĝis al "planedo", same ekzistas "cigaredo", "bufedo", "komedo", sed forgesite restis "t" en vortoj kiel "planetario". Same pro la sufikso de feminino **-ino** oni ŝanĝis la latinidan "farina" al "faruno", sed la sufikso restis en la vortoj penicilino, doktrino, insulino.

Kombino de signifoplenaj afiksoj kaj eblo de vortkunmetado alportas ankaŭ la problemon de izomerismo, kiu estas fonto de diversaj vortludoj kaj ŝercoj, ekz. la sufikso **-isto** signifas profesiulon, homon de ia okupo, do pianisto, lingvisto, konstruisto, sed "turisto" ne estas profesia konstruanto de turoj (turo + isto). Same "ĉampano" ne estas pano bakita por ĉamoj, sed bongusta vinspeco. Plue, ekskurso je povas esti "estinta kurso", sed ankaŭ veturado, vojaĝo, "ekspozicio" estas estinta pozicio, sed ankaŭ montrado de interesaj objektoj. Ekzistas aro da aliaj ekzemploj. Estas vero, ke oni senerare analizas la vorton en kunteksto, sed dum ekz. komputila traduko ekestas problemoj analizi la vortojn. Certe, homonimoj ekzistas eĉ en etnaj lingvoj, sed ĉu la lingvo internacia ne estu pli perfekta ol etnolingvoj?

Esperanto ne estas perfekta kaj apenaŭ ekzistas fenomeno, kiun oni ankoraŭ ne kritikis kaj ne reformis en ĝi, sed, mire, sensukcese. Ĝia apriorica gramatiko estas klarigebla el la historia vidpunkto. Bacon, Leibniz, Descartes, Mersenne, Dalgarno kaj aliaj filozofoj postulis, ke la lingvo estu "spiegulo de aĵoj", subtenante regulon "unu nocio, unu vorto". En la tempo de ekesto de Esperanto ankoraŭ ĉiam floris skemismaj projektoj (Balta, Visona, Spelin, pazigrafioj). Kompare kun Volapük estas Esperanto pli superrigardebla, ŝanĝante la fonetikan formon de vortoj nur malmulte.

Al ĉefaj reformantoj, krom idistoj, apartenis René de Saussure (Antido I, Antido II, Esperantido, Nov Esperanto) kaj Erich Weferling.. Ekzisto de la reformprojektoj pensigas, ĉu certaj reformoj, ne influantaj la facilecon de la lingvo, tamen ne indus.

Estus troigo diri, ke Esperanto disvastiĝis pro sia facileco. Grandan meriton havas la organizita movado, kiu anstataŭigas la neekzistantan etnan (geografian) komunumon. La plej granda esperantista organizo, UEA, fondita en 1908, havas reprezentantojn en okdek landoj de la mondo kaj dum kongresoj kunvenadas ĉ. trimil partoprenantoj (dum la centjariĝo de Esperanto eĉ 6000). Ekzistas multaj naciaj kaj internaciaj esperantistaj organizoj, eldoniĝas ĉ. 130 revuoj kaj elsendas ĉ. 30 radiostacioj, ekzistas ĉ. 30 000 literaturaj verkoj, Esperanto estis akceptita de la Internacia Poŝta Unio, de UNESCO, uzas ĝin internaciaj fervojoj, sciencaj laborejoj, artaj societoj ktp. Tio do sufiĉe pruvas la vivkapablon de la lingvo en praktika vivo.

Dum cent jaroj de sia ekzisto transiris la lingvo certan evoluon, troviĝas en ĝi kaj arĥaismoj kaj neologismoj, fakaj slangoj kaj dialektaj apartaĵoj. Klopodon rekonstrui lingvan praformon (same kiel oni rekonstruis la hindeŭropan pralingvon) oni povas opinii aŭ esprimi de estimo por la lingvaj tradicioj, aŭ lingvistika ludismo. Ĉiukaze temas pri faro interesa. Oni scias, ke Zamenhof interesiĝis pri la ideo de internacia lingvo jam en siaj studentaj tempoj kaj ke li kreis nekonserviĝintan projekton "Lingwe universala".

"Praesperanton" inventis jam la fama poeto Kolomano Kalocsay. En la sepdekaj jaroj publikigis Manuel Halvelik la rekonstruon, nomitan "Arcaicam Esperantom", kiu inspiris ankaŭ aliajn interesitojn. La "rekonstruaj" kialoj estas facile klarigeblaj. Halvelik diras en la antaŭparolo al sia verko (Halvelik, M., 1969), ke la nuntempa Esperanto servas al aktuala konversacio kaj beletrio, kie pruviĝis la ekzisto de lingvaj normoj, do de la Zamenhofa Fundamento. Pli grandajn problemojn havas la lingvo dum la kreado de terminologio de ekzaktaj sciencoj, kie oni ne povas trovi apogon en la lingva tradicio, oni do devas eliri el la latina terminologio, aŭ krei novan, sed ne per "vulgara imitado de ĥaose ekestintaj vortaroj de naturaj lingvoj". Esperanto ja estas en la stato de daŭra

evoluo kaj, bedaŭrinde, mankas al ĝi tradicio pli malnova ol cent jaroj, tial rigardas ĝin malestime la lingvistoj, dum la etnaj lingvoj ĝuas pli da estimo nur pro tiu tradicio. Ĉiu kulturo citas siajn klasikulojn, ĉu Homeran Odisseon, ĉu Vedojn aŭ Koranon, maksimumoj ilustras la saĝecon de antaŭuloj. Tia apogo do mankas al Esperanto, kvankam ĝi ja estas el lingvistika vidpunkto samvalora al la etnolingvoj.

Se oni do opinias Esperanton latinida, oni povas supozi ĉe ĝi similan evoluon kiel ĉe la vulgara latina (simpliĝon de deklinacio, reguliĝon de gramatikaj formoj, lingvan ekonomion, tendencojn al fortaj esprimoj k.a.), la rekonstruo de la arkaika stato do ne devus esti problemo, opinias Halvelik kaj prezentas rekonstruon kun fleksio kaj kun arkaikaj fonetikaj formoj. Li aldonas specimenojn de tekstoj kaj de latindevena scienca terminologio. En 1992 aldoniĝis al tiu ĉi kvazaŭ histori-lingvistika esploro Richard Cash kun gramatiko de Praesperanto.

Tiuj rekonstrukciaj streboj ja povas esti nur amuzo, sed ili tamen pruvas, ke la lingvo havas tre interesatajn uzantojn kaj oni spontanee uzas ĝin ne nur dum la organizitaj esperantistaj eventoj. Ekzistas eĉ denaskaj parolantoj de tiu ĉi lingvo, interesa afero por psikolingvistoj.

Esperanton eblas studi ankaŭ en altlernejoj. (Redaktite de Germain Pirlot aperas ĉiujare superrigardo de okazintaj kursoj). La plej sukcesa estas tiudirekte Universitato Eötvös Loránd en Budapeŝto. Esperanto kiel studfako kaj scienca fako ekzistas ĉe la katedro de ĝenerala kaj aplikata lingvistiko en filologia fakultato ekde 1966. La fakon absolvis jam centoj da studentoj, ĉ. 80 kiel diplomfakon (kun diplomlaboro) kaj kelkaj kandidatoj elektis Esperanton por doktoriĝi. Nuntempe eblas studi en direkta studado bakalaŭra 2,5 jarojn, en la magistra 5 jarojn kaj en doktora postajn 2-3 jarojn. Krom la ĝenerala studado de la lingvo kaj literaturo estas en la studprogramo: ĝenerala, kompara kaj aplikata lingvistiko, historio de interlingvistiko, enkonduko en komputistikon (preparo de lingvaj kaj tradukaj programoj, sinteza parolo), historio de esperantista movado, laŭ plua orientiĝo poste didaktiko kaj metodiko de Esperanto por instruistoj, redakcia stilstiko, ĵurnalista kaj traduka seminarioj, samkiel specialaj seminarioj al kulturaj, sociologiaj, estetikaj kaj politikaj temoj kunigitaj kun la fako. En ĉiuj hungaraj lernejoj oni intertempe rajtas elekti Esperanton kiel unuan aŭ duan fremdlingvon.

Kiel scienca lingvo estas Esperanto uzata ekde 1925 (enkadre de la Kongresaj Universitatoj dum Universalaj Kongresoj). Ekde 1972 uzas ĝin por siaj someraj kursoj universitato en Liège, ekde 1979 ĝi estas (apud la Franca kaj Angla) unu el la oficialaj lingvoj de la internacia kibernetika organizo (Association Internationale de Cybernétique) kaj ekde 1984 oficiala lingvo de TAKIS (Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko). Ekde 1985 uzas ĝin kiel ĉefan oficialan lingvon AIS San Marino (tamen sub la origina nomo Internacia Lingvo, mallongige ILo, por montri sian distancon de la esperantista movado) apud la Itala, la Franca, la Angla kaj la Germana. En 1988 eliĝis el AIS Akademio Comenius, kun sidejo en Uppsala, kiu estas institucio rigide scienca — ĝiaj membroj rajtas esti nur akademianoj. Akademio Comenius ankaŭ uzas Esperanton kiel laborlingvon. Enkadre de la tutmonda esperantista organizo UEA ekzistas multaj fakaj institucioj, ekz. Terminologia Esperanto-Centro speciale orientiĝas al problemoj de scienca terminologio. Resume, Esperanto ja atingis nivelon kaj disvastiĝon kompareblan kun etnolingvoj, tamen ĝi ne povas superi hegemonion de la Angla. Ideoj realiĝintaj dank' al Esperanto tamen pensigas pri la utila funkcio de la internacia lingvo por la estonteco, ekz. por la aŭtomata traduko kaj informprilaborado, samkiel por la sekva instruado de etnolingvoj.

5.3 Ido (Louis Couturat – Louis Beaufront, 1907)

Alfabeto: a, b, c, ch/ĉ/, d, e, f, g, h, i, j/ĵ/, k, l, m, n, o, p, q, r, s, sh/ŝ/, t, u, v, w, x, y/j/, z.

Akcento estas plej ofte sur la antaŭlasta silabo, ĉe infinitivo sur la lasta, **i** kaj **u** antaŭ vokalo en

plusilabaj radikoj ne estas akcentitaj: **familio**, **Germania**, **historio**, **statuo**, sed ja en unusilabaj: **dio**, **shuo**.

Artikolo estas nur difina por ĉiuj genroj kaj numeroj, **la**, kun elizio antaŭ vokalo (l'aganto), kun prepozicio **de** ĝi formas **del**, kun prepozicio **da** **dal**, kun prepozicioj **a** kaj **ad al**.

Substantivoj finiĝas plejparte je **-o** (sioro, revuo, domo), sed ili povas havi ankaŭ naturan finaĵon, ekz. feminina **-a** (stranjera, Italia), aŭ konsonanton (mark, ukaz). Pluralo finiĝas per **-i**: siori, revui, domi. Objektiva kazo havas finaĵon **-n**, se ĝi ne staras malantaŭ subjekto: La krokodilo (subj.) devoras la tigro. La tigr**on** (obj.) devoras la krokodilo. Finaĵo **-o** povas elizii kun apostrofo: la dom', la sior'.

Adjektivoj finiĝas per **-a** en singularo kaj pluralo, elizio estas sen aprostrofo: nacional, bon. Se la pluralo devas esti markita, oni uzas specialan artikolon **le**: Donez a me la flori, ne le reda, ma le blanka. Komparado: tam bon kam.. plu/min bon... maxim/minim bon, absoluta superlativo tre bon, absolute bon k. s.

Personaj pronomoj: me, tu/vu, lu, il(u), el(u), ol(u), ni, vi, ili, eli, oli. Pronomoj indikantaj aĵojn, kies genron ni ne konas, havas en la 3-a sg formon **lu**, en la 3-a pl. **li**. Ĉiu frazo devas havi subjekton, eĉ formalan, pronoman.

Posesivaj pronomoj formiĝas el la personaj per finaĵo-**a**: mea, tua...

Aliaj pronomoj: nedifina **on**, refleksiva **su**, demonstrativo proksimeca **ca**, demonstrativo malproksimeca **ta**, relativa **qua** (sg.), **qui** (pl.), **quo** (por aĵoj).

Numeraloj bazaj: un, du, tri, quar, kin, sis, sep, ok, non, dek... dek-e-un, du-a-dek, cent, mil. Ordaj num.: **-esma**, oblaj **-opla**, dividaj **-opa**, frakcioj **-imo**, numeraladverboj **-e**, numeraladjekt. **-a**.

Verboj ne ŝanĝiĝas en persono kaj numero. Infinitivo prezenca finiĝas per **-ar** (amar), pasinta **-ir** (amir), futura **-or** (amor). Finaĵoj de verbaj tempoj estas la samaj kiel en Esperanto (prezenco **-as**, imperfekto **-is**, futuro **-us**, kondicionalo **-us**; imperativo/volitivo finiĝas per **-ez** (amez!). Participoj samas kiel en Esperanto (akt. **-anta**, **-inta**, **-onta**, pas. **-ata**, **-ita**, **-ota**). Pasivon formas helpvervo **esti** en speciala infiksa formo **-es-**: me amesas, me amesus. Ceteraj tempoj estas inspiritaj de la Latina (infikso **-ab-** : me amabis, me amabus).

Adverboj finiĝas plejparte per **-e**, sed ili povas havi konsonantan finaĵon (olim, quik, sat). Komparativo formiĝas kun partiklo **plu** aŭ **min**, superlativo **maxim/minim**.

Prepozicioj estas plejparte latindevenaj: ante, apud, cirkum, cis, exter, inter, koram, preter, pro, super, trans... kun nominativo.

Vortkreado uzas, same kiel Esperanto, signifoplenajn afiksojn, sed ili ne estas uzeblaj memstare. Ĉe iuj koincidas la signifo kun la Esperanta (bo-, ge-, -ar-, -em-, -ay-, -an-, -ad-, -in-...), aliaj proksimiĝas al la Latina (des-, pre-, retro-, -ier, -ik, -iv...)

Specimeno de teksto

(Schmitt, V., Ido, Praha 1922, p.84):

Che volfo venis uldie hundo grasa. La volfo dicis a lu: bona kamarado, quale tu vivas por esar tante grasa, dum ke me esas tante magra? La hundo respondis: me servas homo

qua donas a me sat multo por janjar. La volfo dicis: takaze me volas iri kun te ed anke servar. Kande li pose iris kune, la volfo regardis la kolo di la hundo e dicis a lu: de quo venas ke tua kolo esas tante skrechita e senpila? Ita dicis: jorne on katenizas me e ligas kolaro cirkum la kolo, to igas me sangrifiar, ma kande noktas, me esas libera e senkatena. Iore la volfo dicis: adio, kamarado. Me preferas esar magra e libera kam esar grasa e nelibera.

Pritakso kaj informoj:

Idon oni nomas lingvo "kompromisa", sed pli ofte lingvo aŭtonoma, reformanta pli skeman Esperanton, el kiu ĝi eliras. La diferencoj estas ekz. en grafiko — Ido ne bezonas diakritajn signojn, kiujn ĝi anstataŭigas per grafemaj kombinoj (ch, sh), por kompleksaj fonemoj "ks", "kv" ĝi uzas **x**, **q**, plue enestas **y** kaj **w**. Ido havas pli da ebloj en substantivaj finaĵoj, ĝi forigas adjektivan pluralon kaj parte akuzativan finaĵon. La vortprovizo konscie orientiĝas al Romanaj lingvoj. Lingvistoj pozitive pritaksas leksikografian laboron de idistoj. Unu el la unuaj Ido-vortaroj (Couturat – Beaufront – Thomann 1908) havas 5400 vortradikojn, el kiuj 40% troviĝas en la ses ĉefaj eŭropaj lingvoj. Ido-germana vortaro de Feder el 1920 enhavas ĉ. 50 000 vortojn, per kio ĝi superas ekzistantajn vortarojn de Esperanto. Ankaŭ la nombro de derivaj afiksoj estas pli granda en Ido, 46 oficialaj Ido-afiksoj kontraŭ 32 Esperantaj. Ekz. por Esperanto sufiĉas la finaĵo **-a** (silka vesto, silka industrio, silka ĉapelo, silka raŭpo), dum Ido havas buntecon da afiksoj (silka vesto, silkala industrio, silkoza ĉapelo, silkifanta raŭpo). Ido do estas pli riĉa je formoj kaj pli bunta je esprimoj, despli malfacile estas lerni ĝin. La signifo de Ido estas en la kreiva lingvistika laboro — celante reformi, plibonigi kaj naturaligi Esperanton realigis la idistoj multajn ŝanĝojn, kiuj eĉ ree influis Esperanton mem, ekz. sufiksoj **-iz**, **-oz**, **-iv** estas "neoficiale" uzataj en la parola lingvo.

Historio de la planlingvo Ido ligiĝas kun laboro de la internacia lingvistika organizo Délégation pour adoption d'une langue auxiliaire (Delegacio por akcepto de internacia lingvo), fondita en 1900 en Parizo, al kies 1250 membroj apartenis i.a. sciencistoj kiel O. Jespersen, H. Schuchardt, W. Ostwald, L. Couturat, serioze pritraktis aron da internacilingvaj projektoj, poste iom neatendite prolamis kiel la plej taŭga reformitan Esperanton — projekton Ido de Louis Couturat kaj Louis de Beaufront.

Flanke de la Esperanto-movado formiĝis ankaŭ la Ido-movado, do socia fenomeno, pluportanta la lingvon. Al Ido aliĝis centoj da iamaj esperantistaj societoj, precipe tiuj de latinidaj landoj. Ido estas krom Esperanto la ununura internacia lingvo vaste uzata ankaŭ de neintelektuloj (Latino sine flexione, Occidental kaj Interlingua praktike estas flegataj de intelektulaj grupoj kun lingvistika fono de la Latina). Ekzistas, same kiel ĉe Esperantistoj Sennacieca Asocio Tutmonda, disvastigo de Ido en la internacia laborista movado kaj diversaj interesgrupoj. El centoj da revuoj, ekzistintaj antaŭ la unua mondmilito, restis proksimume kvin kaj el sescent membroj de "Uniono por la Lingvo Internaciona" (fondita en 1923) postrestis eĉ ne la duono. Interese estas, ke Ido aperis ankaŭ en la tria mondo, ekz. la revuo "Amiko" estas eldonata en Sri Lanka. La uzantoj de Ido inspiroĝas per esperantista movado en maniero uzi kaj propagandi sian lingvon. Kelkaj interlingvistoj parolas ambaŭ lingvojn kaj strebas unuigi iliajn avantaĝojn.

5.4 Latino sine flexione (Giuseppe Peano, 1903)

Alfabeto: a, b, c/k/, d, e, f, g/g/, h, i, j/j/, k, l, m, n, o, p, sh, r, s, t, u, v, x, y/y, j/, z.

El la Latina venas ankaŭ diftongoj ae, oe kaj duoblaj konsonantoj (officiale). La akcento estas plejparte sur la antaŭlasta silabo. Oni respektas latinan ortografion.

Artikolo ne ekzistas, substantivo estas laŭbezone difinita per pronomo (ille, uno ktp.). Nature

genron oni povas montri pere de aldona substantivo: cane mas, cane femina.

Substantivoj ne havas en singularo specifan finaĵon, sed la formon de ablativo (do eblas fari ilin el genitiva formo trovebla en ĉiu vortaro, ŝanĝante -ae>a, -i>o, -us>u, -ei>e, -is>e.

Ekzemploj: rosa, ae — rosa, annus, i — anno, puer, i — puero, casus, us — casu, cornu, us — cornu, dies, ei — die, pax, cis — pace, dens, tis — dente, doctor, ris — doctore, genus, eris — genere, corpus, oris — corpore.

Pluralaj finaĵoj ekestas laŭ la sekva skemo: **-a**, se la latina pluralo finiĝas per -a (arma — arma), **-as**, se la latina pluralo finiĝas per -ae (divitiae — divitias), **-os** ĉe pluralo -i (liberi — liberos), **-e/-es** ĉe latina finaĵo -es (maiores -maiore/maiores). Ĝenerala plurala finaĵo estas **-s**, sed ĝi povas esti ellasita tie, kie estas la pluralo klara el la uzo de aliaj vortoj: patre habe filios et filias — patre habe plure filio et plure filia.

Adjektivoj estas formataj el adjektivoj latinaj neŭtraj laŭ jenaj reguloj: nominativo neŭtra finiĝanta per **-e** neŝanĝiĝas, nominativo je **-um** >o: en ĉiuj aliaj kazoj ŝanĝiĝas la genitiva **-is** >e:

nigrum — nigro, breve — breve, audacis — audace. Komparado: breve — plus breve /magis breve — maximo breve, minus breve — minimus breve

Personaj pronomoj: me, te, illo, illa, id, nos, vos, illos, illas.

Posesivaj pronomoj: meo, tuo, suo, nostro, vostro, suo, analize de me, de te, de nos, de vos...

Numeraloj bazaj: uno, duo, tres, quatuor, quinque, sex, septem, octo, novem, decem, decem-uno, viginta, triginta... centum, mille. Ordaj: primo, secundo, tertio, quarto ...decimo...vigesimo...centesimo.

Verboj finiĝas en infinitivo per **-re**, prezenco ekestas per forigo de infinitiva finaĵo: amo, amare ama, studeo, ere — stude, scribo, ere — scribe, fugio, ere — fuge, audio, ire — audi. Ekzistas malpli regulaj formoj: sum, esse — es, fio, fieri — fi, fero, ferre — fer, facio, facere — fac. Deponencioj transprenas aktivan formon: hortor — horta, fateor — fate, nascor — nasce.

La pasinta tempo estas esprimita ne per la verbo, sed per iu el adverboj kun signifo de pasinteco: heri me scribe, me jam ama, me lauda in passato, te cras habe k. s., por esprimi preteriton eblas diri ankaŭ "me veni ab scribe", "me habe scripto" ktp.

La estonteco estas klara ankaŭ el esprimoj kiel "en futuro", aŭ oni uzas helpverbojn **vel, debe, ir**: me vel ama, me debe ama, me i ama. Imperativo aŭ optativo havas formon prezencan, enkondukitan per formoj kiel **si, que, ut** k.a.

Pasivon oni formas helpe de **es** kaj de pasinta participo finiĝanta per **-to**: filio es amato ab matre, homine es creato forte, sed oni povas la pasivan formon eviti per ĉirkaŭskribo: Laudatus > qui aliquis lauda. Aktiva participo finiĝas per **-nte**: amante, scribente, sed oni povas ĝin anstataŭigi per analizaj formoj: Plures adorant solem occidentem quam orientem > plures adora sole que ori, quam dum cade. Ankaŭ gerundion oni povas taŭge ĉirkaŭskribi: docendo discitur > homo dum doce, disce / qui doce, disce.

Adverboj ekestas el adjektivoj per aldono de esprimoj "cum mente", "in modo": cum mente diligente /in modo diligente, in modo fraterne. Eblas ankaŭ konservi la adjektivan formon: fortiter in re, suaviter in modo > nos debe es forte in re, suave in modo.

Gramatikaj vortoj estas transprenitaj el la Latina: ab, ante, aut, circa, contra, cum, de, ex, in, per, pro, sine, supra, aut, et, jam, non, nam, dum, quando, satis, semper, si, tamen, ut...

Vortordo ne estas preskribita, sed logika estas subjekto – predikato – objekto, verbo tamen povas stari antaŭ la subjekto, se ĝi estas reliefigita aŭ se la frazo komencas per adverbialo. Adverboj sekvas normale post la verbo kaj adjektivoj post la substantivo. La kongruo inter verbo kaj subjekto en persono kaj numero ne estas esprimita.

Vortprovizo direktiĝas laŭ tio, ke ekzistas ege malmultaj gramatikaj reguloj, do la sama radiko povas servi kiel substantivo aŭ kiel verbo sen ŝanĝo aŭ nur kun minimumaj ŝanĝoj, adverbo havas la saman formon kiel adjektivo ktp. La vortkreado uzas afiksojn, kiuj malsame al Esperanto ne havas precizan semantikan valoron. La plej uzataj estas:

ab-: abdicazione, aberratione, **auto-**: automobile, **co-**: cooperatore, cognitione, **dis-**: dismembra, discussione, **in-**: inhabilitate, **inter-**: interacto, **re-**: reexamina, relatione, **sub-**: subterraneo, **super-**: supersigno, **-ismo**: conformismo, **-ido**: splendido, lucido, **-ano**: americano, italiano, **-ore**: calore, professore, **-tore**: factore, actore, **-tate**: specialitate, **-tione**: declaratione

Ankaŭ la derivadon oni povas eviti per taŭga sintaksaĵo: littera finale >littera in fine, stabile >que sta, coquina >loco pro coque, caseina >extracto de caseo.

Specimeno de teksto:

(Szilágyi, D. : Versus interlinguistica, Milano, Schola et vita 1931, p. 3):

Differentia importante inter "linguas naturale" et "interlinguas" consiste in illo facto, quod idiomas naturale es formato inconsciente, dum linguas artificiale es producto consciente. Isto perspectiva genetico redde possibile separatione satis claro, et indica etiam ratione de separatione. Nam es probabile, quod, fungente in actione consciente et inconsciente, es identico, sed solum in luce de conscientia nos pote observa illos in modo immediato. Per conceptiones descriptivo, es difficile, si non impossibile, tale separatione, nam, per exemplo, esperanto hodie non differ plus, in modo essenziale, de linguas nationale, sed certo non es tale.

Pritakso kaj informoj:

La lingvo Latino sine flexione (la aŭtoro uzas la ĝeneralan nomon "la Latina sen fleksio", kiun oni tamen ĉiam citas en originala formo "Latino sine flexione" aŭ "Interlingua"), estas envicigata inter naturalismajn projektojn, sed, malsame kiel ekz. Occidental, ĝi eliras rekte el la Latina fonto, ne el la etnaj latinidaj planlingvoj. La ideo de la aŭtoro estas, ke minimumigo de la gramatiko helpas dum la lingvostudado, ĉar la kulturaj lingvoj estas trogramatigitaj. Ekz. la frazo: Du onkloj venis hieraŭ. Du estas pli ol unu, oni do ne bezonas pluralan formon, hieraŭ signifas pasintecon, do oni ne bezonas ĝin esprimi verbe. Tiamaniere oni povas redukti la tutan gramatikon, ekz. gerundion aŭ konjunktivojn oni povas anstataŭigi per ĉirkaŭskriboj, kunmetaĵojn oni povas eviti. Por la adepto de la lingvo sufiĉas posedi latinan vortaron, kiuj, kiel konate, ekzistas abunde kaj preskaŭ en ĉiuj lingvoj. Por tiuj, kiuj jam havas antaŭajn konojn de lingvo, estas Latino sine flexione trivialaĵo. Tamen oni riproĉas al la projekto lezadon de principoj de lingvoekonomio, ĉar ĝi konservas ekz. la latinan negacian prefikson **in-** ankaŭ en fonetike asimilita formo **im-** (inhabilitate — immortale), sinonimecon de kelkaj afiksoj kaj simile.

Oni devas mencii, ke malsame al Volapük kaj Esperanto, kiuj estis en 1903 jam konataj kaj flegataj, estis celoj de la projekto Latino sine flexione pli sobraj, ne temis pri movado kun noblaj ideoj de

unuigo de la homaro kun flago, simboloj, himno ktp. La celo estis doni al sciencistoj kaj verkistoj facilan lingvon, en kiu ili povus transdoni al si necesajn informojn internacivele. Zamenhof ekzemple tradukis en Esperanton multajn specimenojn de monda literaturo kaj skribis en sia lingvo patetikajn poemojn, celante egaligi ĝin al etnaj lingvoj. En Latino sine flexione ne temis pri artaj tekstoj — tiuj ja povas esti skribataj en la Latina mem, sed pri sobra kaj logika lingvo de fakaj informoj de la moderna civilizo. Bedaŭrinde, ĝuste tiu aspekto de la projekto estas preterrigardata de kritikistoj.

Giuseppe Peano estis profesoro de matematiko en la torina universitato kaj li publikigis multajn sciencajn verkojn pri matematiko kaj logiko en la Latina kaj en la Itala. En 1891 fondis Peano revuon "Revista di mathematica", en kiu li publikigis rezultojn de siaj esploroj. En 1903 eldonis L. Couturat kelkajn france skribitajn verkojn de Leibniz pri faciligo de la Latina por internacia uzo. La verko tuj kaptis intereson de Peano. Li publikigis en "Revista di mathematica" artikolon "De latino sine flexione" skribitan ankoraŭ en la korekta Latina, en kiu krom la informoj pri jam ekzistantaj latinidaj projektoj disvolviĝas ankaŭ pripensoj tuŝantaj unuopajn gramatikajn kategoriojn kaj eblojn de ilia reduktigo. En la scienca artikolo "Principio de permanentia" en la sama revuo estas Latino sine flexione jam praktike uzita kaj en 1908 eldoniĝis publikaĵo "Formulario mathematico", pruvanta, ke oni povas la simpligitan Latinan senprobleme uzi por sciencaj celoj.

En "Revista di mathematica" aperis poste tuta serio da artikoloj en la Latina sen fleksio de diversaj aŭtoroj. "Vocabulario commune ad linguas de Europa" de Peano aperis en 1909. En 1913 kaj 1915 ĝi estis kompletigita — la lasta versio enhavas 14 000 radikojn en 5-10 hindeŭropaj lingvoj kun etimologiaj rimarkoj. En la jaro 1924 publikigis Peano historie komparan studon pri interlingvistiko "Interlingua", kiu estis multfoje reeldonita. La moderna lingvistiko aprezas Peano-n kiel pioniron de matematika lingvistiko, kiu uzis la Latinan por krei lingvomodelon.

Peano iĝis en 1909 direktoro de la iama volapükista akademio, kiu post Idiom Neutral akceptis Latino sine flexione sub la nomo "Interlingua". Ĝi estis sistemo racia kaj alirebla por ĉiuj, kiuj havis antaŭkonojn de la latina lingvo. Ĝi ne celis esti lingvo por popolamasoj, sed por rapida transdono de sciencaj informoj. La oficiala organo de la akademio, revuo "Schola et Vita" publikigis dum sia ekzisto ĉ. 5000 paĝojn da fakaj tekstoj en Latino sine flexione. La akademio poste favoris ankaŭ aliajn sistemojn, celante pli vastan lingvouzon. La uzado de Latino sine flexione verŝajne ĉesis en la sesdekaj jaroj. Sesdek jaroj de ĝia vivo tamen sciigas nin, ke la multnombraj klopodoj simpligi la latinan gramatikon ripetiĝas en la historio pli aŭ malpli sukcese. Jen la kaŭzo pripensi, ĉu tie ne estus vojo racie eluzi la Latinan almenaŭ en la sfero de sciencaj informoj.

5.5 Occidental (Edgar De Wahl, 1922)

Alfabeto : a, b, c /c,k/, d, e, f, g /g, ĵ/, h, ch /ĥ, ĉ/, i, j /ĵ/, k, l, l' /lj/, m, n, o, p, q, r, s /z/, sh /ŝ/, t, u, v, w /ul/, x, y, z, zz /c/.

Krom la neregula prononcado ekzistas neregula akcento, plejparte sur la vokalo antaŭ la lasta konsonanto, sed tio ne validas por la pluralfinaĵo -s: families, professores. Finaĵoj -bil, -ic, -im, -men, -il, -ul -um estas ĉiam senakcentaj. Iam estas la akcento vortkomence: ocul, opium, iam ĝi markiĝas skribe: heroé, café. La ortografio estas sufiĉe libera, oni rajtas skribi konsonantojn simplajn kaj duoblajn (corespondent — correspondent, diferentie — differentie), krom la kazoj, kiam la duobligo estas fonologia: cane = hundo, canne = kano, case = kazo, casse = kaso).

Artikolo: nedifina un por ĉiuj tri genroj en singularo, difina li por ĉiuj genroj en ambaŭ numeroj, kun prepozicioj kuniĝanta en al, del.

Substantivoj havas nur naturan genron kun finaĵoj -o, -a: filio — filia, cavallo — cavalla. Iuj

substantivoj finiĝas per -e: fratre, centrale. Abstraktoj finiĝas per -u: bonu/lu bon. Pluralo havas finaĵon -s: fratres, filias, cavallos.

Adjektivoj ne ŝanĝiĝas en genro kaj numero, finiĝante aŭ per konsonanto aŭ per -i, -e: regulari, felici, pie, varie.

Deklinacio: li bon matre, del bon matre, al bon matre, li bon matre, bon matre!

Ceteraj kazoj prepoziciaj.

Komparado: komparativo plu, minu, superlativo max, minst.

Pronomoj personaj: yo, tu, il, illa, it, noi, vu, les

posesivaj: mi, tui, su, nor, vor. lor

demonstrativaj: ti, tic, ti sam, tal, to

demandaj kaj relativaj: qui, quo, quel, qual, quant

ĝeneralaj kaj negaciaj: on, alqui, alcun, aquel, alquo, aliquos, nequi, nequo, necun, null, nequam, nequant, pluri, mult, poc, cert, mani, tut

Numeraloj bazaj: un, du, tri, quar, quin, six, set, ot, non, deci, decidun... duant, triant, quarant ...cent, mil

ordaj havas sufikson -esim: unesim, duesim, triesim...

obligaj -(i)plic: uniplic, duplic...

araj: unité, pare, trien, quaren...

dividaj: du e du, quar e quar

Verboj: infinitivo finiĝas per -ar, -er, -ir (amar, star, videar, audir), prezenco estas radiko sen finaĵo -r: yo ama, sta, vide, audi. Imperfekto finiĝas per -t: yo amat, stat, videt, audit. Futuro: **va** + infinitivo: yo va amar. Kondicionalo: **vell** + infin.: yo vell amar. Imperativo: **ples** + infin. : ples amar, ples vider. Optativo: **mey** + infinitivo: mey amar! Participo prezenca finiĝas per -nt: amant, vident, audient, part. perf. je -t: amat, videt. Perfekto: **ha** + part. perf. : yo ha amat. Pluskvamperfekto: **va** + **har** + part. perf. : yo vell har amat.

Pasivo formiĝas helpe de la verbo **esser** + part. perf: yo es amat, yo esset amat, yo va esser amat, yo vell esser amat..., aŭ helpe de partiklo **se**: li dom se constructe, li cose se explica simplicmen. Se oni devas diskonigi aktivecon kaj pasivecon, oni uzas helpvortojn **ea**, **sta**: li dom ea constructet = la domo estas konstruata, li dom sta constructet = la domo estas konstruita, li dom eat constructet = la domo estis konstruata, li dom stat constructet = la domo estis konstruita.

Adverboj formiĝas el adjektivoj per sufikso -men: prudentmen, simplicmen, el substantivoj per sufikso -li: partli, preferli, finli. Anstataŭ adverbo uzeblas adjektivo: illa canta bel, bon. Adverbojn oni uzas ankaŭ kun prepozicioj: in general, in fine, in nocte, ye occasion.

Prepozicioj uzatas kun nominativo de substantivoj, pronomoj havas prepozician kazon. Prepozicioj

kaj konjunkcioj estas latindevenaj: ad, con, de, ex, in, sine, nam, tamen, ergo, quasi, etsi ...

Vortordo estas libervola, eblas duobla negacio. Demanda frazo komencas per **esque**.

Vortprovizo plivastiĝas helpe de afiksoj, ekz. **des-**: desfacil, **in-**: ínutil, ínregulari, **pre-**: prejudice, preponderant, **re-**: repreneur, reform, **-ero**: laborero, barbero, **-és**: Anglés, Londonés, **-essa**: princessa, **-ità**: bonità, regularità, **-isar**: idealisar, realisar, **-ade**: boccade, manuade, **-age**: foliage, boscaje, **-ia**: dormitoria, Francia.

Specimeno de teksto

(Pigal: Occidental, die Weltsprache, Stuttgart, Franck 1930, p. 180)

In supra yo volet monstrar, que si on vole constructer un lingue secun rationalistic principies e ne conform al existent psychic natur human, on deve unesimli transformar li psychic natur de homes por far posibli li function de un tal lingue. Si on vole p. ex. mechanisar li lingue, quam cert mundilinguistes aspira, on deve anc mechanisar li homan psyche. Nu, in li sam modo, un lingue ne posse esser vivicapabil, si it es constructet de pur gramatical vidpunctus, abstraente e renunciante del social conditiones e cultural, historic e estetic valores.

Pritakso kaj informoj:

La plej karakteriza signo de Occidental estas strebo pri naturaj formoj ekzistantaj ankaŭ en etnolingvoj, do plej eble granda naturalismo. La vorprovizo baziĝas plejparte sur la latina leksiko, respektante internaciecon, kaj en la dubaj kazoj, do se neekzistas la komuna formo, estas preferata la latina vorto. La ortografio strebas konservi ekzistantan aspekton (curt, chambre, distinyer), tiel ke iam eblas du skribmanieroj (aconosser — acconosser, aquisiter — acquisiter). Kelkaj afiksoj estas interŝanĝeblaj (-ario, -ero, -ist): secretario, secretero, dentero, dentist, eblas do sinonimoj. Kontraŭante la opiniojn de defendantoj de aŭtonomaj principoj, laŭ kiuj la adepto de internacia lingvo ne devas koni eŭropajn lingvojn, Occidental supozas tiajn konojn, ekz. la prepozicio **in** estas uzebla kiel prefikso, sed oni povas misinterpreti ĝin kiel negacian **in-**: inscrit = enskribo, enskribita, kontraŭ inscrit = neskribita.

De Wahl fundis sian projekton sur la fleksia lingvotipo kaj starigis firmajn principojn:

(1) Se post forigo de la gramatika finaĵo -r, -er finiĝas la radiko per vokalo, oni aldonu -t- aŭ ŝanĝu -y- en -t-: crear — creat — creator, creation, creatura ; expedir — expedit — expedition, expeditor, expeditiv ; instituer — institut — institution, institutor.

(2) Se la fina konsonanto de la radiko devus esti -d aŭ -r, ĝi ŝanĝiĝu en -s: exploder — explos — explosion, explosiv; adherer — adhes — adhesion, adhesiv; curren — curs — cursor, cursiv, excursion.

(3) En ĉiuj aliaj kazoj per forigo de infinitiva finaĵo -r, -er ekestas radiko de perfekto.

La gramatiko de Occidental estas kritikata pro multaj esceptoj, ĝiaj afiksoj kaj radikoj pro multsignifo. Ekz. "visibil" estas derivita de "vider" laŭ la regulo n. 2: post forpreno de -r restas "vide-", oni do forigu ankaŭ -e- kaj ŝanĝu -d- en -s-. Nun la radiko finiĝas per konsonanto, tial aldoniĝas -i-. Alia ekzemplo: la sufikso -ion signifas agadon aŭ agadrezulton. Oni aldonas ĝin ekz. al la radiko "destrukt-" post forigo de la infinitiva -er (destrukter — destruktio), alie ĝi havas formon -tion (constituer — constitution). La multsignifon de afiksoj defendas la aŭtoro mem, ĉar la

lingvouzantoj ja pli ŝatas analogion ol logikon. Ekz. la sufikso -erie signifas profesion, sed ankaŭ varon (vitrerie = vitraĵaro) kaj econ (galanterie, bigotterie, diabolerie). La signifo de afiksoj plivastiĝas aŭ malplivastiĝas dum la lingvouzado — do la vortoj kiel destination, rotation, construction, direction, redaction, civilization, delegation havas ofte multe pli vastan signifon ol "agado, agandrezulto". Pleonasmaj finaĵoj, kiuj ekz. en Esperanto servas por diskonigo de verbospecoj, ne estas devigaj en Occidental: kelkaj substantivoj finiĝas per -e, aliaj je konsonanto (dom, parol, regul) aŭ -o (socio), kiu povas ŝanĝiĝi en -a/-e (società, societé), do la laikulo nekonanta la originan formon de la vorto malfacile diskonas la vortspecojn.

Edgar de Wahl prilaboradis sian projekton dum trideko da jaroj, li ankaŭ apartenis al reformantoj de Esperanto. En sia libro "Spiritu de Occidental" (Cheseaux, Occidental institute 1938) li konatigas al siaj legantoj evoluon de la projekto ekde 1887 ĝis 1922 kaj ĉiajn postajn ŝanĝojn. Haveblas eĉ paralelaj tekstoj en du evoluetapoj el 1909 kaj 1938. De Wahl kaj liaj posteuloj kelkfoje ŝanĝis partojn de la projekto kaj mem ĝian nomon oni en 1946 pro politikaj kialoj ŝanĝis en "Interlingue".

La kvindekaj jaroj estis flortempo de Occidental. Aro da periodaĵoj aperadis ankoraŭ antaŭ nelonge. Ni nomu Cosmoglottic ekde 1982, Europa ekde 1976, Exon ekde 1959, Interlingue Forum 1980, Interlingue Information 1950, Interlinguist London 1934, Novas in Interlingue 1950, Ucitel svétomluy 1930, Voce del Ost 1957, Almanac International 1951, Interling 1964, Voce de Est Europa e Orient 1968 kaj aliajn. Konatas dudeko da vortaroj en diversaj eŭropaj lingvoj, trideko da plurlingvaj vortaroj, ekz. la oklingva "Radicularium" en Occidental, la Hispana, la Portugala, la Angla, la Franca, la Germana, la Itala kaj la Rusa, sed ankaŭ tiu de Occidental-Esperanto-Ido.

Multajn diskutojn kaj disputojn publikigis monata revuo, "Kosmoglott", fondita 1922, alinomita 1927 "Cosmoglotta", kiu iĝis oficiala organo de "Occidental Union", en la kvindekaj jaroj alinomita "Interlingue Union". Kiel aldono de la oktobra numero 1957 estis publikita broŝuro "Li defectes inacceptabil de Interlingua de Gode" kun detala analizo de "eraroj", kiujn faris Gode en sia lingvoprojekto, kaj kun defendo de Interlingue/Occidental kontraŭ la nova konkurenco. Ambaŭ sistemoj estas tre similaj, kiel montras la paralelaj tekstoj.

Alphonse Matejka, vivanta en La Chaux-de-Fonds, estas aŭtoro de multaj lernolibroj de Occidental, fervora tradukisto kaj ĝis 1985 redaktoro de la revuo "Kosmoglott". En Svislando aperadis ankoraŭ antaŭ nelonge "Li gimnasiast", revuo de la benediktina gimnazio en Dissentis-Mustér, kie estis Occidental instruata kiel propedeŭtikaĵo. En "oraj tempoj" de Occidental havis nur ĝia svisa grupo pli ol 300 membrojn. Fine de la kvindekaj jaroj ekzistis fortaj grupoj ankaŭ en Svedio, Germanio, Anglio, Francio, Italio, Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Danlando. La nuntempa publikiga aktivado en Occidental ne plu estas grava. En la historio de interlingvistiko estas tiu ĉi projekto tamen grava, reprezentante prototipon de la naturalisma planlingvo.

5.6 Novial (Otto Jespersen, 1928)

Alfabeto: a, b, d, e, f, g /g, ĝ/, h, i, j /j/, k, l, n, m, o, p, q, r, s, t, u, v, x, y /j/.

La alfabeto ne enhavas **c** kaj **z**, kies prononco estas problemhava. Ili ekzistas en propraj nomoj kaj en kemia terminologio. Duobligo de konsonantoj ne eblas. La akcento estas sur la antaŭlasta silabo.

Artikolo: nedifina **un** por ĉiuj tri genroj en singularo, difina **le** por ĉiuj genroj kaj ambaŭ numeroj.

Substantivoj havas genron nedifinan, viran kaj inan: artiste = artisto sen distingo de sekso, artista = artistino. Simile: fratre — fratro — fratra, home — homo — homa, infante — infanto — infanta. Abstraktaj substantivoj finiĝas per **-um**: li bonum, li novum. Pluralo finiĝas per **-s**: onkles, onklos, onklas. Krom regulaj substantivoj ekzistas sinonimoj, ekz. matra apud patra, fema

apud vira ktp. Same kiel nedifina genro ekzistas nedifina numero, formiĝanta per forigo de finaĵo, ekz. hom = viro kaj virino, aŭ viroj kaj virinoj, aŭ viroj, aŭ virinoj. Ĉiuj kazoj estas prepoziciaj krom nominativo, genitivo (finaĵo **-n**) kaj akuzativo, egala al nominativo kaj staranta ĉiam post la verbo.

Adjektivoj estas neŝanĝeblaj kaj ilia pozicio estas libervola: natural formes, forme natural. Nur anafore staranta adjektivo sen substantivo havas finaĵon **-i** kaj formas pluralon je **-is**: hir es du roses, li blanki es bel, vu prefera li blankis.

Komparado: komparativo: plu boni kam, min boni kam, tam boni kam, superlativo: li maxim (minim) boni inter...Same adverboj.

Pronomoj personaj: me, vu, le, lo, la, lu, nus, vus, les, los, las, lus

posesivaj: men, vun, len, lon, lan, nusen, vusen, lesen, losen, lasen

demonstrativaj: ti, disi, tali, tanti, sami, self

demandaj: qui, que, quand, quali, quanti, quantum

Numeraloj bazaj: uni, du, tri, quar, sink, six, sep, ok nin, dek, sent, mil. La dekoj havas sufikson -anti: duanti, trianti, quaranti, sinkanti, sixanti, sepanti, okanti, ninanti. Ili estas substantivigeblaj helpe de finaĵo **-o**: duo, trio, quaro... Ordaj numeraloj havas sufikson **-esmi**: unesmi, sinkesmi..., dividaj **-opim**: triopim, quaropim. Frakcioj: duime, trime, sixtime.

Verboj: infinitivo ne havas fiksan finaĵon (ama, protekta, konstitu, es, mari) kaj havas anglecan partiklon **tu**: tu lekte es plu fasil kam tu parla. La radiko estas samtempe prezenca formo, neŝanĝebla en persono kaj numero (me ama, lo protekte), sen pronomo ĝi servas kiel imperativo (ve-ni!). Konjunktivo-hortativo havas partiklon **let**: let nus starta, let on pensa kom on vol. Optativo havas partiklon **mey**: mey lo viva longitem!

Imperfekto formiĝas helpe de finaĵo **-d**: me amad, vu esed, la marid, sed ankaŭ analize helpe de **did**: me did ama, lo did estima. Perfekto: ha + infinitivo Pluskvamperfekto: had + infinitivo

Futuro: sal + infinitivo, ve + infinitivo. Futuro II: sal + ha + infinitivo.

Participo prezenca havas finaĵon **-nt**: amant, fluent, participio perfekta pasiva finiĝas per **-t**: amat, marit. Ĉe ambaŭ participoj eblas substantivaj kaj adjektivaj finaĵoj **-i**, **-e**, **-a**, **-o**: men amata, amanti fema, amanto, marito k.a.

Pasivo: bli + infinitivo: me bli protekte, me blid protekte, me ha bli protekte, me had bli protekte, me sal bli protekte, me sal ha bli protekte, me vud bli protekte, me vud ha bli protekte.

Adverboj, konjunkcioj, prepozicioj: devenas el la Latina, parte el aliaj eŭropaj lingvoj: anke, ankore, preske, apene, erste, jus, sat, tro.

Vortordo estas fiksa (subjekto – verbo – objekto), demanda frazo komencas per "qui" aŭ ĝia nedeklinaciebla formo (que, quo, qua, quum, pro quum), aŭ per "ob" en la senco de "ĉu": Ob tum non fita belisim? Negacio estas **no**.

Vortprovizo plivastiĝas helpe de afiksoj, inter ili la plej gravaj estas: **pre-**: prehistorio, previda, **anti-**: antimilitarisme, **non-**:nonreal, nonposibli, **dis-**: disdona, distranĉa, **mal-**: malhumorosi, **ri-**:

rielekte, riskripte. Substantivigaj: **-o:** komensao, odorao, **-eso:** vereso, riĉeso, **-ione:** komunikatione, **-um:** fabrikatum, kopiatum, **-ilo:** ludilo, ornilo, **-iste:** dentiste, okuliste, Adjektivigaj: **-al:** universal, national, **-an:** urban, akademian, **-osi:** kurajosi, porosi, **-bli:** lektebli, audibli. Adverbigaj: **-foy:** difoy, chakifoy, **-lok:** omniloc, nuliloc, **-kas:** omnikas, irgikas, **-man:** omniman, altriman.

Specimeno de teksto

(Jespersen, Eine internationale Sprache, Heidelberg 1928, p. 138):

Un objetione kel bli ofte fa konter konstruktet lingues es ke les pove nulitem es tam boni kam li natur-lingues. Es ver ke Novial non es tam richi kam anglum, non tam eleganti kam fransum, non tam vigorosi kam germanum, non tam beli kam italianum, non tam nuansosi kam rusum, non tam hemali kam nusen patriali lingue. Ma merka bonim, ke omni ti boni qualesos, kel on prisa e lauda in li nationali lingues, bli trova kand indijenes parla o skripte les. E li interlingue pove tre facilim es plu richi kam anglum parlat da frans, plu eleganti kam fransum parlat da dane, plu vigorosi kam li germanum de kelki italianes.

Pritakso kaj informoj

"Novial" estas mallongigo por "Nov International Auxiliari Lingue", kies aŭtoro estas dana lingvisto Otto Jespersen. Lia scienca aŭtoritato helpis la agnoskon de la projekto. En la citita lernolibro li detale klarigas sciencajn principojn krei internacian lingvon surbaze de la plej granda internacieco: la fonetiko ne enhavu malfacile artikuleblajn sonojn, tial Novial ne havas ekz. nazalojn kaj rondigitajn vokalojn, kiuj ne ekzistas en la Rusa aŭ en la Itala, mankas palatalaj konsonantoj malfacilaj por germanoj kaj angloj ktp. Ankaŭ la ortografio estas facila, fonetika. Al tiu intenca facileco estis oferita grafemo **c** — formoj kiel klasa, kronika, bank, koridor, fabrika, kolosal, sivil, sigar, bisiklet, sentie, sesa k. s. donas similan impreson kiel ekz. la transliterado de la Latina en la Grekan.

Jespersen kiel membro de "Délégation pour l'adoption d'une langue auxiliaire" kaj kiel estro de la Akademio de Ido tre bone konis la strukturon de la ekzistantaj internaciaj lingvoj kaj en siaj publikaĵoj li forigadis diversajn kontraŭargumentojn de apogantoj de aliaj sistemoj. Lia ĉefa devizo estis maksimuma simpleco de gramatiko, tamen li ne akceptis aprioran solvon, kiel ekz. Zamenhof ĉe korelativoj, sed li restis sur la nivelo de gramatiko de eŭropaj lingvoj, formitaj sur la latina bazo. Jespersen mencias, ke la pronomoj kaj granda parto de verboj estas en etnolingvoj malregulaj, sed ili reguliĝas dum historia evoluo. Analizan konjugacion li opinias superrigardebla kaj logika, tial li krom la normalaj, ankaŭ en la Latina uzitaj helpverboj, helpprenas ankaŭ formojn **sal** kaj **vud**, en kiuj tamen ne plu sentiĝas la latinaj solere kaj velle, sed iom neorganike agantaj anglismoj, same kiel en la pasivaj danecaj formoj kun **bli**.

La vortprovizo montras konojn de Esperanto, el kiu estas transprenataj kelkaj afiksoj, kaj strebon pri granda internacieco. En kelkaj kazoj preferas la aŭtoro nelatinidajn radikojn tie, kie Esperanto, Occidental kaj Ido havas ilin (klema, darfe, even, erste). Li atentigas al du eblojn inrerpreti iujn vortojn, aspektantajn ŝajne kiel kunmetaĵoj (probabli = probabla, ne "pruvebla", seriosi = serioza, ne "seriario", posibli = ebla, ne "metebbla", parfuma = parfumo, ne "trafumi"). Novial do tamen havas la samajn problemojn, kiuj troviĝas ankaŭ en Esperanto: se oni ne konas la originalan, plejparte latinan vortradikon, oni povas misinterpreti la vorton.

En 1930 eldonis Jespersen kvarlingvan vortaron (Novial-anglan-francan-germanan), en kies antaŭparolo li atentigas pri la malfacielco krei optimuman sistemon kaj li aldonas certajn ŝanĝojn, precipe en la vortprovizo: anstataŭ vorte, sep, ok, monate li preferas vorde, set, ot, mensu, ĉe la

sufiksoj li elektas inter -ntia (konvalescentia, inteligentia, presentia) kaj -itate (felisitate, sinsertate) kaj ĉe adverboj li enkondukas formojn sen la finaĵo -im (tot nudi, tal-nomat, extrem facil, bon konstruktet). En 1934 estis en Novial enkondukitaj kelkaj pluraj ŝanĝoj — la aŭtoro mem opiniis, ke la taŭgeco de la jena aŭ alia formo pruviĝos dum lingvouzo, kiel ja normalas en lingvopraktiko. Apud la verboformo **sal** do aperas ankaŭ **ve**, en imperfekto **ved** (lo dikted ke lo ved veni), antaŭ la sufikso **-iv-** estas uzata **-t-**, samkiel antaŭ la sufikso **-ion-e**, se la baza vorto finiĝas per -a, -i, -o (afirmativ, demonstrativ, signifativ), kio ja estas latinigo de la formoj. Apud la sufikso **-er-e** uzatas **-tor-e** (diktatore, kolaboratore, elevatore, transformatore) kaj la Esperanta sufikso **-il-** malaperas. En la ortografion eniras la longe kritikata **c**. Antaŭ a, o, u do eblas skribi **k** aŭ **c** (kosmopoliti — cosmopoliti), kio estas plua paŝo al romanigo.

Onidire havas Novial multajn elementojn komunajn kun Ido. Novaĵo estas distingo de genroj helpe de -e, -o, -a, kiuj donas grandajn eblojn al la rekta derivado kaj orientigas la sistemon al aprioraj principoj. Aliflanke, certa libereco en vortfarado kaj multeco da afiksoj kun simila signifo (-ere, -iste, -tore) ebligas kreadon de sinonimoj, kio estas direktiĝo al la naturalismo. Ankaŭ pluralo je -s kaj uzado de helpverboj envicigas Novial pli al naturalismaj sistemoj. Jespersen estis respektata lingvistika aŭtoritato kaj li mem interesiĝis pri interŝanĝo de opinioj kun aliaj interlingvistoj, ekzemple li modele science diskutis kun Edgar de Wahl, aŭtoro de Occidental, komparante ambaŭ sistemojn kaj serĉante taŭgan solvon.

5.7 Interlingua (Alexander Gode, 1952)

Alfabeto: a, b, c, ch, d, e, f, g, h, i, j, k, l, m, n, o, p, q, r, s, t, u, v, w, x, y, z

La vortprovizo konservas originan formon kaj prononcon, kelkaj vortoj (precipe el nelatinaj alfabetoj) estas transliterataj, ekz. bureau, kimono, koran, sputnik. La akcento estas natura, ofte sur la antaŭlasta silabo.

Artikolo: nedifina **un** por ĉiuj tri genroj en singularo, difina **le** por ĉiuj genroj kaj ambaŭ numeroj, kun prepozicioj **de**, **a** ĝi sonas **del**, **al**.

Substantivoj diferencigas kelkajn femininojn per la finaĵo **-a**: asino — asina, oco — oca, cicinio — cicina. La substantivaj finaĵoj ne estas ĝenerale fiksjaj : homine, tabula, fructo, uxor, galon, matre, obra. Pluralo havas finaĵon **-s**, post konsonanto **-es**, sed ne tie, kie estas **-s** jam en singularo : un guardacostas — duo guardacostas, un paracolpos — duo paracolpos. La fina **-c** en pluralo ŝangiĝas en **-ch**: un zinc — duo zinches. Ekzistas ankaŭ pluralo neregula: le lied — le lieder, le addendum — le addenda.

Adjektivoj ne havas fiksjajn finaĵojn: hibernal, literari, proprie, puera, cyclic, fresc, religiose, american, nederlandese. La substantivo povas ankaŭ havi adjektivan funkcion. Komparado estas regula, sed ekzistas latinidaj neregulaĵoj: magne — plus magne = major — le plus magne = maxime, parve — plus parve = minor -le plus parve = minime. Malan signifon al la partikloj plus kaj le plus havas minus kaj le minus: minus breve — le minus breve. Adjektivoj ne kongruas kun la substantivo kaj ili povas stari antaŭ aŭ post ĝi.

Personaj pronomoj: io, tu, ille, illa, illo, il, nos, vos, illes, illas, illos. Akuzativo: me, te, le, la, lo, nos, vos, les, las, los.

Posesivaj pronomoj havas plenan formon, starante sole, kaj reduktitan formon antaŭ substantivo kaj adjektivo, krom la ununa persono de pluralo: mi-mie, tu-tue, su-sue, nostre, *vostre*, *lor-lore*.

Numeraloj: un, duo, tres, quatro, cinque, ses, septe, octo, nove, dece ... vinti, trenta ... cento ... mille.

Ordaj numeraloj: prime, secunde, tertie, quart, quinte, sexte, septime, octave, none, decime, ultime. Kelkajn oni formas per sufikso **-esime**: vintesimo, trentesimo ... centesimo, millesimo. Obligaj numeraloj: simple, duple, triple, quadruple ... aŭ: simplice, duplice, triplice.

Kunmetaĵoj derivitaj de numeralo du havas prefikson **bi-**: bimetall, bifurcar, bivariate. Same uzatas grekaj prefiksoj penta-, hexa-, hepta- k. s.

Verboj dividiĝas en tri grupojn, finiĝantaj per -ar, -er, -ir. Infinitivo povas havi funkcion de substantivo. Ne ekzistas personaj finaĵoj, nur tempaj. Participo prezenca finiĝas per **-nte**, antaŭas radika vokalo (-ante, -ente), kiu ŝanĝiĝas ĉe la verboj de la tria kaj ĉe kelkaj de la dua grupo

(-iente). Participo perfekta finiĝas per **-ate**, **-ite** (en la tria verbogrupa ankaŭ je -ite). Prezenca ne havas specialajn finaĵojn, ĝi finiĝas per la lasta infinitiva vokalo, krom la neregulaj verboj *esser*, *haber* kaj *vader*, kiuj konjugaciĝas laŭ la unua silabo de infinitivo.

Neregula verbo **esser** havas pluralon **son** kaj apartan konjunktivon prezencan, kiu servas ankaŭ kiel imperativo. Imperativo egalas al indikativo prezenca sen persona pronomo. Imperfekto finiĝas per **-va**, antaŭiras la lasta infinitiva vokalo. Perfekton kaj pluskvamperfekton oni formas kun helpverbo **haber** kaj participo de perfekto. Futuro finiĝas per akcentita **-á** post la infinitiva formo: *io parlará*, *io viderá*, *io audirá*. Ekzistas ankaŭ proksima futuro "io va crear, nos va vider". Kondicionalo finiĝas per **-ea** post infinitiva formo. Pasivo formiĝas kun helpverbo **esser** kaj participo de perfekto.

inf.: crear, vider, audir

imper.: crea, vide, audi

part.prez.: creante, vidente, audiente

perf.: create, vidite, audite

ind.prez.: io crea, vide, audi

perf.: io ha create, vidite, audite

impf.: io creava, videva, audiva

plkvpf.: io haveva create, vidite, audite

fut. I: io creará, viderá, audirá

fut. II: io habera crete, vidite, audite

kond. prez. : io crearea, viderea, audirea

perf.: io hebera create, vidite, audite

Adverboj estas plejparte latindevenaj: nunc, plus, hic, ibi, aliquanto, semper, aŭ kun sufikso **-mente**: naturalmente, klarmente, veracemente, post la fina **-c -amente**: physic — physicamente.

Gramatikaj vortoj, do prepozicioj, konjunkcioj, partikloj, plensignifaj afiksoj ktp. estas plejparte latinaj: alibi, ante, apud, causa, dum, ergo, etiam, quando, quis, satis, semper, tamen...

Vortordo estas fiksa, ekz. la akuzativo staras antaŭ la tempa verboformo, sed post infinitivo kaj imperativo. Infinitivo sekvas post verboj kiel *cessar*, *deber*, *poter*, *preferer*, *vader*, *voler* kaj post kelkaj apartaj esprimoj. Substantivoj estas senakuzativaj, tial ili objektfunkcie staras post la verbo. Infinitivo, ekz. post la prepozicio **pro** povas havi substantivan funkcion.

Vortprovizo pliriĉiĝas helpe de naturaj afiksoj transprenitaj el etnolingvoj, eventuale el la Latina, ekz. adjektivoj povas havi sufiksojn -al, -il, -ile, -ose, -ic, -in, -ian, -ante, -ual, -estre,

-erne k.a. Malojn oni formas helpe de prefiksoj dis-, in-, un-, latina **con-** havas naturajn variantojn, ekz. consolidation, collection, composition, correlation. Multaj vortoj kreiĝas kun la helpo de latina supino, ekz. constitution, audition, permission. Vulgarlatinaj vortformaj sufiksoj -ion kaj -ment estas produktivaj ankaŭ en Interlingua kaj servas kiel bazo por aldoni plurajn afiksojn: experimental, experimentar, experimentation, experientator, fundamental, fundamentalismo, fundamentalista, national, nationalitate, nationalisar, nationalisation. Pluaj substantivaj sufiksoj estas ekz. -ada, -age, -antia, -entia, -ismo, -ista, -itate, -mento, -ura.

Specimeno de teksto

(Dalton, R., The Anatomy of a Failure, 1992. p. 7., el Gode)

Super su fundo de multiple culturas le humanitate de vintesimo seculo possede un civilisation commun. Iste civilisation corresponde a formas de pensar originalmente disvelopate in le occidente. Quando nos cerca le lingua del civilisation moderne, nos trova su fundamento in li occidente. Sed isto es importante: nos cerca le lingua del civilisation non.national e nos le trova in le vivante tradition associate con le potentia que estava Roma.

Pritakso kaj informoj

Alfabeto de Interlingua estas je unua rigardo tre natura, nehavante diakritikaĵojn (krom la vortoj transprenitaj el la Germana kun "Umlaut") , ĝi do taŭgas ekz. por maŝinskribo. Sed la prononco ne ĉiam estas unueca: vokaloj iam estas duonlongaj, iam mallongaj, grafemoj y kaj w estas iam vokalaj, iam konsonantaj. Iuj fonemoj havas plurajn grafemojn, ekz. /k/ estas skribata kiel k, c, ch, qu, /j/ kiel j aŭ g, /f/ kiel f aŭ ph laŭ la deveno de la koncerna vorto. Nek en transliterado el aliaj alfabetoj estas unueco, oni do povas skribi tzar aŭ car, Jelcin aŭ Yeltzin, zhurnal aŭ jurnal, Jurij aŭ Yuriy, Tschaikowsky aŭ Chaykofsky, Rosija aŭ Rossiya. La akcento kaj prononco plejparte konservas la kutimojn de la lingvo, el kiu la vorto estis transprenita.

Substantivoj kaj adjektivoj ne havas fiksjajn finaĵojn, tial ili ne estas analizeblaj sen kunteksto, ekz. **placer** ne estas verbo, sed substantivo, **mammal** ne estas adjektivo ktp. Ankaŭ la substantiva finaĵo -o (stilo, discuso, texto, transporto) ne estas tuj klarigebla, se ekzistas substantivoj kiel jornal, west, vocal, autor. La lingvo estas riĉa je diversaj formoj, inkluzive sinonimoj, ekz. "tago" estas "die" aŭ "jorno", "adreso" estas "adresse" aŭ "dirrection", "kolo" estas "gorga", "gurgite" aŭ "jugulo" laŭ tio, el kiu lingvo estis la vortoj transprenitaj. Tio havigas grandajn stilistikajn eblojn.

Gopsill (Gopsill, P., 1990) diras: "Interlingua reprezentas komunan denominatoron aŭ prototipon de ĉiuj Romanaj lingvoj. Tiun prototipon oni trovos per detala etimologia studado de vorta familio, en kiu troviĝas la internacia vorto. La vera procedo de prototipa malkovrado tamen interesas serioze nur leksikografon, kiu povas spekti la metodon tiel, kiel ĝin priskribis Gode en la antaŭparolo de sia vortaro. La bazan vorton oni povas trovi en Romanaj lingvoj, menciindas eĉ la Germana kaj la Rusa, kies vortaroj estas parte Romanaj." Tiu ĉi scienca klarigo estas certe tre utila, se la probabla uzonto de Interlingua regas kelkajn Romanajn lingvojn, plus la Rusan kaj la Germanan.

Strebo pri Romana natureco karakterizas ankaŭ la gramatikon de Interlingua: ekzistas artikoloj difina kaj nedifina, ordaj numeraloj havas specialajn radikojn, ekzistas tri neregulaj helpverboj kaj komplekso de verbaj formoj inkluzive la dua futuro kiel en latinidaj lingvoj. Romana komplekso de verbaj formoj tamen formiĝis dum historia evoluo kaj la neregulaĵoj en ĝi havas etimologian klarigon. En Interlingua oni devas lerni, ke ekz. part. prez. akt. de la tria verbgrupo finiĝas per -iente, sed ind. fut. I je -ira kaj part. perf. je -ite. En kelkaj kazoj do helpas nek la konoj de la Latina.

Interlingua estas unuavide komprenebla al la Romanaj parolantoj. La aserto, ke la Interlingua-uzanto interkompreniĝos kun milionoj da Romanaj parolantoj, estas sendube vera. Tamen, aktiva regado de tiu ĉi lingvo (la ĝusta prononco, vortkreado, uzado de prepozicioj kaj verbaj konstrukcioj) estas relative malfacila, eĉ se al la adepto ne mankas latino-Romana (kaj pli ĝenerale okcidenteŭropa) kultura fundo.

Interlingua havas unu privilegion, kiu mankas al aliaj planlingvoj. La finan aspekton ĝi ricevis de Alexander Gode, sed ĝin konscie konstruadis dum kelkaj jaroj kolektivo de lingvistoj, ĝi do estas malsame al la "diletantaj" lingvoj kiel Volapük (kies aŭtoro estis pastro) aŭ Esperanto (la aŭtoro estis kuracisto) aŭ eĉ Latino sine flexione (Peano estis matematikisto) kreaĵo sciencnivela. Kial havis Volapük kaj Esperanto pli da favorantoj ol Interlingua, estas fakto lingvistike neklarigebla.

International Auxiliary Language Association (IALA) kunlaborigadis en la jaroj 1921-1953 dekojn da sciencistoj-specialistoj, kiuj post multaj lingvistikaj studoj kaj eksperimentoj prilaboris kaj elektis el kvar similaj latinid-naturalismaj variantoj tiun de Interlingua kiel la plej taŭgan por internacia komunikado.

La signifon de IALA oni ne povas prijuĝi laŭ sukceso aŭ malsukceso de ĝia fina produkto, Interlingua. Ne necesas kulpigi A. Gode, kiu laŭ iuj kritikistoj iĝis tro aŭtoritata dum la fina prilaborado de la projekto. Tiatempaj tendencoj al lingva naturalismo kaŭzis ekeston de la nova latinido, ju pli riĉa kaj belsona, des malpli regula kaj facila. Tio povas esti klarigebla per orientiĝo de Interlingua al la eŭropa (kaj eŭrope kolonia) intelektularo.

En 1957 fondis Svisoj Ric Berger kaj André Schild organizon Union Mundial pro Interlingua, "un institution pro cooperation international concernant la lingua international Interlingua", kies sidejo estas nuntempe en Danlando. Ĝi havas sian lingvan komisionon, komisionon por akcepto de Interlingva en Eŭropa Komunumo, publikigan servon kaj delegitojn en dudeko da landoj en la mondo. Oficiala revuo estas "Panorama in Interlingua", antaŭe "Currero international". Fine de la kvindekaj jaroj estis Interlingua uzata por sciencaj celoj — oni skribis en ĝi resumojn de prelegoj dum pluraj internaciaj medicinistaj kongresoj. Estas kompreneble, ke la kuracistoj, ĉe kiuj oni supozas la konojn de la Latina, komprenas la fakajn resumojn en Interlingua pli bone ol en la etnolingvo, kiun ili ne studis — jen la ebla kampo de universala uzo de internacia lingvo, kiu tamen supozas ellaboron de klara kaj komprenebla terminologio.

En 1967 estis Interlingua agnoskita ankaŭ kiel taŭga lingvo por internacia terminologio en la internacia organizo "International Standardizing Organization". En Interlingua aperas fakaj artikoloj kaj libroj, precipe pri medicino. Union Mundial pro Interlingua eldonas bibliografiojn de novaj publikaĵoj inkluzive de originala beletro. La nombro de ĝiaj uzantoj estas tamen malpli granda ol ekz. tiu de esperantistoj. Se oni prikonsideras unu el la postuloj pri internacia lingvo ĝian praktikan uzitecon, oni povas pritaksi Interlingva-n pozitive, se oni ne mezuras tiun ĉi uzitecon kvante. Dum la kongresoj de UMI kunvenas ĉ. cento da delegitoj kaj la jarlibro de Interlingua enhavas ĉ. ducent adresojn. Nuntempe aperas sep periodaĵoj: krom la menciita "Panorama" ankaŭ "Actualitates de Interlingua" en Danlando, "Lingua e vita en Britio", "Internovas" en Brazilo, "Voce de Interlingua" en Nederlando, "Unir» en Francio kaj "Biblia", internacia evangelika revuo. Krome aperadas diversaj tajpitaj informiloj kaj bultenoj, ekz. tiu de "Centro de Interlingua" en Novjorko. La plej aktiva aŭtoro, skribanta en Interlingua, estis svisa profesoro pri bildiga edukado Ric Berger, kiu laŭvice aktivis pro Esperanto, Ido, Occidental kaj Interlingua. En originale ilustrita formo li eldonis bonkvalitajn enciklopediajn verkojn, riĉe dokumentitajn (per leteroj, ĵurnalaj artikoloj ktp.), historion de Interlingua "Vade mecum de Interlingua" 1967, "Le problema de una lingua international" 1972 kaj ĝis 1983 la revuon "Revista de Interlingua". Tiuj ĉi faktoj pravas la vivkapablon de Interlingua, kiu ankaŭ ludas gravan rolon en nuntempa interlingvistiko.

5.8 Demandaro

27. Kio estis baza fonto de Volapük kaj la regulo por ĝia vortkreado?
28. Nomu almenaŭ 3 gravajn volapükistojn.
29. Kia estis baza ideo de Ido?
30. Kiu estis aŭtoro de Latino sine flexione kaj kio estis ĝiaj bazaj principoj?
31. Kiuj estis aŭtoroj de Occidental kaj Novial, kia estis ilia baza principo?
32. Kiu estis aŭtoro de Interlingva, kia estas ĝia baza principo kaj praktika uzo?

Pliprofundiga literaturo

Troviĝas detalaj indikoj ĉe la ĵus menciita *Duliĉenko, 1990*. Pri lernolibroj, vortaroj kaj plua informaro rekomendindas literaturo listigita ekz. en bibliografia parto ĉe *Blanke, 1985*. (vidu ĉe 1.2)

Pri Volapük konsultebblas ekz. *Schleyer, J. M.: Volapük die Weltsprache, Iltis, Hildesheim 1982, 136 + 124-paĝa*, kun bibliografio de R. Hauptenthal.

Pri Esperanto *Waringien, G., K. Kalocsay: Plena analiza gramatiko de Esperanto, UEA, Rotterdam 1985, 599-paĝa*.

Pri Ido *Carlevaro, T.: Eseo pri Ido, Studoj, La Chaux-de-Fonds 1976*

Pri Latino sine flexione *Peano, G.: De latino sine flexione, Revista di mathematica 8/1903, p. 74-83*.

Pri Occidental *Wahl, E.: Occidental, Reval, Tallin 1925, 180-paĝa*.

Pri Novial *Jespersen, O.: Eine internationale Sprache, Winter, Heidelberg 1928, 148-paĝa*.

Pri Interlingua *Gopsill, F. P.: International Languages, a Matter for Interlingua, English Interlingua Union, Sheffield 1990, 277-paĝa*.

6. PRAKTIKA UZO DE PLANLINGVOJ SUR LA EKZEMPLO DE ESPERANTO

La prezentitaj planlingvoj celas antaŭ ĉio esti facile akireblaj interkomunikiloj, do "vivaj" lingvoj. Iliaj avantaĝoj povas tamen esti praktike uzeblaj tie, kie la etnolingvoj ne taŭgas precipe pro sia komplikeco. La modela ĥaraktero de planlingvoj igas ilin tre bone aplikeblaj en la kampo de perkomputila lingvoprilaborado kaj kiel lingvomodelo por instruceloj. Se oni komparas etnajn lingvojn, planlingvojn kaj formalajn lingvojn sur la bazaj lingvoniveletoj, oni konstatas, ke la planiteco proksimigas internaciajn lingvojn al la formalaj lingvoj por perkomputila prilaborado:

	<i>formalaj lingvoj</i>	<i>planlingvoj</i>	<i>etnolingvoj</i>
elementaro	simboloj	morfemoj, vortoj	morfemoj, vortoj
fonetiko	ne ekzistas	simpla, regula	komplika, neregula
morfologio	strikta	regula, difinita kom-	parte regula, varia

	difinitaj elementoj	bineblo de elementoj	
sintakso	regula, difinita strukturo	regula, ne limigita strukturo	neregula, nelimi- gita strukturo
semantiko	unusenceco	tendenco al unusenceco	plursenceco
pragmato	la reguloj difinas la uzon	la lingvouzo influas la regulojn	la lingvouzo modifas la regulojn

La praktikan uzon de planlingvo, nome de Esperanto, oni povas observi en la tute konkreta ekzemplo de maŝina lingvoprilaborado.

6.1 Perkomputila tradukado

Perkomputila tradukado estus granda helpo al internacia komunikado, ĉefe al industria dokumentado, do komunikado inter produktantoj, evoluigantoj, vendantoj kaj aĉetantoj, se ĝi funkcius tute fidine. Ĝenerale ankoraŭ ne eblas maŝine traduki beletron, poezion kaj aliajn tekstojn, kies semantika enhavo estas tro multsenca, ĉar la maŝino ne scipovas elekti ĝustan sinonimon aŭ parolturnon kun duobla senco. Por la maŝintradukado do taŭgas precipe fakaj tekstoj kun klara teminologio. Plue, la maŝino devas havi propran programlingvon kaj algoritmon de struktura aŭ leksika transigo, do sistemon, kiun ĝi "komprenas", konsistantan el formuloj eĉ pli komplikaj ol tiuj de la homa lingvo. Por tiaj sistemoj oni povus uzi esprimon "artefarita lingvo" en propra senco. La traduko ĉiam havas tri fazojn: analizon de fontoteksto, transferan fazon kaj sintezon en la celteksto. En la unua fazo estas malvolvita la strukturo de la fontolingvo. En la tria fazo la abstrakta lingva strukturo ricevas sian cellingvon. Dum la transfera fazo devas esti transformita la tuta enhavo kaj forma sistemo de la fontolingvo en tiu de la cellingvo. Tiu ĉi fazo estas dulingva. La analizo de fontolingva teksto ne povas produkti tiomgrade abstraktan reprezentadon, kiu povus esti bazo al la sintezo en iu ajn cellingvo. Ĝenerale praktikataj traduksistemoj, do precipe SYSTRAN, kiujn uzas la Eŭropa Komunumo (alia ĝia traduksistemo, EUROTRA, restis en la stadio de prototipo), scipovas traduki unudirekte, t. e. ekzemple de la Germana al la Angla, aŭ de la Franca al la Angla, aŭ de la Angla al la Germana ktp. Tio signifas, ke se oni volus ellabori funkciantan sistemon nur por tiuj tri lingvoj, oni bezonus kompletajn apartajn tradukprogramojn por ses kombinaĵoj, ĉe kvar lingvoj temas jam pri dekdu kombinaĵoj, ĉe kvin lingvoj pri dudek kombinaĵoj ktp. (laŭ la formulo, ke por n lingvoj bezonatas $n(n-1)$ tradukprogramoj), kio certe ne estas facila kaj malmultekosta solvo. Alia eblo estus uzi ian tradukan interlingvon (**IL**), en kiun oni tradukus ĉiujn fontotekstojn, storus ilin kaj laŭbezone tradukus en la postulatajn celtekstojn. La IL povus transpreni la internan, transferan fazon de la traduko, transigante la informojn al la cellingvoj kaj ne estante specifa por ĉiu lingvoparo. Krom la malaltigo de kombinaĵnombroj (por kvar lingvoj bezonatus ok kombinaĵoj, por kvin lingvoj dek kombinaĵoj, ĉiam do nur n oble 2) ekzistus jenaj avantaĝoj:

- La centra storado en unu lingvo ŝparas la storkapaciton de komputiloj (oni do ne bezonas stori la saman informon en pluraj lingvoj).
- Se estas repostulata teksto en la fontolingvo, eblas la preciza rekunmeto de la originalo.
- Eventualan mistradukon en IL eblus pli rapide korekti kaj aldoni tradukinformon, oni do ne devus korekti en ĉiuj kombinaĵoj, la tradukprogramo do estus pli facile reviziebla kaj plibonigebla.

- La aktualigo, sistemigo, ordigo kaj indeksado de la dokumentoj estas pli facila.

Eĉ kun tia IL la traduko ne estus plene aŭtomata — la transformo de strukturoj el la cellingvo al la IL ĉiam postulas kontrolon, redemandojn ktp. Nur la dua fazo, sintezo en la cellingvo, povas okazi aŭtomate, se la IL estas sufiĉe fidinda. Ankaŭ tie estas la uzo de IL pli praktika — la koncerna specialisto devas koni ĉiam nur la fontolingvon kaj IL, ne plu ĉiujn kombinaĵojn, kien oni volas traduki.

Kiu lingvo do servu kiel IL ? La plej facila estus uzi unu el la postulataj lingvoj, ekzemple la Anglan aŭ alian etnolingvon. Sed ĉe la etnolingvo oni tuj devas barakti kun malreguleco, sinonimeco kaj kun ĉiuj historie ekestintaj kaj konvencie kodigitaj apartaĵoj, ofte mallogikaj. Precipe en la Angla estas malfacile rekoneblaj vortkategorioj, do ĉu ekz. "help" estas substantivo, adjektivo aŭ imperativo, ne klaras ĉiam el kunteksto eĉ por homa leganto, despli por maŝino. Problemhaviga estas la plursenceco, ekz. "with" povas signifi "kun" aŭ "pere de" kaj devas esti koncerne tradukita. Similaj ekzemploj ekzistas en ĉiuj etnolingvoj kaj, malpli, eĉ en planlingvoj. En la tradukado temas pri bildigo de unu lingvosistemo al alia, do pri problemoj de leksika transigo inter tiuj lingvoj. Estas sufiĉe klare, ke la maŝina IL devas esti lingvo preciza, regula, analizebla, klara, do certasence lingvo-modelo. Ĝi devas esti plej eble preciza por minimumigi informaciperdojn kaj plej eble konciza por minimumigi tempoperdon. Kun la celo de pedagogia kaj konsekvenca informacia facileco ja estis konstruataj la planlingvoj. Tiu ĉi intencita facileco havas konsekvencajn avantaĝojn por aŭtomataj lingvorekono, lingvosintezo, dokumentado kaj sekve tradukado. Jen kelkaj gravaj postuloj pri IL:

- ĝi estu sufiĉe riĉa kaj elasta por esprimi sciencajn, politikajn k. aliajn komunikade gravajn ideojn
- ĝi estu esprimiva en terminoj
- la individuaj leksemoj estu bone difineblaj kaj ne ŝanĝiĝu sen kontrolo
- la surfaca strukturo estu regula
- ĝi havu homan interfacon, do estu tuj komprenebla al homoj.

Esperanto sufiĉe bone plenumas la starigitajn kondiĉojn, estante fleksebla kaj esprimiva dank' al sia aglutineco, la vortspecoj estas facile analizeblaj, la signifo de radikoj kaj derivado estas superrigardeblaj kaj grandskale kombineblaj — la leksika fortaĵo krome estas, ke ĉiu vorto inkluzivas ankaŭ multajn gramatikajn informojn en si mem. Oni povas facile generi novajn vortojn. La fleksio kaj aliaj gramatikaĵoj estas senesceptaj, la surfaca strukturo, ortografio kaj sintakso estas regulaj, la lingvo estas facile parolebla kaj komprenebla.

Sed, ĉar Esperanto estas vera lingvo, ankaŭ en ĝi ekzistas eroj, precipe sintaksaj, kiuj ne estas unusence klaraj, ekzemple uzo de la akuzativo en la kazo de tempindikoj povas esti komprenata de la maŝino kiel rekta objekto: Mi legis tutan nokton — Mi legis libron. Plua malklara kazo estas uzado de adjektivo apartenanta al du substantivoj, ekz. "maljunaj virinoj kaj infanoj" — do ĉu maljunaj virinoj kaj maljunaj infanoj?, alia problemeto estas uzado de personaj pronomoj en dependaj frazoj ("Mi deprenis panon de la breto kaj metis ĝin en la tekono." — Kion mi metis, ĉu la panon aŭ ĉu la breton ?). En la frazo kiel "Mi vidis lin sur la ŝipo" ne klaras, ĉu ni ambaŭ, aŭ nur li estis sur la ŝipo ktp, ktp.

Klaras do, ke ankaŭ Esperanton necesas iom "raciigi" por komputilaj bezonoj. Sintakson de Esperanto por perkomputila analizo faris jam en la jaro 1970 Siv Sjögren, celante uzi ĝin por dialogosistemo. Ŝi faris certajn modifojn forigantajn la ambiguecon:

- Ĉiu frazo havis subjekton: vi manĝu, ĝi pluvas.
- Subjekto ĉiam staris antaŭ predikato.
- Akuzativo ne estis uzata por esprimi direkton.
- Post participo ne povis esti komplemento de la predikato.
- Ĝis ne povis esti kaj prepozicio kaj konjunkcio.
- *Al* estis uzebla nur en nereкта objekto.
- Pasiva voĉo uzis ne *de*, sed *fare de*.

En la jaroj 1982-1990 uzadis Esperanton kiel IL nederlanda firmao BSO (Buro voor Systeemontwikkeling) el Utrecht. Ĝi lanĉis esplor-evoluigan projekton DLT (Distributed Language Translation, do "malcentra traduksistemo"), subvenciatan de la nederlanda ministerio pri ekonomiaj aferoj. DLT havis dudekon da konstantaj kunlaborantoj, lingvistojn kaj informadikistojn. La antaŭvidita ebla apliko, kun la konstruo de traduksistemo, estis komplementi videotekstajn retojn por sendado de informoj tiel, ke la uzanto povu legi la necesan informon eĉ en alia lingvo ol tiu, en kiu la sendinto entajpis ĝin. Helpe de speciala DLT-karto eblus do ricevi "unudirekte" informojn tradukitajn el aliaj lingvoj, aŭ eĉ "dudirekte" komuniki informojn internacie uzante la DLT traduksistemon. Aliaj antaŭviditaj ebloj estis internacia konekto de jam ekzistantaj naciaj informsystemoj (kiel BTX en Germanio, Minitel en Francio, Readers Digest en Usono), liverado de subtitoloj por televidaj filmoj (storante la tekston en IL kaj tradukante laŭbezzone), parolsintezo ktp.

Por la celoj de perkomputila tradukado ankaŭ DLT iomete modifis Esperanton, tamen multe malpli ol oni komence antaŭvidis. Oni uzis la rimedojn igantajn IL-frazojn sintakse malambiguaj (problema ne estas ambigueco semantika, sed traduka, kondiĉita de ambaŭ koncernaj lingvoj). Por bona traduksistemo gravas, ke la IL estu normigita ne nur en la gramatiko, sed ankaŭ en la vortaro, tial la tradukvortaro praktike estas unusence difinita terminaro.

La eblecon uzi Esperanton kiel IL dum aŭtomata tradukado de sciencaj tekstoj esploradis inter 1980-1992 la studgrupo de Prof. Hiroshi Katsumori en Chubu Universitato en Japanio. La sistemo CHUESTRA servis por tradukoj de fakaj fizikaj tekstoj inter la Japana kaj la Angla, starigante utiligeblan Esperanto-terminaron pri fiziko kaj aplikata matematiko. Tiel ekestis interlingva "subsistemo", kiun oni povas estonte utiligi por traduko en koncernaj fakoj en aliajn, malpli uzatajn etnolingvojn. CHUESTRA eĉ kombinas du subsistemojn en la sistemo-sendependa maniero, uzante LISP kaj PROLOG. La fina celo estas, kompreneble, plurlingva traduksistemo kaj starigo de pluj terminaroj.

Pliprofundiga literaturo

Legeblas diversaj artikoloj de DLT-anoj, ekz. *Schubert, K.: Inter homo kaj komputilo, en Aktoj de internacia scienca simpozio "Esperanto 100-jara", ELA Vieno, 1994, 249-paĝa, sur la paĝoj 14-30, kun bibliografia indiko de plua pritema literaturo.*

6.2 Parolsintezo

La aŭtomata parolsintezo multe helpas dum analizo de homa parolo. Ju pli oni povas kapti la karakterizojn de homa voĉo kaj formuli ilin per reguloj, des pli sukcesos la maŝina parolo.

La plej malgranda segmento de la parolaĵo estas la parolsono, el parolsonoj konstruiĝas la vortoj. Al la segmentaj elementoj aldoniĝas la t.n. supersegmentaj elementoj kiel melodio, ritmo, dinamika strukturo. El akustika vidpunkto la parolsonoj estas priskribeblaj per siaj spektroj. La spektro

videbligas, kiel la energio de la parolsignalo disdividiĝas inter la diversaj frekvencozonoj laŭ la tempo. Lokaj maksimumoj de la frekvenco nomiĝas formantoj. Vokaloj havas almenaŭ tri formantojn, la konsonantoj parte ne havas formantostukturon. Ĉe aŭtomata parolgenero oni kreas la saman akustikan efekton kiel ĉe homa parolo, sed per malsama maniero. Deklarante, ke Esperanto estas fonetika lingvo, oni komprenas, ke ĉiu litero korespondas al unu sono kaj inverse. Tiel ekzistus 28 fonemoj en Esperanto. Por la aŭtomata sintezo oni tamen estu pli preciza. La sono /ŭ/ aperas nur en diftongo, do /aŭ/, /eŭ/, /oŭ/ kondukas kiel unu fonemo ĉe akcentado, vortdivido ktp. La sama fonemo realiĝas iom alie depende de fonetika ĉirkaŭaĵo pro la akomodigo de parolorganoj, la plej oftaj estas fonologiaj

variantoj de /n/ kaj /k-g/. Ekzistas pli malpli norma prononco de Esperanto, nome tiu, kiu konservas striktan rilaton inter ortografio kaj prononco, distingas inter fonemparoj, skribitaj per malsamaj literoj, kaj estas geografie neŭtrala.

La skribitan Esperanto-tekston eblas transformi en parolon. Sukcese faras tion la sistemo ESPAROL, prilaborita en la Eötvös Loránd Universitato en Budapeŝto sub la gvido de Ilona Koutny. La maŝino konvertas grafemojn en fonemojn, determinas akcentatan silabon, prilaboras la parolsonkodojn uzante la sonsegmentaron kaj la regularon por sonligoj, generas la vicon de la sonsegmentoj, determinas la fraztipon (deklaran, demandan, imperativan), generas intonacion kaj prozodion, regas la sintezilon. El la elmetitaj literoj, ciferoj, interpunkciiloj kaj aliaj karakteroj kutimaj en teksto (kiel %, +, -) generas la komputila programo bone kompreneblan Esperantan parolon tute aŭtomate, sen homa interveno. La konverto de grafemoj al fonemoj estas simpla pro la fonemika karaktero de Esperanto.

La elirsignalojn produktas la parolsintezilo regebla per 10 parametroj. Baza parto de la sistemo transformanta tekston al parolo estas la sonelementaro. Tiu enhavas sonelementojn, kiuj certigas la generon de la parolsono kaj sonligoj. La kvalito de la parolo dependas de la sonsegmentaro. Por Esperanto oni ellaboris 220 segmentojn en pluraj ŝtupoj. Per konvena algoritmo kunmetante la sonsegmentojn ĉiu ajn skribita teksto transformeblas al parolo. Por kunmeti unu vorton oni devas uzi plurajn segmentojn, ekz. por unusekunda parolo oni devas enigi 25 parolsegmentojn. Post la transformo de teksto al parolsonkodoj haveblas la fonetika varianto de la elparoligenda teksto. Poste prilaboriĝas parolsonvico helpe de 950 reguloj, priskribantaj prononcon de sonoj aŭ sonligoj kaj ilian daŭron. En Esperanto plej oftas kombinoj de konsonanto kaj vokalo kaj kombinoj de likvido kun alia konsonanto, kiujn oni aparte priatentis. Aldoniĝis akcentado sur la antaŭlasta silabo, kies vokalon oni en malfermitaj silaboj plilongigis. Poste aldoniĝis intonacio.

La sintezita parolo utilas por parolaj mesaĝoj de la komputilo, krome ĝi tre taŭgas en la lingvoinstruado por ekzerci la lernitan materialon (ekz. diktado de la maŝino), plue ĝi uzeblas por elparolo de enkomputilaj tekstoj, ekz. ĉe provlegado de komputile kompostitaj tekstoj. Ligite al optika legilo ĝi povas laŭtlege por blinduloj. Ekzistas multaj parolaj ludprogramoj kaj informaj programoj, pretiĝas instruprograme por Esperanto.

Pliprofundiga literaturo

Aperis en la sama, supre menciita kolekto la artikolo de *Koutny, I., G. Olaszy: Fonetika fono kaj realigo de esperantlingva elektronika parolgenero*, sur la paĝoj 187-202.

6.3 Lingvoorientiga instruado

Europa Komunumo oficiale agnoskas, ke en la nuntempa Eŭropo apenaŭ eblas orientiĝi sen konoj de fremdaj lingvoj, kaj ke ĉiu eŭropano devos lerni minimume unu, sed plej bone du ĝis tri

fremdlingvojn por interkompreniĝi ene de sia vivospaco. La oficiale lanĉitaj instruprogramoj havas ellaboritan bazan aron da postulataj lingvokonoj por la Angla kaj por la Franca (threshold level, niveau seuil), sed la praktika disvastigo, precipe preparo de instruistoj kaj atingo de kontentigaj lingvokonoj kompareblaj kun la gepatra lingvo estas problemhavaj. Preskaŭ ĉie en Eŭropo estas instruata la Angla kiel la unua fremdlingvo, sed ĝia kono komparebla kun tiu de la koncerna gepatra lingvo estas atingebla nur esceptkaze, ĉe la dua aŭ la tria fremdlingvo tiu ĉi kono eĉ malpli probablas. La instruistoj do serĉas diversajn metodojn, kiel plibonigi la fremdlingvajn konojn helpe de taŭgaj instrumentoj kaj diversaj perfektigoj de instruprocezo.

Klerigkibernetikistoj rigardas la aferon laŭ jena teorio: Mezuma plenkreskulo povas lerni dum unu minuto maksimume 40-50 bitojn da informacio (la preciza valoro dependas de la lernanto). Infano lernas malpli rapide ol plenkreskulo — la lernrapideco C dependas de la aĝo. La tuta lernita informacio I enhavas la postulatan lernendaĵon, sed ankaŭ multajn krominformojn. Pro nelerteco de la instruisto, pro nesufiĉa intereso de la lernanto, pro perturboj en la lernĉirkaŭaĵo kaj similaj kialoj estas en la praktiko celkonforme uzata nur certa parto de la lernkapablo de la lernanto, nomata efikanco. (Krom la postulata instruaĵo kunlernas la lernanto aron da negravaj aferoj, ekzemple kiel aspektas aŭ kondutas la instruisto). La informacio $I(t)$ lernita dum tempo t rezultas el la formulo $I(t) = \eta \cdot C \cdot t$, (η efikanco, C lernrapideco). La procentaĵo de la tuta informacio I_0 , kiun jam la lernanto akiris dum certa instrutempo, estas nomata "kompetenteco" kaj la proporciecfaktoro inter la kompetenteco kaj la lerntempo estas "lernfacileco" λ . Laŭ $\lambda = \eta \cdot C / I_0$ validas, ke la lernado estas des pli facila, ju pli granda estas la efikanco de la instruado, ju pli rapide oni lernas, kaj ju malpli da informacio estas lernenda. La kompetenteco de la lernanto do dependas de la facileco de la lernaĵo kaj de la necesa lerntempo. Por plialtigi la kompetentecon, t. e. konojn de la instruaĵo, ekzemple de la fremdlingvo, la instruistoj deziras aŭ akiri ĝis la fino de lerneja jaro pli altan kompetentecon de siaj lernantoj ol ĝis nun, aŭ atingi la ĝisnunan kompetentecon pli frue.

Triviala maniero por ŝajne plenumi ambaŭ kriteriojn de plibonigo estas plej ofte postulita kaj elprovita: la komenco de la instruado de la angla lingvo jam en la elementa lernejo, kutime do jam al ok- aŭ naŭjaraj infanoj dum du semajnaj studhoroj. Tiam la lernantoj logike montras je la fino de la posta lerneja jaro pli altan kompetentecon ol samklasanoj sen tiu antaŭa instruado, sed la supereco de la pli frue komencintaj lernantoj pli kaj pli malkreskas dum la sekvaj lernejaj jaroj. La plifruigo de la instruado de la angla lingvo tial ne havigas tempoŝparon, sed, kontraŭe, postulas pli da lerntempo, kiu en la fruaj lernojaroj malpligrandigas la tempon disponeblan por lerni la kalkuladon, la skribmanieron de la gepatra lingvo aŭ aliajn gravajn instruaĵojn, se oni ne volas redukti la liberan ludtempon de la infanoj. Se oni disponigas la saman lerntempon kiel kutime al la instruado de la angla lingvo, ties plifruigo ne kaŭzas plibonigon de la lernsukceso, ĉar ĝi ne kaŭzas pli altan lernfacilecon de la angla lingvo.

Kontraŭe al la kutima (kaj sensenca) plifruigo de la instruado de fremda etna lingvo la tielnomata "lingvo-orientiga instruado" (**LOI**) celas per iu taŭga preparado de la lernanto plifaciligi la lernadon de la angla (aŭ alia etna) lingvo. Kompreneble, ankaŭ LOI postulas certan lerntempon. Por pruvi ĝian taŭgecon oni povas starigi du konkurencajn grupojn. La unua grupo tuj komencas lerni la anglan lingvon, la alia grupo dum la sama tempo ankoraŭ ne lernas la Anglan, sed ricevas certan lingvo-orientigan preparon kaj komencos lerni la Anglan pli poste. Tiam ĉi tiu prepar-instruado efikas tiel, ke la posta lernado de la Angla estas pli facila. Tio signifas, ke post certa tempo la grupo ĝuinta lingvo-orientigan instruadon preterkuras la konkurencajn grupon sen preparo startintan. Kompreneble ambaŭ grupoj pro la lerntempo jam antaŭe elspezita daŭre superos siajn samaĝulojn, kiuj lernas la Anglan tradicimaniere. Sed nur la grupo ricevinta lingvoorientigan instruadon, ekde certa kompetentecnivelo en la angla lingvo, ŝparas pli da tempo ol ĝi antaŭe estis elspezinta. Kial? Ĉar la antaŭ-informo plifaciligas la lernadon de instruaĵo tiel, ke la progreso de la orientita grupo estas pli granda.

Por facile klarigi tian fenomenon oni uzu simplan ekzempleton: Kiom da tempo bezonus la "neorientita" leganto por parkeri jenan frazon: *Alicaf ilp satse odanrel al.? Eble unu minuton? La "orientigo", kiu daŭras kelkajn sekundojn, instruas la leganton, ke oni legu de malantaŭe — kaj jen la frazo estas lernebla en ono da tempo. La "orientigo" do konsiderinde plifaciligis la lernadon per malpligrandigo de informacio kaj sekve malplilongigo de tempo bezonata por lerni. La samon celas LOI, prezentante antaŭ la komenco de la fremdlingva instruado taŭgan instrumodelon, plifaciligantan la postan komprenon de lingvostrukturoj.*

En la instruado de natursciencoj oni jam delonge uzas pedagogie taŭgajn modelojn de la instruaĵo antaŭ ol prezenti la aĵon mem. Oni malŝparas iomete da tempo por prepari la lernanton al nova instruaĵo, kiun li tamen laŭ la modelo pli bone komprenas kaj tiel ŝparas multe pli da tempo poste. La modelo, uzata dum la instruado, devas esti:

- simpla, por ke ĝi ne atentigu pri kroma informo, kiu ne estas esenca por la instruinda strukturo
- regula, por ke ĝi ne atentigu pri esceptoj kaj diferencoj de iu paradigmo
- disigebla, tiel ke oni dise povu instrui la lernelementojn, eĉ se ili estas en la objekto interplektitaj.

Se temas pri la modelo de lingvo, ĝi devas do enhavi ĉion, laŭ kio oni komprenu ĝenerale, el kio konsistas la lingvostrukturo kaj laŭ kiaj reguloj la lingvo funkcias. Ĝi do havu, se temas pri eŭropeca lingvo:

- klarajn gramatikajn kategoriojn (substantivo, adjektivo, verbo...) facile rekoneblajn, ekzemple per konstanta finaĵo
- facilan, senesceptan, superrigardeblan fleksion (ekz. prepozician deklinacion, konjugacion kun pronomoj, senesceptajn verbajn finaĵojn)
- logikajn kaj regulajn vortmodelojn (ekzemple konsekvenca formon de demandaj kaj demonstrativaj korelativoj)
- unusignifajn radikojn (eĉ sufiksojn) kaj aglutinan vortkreadon
- firmajn gramatikajn regulojn

La modelo ĝenerale ebligas kreadon laŭ lernita algoritmo, do aktivecon de la lernanto surbaze de firmaj reguloj. Tio apenaŭ eblas en natura lingvo (hazarde oni prenu ekzemplon de pluralkreado en la Germana: Haus — Häuser, sed Maus — Mäuse. En la Ĉeĥa simile: les — lesy, sed pes — psi). Klaras, ke kiel modelo por lingvoinstruado taŭgas nur logike konstruita lingvo, do planlingvo. La Internacia Lingvo de D-ro Esperanto estas tia pedagogie taŭga modelo, estante simpla (ekz. sen konjugaciaj finaĵoj, ĉar la persono estas kodita per pronomo), regula (la gramatiko sen esceptoj) kaj disigebla pro sia aglutineco, ebliganta rekoni ĉiujn elementojn. Tial ĝi estas modelo facile lernebla, malfermanta la lernkapablon de la lernanto por fremdaj lingvoj. Kontraste al la Esperanto-instruado LOI ne baziĝas sur la supozo, ke Esperanto estu antaŭvidita komuna dua lingvo por Eŭropo kaj tiam taŭga instruaĵo jam por la elementa lernejo. LOI utiligas anstataŭe la facilecon de tiu ĉi planlingvo por vekti helpe de tiu lingvomodelo (kiu tiucele ne estas komplete lernenda) komprenon por lingvaj strukturoj kaj intereson por fremdlingvoj.

.....Ĝuste por la posta lernado de la Angla kaj precipe de Romanaj lingvoj taŭgas Esperanto kiel propedeŭtiko, ĉar ĝia vortprovizo enhavas ĉ. 70% da "internaciaj" vortoj, kiuj dank' al la komuna kultura heredaĵo troviĝas en la plejmulto de la menciitaj etnolingvoj. Ili ĉefe devenas de la Latina,

de kie ili estis transprenitaj kaj kultivataj per eŭropaj nacioj, kelkaj tamen estis transprenitaj rekte de la Angla. Por la lernanto poste validas lingvistika transfero, se li do devas ekz. analizi vortojn kiel "bird", "street", "help", "learn", "soup", nomojn de la monatoj, numeralojn ktp., li ne plu bezonas lerni la signifon de koncernaj vortoj. La ĉefajn gramatikajn trajtojn, do ekz. vortkategoriojn, fenomenojn de konjugacio, komparado ktp. la lernanto jam ankaŭ pli bone komprenas ol se li devus fari komparon kun la propra gepatra etnolingvo, kiu enhavas aron da malregulaĵoj kaj esceptoj. Tiel oni logike ŝparas tempon kaj energion dum la "orientita" instruado de la Angla aŭ de alia eŭropa lingvo.

Jam antaŭ praktika pruvo de la menciitaj klerigkibernetikaj teorioj ekzistis propedeŭtikaj eksperimentoj kun Esperanto. En la dudekaj jaroj de nia jarcento (komenco de la eksperimento estis en 1919) uzis ĝin knabina mezlernejo en Durham, Britio, por poste pli bone lerni la Francan. Unu klaso lernis duonjaron Esperanton, la paralela klaso lernis samtempe la Francan. Sekvan jaron lernis ambaŭ klasoj la Francan kun la rezulto, ke la Esperanto-klaso procedis pli rapide kaj pli kompreneme.

Pli vastan eksperimenton organizis en la jaroj 1928-1931 IALA (International Auxiliary Language Association) sub la gvidado de Helen S. Eaton en Usono kaj en Eŭropo. Observataj estis la efikoj de LOI al la postaj rezultoj en la Angla (do la gepatra lingvo) kaj en la fremdlingvoj la Franca kaj la Latina. En la supera lernejo en Novjorko lernis la eksperimenta klaso Esperanton laŭ speciala lernolibro de H. S. Eaton, la paralela klaso lernis la Francan laŭ speciala metodo, kaj la tria klaso la Francan laŭ klasika metodo. Dum la sekvanta lernojaro, kiam ĉiuj tri klasoj samkvalite lernis la Francan, estis ĉe la Esperanto-lernintoj observataj pli bonaj rezultoj kaj en la gepatra, kaj en la fremdlingvoj.

Similan eksperimenton, kun helpo de precizaj testoj pri ĝenerala kaj verbala inteligenteco, organizis dum kvar jaroj (1947-1950) J. H. Halloran en gimnazio en Sheffield, Britio, kun kvar klasoj, do proksimume kun 120 lernantoj. La specialaĵo estis, ke la kvar klasoj reprezentis po du inteligentec-nivelojn (ĝenerala kaj verbala), el kiuj ĉiam unu ricevis LOI, kaj la dua, saminteligenta, la instruadon de la Franca. Post la posta komuna lernado de la Franca ili estis zorgeme ekzamenitaj — la testoj enhavis tradukon el kaj en la Francan, komprenon de aŭdita kaj de skribita tekstoj, gramatikan, leksikan kaj konversacian parton. La plej interesaj rezultoj montriĝis en la testo pri vortprovizo — la lernantoj devis serĉi korespondantajn tradukojn de francaj vortoj en la gepatra lingvo kaj krome kompletigi mankantajn vortojn en fremdlingvaj frazoj. Ĉe la du grupoj kun pli granda inteligenteco estis la rezultoj similaj — do kaj la frua lernado de fremdlingvo, kaj LOI estis samavantajaj, sed ĉe malpli inteligentaj grupoj estis la rezultoj de Esperanto-lernintoj pli bonaj ol ĉe la lernintoj de la Franca.

En finnlanda urbo Somero oni organizis instruadon de Esperanto kiel unua fremdlingvo en mezlernejo en la jaroj 1958-1963 por observi, ĉu ĝi helpas en la posta studado de la Germana. Kiel la unua fremdlingvo en paralelaj klasoj estis instruataj ankaŭ la Angla kaj la Germana. La rezultoj de la observataj studentoj post dujara studado de la Germana ne estis malpli bonaj ol de tiuj, kiuj lernis la Germanan unu jaron pli longe. Krome oni observis pli aktivan kaj kreivan studaliron kaj pli grandan memfidon de la "orientitaj" lernantoj.

La lastan de la serio de "antaŭkibernetikistaj" eksperimentoj faris la hungara interlingvisto István Szerdahelyi en la jaro 1970. Li havis je dispono klason da hungarlingvaj lernantoj, kiuj unue estis lernintaj Esperanton, kaj poste la grupo dispartiĝis por lerni aŭ la Rusan, aŭ la Germanan, aŭ la Anglan, aŭ la Francan. Pro la antaŭa LOI la grupo lernanta nun la Rusan havis 25%an plifaciligon. La redukto de malfacilo de la Germana estis 30%, de la Angla 40% kaj de la franca eĉ 50%, do resume oni ŝparis ĉ. 250 intruhorojn en la mezlernejo.

En la sama jaro komencis sub la gvidado de Prof. Szerdahelyi la unua kvinlanda eksperimento — partoprenis Austrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio, kun la celo pruvi, ke Esperanto ne nur estas taŭga propedeŭtiko por la lernado de fremdlingvoj, sed ankaŭ helpas pli bone regi la gepatran lingvon, estante krome pli facile lernebla ol etnolingvoj. Post la trijara lernado en koncernaj landoj estis unuece testitaj la konoj de la lernantoj kompare kun la lingvoj germana, angla, itala kaj rusa. Evidentiĝis, ke la lernantoj multe pli bone scipovis esprimi sin en Esperanto ol en aliaj, samlonge studataj fremdlingvoj.

La dua kvinlanda eksperimento komencis en la jaro 1975 kun partopreno de lernantoj el Belgio, Francio, Grekio, Germanio kaj Nederlando. La akiritaj konoj estis kelkfoje testitaj kaj pruvis pli facilan lerneblon de Esperanto kompare kun la Angla.

En Germanio partoprenis la eksperimenton laŭ "paderborna modelo" en la jaroj 1975-1984 sescento da lernantoj de elementa lernejo. La precipaj ecoj de la modelo, ellaborita en FEoLL (Forschungs- und Entwicklungszentrum für objektivierte Lern- und Lehrverfahren) estis:

- lingvoorientiga instruado okazis en la tria kaj kvara lernojaroj dum du horoj posemajne
- oni uzis aŭdvidajn metodojn, diversajn didaktikajn helpilojn kaj maŝinojn
- ne estis instruita la tuta lingvo, sed por la infanoj taŭga parto de gramatiko kaj vortprovizo
- instruataj estis lernantoj de diversaj gepatraj lingvoj, tiel ke ili povis baldaŭ interkomuniki en la lernita lingvo.

Ankaŭ ĉe germanaj lernantoj evidentiĝis, ke ne nur la rezultoj en la Angla, sed ankaŭ en la gepatra lingvo estas ĉe "orientitoj" pli bonaj. Kiel kromrezulto helpis LOI ankaŭ en matematiko, ĉar la lernantoj ne timis logike pensi, dedukti kaj uzi algoritmojn, kiel ili lernis en la senescepta lingvo, kaj eĉ en geografio, ĉar la lernantoj interesiĝis pri landoj, kie oni ankaŭ lernis la samon (kaj kun kiuj oni korespondadis). LOI kreskigis ankaŭ la intereson de la lernantoj pri la eŭropaj lingvoj kaj ilia parolantaro, kio estis alia pozitiva kromrezulto. Lernantoj ne partoprenintaj LOI-n en la elementa lernejo bezonis ĉ. 35% pli da tempo ol lernantoj post dujara LOI por atingi la saman nivelon en la angla lingvo, kaj ĉ. 20% pli ol tiuj, kiuj partoprenadis LOI dum unu jaro. Aliel kalkulite, 160 studhoroj da LOI kaŭzis ĉe la posta instruado de la angla lingvo ĉ. 26%-an reduktion de la bezonata lernotempo, 80 studhoroj ĉ. 17%-an reduktion. Surbaze de tiuj ĉi spertoj eblas legitimi la jenajn klerigpolitikajn rekomendojn:

- En eŭropaj elementlernejoj okazu dum la tria kaj kvara lernojaro LOI anstataŭ la tro frua instruado de etna fremdlingvo
- Lernantoj, kiuj montras nesufiĉan progreson en la poste instruata etna fremdlingvo, estu liberigitaj de ĝi kaj anstataŭe ricevu komunikadkapablon en la Internacia Lingvo (kiu ĝis nun servis nur por LOI)
- Ĉiuj aliaj lernantoj havu en mezlernejo la eblon ne nur lerni (pro LOI pli rapide) almenaŭ du eŭropajn etnolingvojn, sed ankaŭ libervole perfektigi en aktiva lingvouzo de la Internacia Lingvo.

Tiuj ĉi rekomendoj radikas en la teorie kaj empirie bazitaj ekkonoj pri la lernfacileco, kiun eblis atingi por la simple, regule kaj modulare evoluigita planlingvo sen perdo de esprimpovo, kaj pri la lernplifaciligado, kiun kaŭzas la propedeŭtika instruado de la internacia lingvo (kiel fremdlingvomodelo pedagogie taŭga) por pli rapida lernado de etnaj fremdlingvoj. Krome, LOI kreskigas la kapablon almenaŭ kompreni plurajn eŭropajn fremdlingvojn kaj pli efike uzi ilin.

Menciindas ankaŭ la eblo ricevi tiel konkretan opcion por la komuna eŭropa interkompreniĝlingvo, pri kies ekzisto oni tiom multe teoriumas.

Pliprofundiga literaturo

Ĉiam en la sama kolekto artikolo de *Frank, H.: Propedeŭtika valoro de la internacia lingvo*, sur la paĝoj 59-70. Pluaj samtemaj kontribuaĵoj troviĝas en la kolekto *Barandovská (eld.)*, 1993 (vidu ĉe 1.2).

6.4 Demandaro

33. Nomu almenaŭ tri kampojn de praktika apliko de planlingvoj.